

Cibulevskij D.M.

A S E

(Asocio de Sovetiaj Esperantistoj)

Historiaj notoj

Ĥarkiv

2000

Cibulevskij D.M.

ASE

(Asocio
de
Sovetiaj
Esperantistoj)

• *Historiaj notoj* •

Ĥarkiv
2000

Ц-56

Cibulevskij Dmitrij Miĥajloviĉ
ASE (Asocio de Sovetiaj Esperantistoj).
Historiaj notoj

Цыбулевский Дмитрий Михайлович
АСЭ (Ассоциация Советских Эсперантистов).
Исторические заметки
На языке эсперанто

Kontrolita kaj redaktita de:
Aroloviĉ Viktor Semjonoviĉ (Moskvo) kaj
Samodaj Vladimir Vladimiroviĉ (Moskvo)

Fotoj de I.G. Gonĉarova, V.V. Samodaj k.a.

© Dmitrij M. Cibulevskij, 2000

LISTO DE MALLONGIGOJ

"A"	— "Aktuale", periodaĵo de SEJM;
AESSR	— Asocio de esperantistoj en Slovaka Socia-lisma Respubliko;
AOKS	— (ruse) Armena Societo de Kultura Ligo [kun eksterlando];
APN	— (ruse) Presagentejo "Novaĵoj";
ArtVER	— Arta Volgia Esperanto-renkontiĝo;
ASE	— Asocio de Sovetiaj Esperantistoj;
BEA	— Bulgara Esperantista Asocio;
BEK	— Baltlanda E-Kongreso;
BET	— Baltlanda E-Tendaro;
CED	— Centro de Esploro kaj Dokumentado;
CK	— Centra Komitato (de);
cm	— centimetroj;
CRER	— Centro-Rusia regiona E-renkontiĝo;
ĉ.	— ĉirkaŭ;
ĈEA	— Ĉeĥa E-Asocio;
DA	— Domo de Amikeco;
d-ro	— doktoro;
E	— Esperanto;
EAE	— Esperanto-Asocio de Estonio;
EKRELO	— Eldon-Kooperativo por Revolucia Esperanto-Literaturo;
ekz.	— ekzemple;
EVA	— Esperantlingva Verkista Asocio;
FEJA	— Fondaĵo de Esperantistaj Junularaj Aranĝoj;
FK	— (La) Fonda Konferenco (de ASE);
GDREA	— E-Asocio en Kulturligo de GDR;
GeIERT	— Gelsenĵika E-renkontiĝo de turistoj;
Glavlit	— (ruse) "Ĉefa Administrejo pri Aferoj de Literaturo kaj Eldonejoj";
Gorlit	— (ruse) urba filio de Glavlit;
GOSINTI	— (ruse) Ŝtata Instituto de Scienc-teknika Informado;
GULAG	— (ruse) Ĉefa Administracio de koncentrejoj;
HEA	— Hungara E-Asocio;
FOP	— (ruse) Fakultato de Sociaj Profesioj;

ASE (Asocio de Sovetiaj Esperantistoj)

FET	—	Familia E-Tendaro;
i.a.	—	inter aliaj;
ILEI	—	Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj;
ilus.	—	ilustrita;
IMK	—	Instru-metodika komisiono;
IMKI	—	Informilo de Instru-metodika komisiono (en Ukrainio);
IML	—	Instru-metodika laboro;
InterSEJT	—	Internacia Esperantista Junulara Tendaro;
ISAE	—	Internacia Scienca Asocio Esperantista;
ISEU	—	Internacia Somera E-Universitato;
IUEF	—	Internacia Unuiĝo de la Esperantistoj-Filologoj;
JS	—	junulara sekcio;
k.a.	—	kaj aliaj;
KARE	—	Kieva Arta Rondo Esperantista;
k-do	—	kamarado;
KEK	—	Kolektivo Esperantista Komunista;
KGB	—	(ruse) Komitato de Ŝtata Sekureco;
KGS	—	Klubo de gajaj kaj spritaj;
KID	—	(ruse) Klubo de Internacia Amikeco;
KMO	—	(ruse) Komitato de Junularaj Organizaĵoj;
KOR	—	Kiŝinev-Odesa renkontiĝo;
KPSU	—	Komunista partio de Soveta Unio;
k.s.	—	kaj similaj;
ktp	—	kaj tiel plu;
LatEA	—	Latvia E-Asocio;
LEA	—	Litova E-Asocio;
LK	—	Lingvistika Komisiono;
LKSMU	—	(ruse) Ukraina Respublika Lenina Ko-munista Unio de Junularo;
LR	—	Labora Renkontiĝo;
LetER	—	Leningrada turista E-Renkontiĝo;
LETo	—	Lemejana E-Tendaro;
MAJE	—	Moskva Asocio de Junaj Esperantistoj;
MCEK	—	Moskva Centra E-Klubo;
MEM	—	Mondpaca Esperantista Movado;
MIEK	—	Moskva Internacia E-Klubo;
MLEK	—	Moskva Literatura E-klubo;
MoskvEJT	—	Moskva Esperantista Junulara Tendaro;

Historiaj notoj

nask.	—	naskiĝis;
NATO	—	(angle) Nordatlantika unio;
Obllit	—	(ruse) provinca filio de Glavlit;
OK	—	(La) Organiza Komitato (de la FK);
OkSEJT	—	Sovetia Esperantista Junulara Tendaro de Eŭropa (okcidenta) parto de USSR;
OrSEJT	—	Sovetia Esperantista Junulara Tendaro de Azia (orienta) parto de USSR;
OSER	—	Okcident-Siberia E-renkontiĝo;
p.	—	paĝo(j);
PEA	—	Pola E-Asocio;
PIF	—	Pupteatra Internacia Festivalo;
pr.	—	proksimume;
prez.	—	prezidanto;
prof.	—	profesoro;
PSLP	—	Pola Social-laborista partio;
red.	—	redaktis;
REK	—	Renkontiĝo de Esperantistoj-kantemuloj;
REVU	—	Renkontiĝo Esperantista de Volgo-Urala Regiono;
rim.	—	rimarko;
RSFSR	—	Rusia Soveta Federacia Socialisma Respubliko;
SAT	—	Sennacieca Asocio Tutmonda;
s-ano	—	samideano;
SEA	—	Slovakia E-Asocio;
SEJM	—	Sovetia Esperantista Junulara Movado;
SEJT	—	Sovetia Esperantista Junulara Tendaro;
SEU	—	Sovetrespublikara Esperantista Unio;
soc.	—	socialisma;
STK	—	Scienc-teknika Komisiono;
SSOD	—	(ruse) Unio de Sovetiaj Societoj de Amikeco kaj Kultura Ligo kun Eksterlando;
t.e.	—	tio estas;
TEJO	—	Tutmonda Esperantista Junulara Organizo;
t.n.	—	tiel nomata;
TPK	—	Tutmonda Packonsilantaro;
trad.	—	tradukis;
TTV	—	Tutmonda Tago de Viroj;

ASE (Asocio de Sovetiaj Esperantistoj)

TUEK	—	Tutunia Unuiĝo de E-Kluboĵ;
UEA	—	Universala E-Asocio;
UES	—	Urala E-Societo;
UK	—	Universala Kongreso de Esperanto;
UkrEA	—	Ukrainia Esperanto-Asocio;
ul.	—	(ruse) strato;
UNESCO	—	(angle) United Nations Educational, Scientific and Cultural Organization (UNO-orga-nizaĵo pri edukado, scienco kaj kulturo);
UNO	—	Unuiĝintaj Nacioj;
UREU	—	Ukraina Respublika Esperanto-Unuiĝo;
URF ASE	—	Ukraina respublika filio de ASE;
URSK	—	Ukraina respublika sindikata konsilantaro;
USSR	—	Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj;
UzER	—	Uzbekia E-Renkontiĝo;
v.	—	vidu...
VAĤ	—	Vintro apud Ĥarkovo (ripoza E-Renkontiĝo);
VAZ	—	Vintro apud Zmijovo (ripoza E-Renkontiĝo);
VCSPS	—	(ruse) Tutunia Centra Konsilantaro de Sindikatoj;
VER	—	Volgia E-Renkontiĝo;
VLKSM	—	(ruse) Tutunia Lenina Komunista Unio de Junularo;
VNMC	—	(ruse) Tutunia Scienca Metodika Centro;
VolgEJT	—	Volgia Esperantista Junulara Tendaro;
VPEA	—	Vjetnama Pacdefenda E-Asocio;

ANTAŬPAROLO

*Vivis ni trankvile
En kutima SEJM.
Estis ĝi por ĉiuj ni.
Kvazaŭ kara hejmo.
Sed aperis kaŭzo
Por ĉiesa mir':
Pri l'kondiĉoj novaj
Venis onidiri"*

* * *

*"Aĥ, malordo, malordo, malordo!
Aĥ, teruro, teruro, teruro!
La arogajn esperantistojn
Devas ni tuj ordigi nepre.
Ni por fondi la Asocion
Tuj kunvoku noblan socion!
Ĉu inviti esperantistojn?
Kelkajn — memkompreneble!"*

Ne estis ankoraŭ finita la laboro pri verkado de "SEJM. Historia skizo", sed en la kapon venis jam la ideo pri la dua verko — priskribi la historion de ASE. Ja ankaŭ tiu periodo en la landa E-movado estas siaflanke interesa — kiel agis ASE, kiuj en ĝi aktivis, kiuj kaj kio malhelpis, bremsis la laboron; kion oni planis kaj kion malsukcesis...

Notinte proksimuman planon de tiu nova libro, mi komprenis — sen helpo de almenaŭ kelkaj esperantistoj, sen arkivaj materialoj ne eblos kvalite prilumi la tuton. Kiam en USSR funkciis SEJM, kiam la tuta E-movado estis fakte "centralizita", ni ĉiuj sciis pri diversaj eventoj kaj ties detaloj, sendepende de tio, en kiu angulo de la lando tio okazas.

Dum ASE-periodo la situacio ŝanĝiĝis. Krom ASE mem en uniaj respublikoj diversaktive agis respublikaj filioj de ASE, pri kies aktivecoj plej kompetentaj estas lokaj esperantistoj.

Do, prilaborante tiun ĉi libron, mi unuavice atentis la momentojn de la agado, kiujn mi bone scias, kiujn partoprenis...

¹ El E-kantoj de M. Bronŝtejn.

En la laboro helpis al mi Vladimir V. Samodaj, Leo B. Vulfoviĉ, Nikolaj B. Zubkov, Viktoro S. Aroloviĉ (ĉiuj — el Moskvo); Je-katerina V. Majburova kaj Vladimir A. Miŝĉenko (ambaŭ — el Kievo), Adomas Vaitilavičius (Vilnius) kaj Povilas K. Jegorovas (Kaunas), multaj aliaj esperantistoj. Apartan mencion meritas Viktoro S. Aroloviĉ, kiu kelkfoje rerigardis la libron kaj faris tre gravajn konsilojn kaj korektojn. Same kiel la unua mia verko pri SEJM, tiu ĉi libro povas esti kiel startlaboro por plua pli profunda scienca studo de tiuperioda E-movado.

Kaj ankoraŭ unu nuanco: ĉie tra la libro en la esprimoj "nia lando", "landa E-movado" ks sub la nocio "lando" necesas kompreni la tutan teritorion de USSR, kia ĝi estis ĝis 1991 (inkluzive ĉiujn 15 sovetajn respublikojn), sed ne unusolan sendependan nun ŝtaton Ukrainion, kie mi naskiĝis kaj loĝas nun.

Dmitrij. Cibulevskij

SEJM — ASE. AŬ KIEL AGI PLUE

"...Kaj ordonis Kverk' majesta:
"Estu orda vivo besta!
Vulpo estu prezident' —
Sonis en la branĉoj vent', —
La fakulo pri brasiko,
Pri filiko kaj urtiko,
Kaj pri ĉiu manĝo-herb';
Estas eminenta cerb'!
Kaj leporon bona Vulpo
Ne ofendos ja sen kulpo!
Kaj lin helpos oficul',
La sekretari' — Betul'"²

Multajn jarojn batalis sovetiaj esperantistoj por oficialigo de sia organizaĵo. Se en la 20-aj — 30-aj jaroj oficiale ekzistis SEU, se tiuperiode floris E-movado en nia lando, kial do nun, post la Dua Mondmilito ne kresku vicoj de esperantistoj, ne aktivu la spertaj?..

Ankaŭ SEJM estis fondita kaj por unuigi enlandajn E-fortojn, kaj por montri al oficialuloj, kion povas fari esperantistoj por propagandi sovetan vivmanieron, multnacian sovetan kulturon eksterlande. En Regularo de SEJM estis notita:

"... Celoj de SEJM estas disvastigo, diskonigo kaj praktika utiligo de Esperanto por propagandi la sovetan ideologion kaj la kulturon de sovetaj popoloj eksterlande..."

Kaj SEJM-anoj, kaj E-veteranoj, kiuj aktivis ankoraŭ antaŭ la milito kaj reaktiviĝis post ĝi, sukcese batalis por la oficialiĝo, komprenante, ke oficiala E-organizaĵo povas fari multe pli, ol la neoficiala...

Kaj jen somere 1978 aperis onidiroj pri eventuala fondo de tiom longe atendata oficiala E-organizaĵo. Kvazaŭ partia CK cirkuleris ĝuste pri tio.

Se la onidiroj ne estos mistifikaĵo, kiel agu esperantistoj en "novaj kondiĉoj"? Ĉu SEJM plu ekzistu? Ĉu ni likvidu SEJM-

² B. Tornado (B.V. Tokarev) "La leporoj en arbar" — "Cerbe kaj kore"
N 7 (38)/1996, p. 3 (v. ankaŭ piednoton sur la p. 16)..

on kaj plene transiru labori en tiun novan nekonatan kaj sekve nekutiman por ni organizaĵon?

Ĝuste tio estis unu el la pridiskutitaj temoj dum la Konferenco de SEJM-Konsilantaro tiujara.

Plue la diskutoj pri SEJM — ASE daŭris surpaĝe de "Aktuale" — tiutempa SEJM-periodaĵo. La debatoj montris, ke por ĉiuj veraj esperantistoj de la lando la demandoj pri SEJM, pri ties sorto estis tre proksimaj al la koroj. Ĉu vere aperos ASE? Ĉu likvidi SEJM-on? Ĉu ASE helpas al esperantistoj en diversaj organizaj problemoj (tendaroj, renkontiĝoj, ejoj por kluboj...)?

Kaj se diri sincere, verŝajne estis pli facile fondi SEJM-on, ol ĝin likvidi por plue daŭrigi laboron enkadre de ASE.

Por ilustri tiujn debatojn mi ŝatus prezenti ĉi tie kelkajn citaĵojn el "Aktuale":

"...I. Pri niaj celoj

Kelkaj *gesamideanoj* eble jam nun kontente frotas la manojn, antaŭĝuante la baldaŭan estonton, kiam ili konvertos al E-ismo amasojn kaj amasojn.

Haltu!

Ne tio estu la ĉefa tasko en la nunaj kondiĉoj. Multe pli gravos KION ni faros, ol KIOMOPE. La lasta faktoro ESTIS unu el la decidaj ANTAŬ la oficialiĝo, ĉar laŭ ĝi oni povus juĝi nin aŭ kiel konsiderindan movadon aŭ kiel mizeran koterion. Ni estas akceptitaj kiel movadeto. Sekve por ioma tempo estas eble kaj preferinde zorgi malpli pri nia KVANTO ol pri la KVALITO..."

A. Melnikov, prezidanto de SEJM, el la artikolo "Meditoj por meditiĝi" — "Aktuale", N 3(57)/1978—1979, p. 33:

"...La eventuala fondo de la Asocio de Sovetaj Esperantistoj evidente okazos. Okazos ankaŭ la fonda Konferenco de ASE en SSOD. Do, la plej aktuala nia celo estu nasko de la Asocio *laborkapabla*, ne simila al kelkaj ekzistantaj. Por tio mi proponas al eventualaj delegitoj levi en la fonda Konferenco proksimume jenajn demandojn...

...Kaj laste mi kuraĝas eldiri unu proponon por SEJM-Konsilantaro. Mi proponas, ke malgraŭ eventuala fondo de la Asocio en decembro SEJM funkciu dum la transira periodo, t.e. ĝis la somero 1979, kiam la SEJM-Konferenco decidos ĝian sorton".

M. Bronŝtejn, Honora Aktivulo de SEJM, el la artikolo "Ne meditu ni senfrukte" — "Aktuale", N 3(57)/1978—1979, p. 36—37.

"La fondo de ASE okazas en atmosfero de sekreteco (ekz., ĝia statuto-projekto ne aperis en "A"). Nature, antaŭ membroj de SEJM-klubo levigas multajn demandojn. Ĉu ASE daŭrigos tradiciojn de SEJM, ĉu ĝi estos alirebla por ĉiu E-grupo? Kiu ĝin gvidos — ĉu tiuj, kiuj konas bone la movadon kaj bone rekomendigos en ĝi (ekz., A. Gončarov, B. Kolker, V. Arolovič, P. Jegorovas), aŭ tiuj, kiuj ĉiel evitis kontaktojn kun SEJM? Ĉu ne ĝenos gvidantojn de ASE laŭte rckoni meritojn de SEJM?..."

V. Ŝilas, Honora Aktivulo de SEJM, el la artikolo "Adaptiĝi al novaj kondicoj" — "Aktuale", N 4(58)/1978—1979, p. 48.

"Nia esperantistaro jam delonge strebis al oficialiĝo. Ĉiam al ni malhelpis necertaj rilatoj al nia movado, foresto de oficiala Sovetunia E-revuo ktp. Preskaŭ spontane, dank' al penoj de kelkaj ardaĵ kamaradoj ekestis SEJM — formo de kunlaboro de junularaj E-kluboĵ en nia lando. SEJM brile pruvis sian vivkapablon kaj fakte dum multaj jaroj estis la sola organiza forto de tuta E-movado en nia lando.

Kaj do, nun ni staras sur la sojlo de novaj grandaj kaj sendube pozitivaj ŝanĝoj — kreo de ASE...

...Likvido de SEJM devigus ASE komenci ĉion de nulo: la ellaboritaj kaj harditaj en praktikto spertoj en E-agado pereus, same kiel almenaŭ duono de la E-kluboĵ. Koscie fari tion ne eblas..."

G. Gercikov, el la artikolo "Ne decas rapido en grava decido" — "Aktuale", N 4(58)/1978—1979, p. 48-49.

"ASE estas fondata ne por anstataŭi SEJMon. Sekvas konkludo: SEJM ne nepre devas malfondiĝi. Tamen — unu el la celoj de SEJM estis ja atingi oficialecon por E-agado, kaj ĝiaj aktivuloj multon faris por antaŭprepari aperon de ASE. Sekvas la dua konkludo: post ekfunkcio de ASE necesos malfondi SEJMon kaj ekaktivi en kadroj de la oficiala ASE..."

V. Ŝilas, Honora Aktivulo de SEJM, el la artikolo "Honoran malfondon!" — "Aktuale", N 5(59)/1978—1979, p. 58.

"...Dum pli ol dudek jaroj esperantistoj agadis dise kaj kune, revante pri tiuj tempoj, kiam iliaj penoj estos agnoskitaj de la socio, de la instancoj. Tiu agado ne estis facila, ĉar ne multaj esperantistoj feliĉis estis kompreneblaj pri siaj revoj kaj streboj. Ne havante oficialan subtenon, ili ne povis ne agi meminitate. Ili instruis Esperanton, korespondadis kun eksterlandaj samideanoj, organizadis klubojn, penetradis internaciajn E-organizaĵojn kaj eĉ ties gvidorganojn, peradis abonadon al E-gazetaro kaj liveradis eksterlandajn E-librojn, eldonadis proprajn bultenojn kaj eĉ organizis tut-sovetian junularan E-movadon kun regionaj renkontiĝoj, tutlandaj tendaroj kaj ĝeneralaj konferencoj. Ĉio ĉi estis, ĉar ne povis ne esti..."

...ASE estas kreata por fini tiun neregatan aventuremon. por ordigi la E-agadon sub la kontrolo kaj kun helpo de SSOD, Komsomolo, Profesiaj sindikatoj. La preparon de la Regularprojekto por la Asocio partoprenis konataj esperantistoj kaj respondecaj neesperantistoj..."

...Ĉu malfondi SEJMon? Mi, unu el ĝiaj kunfondintoj kaj la nominto, ne povas tion sugesti. Ĝi devas resti kaj funkcii, aliforme, alinorme, enkadre de

ASE, sed same brave kaj pli sagace, ne forgesante, ke nia porsocia laboro PEResperanta kreas fortan bazon de la agado POResperanta".

V. Samodaj, Honora Aktivulo de SEJM, el la artikolo "Kion fari?" — "Aktuale", N 6(60)/1978—1979, p. 69, 78.

"La fondo de ASE estas ne supertaksebla, historia evento por la esperantista movado en USSR. Tiu ĉi evento estas entuziasme akceptita de esperantistoj en socialismaj landoj kaj ricevis pozitivan reeĥon ĉe progresemaj esperantistoj en ĉiuj aliaj landoj. Grandaj perspektivoj malfermiĝis por nialanda E-movado. Jam estas ellaborataj vastaj planoj de organiza, inform-propaganda, instrua kaj eldona laboro. ASE eniros en la internacian E-scenejon, kie ĝi sendube baldaŭ okupos lokon decan por nia potencega lando. Jam malfermiĝis por Esperanto paĝoj de diversaj centraj gazetoj, kiuj ĝis nun tute neglektis nian movadon.

En tiu ĉi situacio gravaj problemoj ekstaras por la sovetia esperantista junularo. SEJM faris grandan, modelan laboron en la periodo, kiam ĝi fakte estis la sola tutsovetia organizita movado. Agnosko de tiu ĉi fakto trovis respuguliĝon en konsisto de la gvidorganoj de ASE: pli ol dek SEJM-gvidantoj kaj aktivuloj estis elektitaj al la Estraro kaj ĝia Prezidio. Du el la kvar vicprezidantoj de ASE estas Honoraj Aktivuloj de SEJM. Estas fondita la junulara sekcio de ASE, kiun direktos la ĝisnunaj SEJM-gvidantoj...

...Ĉu en tiu ĉi situacio devas ekzisti SEJM, kiel paralela organizajo? Evidente, ne. La plej ĉefaj funkcioj de SEJM estas transdonitaj al la centra kaj respublikaj JS-oj. La lokaj junularaj kluboj certe restos same funkciantaj kiel ĝis nun kaj aliĝos kiel kolektivaj membroj al ASE..."

S. Podkaminer, Honora Aktivulo de SEJM, el la artikolo "ASE kaj nialanda junulara esperantista movado" — "Aktuale", N 7(61)/1978—1979, p. 89—90.

"Tiu ĉi tagon ni atendis dum pli ol 20 jaroj — ne nur atendis, sed laboris. Sen nia persista laboro tiu tago ne venus..."

...Verŝajne, neniuj foriris post la Konferenco malkontenta. Ni konservis la plej ĉefan: eblon aĝi laŭ nia bontrovo. Restos niaj tendaroj kaj renkontiĝoj: ili simple estos antaŭviditaj en la planoj de ASE. Ni kreis la junularan sekcion. En la Prezidiumon kaj Estraron de ASE eniris multaj konataj aktivuloj de SEJM..."

B. Kolker, Honora Aktivulo de SEJM, el la artikolo "La fondiĝo de ASE: rezultoj kaj perspektivoj" — "Aktuale", N 7(61)/1978—1979, p. 90.

Mi prezentis ĉi tie sufiĉe multe da diversaj opinioj pri la sorto de SEJM kaj pri la plua agado de nia E-junularo. Estas videble, ke la plimulto, tamen, estis por tiu larmiga decido — por SEJM-likvido. Ja en novaj kondiĉoj vere SEJM, kiel neoficiala organizajo, ne povis ekzisti. Se ĝis ASE-fondiĝo oni po-

vus argumenti, ke en la lando ne ekzistas iu alia Eorganizajo, do post la apero de ASE tiu argumento forvaporiĝis.

ORIGINO (PREPARA PERIODO)

"...ni decidis ordigi la tiel nomatan esperantistan movadon. Certe, ne mi persone, li montris kulimgeste al la plafono, - jen kie aperis tiu decido. Ni jam finfaris grandan preparan laboron.

Mi povas diri al vi, knaboj, ke demando pri la Asocio de esperantistoj supre estas respondita pozitive..."²

Multfojaj, senĉesaj, seninterrompaj ĉiuf flankaj perleteraj kaj personaj atakoj de niaj esperantistoj al Centraj Komitatoj de la Komunista partio kaj Komsomolo, al sindikatoj, al aliaj superaj instancoj; maltrankviliga agado de SEJM influis fintime aperon de "cirkuliera letero" de la partia CK, kie temis pri neceso fondi en USSR tutlandan E-organizaĵon (v. la suplementan parton).

Simila letero tiutempe ĉiam estis konsiderata ne malpli ol ordono agi ĝuste tiel, kaj la postaj kunfondintoj de ASE — SSOD, CK de VLKSM kaj VCSPS — la 27-an de decembro 1978 akceptis komunan decidon "Pri organizo de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE)".

En la decido estis nomita ankaŭ Organiza Komitato de la Fonda Konferenco de ASE, kiu komencis prepari projekton de Regularo de ASE kun indiko de ties celoj kaj taskoj.

Kvinopo de tiu listo (M.M. Pesljak, G.J. Kanajev, V.G. Naĥodkin, R.R. Saakov, A.V. Berjoza) reprezentis siajn organizaĵojn (SSOD, VCSPS, VLKSM); ankoraŭ tri (S.N. Podkaminer, A.I. Koroleviĉ, E.E. Kuuskül) apartenis al nemoskvanoj kaj eĉ ne ĉiam estis vokataj al la kunsidoj de la OK (kiel ni vidos poste — tia estis la "politiko" de SSOD-Estraro). Sed estis aldone formita "apud-OK-a sekretario" el 4 personoj (Irina

² El la libro de M. Bronŝtejn "Oni ne pafas en Jamburg"

Valina⁴, Viktoro Aroloviĉ, Paŭlo Jegorovas kaj Ludmila Lopatina — filino de J.A. Bokarev) subgvide de A.V. Berjoza, el kiuj la unuaj du personoj vere multe kontribuis al la prepara laboro.

Ne ĉiuj OK-membroj aktivis. Respeguli la bildon de partopreno en kunsidoj de la OK helpas la aldonata tabelo.

TABELO DE PARTOPRENO EN OK-KUNSIDOJ

Membroj de la OK kaj helpantoj	20.12. 1978	25.01. 1979	21.02. 1979	11.03. 1979
A. Membroj de la OK:				
1. Pesljak M.M.	+	+	+	+
2. Kanajev G.J.	+	—	—	—
3. Nahodkin V.G.	+	—	—	—
4. Isajev M.I.	+	+	+	+
5. Saakov R.R.	—	—	—	—
6. Berjoza A.V.	+	+	+	+
7. Makovskij A.I.	+	+	+	+
8. Samodaj V.V.	+	+	+	+
9. Paŝĉenko M.F.	+	+	+	+
10. Perevalov D.A.	+	+	+	+
11. Podkaminer S.N.	+	—	—	—
12. Koroleviĉ A.I.	+	—	—	—
13. Kuuskül E.E.	+	—	—	—
B. Helpantoj de la OK:				
1. Aroloviĉ V.S.	+	+	+	+
2. Valina I.G.	+	+	+	+
3. Jegorovas P.K.	?	—	—	—
4. Lopatina L.J.	?	—	—	—

Kiel estas videble, entute okazis 4 kunsidoj de la OK, dum kiuj oni pridiskutis la tagordon de la FK, la prelegon dum ĝi (la prelegon preparis M.I. Isajev), la delegitaron, la gvidorganojn de ASE, aliajn demandojn.

En sia cirkulera letero al SEJM-Komitatanoj (22.12.1978) Viktoro Aroloviĉ tiel priskribas la unuan kunsidon de la OK:

⁴ La familinomon *Valina* ŝi en 1980 ŝanĝis al *Gorĉarova* kaj plue en la teksto estos renkontata sub la nova familinomo.

"...ĉeestis ĉiuj OK-anoj, krom la malsana Saakov. Pesljak informis pri la ĵusa (19.12) decido de la SSOD-Prezidio, VCSPS kaj CK de VLKSM pri konkretaj paŝoj por la fondo de ASE (konfirmo de OK, principa aprobo de la Regularprojekto, evidentigo de ekzistantaj E-kolektivoj, okazigo de FK ktp)...

Berjoza raportis pri la stato de E-reto en la lando laŭ la venintaj raportoj kaj proponis proksimume jenan distribuon de lokoj en FK (sume ĉ. 100): Moskvo — ĝis 50, Leningrado — 5, Krasnojarsko, Krasnodar, Soĉi — po 2, Ufa, Ivanovo, Mejdureĉensk, Rostov/Don, Novosibirsk, Ĉeljabinsk (espereble Miass) — po 1, Ukrainio — 7, Litovio, Latvio, Estonio — po 5, Kartvelio, Armenio — po 2, Belorusio, Uzbekio, Kazahio — po 1, kelkaj lokoj restas rezervaj...

...Isajev proponis, ke la Estraro de ASE estu 45 — 50-persona, la Prezidio — 11 — 13. Pri persona konsisto temos aliffoje. Makovskij A.I. proponis konsiston de ASE-sekcioj kaj komisionoj: organiza, internacia, MEM, junulara, eldona, virina, gastakcepta, kultura. Pesljak ial tre kontraŭis la junularan sekcion kaj neniam argumentoj helpis..."

Eblas citi ankoraŭ unu cirkuleran leteron de Viktoro Aroloviĉ al SEJM-Komitatanoj (27.01.1979):

"... OK kunsidis la 25-an [de januaro] en mallarĝa konsisto: aliurbanaj ne estis invititaj, reprezentantoj de VCSPS kaj CK de VLKSM oficvojaĝis. Kompense estis Kuznecov V.⁵ Isajev prezentis tezojn de sia raporto. Oni (eĉ SSOD-anoj) riproĉis, ke estas tro pri politiko kaj nesufiĉe pri E-movado..."

...Pesljak diris, ke ... februare ĉiuj bazaj dokumentoj devas esti pretaj por prezento al SSOD-Prezidio..."

El protokoloj el la OK-kunsidoj (ilin zorgeme konservis Irina Valina) klare videblas, ke jam dum tiuj kunsidoj estis plejparte solvitaj la demandoj pri tio, kiuj venu al la FK kaj kiuj eniru gvidorganojn de ASE. Demokratieco ankoraŭ ne venis.

Vere esperantistoj tiam ne tre atentis la okazanton. Ili opiniis, ke la batalo por la oficialiĝo, kiu daŭris plurajn jarojn, finfine estis ĉesigita, kaj ili venkis — ja la landa E-organizaĵo estos fondita! Gravis por ili ankaŭ la fakto, ke en la gvidorganoj de ASE estos, krom la ceteraj, ankaŭ esperantistoj, reprezentantaj kaj diversajn respublikojn, kaj diversajn urbojn de la lando.

⁵ Kuznecov V. certan periodon okupis postenon de respondeca sekretario en la E-komisiono ĉe SSOD.

Certe estis ankaŭ iomaj malglataĵoj. Ne trafis en la liston de partoprenontoj en la FK Viktoro Noĉovkin el Poltava (Ukrainio) — februare li perletere petis pri enigo en la liston, sed ricevis afablan rifuzon; Anatolo Gonĉarov el Barnaul (Altaja provinco, Rusio) — ĉiam "maloporturia" por SSOD persono pro siaj laboremaj kaj laborigaj kvalitoj...

Tamen, la preparlaboro estis farita.

LA FONDA KONFERENCO DE ASE

"Oni diras — en ASE,
Oni diras — en ASE
Vivos ni ekstraktase,
Do ne decas mallevi la voston.
La movad' malrapide,
La movad' malrapide
Daŭros sub ligna gvido⁶,
Daŭros sub ligna gvido;
Tamen, jes! Ni veturos en Moskvon"⁷


Pri la FK de ASE eblas eĉ multon ne skribi. Ĉiuj E-periodaĵoj tiutempe nepre almenaŭ menciis ĝin. Kaj en la kelkaj ("Esperanto", "Bulgara Esperantisto", "der Esperantist"...) estis aperigitaj sufiĉe vastaj artikoloj.

FK okazis la 14-an de marto en la belega Domo de Amikeco centre de Moskvo (Kalinin-avenuo, N 16). Ĉiuj esperantistoj, partoprenintaj ĝin, sentis, ke "festo venis ankaŭ al ilia strato" — utilis la multjara batalo por oficialigo de sia agado, fondiĝas la tutlanda E-organizaĵo. Kaj ĉiuj mankoj en la organizado tiutempe estis tiom negravaj...

La partoprenintoj venadis al la DA frumatene, antaŭ la anoncita tempo, plenigadis enketilojn kaj babiladis inter si, planante estontan sian agadon "en novaj kondiĉoj". Kaj preskaŭ neniu supozis, ke la fondata organizaĵo celas limigi veran aktivecon de sovetiaj esperantistoj, malvastigi ties movadon.

⁶ *Berjoza* en la rusa signifas nomon de arbo "betulo".

⁷ El E-kanto de M. Bronŝtejn.



Domo de amikeco en Moskvo

Oni anoncis la tagordon, kaj denove spertuloj ekvidis, ke ĉio estis farita por hastigi la plej ĉefan parton de la Konferenco — la elektojn de ASE-gvidorganoj.

Sed ankaŭ tio ne tro timigis esperantistojn. Necesas memori, ke en 1979 ĉiuj niaj civitanoj ankoraŭ kutimis pensi, ke la elektoj okazadas ne dum, sed antaŭ la konferenco (kunveno, kunsido...) kaj dum ĝi okazadas eventualaj iomaj malgravaj ŝanĝoj. Por ni ĉiuj la plej grava estis la evento mem — la Fonda Konferenco!

УДОСТОВЕРЕНИЕ № 95

Тов. Цобулевский Д.М.

является делегатом Всесоюзной учредительной конференции Ассоциации советских эсперантистов

от Эсперанто-клуба
г. Харьков

Москва, март 1979 г.

ОРГКОМИТЕТ

Atesto de la FK-partopreninto⁸

8

ATESTILO

K-do Cibulevskij D.M.

estas delegito de Tutunia fonda konferenco de la
Asocio de sovetiaj esperantistoj
de *Эсперанто-клуба де н. Харків*

Moskvo, marto, 1979 j.

Orgkomitato

Krome, malgraŭ ĉio, esperantistoj pretis al batalo por tio, ke en la gvidorganojn de ASE eniru pli da fidindaj esperantistoj kaj malpli da funkciuloj...

Ĉi tie indas menciigi kelkajn interesajn momentojn. Unue, pri la konsisto de la partoprenintoj en la FK. Laŭ la raporto de la mandata komisiono la konferencon partoprenis 101 delegitoj kun voĉdona rajto.

En la nombro de la delegitoj: 24 virinoj kaj 77 viroj; 43 membroj de KPSU kaj 18 komsomolanoj; 27 personoj malpli ol 30-jaraj. Inter la delegitoj 15 personoj havis la sciencan gradon de kandidato pri scienco, 6 doktoroj pri sciencoj, inter la lastaj — unu akademiano.

La konferenc-delegitoj reprezentis pli ol 4000 esperantistojn, unuiĝintajn en klubojn. Ili estis senditoj de 10 uniaj respublikoj de USSR, unu aŭtonoma respubliko, 19 teritorioj kaj regionoj.

Krom la delegitoj por partopreni la Konferencon estis invititaj dekoj da gastoj, reprezentantoj de sociaj organizaĵoj, partiaj, komsomolaj kaj sindikataj organoj, reprezentantoj de SSOD kaj gazetaro.

La unua raporto de M.I. Isajev estis titolita "*Pri la stato kaj rimedoj por plibonigo de la esperantista laboro en la lando kaj pliefikigo de la internaciaj rilatoj*". Ĝi estis tre longa kaj ne levanta verajn E-problemojn. Nur iom la preleginto menciis pri agado de la E-komisiono ĉe SSOD kaj aktivecojn de apartaj E-kolektivoj. Sed malgraŭ, ke la prelego estis tro scienca kaj teda, la ĉeestintoj kun intereso ĝin aŭskultis, esperante ekaŭdi iujn vere gravajn sciindaĵojn. Multe pli interesa estis la parolo de vicprezidanto de SSOD-Prezidio M.M. Pesljak "*Pri fonda de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj*". En la raporto temis, ke nuntempe en USSR estas proksimume 10 mil esperantistoj; E-kluboj kaj rondetoj en la lando funkcias ĉefe ĉe sindikataj kulturdomoj, ĉe urbaj aŭ distriktaj komsomol-komitatoj. La raportinto menciis ankaŭ kelkajn mankojn en la agado de esperantistoj kaj esprimis la opinion, ke la fondata Asocio de

Sovetiaj Esperantistoj helpas forigi tiujn mankojn kaj plifirmigi la E-movadon de organiza vidpunkto (eventuale, la "mankoj" en la agado estis maltrankviliga vivo de E-kolektivoj).

Debate dum la pridiskuto parolis pli ol 10 esperantistoj, kiuj esprimis pozitivan opinion pri la fondo de la Asocio kaj faris diversajn proponojn por ties bona laboro.

Fine la decido pri la fondo de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj estis akceptita unuanime (fakte, ĉu povis esti aliel, se tiaj estis la streboj?) Samtempe estis akceptita ties Regularo, kiu havis iomajn malglataĵojn, sed ĉiuj opiniis, ke dum plej proksima tempo tiuj malglataĵoj estos refaritaj. Certe, ne estis forgesita la Estraro de ASE. Inter la elektitaj 59 membroj de la Estraro estis reprezentitaj diversrangaj funkciuloj el SSOD, VCSPS, Komsomolo — 11 personoj (kiuj poste plejparte fakte ne laboris, eble nur iel helpis al ASE); 30 personoj — el Moskvo, po 3 — el Ukrainio, Leningrado, Estonio, po 2 — el Latvio, Litovio, Armenio, Kartvelio; 8 personoj reprezentis diversajn urbojn de Rusio kaj po 1 persono estis el Uzbekio, Kazahio, Belorusio.

Tutegale, laŭ opinio de multaj esperantistoj, la FK estis sukcesa.


Necesas ne forgesi ankaŭ pri la fakto, ke la fondo de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj estis vaste reklamita tra la lando kaj ekster ĝi. En multaj periodaĵoj aperis diversaj artikoloj, eĉ la centra gazetaro reeĥis tiun gravan eventon.



Inter partoprenintoj de la FK de ASE



Labora kunsido de la FK



Dum la FK. Parolas M.M. Pesjajk



Dum la FK. Raportas M.I. Isajev



Prezidio de la FK. Staras M.M. Pesjak



Dum paŭzo de la FK. De maldekstre: A.I. Makovskij,
S.N. Podkaminer, E.E. Kuuskül, N.B. Zubkov



Dum la FK. Parolas V.V. Samodaj

SKIZE PRI POLITIKA, EKONOMIA KAJ ALIA SITUACIO EN USSR DUM ASE-PERODO

“La rekonstruo estas ne nur liberigo for de la stagneco kaj konservativismo de la antaŭa periodo, korektado de la allasitaj eraroj, sed ankaŭ rezigno pri historie limigitaj, malaktsualigintaj trajtoj de la socia organizo kaj de la labormetodoj”⁹

Mi opinias inda iom prilumi la politikajn kaj aliajn eventojn, kiuj okazis dum la jaroj 1979 — 1989 en nia lando. Ja de tio dependis ankaŭ la oficiala E-agado (la surloka evoluis senrigarde al la superaj instancoj kaj al la tieaj eventoj).

La komencaj jaroj de ASE-ekzisto estis la jaroj, kiujn oni poste nomis “stagna periodo”. Dum ĝi estris en la lando Leonid I. Breĵnev (de tempo al tempo oni povas aŭdi pri li la esprimon “vivanta kadavro”) kun “sia teamo” — Miĥail A. Suslov,

⁹ M. Gorbačov “Oktobro kaj la rekonstruo: la revolucio daŭras”, Moskvo, APN, 1987, p. 37.

partia ideologo; Viktor V. Grišin, Grigorij V. Romanov, Gejdar Alijev, Ŝaraf R. Raŝidov, Dinmuĥamed A. Kunajev kaj aliaj. Mem Leonid I. Breĵnev certe ne okupiĝis pri iuj duagradaj taskoj (eble, li ne plu kapablis ion fari ankaŭ pri la unuagradaj), sed ĉion faris la teamo...

Post la forpaso de Leonid I. Breĵnev novembre 1982 sekvis jaroj de Jurij V. Andropov kaj Konstantin U. Ĉernenko. Jurij V. Andropov, eksa gvidanto de KGB, emis tuje efektiviĝi iujn ŝanĝojn en la lando, uzante preskaŭ perfortajn metodojn. Sed por atingi iujn sukcesojn li ne havis tempon — sekvis ankaŭ lia morto. Same Konstantin U. Ĉernenko nenion sukcesis fari — pro la aĝo li tute ne estis laborkapabla.

Nur marte 1985, kiam ŝanĝe al la forpasinta Konstantin U. Ĉernenko al la gvidado venis relative juna kaj energia Miĥail S. Gorbaĉov, en la socia vivo de la lando komenciĝis veraj ŝanĝoj. La ruslingva vorto "*PERESTROJKA*"¹⁰ fariĝis internacia kaj komprenata ĉie tra la mondo sentraduke. Samtempe oni komencis sentime esprimi siajn opiniojn pri certaj agaddirektoj de iuj funkciuloj, kritiki ilian agadon — tiel venis en la landon "*GLASNOSTJ*" — ankoraŭ unu rusa vorto, populara eksterlande.

Ankaŭ esperantistoj de tiu periodo komencis pli kuraĝe kritiki la "laboron" de SSOD-funkciuloj, kiuj devis okupiĝi pri esperantistoj, sed fakte strebis bremsi la aktivecon de esperantistoj mem. Sendube erare estus pensi, ke ĝis tiu 1985 esperantistoj ne batalis kontraŭ burokrateco de ASE-funkciuloj (temas nur pri tiuj funkciuloj, kiuj anime estis kontraŭ la lingvo mem). Sufiĉus indiki ĉi tie vere kuraĝan paŝon — neelekton de Anatolij V. Berjoza, la sola persono, kiu pro la agado en ASE ricevis salajron, en la Estraron de ASE dum la 2-a Tutunia ASE-Konferenco (tamen, samtage A.V. Berjoza estis kooptita al la Estraro kaj elektita en la Prezidion de ASE); la leteron de espe-

¹⁰ Laŭsenca traduko estas: "renovigo de la socio"; iuj tamen preferas traduki "rekonstruo".

rantistoj-partianoj al Leonid I. Breĵnev (somere 1982). Sed pri tio sekvas rakonto pli sube.

Necesas indiki ĉi tie ankaŭ sufiĉe oftajn katastrofojn en la lando — Ĉernobil-eksplodo (atoma elektrostacio — 26.04.1986), milito en Afganio (dum la tuta ASE-periodo — 1979 — 1989), tertremo en Armenio (08.12.1988), multaj aliaj. Memorindas ankaŭ la fama ukazo kontraŭ alkohol-uzado (1985), organizo de Olimpikaj ludoj en Moskvo (19.07 — 03.08. 1980), okazigo de la 12-a Tutmonda Festivalo de junularo kaj studentoj (27.07 — 03.08.1985), organizo de celebrado de la 1000-jariĝo de Kristanigo de Rusio (1988)...

Eĉ tiuj ne multe indikitaj eventoj montras, ke partiaj kaj sociaj funkciuloj havis pri kio okupiĝi kaj neglekti la E-movadon. Ne vane do Miĥail S. Gorbaĉov respondis la demandon de Volde-mar Kauts proksimume tiel: "Komence ni finu renovigon de la socio kaj jam poste ni povos okupiĝi ankaŭ pri Esperanto".

LABORO DE LA ORGANIZA KOMISIONO

"Dum la raporta periodo estas farita certa laboro pri organiza plifirmigo kaj ordigo en la agado de sovetiaj esperantistoj, efektivigita enketado de la kluboj, ellaborita kaj publikigita en "Informbulteno" la ordo de registrado de la kluboj kiel primaraj organizaĵoj de ASE..."¹¹

Evidente la laboro de tiu komisiono estis la plej grava por la tuta ASE-agado. Precipe dum la komenca periodo. Necesis distribui la taskojn inter ASE-estraranoj kaj prezidianoj, necesis tre atente kompili laborplanon kaj skrupule ĝin sekvi, ĉiutempe memorigante al respondeculoj pri ties devoj, necesis koordini la tutan laboron...

Eblas noti plurajn aliajn "necesis", sed eĉ tiuj sufiĉas. Ja tutegale la komisiono agis absolute nekontentige. Ni ne serĉu nun kulpulojn. Evidente tio estis la sekvoj de la tempo, dum kiu

¹¹ El la decidoj de ASE-Estraro 09.12.1983.

ekzistis ASE, kiam necesis multon fari surpapere, sed ne multon efektive.

La gvidanto de tiu grava komisiono estis ŝtata funkciulo el SSOD¹² Anatolij I. Makovskij, vicprezidanto de ASE, kiu kelkajn jarojn dum la ekzisto de la Esperanto-komisiono ĉe SSOD laboris kiel ties respondeca sekretario. Kelkfoje mi turnis min al li en la 60-aj jaroj kaj — vere pozitiva momento — ĉiam ricevadis respondojn (pli postaj respondecaj sekretarioj eĉ tiun devon plenumis tute ne akurate: aŭ silentis, aŭ respondadis foje al kelkaj leteroj).

Do, laŭ mi A.I. Makovskij devis entrepreni jenajn unuajn paŝojn por starigi la laboron de ASE (eble, mi iom ripetos jam notitajn supre momentojn):

* Organizi konsistigon de sia "teamo", alivorte allogi esperantistojn, kiuj emis kaj pretis kunlabori en la komisiono;

* Organizi kompiladon de ASE-laborplano por ĉiu jaro aparte, konsiderante postulojn de la Regularo, kaj atente ĝin sekvi;

* Ellabori la postulojn por la kluboj, ke tiuj eniru en la strukturon de ASE kiel kolektivaj membroj, kaj organizi ties amasan akcepton. Ja sen la membroj ne povis ekzisti ASE mem (efektive la unuajn jarojn ASE-Prezidio ne okupiĝis pri akcepto de E-kluboj en la organizaĵon, sed simple registradis la adresojn kaj eventualajn aktivecojn de esperantistoj. Po iomete tiuj adresoj komencis aperadi en ASE-periodaĵo — "Informbulteno". Pro tio estas malfacile prilumi, kiel kreskis la vicoj de E-kluboj en ASE laŭjare. Fine de ASE-ekzisto en ĝi membris 191 E-kolektivoj (v. la liston);

* Distribui la taskojn inter ĉiuj ASE-prezidantoj kaj estraranoj kaj atenti, ke tiuj laboru;

* Organizati enkondukon de sistemo de soc. konkurado inter E-kluboj de la lando (fakte gravas ne kiel nomi tiun konkuradon, gravas, ke ĝi povus poste helpi prilumi diversajn aktivecojn de esperantistoj);

* Helpi en organizado de enlandaj E-aranĝoj (renkontiĝoj, tendaroj...);

* Helpi organizi malfermon de financa konto de ASE ĉe iu banko (dum la tuta ASE-ekzisto ĝi ne havis propran monon, malgraŭ ke ĝi estis jura organizaĵo).

Efektive la komisiono faris nur ion el tio, kion ĝi vere devis fari.

¹² Fakte tiuperiode A.I. Makovskij laboris en Ministerio pri justico, sed por ĉiuj ni li estis "funkciulo el SSOD".

Necesas mencii, ke, plej verŝajne, la komisiono mem ne ekzistis, alivorte — en ĝi laboris sole Anatolij I. Makovskij, la komisionestro.

Ni provu, tamen, taksi la laboron, komencante de la Prezidikaj Estarkunsidoj. Tiuj laŭ la ASE-Regularo devis esti organizataj ne pli malofte ol foje dum tri monatoj (la Prezidikunsidoj) kaj foje dum la jaro (la Estrarkunsidoj). Kaj kiun realan bildon ni povas vidi?

La Prezidikunsidoj estis organizataj pli-malpli regule: laŭ la lasitaj spuroj entute okazis 77 Prezidikunsidoj dum la tuta ASE-ekzisto. Kaj nur kelkfoje oni ne sukcesis sekvi la Regularon, organizante la kunsidojn kun pli longa paŭzo inter tiuj:

LISTO DE LA PREZIDIKUNSIDOJ

01-a — 13.04.1979	27-a — 21.01.1983	53-a — 16.01.1986
02-a — 29.05.1979	28-a — 25.02.1983	54-a — 28.01.1986
03-a — 27.07.1979	29-a — 08.04.1983	55-a — 25.02.1986
04-a — 07.08.1979	30-a — 13.05.1983	56-a — 01.04.1986
05-a — 22.09.1979	31-a — 28.07.1983	57-a — 13.05.1986
06-a — 10.12.1979	32-a — 29.09.1983	58-a — 26.06.1986
07-a — 16.01.1980	33-a — 25.10.1983	59-a — 19.12.1986
08-a — 20.03.1980	34-a — 22.11.1983	60-a — 19.01.1987
09-a — 14.05.1980	35-a — 01.12.1983	61-a — 05.03.1987
10-a — 05.06.1980	36-a — 09.12.1983	62-a — 09.04.1987
11-a — 13.10.1980	37-a — 19.01.1984	63-a — 28.05.1987
12-a — 11.02.1981	38-a — 09.02.1984	64-a — 06.08.1987
13-a — 09.04.1981	39-a — 01.03.1984	65-a — 15.10.1987
14-a — 21.05.1981	40-a — 12.04.1984	66-a — 03.12.1987
15-a — 10.06.1981	41-a — 10.05.1984	67-a — 17.12.1987
16-a — 15.07.1981	42-a — 11.10.1984	68-a — 22.03.1988
17-a — 25.09.1981	43-a — 29.11.1984	69-a — 24.05.1988
18-a — 24.12.1981	44-a — 18.12.1984	70-a — 14.09.1988
19-a — 22.01.1982	45-a — 17.01.1985	71-a — 21.09.1988
20-a — 12.02.1982	46-a — 05.02.1985	72-a — 05.10.1988
21-a — 18.06.1982	47-a — 26.03.1985	73-a — 23.11.1988
22-a — 22.07.1982	48-a — 10.04.1985	74-a — 23.12.1988
23-a — 24.09.1982	49-a — 24.04.1985	75-a — 04.01.1989
24-a — 22.10.1982	50-a — 01.10.1985	76-a — 12.01.1989
25-a — 19.11.1982	51-a — 03.12.1985	77-a — 18.01.1989
26-a — 24.12.1982	52-a — 09.01.1986	

Se tamen rigardi de alia vidpunkto, ni povus nin demandi, ĉu entute okazis veraj (aŭ plenrajtaj, decidrajtaj) Prezidikunsidoj kun partopreno de almenaŭ duono de la prezidianoj?

Dank' al Irina G. Gonĉarova (denove — dank' al ŝi!) ni sukcesis trarigardi protokolojn de deko da unuaj Prezidikunsidoj, kiuj prezentas al nia atento jenan bildon: ŝajne nur en du el la notitaj kunsidoj partoprenis pli ol 50% de la prezidianoj. La ceterajn partoprenis nur 5 — 6 personoj kaj la invititoj (v. la tabelon). Eĉ ne unu fojon partoprenis la kunsidojn Aleksandr I. Koroleviĉ (Lviv, Ukrainio), E.E. Kuuskül (Tallinn, Estonio), G.Je. Kanajev kaj N.N. Muĥin (funkciuloj el Moskvo). Nur po 1-foje ĉeestis Semjon N. Podkaminer (Leningrad) kaj Boris G. Kolker (Ufa, Baŝkirio).

Kompreneble, tio ne signifas, ke la notitaj prezidianoj ignoris siajn taskojn kaj ne emis partopreni la kunsidojn. Simple la plimulto (eksternoskvanoj — ĉiuj) ne estis invitataj kaj eĉ informataj pri la okazonta kunsido. Mi mem estante prezidiano de ASE sukcesis nur du-tri-foje partopreni la kunsidojn hazarde (nur unufoje mi estis invitita en Moskvon al la kunsido por ricevi riproĉojn).

La Estrarkunsidoj devis esti organizataj ĉiujare, sed evidentiĝis, ke tiuj estis tute ne regulaj. Se la unua post la FK okazis nur kun dumonata malfruo, la sekvaj havis pli longajn malfruojn:

ESTRARKUNSIDOJ DE ASE¹³

Numero de la kunsido	Dato de la okazigo de la kunsido	Notoj
1-a	23.05.1980	
2-a	26.03.1982	2-a Tutunia reelekta onferenco
3-a	09.12.1983	
4-a	25.04.1985	
5-a	17.01.1986	
6-a	26 — 27.09.1988	
7-a	23.01.1989	3-a Tutunia reelekta onferenco

¹³ Ĉi tie ne estas menciita la komenca Estrarkunsido, kiu laŭ Informbulteno okazis tuj fine de la Fonda Konferenco de ASE, alivorte 14.03.1979.

Tabelo de partopreno en Prezidikusidoj de ASE (komenca periodo)

	1979		1980								1981				
	N 1	N 2	N 5	N 6	N 7	N 8	N 9	N 11	N 12	N 13	N 14	N 15	N 16		
	13.04	29.05	22.09	10.12	16.01	20.03	14.05	13.10	11.02	09.04	21.05	10.06	15.07		
A. Prezidianoj:															
1. Isajev M.I.	+	+	+	+	+	+	+	+	+	+	+	+	+		
2. Makovskij A.I.	-	-	+	+	+	+	+	+	-	+	+	+	-		
3. Podkami- ner S.N.	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	+		
4. Samodaj V.V.	+	+	+	+	+	+	+	+	+	+	+	+	+		
5. Zubkov N.B.	+	+	+	+	-	+	+	+	+	+	+	+	+		
6. Berjoza A.V.	+	+	+	+	+	+	+	+	-	+	+	+	+		
7. Kanajev G.J.	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-		
8. Koller B.G.	-	-	-	-	-	-	-	-	+	-	-	-	-		
9. Koroleviĉ A.I.	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-		
10. Kuuskül E.E.	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-		
11. Muhiĉ N.N.	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-		

	N 1	N 2	N 5	N 6	N 7	N 8	N 9	N 11	N 12	N 13	N 14	N 15	N 16			
	1979							1980						1981		
	13.04	29.05	22.09	10.12	16.01	20.03	14.05	13.10	11.02	09.04	21.05	10.06	15.07			
12. Perevalov D.A.	+	+	+	+	+	+	—	+	+	+	+	+	+			
13. Saakov R.R.	—	—	+	—	+	+	—	—	+	—	—	—	—			
Sume (prezidianoj):	5	5	7	6	6	7	5	6	6	6	6	6	6			
B. Invititaj:																
1. Arolovič V.S.	—	—	+	+	—	+	—	+	+	—	—	—	+			
2. Ĉerepanov V.	—	—	+	—	+	—	—	—	—	—	—	—	—			
3. Donskaja L.I.	—	—	—	—	—	—	+	—	—	—	—	—	—			
4. Gončarov A.J.	—	—	—	+	+	+	+	+	+	+	+	+	+			
5. Gončarov A.M.	—	—	—	—	—	+	—	+	—	+	+	—	—			
6. Ĥarjovskij A.S.	—	—	—	—	—	+	—	—	—	—	—	—	—			
7. Jakovlev A.V.	—	—	—	—	—	+	—	+	—	—	—	—	—			

	N 1	1979					1980					1981				
		N 2	N 5	N 6	N 7	N 8	N 9	N 11	N 12	N 13	N 14	N 15	N 16			
	13.04	29.05	22.09	10.12	16.01	20.03	14.05	13.10	11.02	09.04	21.05	10.06	15.07			
8. Jęgorovas P.K.	-	-	-	-	-	+	-	-	-	-	-	-	-			
9. Kazakov A.B.	-	-	-	-	-	-	-	+	+	-	-	-	-			
10. Kolobova G.A.	-	-	-	-	-	-	+	-	-	-	-	-	-			
11. Korotkevič G.J.	-	-	-	+	-	+	+	+	+	+	+	+	+			
12. Krajnov S.N.	+	-	-	-	-	+	+	-	+	+	+	+	+			
13. Kuznecov S.N.	-	-	-	-	-	+	-	-	-	-	-	-	-			
14. Matkovskaja G.N.	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	+			
15. Novikova L.L.	-	-	-	-	-	+	-	+	-	-	-	-	-			
16. Pašenko M.F.	-	-	-	-	-	+	+	-	-	+	+	-	-			

	N 1	N 2	N 5	N 6	N 7	N 8	N 9	N 11	N 12	N 13	N 14	N 15	N 16
	1979				1980				1981				
	13.04	29.05	22.09	10.12	16.01	20.03	14.05	13.10	11.02	09.04	21.05	10.06	15.07
17. Pata- tjan A.G.	-	-	-	-	-	-	-	-	-	+	-	-	-
18. Pesjak M.M.	-	-	-	-	-	-	+	-	-	-	-	-	-
19. Stanešni- kov F.F.	-	-	-	-	-	+	-	+	-	-	-	+	+
20. Tokarev B.V.	+	+	-	-	-	+	+	+	+	+	+	+	+
21. Valina (Gon- čarova) I.G.	+	+	+	+	+	+	+	+	+	+	+	+	+
22. Verigin V.J.	-	-	-	-	-	-	-	-	-	+	-	-	-
23. Vuifovič L.B.	-	-	-	-	-	+	-	-	-	+	-	+	+
Entute invititaj	3	2	3	4	3	15	9	10	7	11	7	7	9
Sume ĉeestis	8	7	10	10	9	22	14	16	13	17	13	13	15

Evidente nun necesas mencii ankaŭ laborajn renkontiĝojn de klubestroj, kiuj estis organizataj helpe de ASE-Estraro (pli ĝuste — de la Prezidio). Entute okazis du tiaj LR, ambaŭ en Moskvo aŭ Moskva regiono.

La unua okazis la 19—23-an de marto 1984 en Apudmoskvo. Ĝin partoprenis 71 reprezentantoj de 46 E-klubo el 42 urboj, enkluzive reprezentantojn el Ukrainio, Belorusio, Litovio, Latvio, Estonio kaj Armenio. Resuma kunsido estis organizita en la DA, dum ĝi estis pridiskutitaj kaj akceptitaj rekomendoj pri

УДОСТОВЕРЕНИЕ № 53

гов Цыбулевский Д. М.

является участником отчетно-выборной конференции

Ассоциации советских эсперантистов

от Украинского отделения АСЭ

Москва, март 1982 г.

Президиум АСЭ

Mandato de partopreninto en la 2-a Tutunia reelekta Konferenco

plibonigo de E-agado (unuavice — la organiza). La ĉefa organizinto de la LR estis A.I. Surnakin (Moskvo).

La dua LR de klubgvidantoj okazis en Apudmoskvo (Kljazma) la 26 — 29-an de aprilo 1985. Ĝin partoprenis 130 esperantistoj el 66 urboj (el ili pr. 30 estis artistoj¹⁴ kaj moskvanoj). La LR-2 okazis tuj post vica ASE-Estrarkunsido, kio helpis al aliurbaj estraranoj partopreni la renkontiĝon. Do, la unuigo de tiuj du aranĝoj estis ege utila.

La tria LR devis okazi la 13—18-an de marto 1986 en Moskvo (hotelo "Sputnik"). Poste oni transmetis ĝin al majo (15—20.05.1986), poste ĝi estis denome transmetita al jarfino (30.11 — 03.12.1986). Oktobre A.I. Makovskij dissendis cirkuleron, en kiu estis notita nova periodo de la LR: komenco de 1987...

¹⁴ Temas pri esperantistoj, kiuj partoprenis nur vesperajn aranĝojn, dum kiuj ili prezentis al la ceteraj siajn artaĵojn.

CONOVS SOVETNIKHX OBYCSTV DРУЗЬЕИ И КУЛЬТУРНОИ СВЯЗИ С ЗАРУБЕЖНЫМИ СТРАНАМИ
UNIO DE SOVETAJ SOCIETUJ DE AMNECO HAJ KULTURAJ LIGUJ HUN ENSTERAJ LANDUJ

АССОЦИАЦИЯ
СОВЕТСКИХ
ЭСПЕРАНТИСТОВ



ASOCIO
DE SOVETIAJ
ESPERANTISTOJ

Tel. 290-15-25
103985, ГСП, Москва И-4, пр-т Нахимова, 14

Tel. 290-15-25
Soveta Unio, 103985, Moskvo, И-4, pr. ap. Naŝimova, 14

Отделению
Ассоциации советских эсперантистов,
членам Правления АСЭ

О подготовке Годового заседания
Правления АСЭ

5.03.1985

Уважаемые товарищи.

Организационно-массовая комиссия АСЭ сообщает вам, что Годовое заседание Правления АСЭ состоится 25.04 1985 г. в ~~одноименном пансионате «Клевань»~~. Заседание посвящено 40-летию Победы советского народа над немецко-фашистскими захватчиками. В связи с этим будут обсуждаться следующие основные темы:

- 1/. Участие советских эсперантистов в МЭМ.
- 2/. Международные связи советских эсперантистов.
- 3/. Работа Отделений и клубов АСЭ по интернациональному воспитанию.
- 4/. Подготовка Отделений и клубов АСЭ к 40-летию Победы советского народа над немецко-фашистскими захватчиками.

К Годовому заседанию Правления АСЭ просим вас:

- подготовить отчет о деятельности Отделения в 1984 г.;
- представить план работы Отделения на 1985 г.;
- выступить с конкретными предложениями по плану работы АСЭ на 1985 г.;
- по возможности подготовить сообщение по основным темам Годового заседания Правления АСЭ;
- а также по другим вопросам деятельности АСЭ, ее отделений и клубов, если имели место новые методы работы, сформулировать интересные предложения, сложить и определить обобщения и выводы.

Вице-президент АСЭ

по организационно-массовой работе

/А.Н. Казарский/

*Specimeno de cirkulerletoj,
de tempo al tempo dissendataj de ASE-Prezidio¹⁵*

¹⁵ En la prezentata ĉi tie cirkulerletero temas pri Estrarkunsido, planata por 25.04.1985, pri ĝia tagordo kaj sekvas peto, kion necesas prepari por ĝi.

Sed fakte la renkontiĝo ne okazis.

La ĉefaj celoj de la LR estis:

- * efektivigo de senperaj kontaktoj inter ASE-gvidantoj kaj klubestroj; ASE-komisionestroj (sekcioestroj) kaj aktivuloj de E-movado;
- * altigo de gvidnivele de la klubestroj;
- * spertintersanĝo kaj koordinado de komunaj agoj de di-versaj E-kolektivoj.

La okazigo de la LR estis ege pozitiva momento en la tuta agado de ASE. Bedaŭrinde, ne ĉion oni sukcesis fari, kio estis planita; sufiĉis mankoj. Sed tutegale la avantaĝoj estis multnombraj.

Dum la LR-2 estis okazigita enketado de partoprenintoj (faris ĝin I.G. Gonĉarova el Moskvo), kies rezultojn ni aperigas ĉi tie kaj per kiuj ni povas prezenti la pozitivajn kaj negativajn flankojn de la LR.

Pri la laboro de la organiza komisiono de ASE estis levata demando dum ASE-Prezidikunsidoj (ekz., 15.07.1981). En ili temis, ke la kluboj en la lando estas disŝiritaj unu de la alia, ne estas efektivigata ia gvidado flanke de ASE — nek helpo, nek kontrolo. Nur de tempo al tempo aperadis "ordonoj" nome de ASE-Prezidio (ekz., jam 09.10.1979 aperis cirkulera letero, subskribita de M.I. Isajev, pri mankoj en someraj E-tendaroj, malgraŭ ke la riproĉoj estis tute senbazaj).

Samtempe temis, ke la laboro de la ASE-Prezidio mem ne estas ordigita, ke plimulto el la komisionoj ekzistas nur surpape kaj neniu el esperantistoj ion scias kaj eĉ aŭdis pri ties laboro, ne ĉiuj ASE-estraranoj kaj eĉ prezidianoj havas konstantajn aŭ almenaŭ provizorajn taskojn...

Ne malutilus iom prilumi la karakterojn de tiuj personoj, de tiuj SSOD-funkciuloj, kiuj okupis eble la plej gravan postenon en ASE-Prezidio — estis la respondecaj sekretarioj. Tiuj estis la solaj en la lando homoj, kiuj salajris dank' al Esperanto. Kaj de ili dependis permesi aŭ malpermesi ion, organizi aŭ ne organizi, fari aŭ ne fari...

Jen kion skribas pri tiuj funkciuloj A.S. Melnikov en sia libro "Babilajoj de esperantisto lavango n-ro 1"; (Rostov-na-Donu, 1995):

"...La movado kreskis. Sed ĝin daŭre gvidis unusola persono — postene "respondeca sekretario de ASE", fakte — kontraŭesperantisto, salajrata de SSOD. Jes ja ekzistis elektataj Estraro kaj Prezidio. sed la faktan povon havis

nur la suprenomita funkciulo. (Kompreneble, malantaŭ li staris SSOD (ido de CK KPSU kaj KGB), kiu limigis la agivon de sia postenito, sed malgraŭ tio simpatianto povus fari sufiĉan multon por la movado...) Li nepre devis esti malesperantisto konvinke kaj oftege ankaŭ lingve. Rezulte, dum 10 jaroj ASE ne sukcesis solvi eĉ tiel simplan problemon kiel oficiala (ASEa, ne ŝtata) atestado de E-instruistoj Mi ne parolu pri lanĉo de E-lingva gazeto¹⁶ aŭ aliĝo al UEA".

De 1979 tiun postenon okupis Anatolij V. Berjoza (jam antaŭ ASE-ekzisto lastan periodon A.V. Berjoza okupis la postenon de respondeca sekretario en la E-komisiono ĉe SSOD), kiun eblas evidente senriske nomi "ĝisosta funkciulo". Krome, li estis arda malamiko de Esperanto kaj eĉ ne kaŝis tion. Ĝuste pri li temis en la sciigo en "Esperanto" (septembro, 1976), ke dum la UK en Grekio estis reprezentanto el Sovetunio, kiu konversaciis ne Esperante, sed ruse aŭ france...¹⁷

Lia agado daŭris ĝis fino de 1982. Antaŭ tio esperantistoj ekribelis. Kiam okazis la 2-a Tutunia reelekta Konferenco, dum la elektado de la Estraro A.V. Berjoza estis balotfaligita, sed tuj ĉefoj organizis lian kooptadon — kaj denove li okupis kulman jam por si postenon.

Sed tiu balotfaligo kaj sekvinta ĝin somere letero de grupo da komunistoj al L.I. Breĵnev (v. ĉapitron "Opozicio") faris tamen sian aferon — la SSOD-estroj estis devigitaj anstataŭigi A.V. Berjoza-n per alia funkciulo G.N. Matkovskaja. Tiu lasta estis enpostenigita provizore, agis proksimume 1 jaron kaj neniel povis sin montri — nek pozitive, nek negative.

Anstataŭ ŝi komence de 1984¹⁸ enposteniĝis Lidija Je. Ŝanina, kiu restis sur la posteno ĝis lastaj tagoj de ASE, kaj eĉ poste ŝi plenumis en SSOD iujn taskojn, ligitajn kun E-agado.

Pri L.J. Ŝanina kaj ŝia agado sur la posteno estas diversaj opinioj. Iamaniere ŝi tamen helpis al E-movado en la lando. Jen estas opinio de László Szilvási (proksimuma citado de la vortoj):

"Kun L.J. Ŝanina eblis kontakti pri organizo de io, pri partopreno en iaj E-aranĝoj. Ŝi metis tiujn postulojn, kiuj estis bezonataj tiuperiode pro troigita burokrateco. Foje mi kontaktis ŝin pri iu aranĝo, kelkfoje telefonadis kaj plenumis ĉiujn ŝiajn postulojn, plenigis kaj sendis ĉiujn bezonatajn paperojn. Dank' al tio la intenco (pri partopreno de E-aranĝo) sukcesis..."

Alia persono¹⁹ esprimis sian opinion pri L.J. Ŝanina per du frazoj, proksimume jene sonantaj: "Ŝi estis vera funkciulo kaj faris nur tion, kion oni al ŝi komisiis. Krome, ŝi estis arda antisemitino..."

¹⁶ Principe tio ekeblis en 1989, Tiam formale laŭ mendo de la Rostova E-klubo "Moskvaj Novajoj" eldonis provnumeron en Esperanto. La iniciato estis sufiĉe varme akceptita en la E-movado. Komencis venadi abon-interesiĝoj. Sed!!! La iam kurtega periodaĵo ĝuinta grandegajn financajn injektojn de la registaro, devis kaŭze de la perestrojko lerni manaĝi siajn kontojn mem. En la novaj kondiĉoj esperantistoj ne kapablus elteni la financan pezon de la avana siatempe eldonajo. Krome, fi-influis redakciaj tumultoj ligitaj kun diversaj re-organizaĵoj kaj -strukturigoj (Noto de A.S. Melnikov el la sama libro).

¹⁷ Laŭ onidiroj tiu rimarko estis tradukita en la rusan, kaj pri ĝi sciis SSOD-anoj kaj KGB.

¹⁸ Eble, la fakta enpostenigo okazis pli frue (laŭ onidiroj — somere 1983), sed ĉe mi mankas konfirmoj pri tio; krome, necesas konsideri, ke la proceduro enpostenigo okazis nur 25.04.1985 (!).



A. V. Berjoza (dekstre) respondeca sekretario de ASE, kaj O. G. Miliŝenko, funkciulo el Ukrainia SSOD, dum Ok-SEJT-21 en Apudkievo somero 1979



L. J. Ŝanina, respondeca sekretario de ASF dum ASE-Estarkunveno (januaro, 1986)



M. I. Isajev, prezidanto de ASE

^{1*} La nomo de tiu persono estas konata al la aŭtoro, sed ne menciatis ĉi tie laŭ peto

Ankaŭ gravis la personeco de la ASE-Prezidanto M.I. Isajev. Jen kion skribis pri li N.E. Zubkov:

"Isajev *Magomet izmajoviĉ*, oseto, lingvisto, naskiĝis en 1928 (la 5-an de marto) en Vladikavkazo. Studento en Leningrada universitato (1946-1951), aspiranto en Moskva universitato (1951-1954). Kandidato de filologio (1954), doktoro de filologio (1973); profesoro.

Esperantistiĝis en 1957, aktiviĝis kiel membro de la E-komisiono ĉe SSOD. Post la morto de prof. E.A. Bokarev gvidis Komisionon de interlingvaj problemoj ĉe Instituto de lingvoscienco en Moskvo ĝis 1979. Prezidanto de ASE (1979-1989). Partopreninto de kelkaj UK, vicprezidanto de MEM (1976 -- 1988).

Verkis broŝuron "Jazik Esperanto" ["La lingvo Esperanto"] (po 5000 ekz. en 1981 kaj 1983); lernolibron de la lingvo (30 mil ekz. en 1984, kun Z.V. Semjonova), multajn artikolojn kaj librojn pri lingvistiko, interlingvistiko kaj Esperanto".

Al tio eblus aldoni, ke antaŭ la fondo de ASE li skribis leteron al la partia CK en kiu prilumis situacion de Esperanto en nia lando. Eble ankaŭ tiu letero iom helpis al la fondo de ASE.

Sed de alia vidpunkto - M.I. Isajev estis sufiĉe limema persono. Li dum sia prezidanteco faris nenion por organize helpi al la E-movado en la lando, sed uzis sian postenon nur por sia kariero. Li plenumadis ĉiujn postulojn de funkcioj el supraj insancoj kaj ĉiam evitis ajnajn "tiklajn" momentojn.

Povas esti ĉi tie enmetindus ankaŭ sciindajoj pri ankoraŭ unu persono - aktiva esperantistino, de kiu, eble, ne dependis la laboro de ASE entute, sed kiu multe kontribuis al ties laboro kaj en la organiza komisiono, kaj en la instru-



I.G. Gonĉarova kaj D.M. Cibulevskij dum unu el someraj E-aranĝoj

metodika, kaj en aliaj sferoj de aktiveco. Temas pri Irina Germanovna Gonĉarova.

Gonĉarova (Valina) Irina Germanovna naskiĝis la 10-an de novembro 1951 en Petrozavodsk (Karelio); laŭ profesio - specialisto pri rusa lingvo kaj literaturo (finlemis Moskvan ŝtatan pedagogian instituton "V.I. Lenin"). De la jaro 1974 konstante loĝas apud Moskvo.

Hereda esperantistino — ŝiaj geavoj (Kulakova Tatjana Kuzminiĉna kaj Kulakov Pjotr Ivanoviĉ) siatempe (en la jaroj 1928/1929) akceptis esperantiston-bicikliston el Francio, veturintan tra nia lando (poste aperis rememoroj de tiu esperantisto pri sia vojaĝo — Lucien A. Peraire²⁰ "Tra la mondo per biciklo kaj Esperanto": eldonis SAT en 1990). La geavoj konatiĝis kiel esperantistoj kaj en 1915 okazis ilia geedziĝo (en Omsk).

Ankaŭ la patrino de I.G. Gonĉarova estis esperantistino.

Mem Irina lernis la lingvon en 1967 kaj ŝia unua E-tendaro estis samjare --- BET (SEJT-9) en Litovio.

Sekvis kelkjara paŭzo pro lernado en instituto kaj aliaj okupoj. En 1973 okazis unuafoja ŝia reaktiviĝo.

Sed veran puŝon al la reaktiviĝo donis ekskursiva veturo en Pskov al S. Soskina kune kun famaj esperantistoj A.S. Ĥarĵkovskij, V.S. Aroloviĉ, J. Matvijišin kaj J. Ŝerstinjova. Tio okazis en 1977 kaj de tiam Irina G. Gonĉarova ne lasas E-movadon. Sekvas partopreno en BET-18 (Rezekne, Latvio), SEJM-Konferenco en Poltavo (ambaŭ aranĝoj -- en 1977), SEJM-Konferenco en Apudmoskvo OkSEJT-20 en Dagestano (1978), E-tendaroj en Krasnojarsk kaj Kievo (1979; en la Krasnojarska tendaro ŝi estis elektita "Miss Esperanto"), Apudmoskvo (1981)... Plurfoje partoprenis alilandajn E-aranĝojn: E-kongresojn en Hungario (1983), Pollando (1987), Britio (1989), Aŭstrio (1992), Finnlando (1995), Ĉeĥio (1996)...

Gonĉarova Irina G. aktive partoprenas organizan vivon de sovetiaj esperantistoj dum ASE-periodo. Ŝi estis en "apud-OK-a teamo" dum la prepara periodo (fino de 1978 -- komenco de 1979), ASE-estrarano kaj zonestro por Rusio en instru-metodika laboro. Dank' al ŝi estas konservitaj pluraj gravaj dokumentoj pri ASE-agado, kiuj helpis verki libron pri ĝia historio.

Aktive laboras ankaŭ nun en kadre de SEU — REU.

Memkompreneble, tiu gvidado (de M.I. Isajev) tute ne kontentigis E-aktivulojn de la lando. Rezulte, aperis opozicio al la gvidantoj de ASE kaj ties burokrata konduto (pri la opozicio v. apartan ĉapitron). Kaj krome, kelkaj aktivuloj entreprenis siajn rimedojn, siajn certajn paŝojn por iel plibonigi la ekzistantan situacion, aktivante surloke, senrigarde al ordonoj de-supre.

Aleksandr Korĵenkov provis en Urala regiono enkonduki soc. konkuradon inter E-klubo (eble, ĝi nomiĝis ne soc. konkurado, sed iel aliel kaj apartenis nur al instru-metodikaj aktivecoj); kelkaj esperantistoj provis formi apartajn laborgrupojn pri diversaj agadirektoj, kiuj helpus al la movado de organiza vidpunkto. Fakte, estis farata laboro, kiun devis iniciati kaj gvidi la organiza komisiono kaj ties estro Anatolij I. Makovskij.

²⁰ Laŭ sciigo en "Esperanto" n-ro 6 (1104)/1998, p. 120 Lucien Peraire "mortis antaŭ kelka tempo en Francio".

Dum OkSEJT-22 (1980, Ivanova provinco) estis meminitate formitaj provizoraj laborgrupoj:

* FOP-programoj — grupestro Sibirceva Ludmila B. — 630096, Novosibirsk, Nevelskogo, 9 — 1;

* Interlingvistikaj materialoj — grupestro Ŝijafer Aleksandr — 634041, Tomsk, abonkesto 261;

* E-kantaro — grupestro Civileneva Nina J. — 450015, Baŝkirio, Ufa, Revolucionnaja, 12 — 84 (en la grupo: Berce Natali, Bronŝtejn Mikaelo, Ŝarov Aleksandr, Ŝilas Vitaŭtas);

* Moderna prelego pri Esperanto — grupestro Melnikov Aleksandr S. — 344007, Rostov/Don, abon/kesto 29;

* Enlanda enciklopedio de Esperanto — grupestro Tveritina Olga — 105425, Moskvo, ul. 3-a Parkovaja, 50 — 3 — 20.

En "Kurte" N 121 (januaro 1982) estis aperigita anonco:

"Estas organizataj jenaj laborgrupoj —

* Belarta,

* Populariga,

* Sociologia,

* Kolektanta,

* Traduka,

* Lerneja.

* Koresponda,

* Historia,

Bezonatas kunlaborantoj kaj organizantoj (estroj)...

Muraŝkovskij Julio*

Similaj anoncoj kaj grupformadoj estis ankaŭ pli poste. Sed ne estas videblaj la rezultoj de laboroj de tiuj grupoj (ne necesas kompreni, ke la laboro tute ne estis farata, sed nur, ke pri la rezultoj, se tiuj estis, ne aperis sciigoj en gazetaro)...


Pri la organizaj demandoj en ASE temis ankaŭ dum kunsidoj de la ĉefa kunfondinto de ASE — SSOD.

La unuan fojon kunsidon pri tiu temo Buroo de SSOD-Prezidio organizis la 5-an de februaro 1982. Estis pritraktita la 3-jara agado de ASE.

Partoprenis la kunsidon Prezidanto de ASE M.I. Isajev, vicprezidantoj A.I. Makovskij, V.V. Samodaj kaj N.B. Zubkov kaj la respondeca sekretario de ASE A.V. Berjoza. Krome, estis reprezentitaj CK de KPSU, VCSPS, CK de VLKSM. Estis akceptitaj decidoj "Pri ordigo de agado de sovetiaj esperantistoj"

(4-paĝa, 9-paragrafa) kaj aprobita "Plano por ĉefaj agaddirektoj de ASE por 1982/1983"²¹.

La nedeziro de la Komisionestro A.I. Makovskij okupiĝi pri la organiza laboro, bremsado de la agado entute stimulis la kaosecon, miskomprenojn, oftan duobligon. Sed malgraŭ ĉiuj organizaj malfacilaĵoj la laboro en la lando ne stagnis.



FET-2 Kujbiŝev, 1986)

Ĉie tra la lando kluboj iniciatis diversajn aktivecojn, ĉefe — diversspecajn renkontiĝojn kaj tendarojn. Kaj partoreno en la aranĝoj estis sufiĉe multnombra. Mi ŝatus prezenti ĉi tie nur malgrandan parton de tiaj renkontiĝoj (v. la tabelon).

NOMBRO DE PARTOPRENINTOJ EN KELKAJ E-ARANĜOJ

Jaro	Periodo	Titolo	Loko	Kvanto de partoprenintoj	Kvanto de lokoj
1979	31.03	TTV-6	Viljandi	75	—

²¹ Dum tiu ĉi (aŭ dum iu alia) kunsido V.V. Samodaj raportis pri laboro de la eldona komisiono, sekvis parolo de Z.M. Kruglova (SSOD-prezidanto), kiu riproĉis niajn "patronojn" pro neakcepto de proponoj de la komisionestro.

Historiaj notoj

Jaro	Periodo	Titolo	Loko	Kvanto de partoprenintoj	Kvanto de lokoj
1979	29.04 — 02.05	OSER	Barnaul	50	—
1979	majo	Boatado-79	Ignalina	100	—
1979	07.11 — 09.11	Ora Folio	Pabaj	105	—
1980	07.11 — 09.11	REVU-21	Ĉeljabinsk	108	17
1980	13.12 — 14.12	KOR-3	Kiŝinev	100	—
1981	20.07 — 25.07	Esperanto kaj naturo	Estonio	110	—
1982	07.10 — 10.10	renkontiĝo	Agveran	72	18
1982	11.11 — 13.11	CRREER-24	Jaroslavl	94	15
1983	07.05 — 09.05	CRREER	Ŝĉerbinka	100	11
1983	07.05 — 09.05	Boatado	Ignalina	103	—
1983	07.10 — 09.10	Ora Folio	Riga	157	8
1983	06.11 — 08.11	REVU	Ĉeljabinsk	77	12
1984	07.04 — 08.04	KOR-10	Odeso	120	—
1984	22.06 — 24.06	Giriulai	Giriulai	50	—
1984	04.08 — 10.08	Esperanto kaj naturo	Porkuni	75	—
1984	06.10 — 07.10	KOR-11	Kiŝinev	60	10
1985	januaro	Starto-1	Ĉeljabinska provinco	21	4
1985	16.02 — 17.02	VAĤ-85	Ĥarkova provinco	56	7
1985	12.04 — 14.04	KOR-12	Odeso	148	23
1985	30.06 — 10.07	Seminario de nevidantaj esperantistoj	Apud-oskvo	131	—
1985	julio	E-renkontiĝo en Mezazio	Taĝikio	120	10
1985	16.08 — 18.08	Horizonto-5	Vitinai	40	—
1985	01.11 — 03.11	E-renkontiĝo	Jaroslavl	84	—

ASE (Asocio de Sovetiaj Esperantistoj)

Jaro	Periodo	Titolo	Loko	Kvanto de partoprenintoj	Kvanto de lokoj
1985	14.12 — 15.12	Zamenhof- tagoj	Ternopil	60	5
1986	30.04 — 03.05	OSER-42	Tomsk	90	14
1986	01.05 — 03.05	5-a regiona E-renkontiĝo	Stavropolj	79	—
1986	09.07 — 18.07	Seminario de nevidantaj esperantistoj	Kislovodsk	75	9
1986	26.09 — 03.10	Velura se- zono	Jalta	80	10
1986	13.12 — 14.12	Zamenhof- tagoj	Kaunas	140	—
1987	06.03 — 08.03	2-a nordrusia E-renkontiĝo	Kirov	60	6
1987	25.04 — 26.04	KOR-15	Odeso	86	16
1987	30.06 — 07.07	Seminario de nevidantaj esperantistoj	Moskvo	179	46
1987	21.08 — 23.08	E-renkontiĝo	Novo- ĉerkassk	20	5
1987	22.08 — 31.08	MoskvEJT-1	Zagorsk	140	—
1987	06.11 — 08.11	VER-6	Saratov	106	13
1987	06.11 — 08.11	Sudrusia E-renkontiĝo	Soĉi	60	9
1988	06.03 — 08.03	ArtVER-1	Volgograd	110	18
1988	06.05 — 09.05	OSER-44	Tomsk	103	18
1988	07.05 — 09.05	CRRER-26	Apud- moskvo	133	25
1988	21.07 — 01.08	VolgEJT-2	Urjupinsk	79	28
1988	09.08 — 22.08	LETo-4	Ĉeljabinsk	53	10
1988	10.12	Ekstervica konferenco			

Historiaj notoj

Jaro	Periodo	Titolo	Loko	Kvanto de partoprenintoj	Kvanto de lokoj
		de Litova ASE-filio	Kaunas	317	—
1989	15.04 — 16.04	KOR-17	Odeso	165	25

Same aktivis kiel antaŭe diversaj E-kluboĵ, organizante siajn jam tradiciajn E-aranĝojn:

TRADICIAJ ESPERANTO-ARANĜOJ EN USSR

Titolo de la aranĝo	Klubo-organizanto	Karaktero de la aranĝo	Ofteco dum jaro
Esperanto kaj naturo	E-klubo de Tallinn kaj Estona filio de ASE	ripoza kaj naturdefenda	1
Giriuliai	E-klubo de Klajpeda	ripoz-turista	1
Velura sezono	Jalta E-klubo "TERO"	aŭtuna, ripoza	1
Muzo	E-klubo de Vilnius	literatura	1
Liro	E-klubo "Malahita stelo" de Miass	literatura	1
Boatado	E-klubo de Vilnius	ripoz-turista	1
Neĝfloketo	E-klubo de Riga	vintra, ripoza	1
Ora folio	E-klubo de Riga	aŭtuna, ripoza	1
VAĤ (VAZ)	E-kluboĵ de Ĥarkiv kaj Zmijiv	vintra, ripoza	1
CRPER	Diversaj centro-rusiaj E-kluboĵ laŭvice	Centro-rusia regiona E-renkontiĝo	1 - 2
REJU	Diversaj E-kluboĵ de la regiono laŭvice	E-renkontiĝo de Urala regiono	1 — 2
KOR	E-kluboĵ de Odeso kaj Kiŝinev	ripoz-praktika	1 - 2
Lazura tajgo	E-klubo de Tĵumenj	vintra, ripoza	1
UZER	E-kluboĵ de Uzbekio	ripoz-praktika	1 - 2
OkSEJT	Diversaj E-kluboĵ de la lando	Somera junulara E-tendaro	1
OrSEJT	Diversaj E-kluboĵ de la lando	Somera junulara E-tendaro	1
	Diversaj	Okcident-	

ASE (Asocio de Sovetiaj Esperantistoj)

Titolo de la aranĝo	Klubo-organizanto	Karaktero de la aranĝo	Ofteco dum jaro
OSER	E-klubo de la regiono	siberia E-renkontiĝo	1 - 2
GeIERT	E-klubo de Gefenĝik	ripoz-turista	1

Ankaŭ mi emus prezenti al via atento bildon, kiel ŝanĝiĝis gvidantoj de diversaj ASE-Komisionoj (v. tabelon en la suplementa parto).



Dum OKSEJT-27 (Kujbiŝev, 1986) julianoj de KGS taksas la viditan programon



GelERT-1. Marŝas ĉarkovanoj



Matena kunveno — kutima programero de SEJT



Partoprenintoj en BET—21 (Kuldiga, Lratvio, 1984)



Junaj esperantistoj dum SEJT — Maja Loskutova kaj Sveta Gončarova



Partoprenintoj en OkSEJT-22 (Ivanovo, 1980) ekskursas tra antikva urbo Suzdalj

LABORO DE LA INSTRU-METODIKA KOMISIONO

"Instru-metodika komisiono de ASE konforme al akceptita en 1982 laborplano finis ellabori programon por elementaj kursoj, programon de ekzamenoj por kursgvidantoj kaj ankaŭ Regularon pri atestado, kiuj estis aprobitaj de ASE-Prezidio..."²²

Evidente ĉie tra la mondo unu el la plej gravaj momentoj en la agado de esperantistoj (se ne la plej grava) estas instrua laboro. Ja de ĝi dependas apero de novaj esperantistoj.

Kaj ĉiuj niaj esperantistoj ekĝojis, kiam tuj post la FK kiel gvidanto de tiu grava komisiono estis nomumita de la Estraro la estimata de ĉiuj ni, tre kompetenta en la instru-demandoj eks-SEJM-ano Boris G. Kolker²³.

²² El la decidoj de la jarkurveno de la ASE-Estraro 09.12.1983.

²³ Dum SEJM-a periodo li multe okupiĝis pri instruado kaj ties metodiko, gvidis korespondan instruadon landskale, laboris pri verkado de lernilo, kiu aperis iom antaŭ ASE-fondo kiel broŝuro — "Metodiĉeskije razrabotki po mejdunarodnomu jaziku Esperanto dla kursov"; Ufa, Ufinskij klub Esperanto. 1978, 80 p

Kolker Boris Grigorjeviĉ naskiĝis en Tiraspol (Moldavio); kandidato de filologiaj sciencoj, defendinta la disertacion pri la temo "Kontribuo de la rusa lingvo al la formiĝo kaj evoluo de Esperanto" — diplomito pri la instruado de la rusa kaj franca lingvoj — iama instruisto de lingvistiko kaj lingvoj en pedagogiaj institutoj, poste laboris en Ufa (Baŝkirio) kiel supera scienca laboranto — tradukisto de scienc-teknika literaturo en scienc-esplora instituto. Nun li estas elmigrinta el Rusio al Usono.

Esperantistiĝis Kolker B.G. en la jaro 1957, gvidis kursojn kaj fondis klubojn en Tiraspol, Kiŝinev, Birsĉ, Ufa; ekde 1970 organizis kaj gvidis landskale korespondkursojn. Kurfondinto, prezidanto, vicprezidanto, fakestro de SEJM dum la tuta ties periodo.

Prezidanto, vicprezidanto, gvidanto de instru-metodika komisiono de ASE; vicprezidanto de SEU, respondeca pri instru-metodika laboro.

Komitatano de TEJO (1972 — 1975); ĉefdelegito de UEA por Sovetio (1975 — 1984); Komitatano "B" de UEA (1975 — 1977); Komitatano "C" de UEA (1989 — 1991).

Verkis du E-lemolibrojn; publikigis instru-lingvistikajn kaj esperantologiajn artikolojn, informajn materialojn, multajn recenzojn, versaĵojn kaj tradukojn.

Membro de IUEF, EVA, ILEI, ISAE; partoprenis kelkajn UK-ojn kaj multnombrajn E-aranĝojn en Sovetio. Ĉeforganizinto de SEJT-12 en Baŝkirio en 1970.

Kaj tuj komenciĝis vere efektiva laboro. Jam en "Kurte" N 58 (majo 1979) eblas legi alvokon de la komisionestro: "Instru-metodika fako [komisiono] de ASE bezonas kunlaborantojn. Bonvenas proponoj por la laborplano, sinproponoj por plenumi konkretajn taskojn..." Kaj en N 65: "INSTRU-METODIKA sekcio [komisiono] de ASE sciigas, ke ĝi okazigis pedagogiajn seminariojn dum REVU-18, OrSEJT-21 kaj OkSEJT-21, paroligajn kursojn dum ambaŭ tendaroj..."

Ĉiuj kluboj kaj grupoj de la lando estas petataj dum la proksima tempo pridiskuti kaj elekti respondeculon pri instru-metodika laboro, kiu reprezentos la klubon en la aktivularo de la instru-metodika sekcio..."

Ankaŭ dum CRRER en u. Ivanovo (07 — 09.11.1979) okazis seminario pri E-instruado.

Tia starto en la laboro alportis siajn pozitivajn rezultojn. Sufiĉe rapide estis kompilitaj laborgrupoj, kiuj respondecis pri tri agaddirektoj en la komisiono:

1. Konsilio, kiu respondecos pri la instrua laboro:

- 1.1. Kolker B.G. — prezidanto;
- 1.2. Tokarev B.V. — vicprezidanto;
- 1.3. Ŝijafer A.Z. — sekretario;
- 1.4. Smetanina S.V. — Eŭropa parto de RSFSR, Belorusio, Moldavio, Transkaŭkazio;
- 1.5. Opletajev V.V. — Azia parto de RSFSR, Kazaĥio, Mezaĥio;

- 1.6. Koroleviĉ A.I. -- Ukrainio;
- 1.8. Grigaitis V. -- Litovio,
- 1.9. Linnarnägi M -- Estonio.

2. Metodika grupo:

- 2.1. Kolker B.G.;
- 2.2. Jokarev B.V.,
- 2.3. Koroleviĉ A.I.;
- 2.4. Sevak G.G.;
- 2.5. Kopilenko M.M.;
- 2.6. Grigorjev V.P.;
- 2.7. Kuznecov S.N.



Aŭtoro de unu el lernolibroj "Esperanto en 12 lecionoj"
A.A. Kerner (Kirovograd, Ukrainio)

3. Respondeculoj pri instru-metodika laboro en la kluboj:
tiuj estis elektitaj preskaŭ en 100 E-kluboj de la lando.

Dum proksimaj monatoj post la FK estis kompilita laborplano de la komisiono por proksima periodo de la agado kaj jam maje prezentita al ASE-Prezidio, kie tamen ĝi ne estis pridiskutita kaj aprobita. Same ne okupiĝis ASE-Prezidio pri unueco de Atestoj por la kursfinintoj. Tiu unueco de la Atesto ne estis ellaborita dum la tuta ASE-ekzisto. Feliĉe post kiam la komisiono ellaboris unutipajn por la lando postulojn al la ekzamenatoj, diversnivelajn programojn por la kursanoj, ASE-Prezidio aprobis tiujn dokumentojn dum unu el siaj kunsidoj en 1982.

Multe da atento la komisiono donis al perfektigo de E-instruistoj; tion oni efektivigadis dum diversaj tendaroj, renkontiĝoj, seminarioj... Iom poste estis fondita tutlanda atesta komisiono kaj ellaboritaj postuloj por la E-instruistoj. Ekde tiu momento ĉiuj dezirantoj povis plenumi ekzamenojn por ricevi atestojn pri rajto oficiale instrui Esperanton. Verdire, mi persone opinias, ke tiuj postuloj estis eĉ iom tro severaj. Eble pro tio ne troviĝis multe da dezirantoj plenumi tiujn ekzamenojn. Ankaŭ neniu atestoj pri la ekzameniĝo estis ellaboritaj. Do, iel oficiale certigi la ekzameniĝon oni ne povis.

Sukcese laboris respondeculoj pri la IML en regionoj. Imitinda laboro estis en Urala regiono, kie estis ellaboritaj kondiĉoj kaj organizita konkurado inter E-kluboj de la regiono pri la IML. La konkurado ne estis tiom aktiva, kiel dum SEJM-a periodo aŭ, eble, kiel estis planita, sed malgraŭ ĉio, nun eblas ĉerpi iujn rezultojn pri aktiveco de la regionaj E-kluboj²⁴ (v. la tabelon).

La laboro "floris" ĝis 1984 j., kiam la komisionestro Boris G. Kolker estis devigita lasi sian postenon. Sufiĉe agema li multfoje sur paĝoj de diversaj E-revuoj aperigadis recenzojn pri aperintaj E-libroj²⁵. Kaj unu el tiuj recenzoj, aperinta en la revuo

²⁴ La konkurado inter E-kluboj estis organizita nur pri la IML.

²⁵ Nuntempe Boris G. Kolker estas unu el redaktoroj de la revuo "Monato" kaj gvidas ĝuste la recenzadon de novaj libroj.

Rezultoj de la interkluba konkurado en Urala regiono

NN I/V	Urbo	E-klubo	1982		1983		1984		1985		1986		1987	
			1982	1983	1984	1985	1986	1987	1988					
1.	Ĉeljabinsk	ĈEK	0 9—13	? ?	? ?	12 10	— —	— —	— —	— —	— —	— —	— —	— —
2.	Ĉeljabinsk	Stelo de l' Espero	395 5	? 4	? 4	6 11	— —	— —	— —	— —	— —	— —	— —	— —
3.	Kurgan	KEK	0	? ?	? ?	— —	— —	— —	— —	— —	— —	— —	— —	— —
4.	Miass	Malaĥita Stelo	102 7	? 8	? 8	256 7	— —	— —	— —	— —	— —	— —	— —	— —
5.	Nijnevarstovsk	Samotlor	467 4	? 2	? 2	474,2 5	— —	— —	— —	— —	— —	— —	— —	— —
6.	Nijnij Tagil	Renaskiĝo	—	—	—	—	—	—	—	—	—	—	—	—
7.	Permj	PEK	471 3	? 11—12	? 11—12	200 8	— —	— —	— —	— —	— —	— —	— —	— —
8.	Revda	REK	—	—	—	—	—	—	—	—	—	—	—	—
9.	Salavat	Verda Aŭroro	353 6	? 5	? 5	475,6 4	— —	— —	— —	— —	— —	— —	— —	— —
10.	Sverdlovsk	SvEK	690 1	? 3	? 3	1447 1	— —	— —	— —	— —	— —	— —	— —	— —


NN I/V	Urbo	E-klubo	1982		1983		1984		1985		1986		1987	
			1982	1983	1983	1984	1984	1985	1985	1986	1986	1987	1987	1988
11.	Surgut	Mateno	44	8	?	7	471	6	527	3	484	3	397	4
12.	Tjumenj	D?	—	—	—	—	—	—	—	—	—	—	—	—
13.	Tjumenj	Revo	652	2	?	1	697	3	441	5	210	8	561	3
14.	Tobolsk	Saluton	0	9—13	?	?	65	9	—	—	—	—	—	—
15.	Tobolsk	TobEK	—	—	—	—	—	—	62	8	234	7	48	7
16.	Ufa	Amiko	0	9—13	?	?	—	12	38	9	—	—	—	—
17.	Ufa	Esperanto	0	9—13	?	?	1388	2	492	4	—	—	—	—

Noto: En la tabelo estas prezentitaj poentoj, kiujn kolektis la kluboj dum la tempojaraj, kaj lokoj, kiujn ili okupas

"Esperanto"²⁶, kaŭzis fortan indignon de L. Ŝanina kaj ŝiaj estroj. La plej terura (certe — por SSOD-oficialuloj) estis, ke B. Kolker aŭdacis recenzi verkon de israela aŭtoro, kaj krome — ke apude lokiĝis "kontraŭsovetia" recenzo de la libro de K. Ŝtajner "7000 tagoj en Siberio", farita de U. Lins²⁷ (v. ĉapitron "Laboro de la komisiono pri internaciaj ligoj").

Memkompreneble, SSOD-oficialuloj ne povis elteni tiun malindan agon de B. Kolker (ankaŭ de UEA kaj ties revuo) kaj devigis lin peti pri ekŝiĝo. Nur en 1988 vica ASE-Estrarkunsido decidis reenpostenigi la komisionestron.

Anstataŭ Boris G. Kolker la komisionon gvidis Boris V. Tokarev, sperta pri multaj demandoj en la E-laboro, sed ne tiom forta de organiza vidpunkto. Eble pro tio la laboro tiuperiode ne estis bone prezentita.



B.G. Kolker, estro de IMK, enmanigas honorfolion al unu el gvidintoj de perfektigaj kursoj dum BET-24 (Saulaine, Latvio, 1987)

²⁶ Recenzo de la libro "Salato" de M. Savir -- 'Bongusta salato' ("Esperanto" N 4/1984, p. 72)

²⁷ "Esperanto" N 4/1984, p. 73.

Estas interese konatiĝi kun ankoraŭ kelkaj ciferoj. En Informbuleteno de ASE N 5 (43)/1984 aperis ampleksa artikolo de V. Opletajev²⁸ pri rezultoj de regula enketado, kiu helpis statistike analizi agadon de esperantistoj en la sfero de edukado. Malgraŭ tio, ke ne ĉiuj E-kluboj regule raportis pri siaj aktivecoj ĉi-direktaj, tutegale la kolektitaj donitaĵoj havas certan intereson.

EDUKADO DE NOVAJ ESPERANTISTOJ EN ORIENTA PARTO DE SOVETIO²⁹

Lernojaro	Numero de rondetoj	Numero de rondetanoj			% de sukcese finintoj	Meza aĝo	Meza daŭro de la kurso (monatoj)
		komence	fine	% al fino			
1979/80	39	1004	294	29,3	55	21	5,0
1980/81	?	1600	600	37,5	54	22	4,0
1981/82	70	1110	500	45,5	52	21	4,5
1982/83	43	907	402	44,3	49	?	4,5

LABORO DE LA KULTURA KOMISIONO

"En la kreado de unu kulturo — ĉar kulturojn kreas la homoj pli-malpli konscie — grava faktoro estas ĉiam la kontinueco..."³⁰

Dum la SEJM-a periodo multe varia estis la prezentata kulturo de niaj sovetiaj popoloj. Fakte tio okazadis en niaj internaj (enlandaj) E-aranĝoj. Ĉiuj E-kolektivoj strebis plej multe montri sian potencon, siajn fortojn. Kaj ne

²⁸ V. Opletajev estis membro de IMK, zonestro de orienta parto de la lando (v. p. 53).

²⁹ Uralo, Mezasio, Siberio, Fora Oriento..

³⁰ "Esperanta antologio (poemoj 1887 — 1981)"; Rotterdam, UEA, 1984.

vane en la Taksa Demandaro de soc. konkurado inter SEJM-kluboĵoj estis pluraj momentoj, pro kiuj la kluboj povis akiri aldonajn poentojn.

Dum la FK de ASE estis inter la ceteraj establita ankaŭ kultura komisiono. Ties gvidantoj estis nomumitaj moskvaj esperantistoj Fjodor F. Staneŝnikov kaj Ludmila L. Novikova (komence si loĝis en Miass, poste translokiĝis en Moskvon).

Mem profesia aktoro, do la homo, proksime ligita kun la demandoj de kulturo, Fjodor F. Stanesnikov devus bone orientiĝi, kion necesus fari por prospero de la komisiono.

Mi, bedaŭrinde, ne estis persone konata kun la unua el la komisionestroj kaj povas juĝi pri li kiel homo kaj kiel organizanto nur el paroloj kun lia filino Galina F. Staneŝnikova, kun aliaj homoj, bone lin konintaj.



F.F. Staneŝnikov

aktivinta en Miass, ne estis hazardo en la demandoj pri la kultura laboro. Estas ĝuste ŝi, kiu "naskis" literaturan konkurson en Urala parto de USSR — "Liro"; estis ĉeforganizinto de OrSEJT-19 en 1977 proksime de sia urbo, multe laboris (memkompreneble, laboras ankaŭ nun) pri tradukado de poeziaĵoj.

Do, ŝajnas, estis la kondiĉoj por ke la laboro de la komisiono

F.F. Staneŝnikov (08.06.1914 — 24.10.1983), honora aktoro de RSFSR kaj Taĝikio, naskiĝis en Moskvo, laboris kiel laboristo, poste estis studento (finlernis teatran lernejon en 1937) kaj poste plt ol 40 jarojn laboris kiel aktoro kaj reĝisoro en diversaj teatroj.

Esperanton F.F. Staneŝnikov ellernis en dua duono de 20-aj jaroj, aktive korespondadis. Enkadre de la Esperanto-komisiono ĉe SSOD li kunlaboris pere de prelegoj, koncertoj.

Elektita dum la FK en la Estraron de ASE kaj gvidanto de unu el la komisionoj - kultura, li gvidis ĝin ĝis la lastaj tagoj de sia vivo.

Ankaŭ Ludmila L. Novikova plurajn jarojn



L.L. Novikova

estu sukcesa. Sed ĉu tiel okazis?

La evoluo de ASE-movado montris, ke, laŭ mia opinio, estis farita nenio aŭ preskaŭ nenio por ke la komisiono "floru" kaj progresu. Mi, eble ankaŭ aliaj, ne vidis ĝiajn planojn kaj programojn, ne estis kompilita "teamo" el la homoj, kiuj povis kaj pretis ĉiel kontribui al la laboro...

Kaj kiel sekvo: nek dum la enlandaj E-aranĝoj, nek dum la internaciaj la komisiono povis prezenti sian laboron ĉu per iuj koncertoj, ĉu almenaŭ per koncertaj programeroj.

Ŝajnas, tro "nigrokolore" estis prezentita ĉi tie la kultura laboro en ASE. Sed vere estus eraro opinii, ke nenia laboro entute estis farata en la lando ĉi-direkte. Same kiel antaŭe surloke tiu ĉi vastkampa laboro prosperis: multegis ĉiuspecaj ekspozicioj (ne nur pri E-temaro), okazadis regulaj kaj periodaj literaturaj konkursoj, el kiuj nepras mencii unuavice "Muzon" kaj "Liron"; en Ukrainio tradukista sekcio de la respublika filio okazigadis siajn konkursojn; naskiĝinta en 1978 (decembro) Leningrada E-teatro prosperis — ili plurfoje prezentis siajn spektaklojn en Tartu, Tallinn, Vilnius, Tiĥvin, Budapeŝto (dum Internacia renkontiĝo de E-teatroj marte 1982); en la sama urbo (en Leningrad) estis formita ankoraŭ unu kolektivo — kantensemblo "Eterna muziko", ankaŭ ĝi ofte prezentis sian arton dum diversaj E-aranĝoj... Necesas ne forgesi pri eldono de du gramofondiskoj (kantoj de Ĵomart kaj Nataŝa kaj "Eterna muziko"), kaj ĉio ĉi estis farita iniciate de surlokaj esperantistoj, sen helpo de la komisiono.

Pri deversspecaj, diversrangaj kaj diverslokaj literaturaj konkursoj estas aparta parolo. Ja ne vane mondfama esperantisto Aldo de' Giorgi tiel esprimis sian opinion pri la konkursoj ĝenerale:

" Multspecaj konkursoj pri diversaj literaturaj ĝenroj estas ĉiulanda pasio infektanta larĝajn tavolojn de la aspirantaj: poetoj, novelistoj, romanistoj, eseistoj k.s....

Sed, en ĉi tiuj lastaj jardekoj, la plej vaste konata, prestiĝa kaj serioza konkurso estas sendube la Belartaj Konkursoj de UEA. Ĝin oni lanĉis, en la nuna formo elpensita de Reto Rossetti, en 1950...³¹

Pli sube temos pri konkursoj organizataj de tradukista sekcio ĉe URF ASE kaj pri konkursoj "Muzo" en Litovio. Ĉi tie mi ŝatus prezenti al via atento nur rezultojn de uralregiona ĉiujara konkurso "Liro" kaj bildon de partopreno de niaj esperantistoj en la plej prestiĝaj ĉiujaraj konkursoj — Belartaj Konkursoj de UEA.

Fakte, subpreme de SSOD ASE-Prezidanto dissendis al ĉiuj E-kluboĵ de la lando cirkuleron, en kiu temas, ke neniu el niaj esperantistoj rajtas sendadi preter ASE iajn materialojn eksterlanden por publikigi en E-periodaĵoj, la samo rilatis al konkursaj beletraĵoj. Malgraŭ tiuj malpermesoj pluraj niaj samideanoj, ignorante la cirkuleron, kontribuis al E-periodaĵoj. Plejparte tiuj estis esperantistoj kiuj aktivis ekster ASE.

Komence pri la konkursoj "Liro". En la prezentata al via atento tabelo estas klara preskaŭ la tuta bildo pri tiu ĉi konkurso.

SCIINDAĴOJ PRI LITERATURAJ KONKURSOJ "LIRO"

- "Liro-79" Okazis la 15—16-an de decembro 1979. Ĝin partoprenis 72 esperantistoj el 9 urboj de Volgo-Urala regiono; mem konkurson partoprenis 20 personoj el 8 urboj (3 personoj — foreste).
La poezia konkurso enhavis 4 branĉojn:
* Plenumo de E-kantoj —
1-a loko: L. Rogojnikova pro "Karesas koron",
2-a loko: A. Peĉonkin pro "Dona, Dona" kaj
V. Bugrova pro "Kio de la am",
3-a loko: S. Fomina pro "Pluvo";
* Recitaĵo de E-versaĵoj —
1-a loko: V. Ŝarabkova pro "Estis la am",
2-a loko: R. Peregrjumova pro "Al la hundo de
Kaĉalov",
3-a loko: T. Ŝĉerbakova pro "Kio al mi helpas";
* Tradukitaj kantotekstoj —
1-a loko: N. Cvileneva,
2-a loko: A. Aleksandrov,
3-a loko: L. Sopilnjak;
* Originalaj melodioj por esperantlingvaj tekstoj —

³¹ El artikolo "Valoro de literatura konkurado" — revuo "Esperanto", N 11/1979, p. 188.

donitajoj mankas.

"Liro-80"

Okazis la 07 — 09-an de novembro en Ĉeljabinsk dum REVU-21. Ĝin partoprenis 108 esperantistoj el 17 urboj; mem konkurson partoprenis 30 personoj el 16 urboj (10 personoj — foreste).

La rezultoj de la konkurso laŭ branĉoj:

* Konkurso pri tradukado de A. Blok-poeziaĵoj —

- 1-a loko — L. Novikova (Miass),
 - 2-a loko — P. Astafjev (Kujbiŝev),
 - 3-a loko — N. Danovskij (Riga);
- * Plenumo de E-kantoj —

- 1-a loko — O. Akatova (Kirov),
 - 2-a loko — S. Komejev (Miass),
 - 3-a loko — S. Ojiganova (Permj);
- * Deklamado —

- 1-a loko — ne estas aljuĝita,
 - 2-a loko — M. Ŝjafer (Tomsk),
 - 3-a loko — N. Liŝic (Sverdlovsk);
- * Tradukita poezio —

- 1-a loko — ne estas aljuĝita,
 - 2-a loko — A. Aleksandrov (Ufa),
 - 3-a loko — A. Fomin (Ĉeljabinsk);
- * Originala poezio —

- 1-a loko — G. Gazizov (Ufa),
 - 2-a loko — ne estas aljuĝita,
 - 3-a loko — A. Aleksandrov (Ufa),
- Favora premio — L. Sopilnjak (Kujbiŝev);

* Originala kantoteksto —

- 1-a loko — N. Cvileneva (Ufa),
- 2-a loko — A. Aleksandrov (Ufa).

"Liro-81"

Okazis meze de la decembro 1981 en Miass-distrikto. Ĝin partoprenis pli ol 40 personoj el 15 urboj.

La rezultoj de la konkurso:

* Originala poezio —

- 1-a kaj 3-a lokoj ne estis aljuĝitaj,
- 2-a loko — G. Gazizov (Ufa);

* Originala kantoteksto —

- 1-a loko — A. Radajev (Kujbiŝev),
- 2-a loko — A. Ĵuravlĵov (Krasnojarsk),
- 3-a loko — N. Cvileneva (Ufa);

* Originala melodio por esperantlingvaj tekstoj —

- 1-a loko — A. Fomin (Ĉeljabinsk),
- 2-a loko — A. Radajev (Kujbiŝev),
- 3-a loko — L. Rubcova (Krasnojarsk);

* Tradukita poezio —

- 1-a loko — L. Novikova (Miass),
- 2-a loko — A. Aleksandrov (Ufa),
- 3-a loko — G. Gazizov (Ufa);

* Tradukita kantoteksto —

1-a loko — V. Denisov (Novokujbiŝevsk),
2-a loko — L. Novikova (Miass),
3-a loko — A. Ĵuravlĵov (Krasnojarsk) kaj B. Kolker (Ufa);
* Deklamaĝo de poezio —
1-a loko — V. Ŝarabkova (Kujbiŝev),
2-a loko — A. Knjazev (Miass),
3-a loko — G. Gazizov (Ufa);
* Plenumo de E-kanto —
1-a loko — N. Cvileneva (Ufa) kaj L. Kirŝ (Ufa),
2-a loko — V. Denisov (Novokujbiŝevsk),
3-a loko — A. Fomin (Ĉeljabinsk),
Special;a premio "Nova talento" — M. Nuretdinova (Kujbiŝev);
* Speciala branĉo — tradukita rakonto de F. Dostojevskij —
1-a loko — N. Cvileneva (Ufa),
2-a loko — L. Novikova (Miass),
3-a loko — G. Ŝilo (Slavjansk),
Kuraĝiga premio — L. Kuzmenko (Nijnij Tagil).

"Liro-82" Donitajoj pri la konkurso mankas.

"Liro-83" Donitajoj pri la konkurso mankas.

"Liro-84" La konkurson organizis ER "Kulturo" (sekretario — J. Lozgaĉova).
Ĝin partoprenis 21 verkoj. La juĝkomisiono: N. Cvileneva, A. Fjodorov,
G. Gazizov, J. Grigorjeva, A. Korĵenkov, N. Lozgaĉov.

1-a rezultoj de la konkurso:

* Originala poezio —

1-a, 2-a kaj 3-a lokoj ne estis aljuĝitaj,
Laŭda mencio — V. Masalkin (Taŝkent);

* Tradukita poezio —

1-a kaj 2-a lokoj ne estis aljuĝitaj,
3-a loko — S. Verŝinin (Uljanovsk) kaj N. Lozgaĉov (Permj);

* Omage al A. Aleksandrov (lia ŝatata poemo "Poeto" de Sergej Jensenin) —

1-a kaj 3-a lokoj ne estis aljuĝitaj,
2-a loko — S. Verŝinin (Uljanovsk);

* Originala prozo (scienc-fikcia) —

1-a kaj 2-a lokoj ne estis aljuĝitaj,
3-a loko — M. Korotkov (Leninsk-Kuzneckij);

* Tradukita prozo (scienc-fikcia) —

1-a kaj 2-a lokoj ne estis aljuĝitaj,
3-a loko — M. Korotkov (Leninsk-Kuzneckij);

* Eseo — konkurso ne okazis (venis nur unu konkursaĵo);

* Originala kantomelodio — konkurso ne okazis (venis nur unu konkursaĵo);

* Konkurso por komencantoj — ne okazis.

La venkintoj ricevis libropremiojn dum literatura semajnfino en Sverdlovsk (15 — 16.12.1984).

"Liro-85" La rezultoj de la konkurso:

* Tradukita poezio — V. Kamenskij "Ironia monumento" — la

konkurso ne okazis;

* Tradukita urala scienc-fikciaĵo —

1-a loko — N. Lozgačov (Permj),

2-a loko — A. Korĵenkov (Sverdlovsk),

Laŭda mencio — Andrej Parfentjev (Sverdlovsk);

* Originala poezio —

1-a kaj 2-a lokoj ne estis aljuĝitaj,

3-a loko — M. Korotkov (Leninsk-Kuzneckij);

* Originala prozo —

1-a loko ne estis aljuĝita,

2-a loko — M. Korotkov (Leninsk-Kuzneckij),

Laŭda mencio — Andrej Parfentjev (Sverdlovsk).

"Liro-86"

Laŭreatoj de la konkurso:

* Originala prozo — N. Lozgačov (Sverdlovsk) pro "Savanta";

* Originala poezio — G. Gazizov (Ufa) pro "Politika erotiko";

* Tradukita prozo — Literatura sekcio de Sverdlovskia E-klubo pro "Mia najbaro" de Feliks Vibc;

* Laŭda mencio — V. Minin (Tomsk) pro poeziaj tradukoj el A. Puŝkin.

Premiado okazis dum la 5-a Urala konferenco pri planlingvoj.

"Liro-87"

La konkurso okazis en 4 branĉoj el la anoncitaj 7. La juĝkomisiono:

S. Pokrovskij, A. Korĵenkov, N. Lozgačov — tradukita prozo; A. Korĵenkov, N. Lozgačov — originala verkado;

V. Kloĉkov — tradukita poezio; sekretario — J. Lozgaĉova.

Partoprenis la konkurson 15 verkoj.

La rezultoj:

* Originala poezio — laŭreato: M. Korotkov (Leninsk-Kuzneckij);

* Originala prozo — laŭreato: Aleksandr Parfentjev (Urĵung-Haja, Jakutio);

* Tradukita poezio (el Esperanto — rusen) — Laŭreato: N. Lozgačov;

* Tradukita prozo (el la rusa — Esperanten) — laŭreato: A. Zajsanov (Taŝkent),

Laŭda mencio — V. Opletajev (Surgut).

Premiado okazis dum la 6-a Urala konferenco pri planlingvoj en Permĵa la 03-an de aprilo 1988.

"Liro-88"

La rezultoj de la konkurso:

* Tradukita prozo scienc-fikcia (omaĝe al verkisto Ilĵa Varŝavskij — "Interkompreniĝo estas ebla") — laŭreato: tradukista grupo de Mariĵa Abolskaja (Leningrad),

Laŭda mencio — L. Kuzmenko (Nijnij Tagil);

* Tradukista prozo (libera) — Laŭreato: Andrej Parfentjev (Sverdlovsk);

* Traduko el Esperanto rusen — laŭda mencio: Aleksandr Parfentjev (Sverdlovsk) pro "La vitrino" de J. Modest;

* Originala prozo — laŭreatoj: Aleksandr kaj Andrej Parfentjev (Sverdlovsk);

* Originala poezio — laŭda mencio: Aleksandr Parfentjev

(Sverdlovsk);

* Recenzo pri la poemaro "La tago de l' eterno" de N. Lozgačov — laŭreato: Valentin Melnikov (Moskvo);

* Deklamado — laŭreato: A. Korjenkov (Sverdlovsk);

* Skeĉoj kaj spektakloj — laŭreato: teatra trupo de Sverdlovskia E-klubo, reĝisoro — Rita Dautova ("Budapeŝta ekzameno" de S. Szathmari).

"Liro-89"

Rezultoj de la konkurso:

* Originala poezio, libera (venis 4 verkoj) — laŭreato — Gafur Gazizi (Salavat);

* Tradukita poezio el la rusa Esperanten (el verkoj de A. Afmatova) — venis nur 1 verko, premio ne estis aljuĝita;

* Originala prozo, libera — laŭreato — Andrej Parfentjev (Sverdlovsk),
Laŭda mencio — Natan Procenko (Sevastopol);

* Tradukita prozo, libera — venis nur 2 tradukoj, kiuj ne estis juĝitaj pro mankoj de originaloj;

* Tradukita prozo el Esperanto rusen (El "Sezonoj") — laŭda mencio — V. Melnikov (Moskvo).

Sekretario — J. Lozgaĉova.

Kaj pri la Belartaj Konkursoj de UEA.

Ne estas konata, kiom da niaj esperantistoj partoprenis tiujn konkursojn. Sed ni povas vidi la rezultojn. Dum la periodo 1979 — 1989 la Konkursojn partoprenis kaj gajnis iajn premiojn kelkaj niaj esperantistoj (v. la tabelon).

PARTOPRENINTOJ-PREMIITOJ EN BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA

Jaro	Branĉo	Nomo de partopreninto	Gajnita premio	Titolo de la premiita konkursaĵo
1979	Prozo	V.A. Glazunov (Voroneĵ)	3-a premio	"Bes kunak"
1980	Prozo	V.A. Glazunov (Voroneĵ)	1-a premio	"Ho mia kor"
1984	Kanto	Vladimir Soroka	Honora mencio	"Dum kantas popoloj"
1985	Poezio	E. Belonenko (Rostov/Don)	3-a premio	"Markonkoj"
1986	Kanto	Olena Kopistjanska (Lviv)	Premio An-okin	"Muziko"
1987	Poezio	E. Belonenko (Rostov/Don)	1-a premio	"Fabelo pri ŝkariata floro"

Jaro	Branĉo	Nomo de partopreninto	Gajnita premio	Titolo de la premiita konkursaĵo
1989	Prozo	E. Belonenko (Rostov/Don)	2-a premio	"La blinda modlisto"

Ankaŭ niaj enlandaj E-aranĝoj ne fariĝis malpli interesaj kaj enhavriĉaj pro tio, ke la komisiono "de-supre" ne "organizis" ties programojn. Ĉio estis farata surloke, eĉ iom spontane. Same kiel antaŭe bravis multaj E-kluboj, kiuj same aktive (kompare kun la SEJM-a periodo) preparadis sin al someraj E-tendaroj, al aliaj E-renkontiĝoj; tre bone laboris respondeculoj de la aranĝoj, kiuj devis preparadi tiujn programerojn.

Kaj se paroli pri internaciaj E-aranĝoj, necesas menci, ke por veturi al iuj aranĝoj eksterlanden speciale estis rezervataj lokoj por certaj artistoj, ne nur profesiaj, sed ankaŭ neprofesiaj, amatoraj, kiuj "proksimis" al SSOD-oficistoj. Estus eraro diri ĉi tie, ke tiuj "SSOD-proksimuloj" ne altkvalite sin prezentis. Vere, se konatiĝi kun la plurfoje prezentita kulturo de ekz. Armenio, eblas esprimi la opinion, ke armenaj esperantistoj (kaj efektive la E-aranĝojn eksterlande el Armenio partoprenis nur bone parolantaj esperantistoj) sin prezentis ne nur inde, sed eblas diri eĉ perfekte, brile. Partoprenintoj de kelkaj Universalaj Kongresoj longdaŭre memoros belegajn naciajn vestaĵojn de Armenio, ties naciajn dancojn kaj kantojn en la lingvoj Esperanto kaj armena.

Ankaŭ esperantistoj de Rusio kaj aliaj respublikoj ĉiam pli kaj pli vaste sin prezentis eksterlande al publiko. Jelena Puĥova kaj Galina Staneŝnikova (Moskvo), Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin — Vorkuta), ensemblo de Vladimir Soroka el Ukrainio, ĉarma dueto Ĵomart Amzeev kaj Nataŝa Gerlaĥ — jen estas ne plena listo de niaj esperantistoj, kiuj famiĝis mem vaste tra la mondo kaj fa-migis per siaj koncertaj programoj nian multnacian kulturon.

Pri M. Bronŝtejn plej bone povus diri liaj famaj kantoj. Sed kelkajn vortojn eblas menci ankaŭ pri lia vivo. Kiel homo kaj kiel esperantisto li naskiĝis en Ĥmelnickij (naskiĝdato estas — 07.07.1949), laŭ profesio — inĝeniero-elektristo (finlernis en Tula



M.C. Bronštejn

politeknikan instituton); post Ĥmelnickij li loĝis en Tula -- Tihvin (Leningrada provinco) Vorkuta -- Tihvin

Esperanton al li instruis Andreo B. Rogov (1961). Jam de 1962 M. Bronštejn provas instrui la lingvon al konatoj (komence malsukcese) Ankaŭ samjare komencas traduki (preferas poeziaĵojn -- A. Puŝkin, I Franko kaj multaj aliaj famaj poetoj); verkas mem. lemante tiun arton ĉe Konstantin Gusev. Bonifajlaj Tomado [Boris Tokarev] k.a.

Arda kunlaboranto en SEJM -- ofte li estis elektata kiel Komitatano (kelktempe estis ankaŭ SEJM-Prezidanto) aŭ fakestro. En la jaro 1976 proksime de Tihvin estis organizita vica SEJT-18, kies ĉefa organizinto estis M. Bronštejn.

Multe verkas E-kantojn, kiuj prilumas korusopirojn kaj landan E-vivon. Tiuj kantoj fariĝis tre popularaj inter esperantistoj. Lastatempe multfoje li sukcese prezentas sin internaciskale -- dum UK-oj, dum aliaj E-aranĝoj eksterlande.

Ankaŭ Galina F. Staneŝnikova, filino de Fjodor F. Staneŝnikov, fariĝis fama kiel profesia kantistino de E-kantoj.



Galina F. Staneŝnikova kaj M. Boulton dum unu el UK

Ĉi tie mi ne menciis ankoraŭ unu diskon, faritan dum ASE-ekzisto.

Temas pri granda disko kun kantoj de V. Soroka kaj la ensemblo. Prepari kaj eldoni tiun diskon kun aŭtoraj kantoj helpis tiama respondeca sekretario de ASE L.J. Ŝanina.

Mi opinias inda menciĝi la nefaritajn momentojn en la laboro de la kultur-amasa komisiono. Certe, juĝi "de-flanke" estas pli facile, ol agi, sed...

Do, la komisiono, evidente, devus:


- organizi laboron de literatura rondeto — kolekto de originalaj kaj tradukitaj beletraĵoj, kompilado kaj eldonado de beletra almanako/revuo, organizo de literaturaj konkursoj landskale, organizo de tradukistaj seminarioj, kursoj..
- inda helpo dum la preparo de kulturaj programeroj por ĉiuj E- aranĝoj...
- organizo ie en la lando de E-muzeo, granda E-biblioteko k.s. (ideo pri E-domo, kie lokiĝu muzeo kaj estu organizataj diversaj E-aranĝoj, aperadis plurfloje ĉe diversaj esperantistoj, sed efektivigi tiun ideon ne eblis).



Kievaj esperantistoj prezentas spektaklon dum unu el E-aranĝoj



Jomart Amzeev kaj Nataŝa Gerlah



*Grupo de esperantistoj dum unu el REK en Latvio
(de maldekstre: M. Lineckij, L. Lineckaja, S. Soskina,
N. Sorohova, M. Bronŝtejn*



Kievaj esperantistoj prezentas novan kanton

LABORO DE LA SOVETIA SEKCIO DE MEM

“...ASE-Estraro kaj lokaj organizaĵoj devas aktive partopreni laboron de MEM...”³²

La ĉefa agaddirekto de sovetiaj esperantistoj, sen kio evidente tute ne eblis fondi la Asocion mem, estis laboro enkadre de Mondpaca Esperantista Movado. Fakte, ni ĉiuj, sovetiaj esperantistoj, estis pabatalantoj. Kaj memkompreneble, kiel unu el la plej ĉefaj komisionoj en ASE-strukturo estis la sovetia sekcio de MEM. Ekde la FK tiun gravan agaddirekton ekgvidis tre aktiva esperantisto, havanta grandan sperton en diversaj branĉoj de la agado Semjon N. Podkaminer el Leningrado.

Podkaminer Semjon Naumoviĉ (1901 — 1982), kandidato de teknikaj sciencoj, ekskolonelo de Soveta Armeo, defendanta Leningradon dum la fama 900-taga rezisto de la urbo, aktiva pabatalanto dum pluraj jaroj.

Estante juna studento, li ellemis Esperanton (1920) kaj apartenis al vigla junulara kerno de la E-movado en Petrograd. Li estis unu el kunorganizintoj de la Unua Sovetunia E-Kongreso (1921), dum kiu fondiĝis SEU. Li multe helpis ankaŭ en la organizo de SAT-Kongreso en la jaro 1926. Post la dua mondmilito li daŭrigis sian socian agadon, kunligante pacmovadajn aktivecojn kun la esperantistaj. Li estis presi-

³² El la “Decidoj de la tutlanda FK de ASE”.

danto de E-Komisiono en Leningrad, vicprezidanto de MEM, multe batalis por oficialigo de Esperanto en nia lando kaj estis elektita kiel vicprezidanto de ASE post ties fondiĝo (gvidanto de MEM-sekcio).



Jubilea vespero, dediĉita al la 80-jara jubileo de Semjon N. Podkaminer

Li subtenis la agadon de SEJM, plenforte kontribuis al ties funkciado, helpis al junularo. Okaze de la 10-jara jubileo de SEJM li estis elektita "Honora Aktivulo de SEJM".

Loĝante en la dua urbo de Sovetio (Leningrado), li formis apud si teamon, kiu poste helpis lin en la laboro. Tiuj estis inĝeniero Viktoro Gusev — respondeca sekretario; Ludmila Titova, Vitalij Titov kaj K. Jarmarkin — tri anoj de la sekretarioaro. La sidejo de la sekcio estis en Leningrada Domo de Amikeco kaj Paco (191011 — Leningrado, ul. Fontanka, 21).

Konforme al la plano estis fonditaj MEM-sekcioj ĉe respublikaj ASE-filioj en Ukrainio, Litovio, Latvio, Armenio kaj Estonio.

Krome, estis instalitaj MEM-grupoj kaj MEM-rajtigitoj ĉe fortaj E-klubo (en RSFSR tiuj estis la kluboj de Ivanovo, Krasnodar, Krasnojarsk, Kujbiŝev, Soĉi, Volgograd). La respublikaj MEM-sekcioj siavice fondis MEM-grupojn en siaj respublikaj urboj (en Ukrainio — en 11 urboj; en Estonio — en 3 urboj).

Estis establitaj fortaj kontaktoj kun Packomitatoj³³; anoj de MEM-sekcioj kaj MEM-grupoj aktive partoprenis aranĝojn de la Packomitatoj.

Estis preparitaj diversaj instrukciaj leteroj, rekomendoj kaj konsiloj pri la praktika agado, kiujn oni poste dissendadis al la kluboj. Estis multobligitaj diversaj gravaj dokumentoj de MEM-Estraro, leteroj de MEM-Prezidanto, Deklaro pri kunlaboro inter TPK kaj MEM. Ĉion ĉi la Sekretariaro dissendadis al kluboj.

Ĉiam aktive estis organizataj la abonkampanjoj. Ekz., por la jaro 1982 estis abonitaj 500 ekzempleroj de "Paco".

Aktive laboris ankaŭ lokaj MEM-grupoj. Ekzemple: en Volgogrado en 1982 oni organizis ekspozicion-konkurson de infandeseĝnaĵoj pri la temo "Paco — Amikeco", pli poste — pri la temo "Ni estas volgogradanoj kaj konas, kio estas milito".

Kelkfoje niaj esperantistoj kune kun esperantistoj el aliaj landoj partoprenis "Marŝojn de Paco", kiuj regule estis organizataj tra diversaj vojdirektoj (ankaŭ tra nia lando).



D.A. Perevalov

Post la forpaso de Semjon N. Podkaminer la gvidadon pri la komisiono transprenis V.V. Samodaj, kiu tamen ne longdaŭre okupis ĉi postenon, ja pli kutime por li estis okupiĝi pri eldona laboro kaj pri la literatura, en kio li sendube multe pli kompetentas.

Ŝanĝe al li la gvidadon transprenis Dmitrij A. Perevalov kaj tenis ĝin ĝis la reformiĝo de ASE en 1989. Laborante en APN, li sukcesis organizi aperigon de pluraj broŝuroj pri porpacaj temoj, diversaj politikaj libretoj, kiuj ekabundis dum kelkfojaj ŝanĝoj en superaj tavoloj de politikistoj, dum la periodo, nomita poste "perestrojka".

³³ En Moskvo multaj provoj organizi kunlaboron fiaskis (noto de V.V. Samodaj).

Kelkfoje mi petis lin helpi pri tiu ĉi ĉapitro, sed ial ne sukcesis ion ricevi — nek vidis laborplanojn, nek iujn notojn pri la aktivecoj, nek ion pri anoj de la komisiono. Malgraŭ tio, la laboro certe estis efektivigata, kaj la komisiono entute agis sufiĉe kontentige.

Bedaŭrinde antaŭ nelonge aperis surpaĝe de E-gazeto ("La Ondo de Esperanto", eldonata en Jekaterinburg, Rusio) kelkaj artikoloj, kiuj neniel povas beligi nian E-movadon. Temas pri artikolo de A. Ĥarjkovskij, kaj sekvintaj ĝin respondoj de V.V. Samodaj kaj Nikola Aleksiev. Mi persone tute ne emas daŭrigi la polemikon, sed nur prezentas tiujn artikolojn ĉi-sube. Miavice mi ŝatus esprimi la opinion, ke laŭ mi la plimulto el esperantistoj agadis senrigarde al "manipulado el Moskvo", se tia estis.

MEM estis manipulata de Moskvo³⁴

de Aleksandr Ĥarjkovskij

Kunigi du ideojn

Estas bone konate, ke la Esperanto-movado en Sovetunio komencis reviviĝi post la morto de I. Stalin, kiam nemultaj restintaj samideanoj revenis el GULAGoj. En 1956 oni provis revivigi SEU, formale ne malpermesitan, sed fizike preskaŭ neniigitan. La refonda provo okazis en la moskva klubejo *Ideal*, tamen la aŭtoritatoj disbatis la novnaskitan union kaj riproĉis ties prezidanton E. Bokarev³⁵.

Sed la movado renaskiĝis. Post la sukcesa internacia renkontiĝo kadre de la Moskva festivalo de junularo kaj studentoj (1957) estis fonditaj junularaj grupoj "Fajrero" (Moskvo) kaj "Aŭroro" (Leningrado), kiuj baldaŭ ĉesis pro rezisto de la aŭtoritatoj. Al ni, aktivuloj, estis klare, ke neniu neŭtrala, nepolitika esperantista unuiĝo en USSR estas ebla. Tiutempe du leningradaj esperantistoj kaj komunistoj B. Toll kaj S. Podkaminer iniciatis fondi novan internacian pacbatalan organizon, kiun devige partoprenu ĉiuj sovetiaj esperantistoj. Tiel ili kunigus du ideojn: komunistan pri unuiĝo de la mondo per paco kaj esperantistan pri la internacia lingvo.

MEM kaj la pacmovadoj

³⁴ "La Ondo de Esperanto" N 5-6/1994, p. 20.

³⁵ Detala raporto de Nikolaj Danovskij pri la okazaĵoj en *Ideal* aperis en *Spektro*, 1993, N 2 (noto de la redaktoroj de "La Ondo de Esperanto").

Tiutempe³⁵ estis fondita laŭ la iniciato de Kremlo monda pacmovado kun ties Tutmonda Pac-Konsilantaro en Helsinki, aliaj "tutmondaj" (do, prosovetiaj) organizoj — junularaj, virinaj k.t.p. Festivaloj de "pacbatalantoj" okazis en pluraj ĉefurboj. Sub influo de Tutmonda Kongreso de la popoloj por paco en Vieno en 1953 fondiĝis Mondpaca Esperantista Movado (MEM), sed ĝi ekvivis nur post la fondo de la sovetia filio, kiam unu el la fondintoj de MEM, aŭstria komunisto Anton Balague venis al Moskvo por serĉi favoron de la gvidantoj de la Unuiĝo de sovetuniaj amikec-societoj (SSOD), fakte — fako de la Internacia departemento de CK KPSU. Post kelkaj jaroj li kaj sovetiaj MEManoj atingis la celon — la partiaj subvencioj ebligis eldoni *Pacon*, organon de MEM en USSR kaj ties satelitoj en Eŭropo, eldoni propagandan literaturon en Esperanto, organizi konferencojn de MEM.

La movadon gvidis vicprezidanto de SSOD M. Pesljak, kiu plenumis ordonojn de Valentin Ivanov, kiu kuratoris esperantistojn en la tre influa internacia departemento de CK KPSU.

Pesljak postulis, ke la MEManoj en la socialisma bloko sekvu la partian linion, obeu la ordonojn de la partio kaj limigu la kvanton de esperantistoj. Do, nia espero uzi MEM kiel ŝildon por legitimi la kvanton de esperantistoj en USSR ne realiĝis. Kontraŭe, oni uzis sovetiajn kaj eksterlandajn esperantistojn por atingi siajn porsovetiajn celojn.

Kiu mendis la muzikon?

La sovetiaj aktivuloj de MEM antaŭ esperantistaj aranĝoj estis instrukciataj en la Domo de Amikeco en Moskvo pri la metodoj de propagando. Iliaj vojaĝoj estis pagataj de CK KPSU, kaj kiu pagas la muzikistojn, tiu mendas la muzikon.

En 1965 du sovetiaj komunistoj S. Miĥajlov kaj S. Podkaminer partoprenis en la 50a UK en Japanio. Ili faris ĉion, ke la neŭtrala organizo estu unuflanka kaj kondamnu la usonajn militagojn en Vjetnamio. En la kongresa halo estis aranĝita verda standardo por kolekti subskribojn subtene al la komunisma Vjetnamio. Kiam responsuloj de UEA malpermesis, oni ripetis la samon en la sekva UK (Budapeŝto, 1966), ĉi-foje pli sukcese.

Mi mem partoprenis en 1976 similan konsultiĝon de esperantistoj el socialismaj landoj en Moskvo. La raportoj sonis kvazaŭ ĝi estus ne esperantista, sed kompartia konferenco.

Mi partoprenis ankaŭ konferencon de MEM kadre de la 63a UK (Varna, 1978). Por la elekto de la Internacia Komitato de MEM estis prezentita listo kompilita de M. Pesljak en Moskvo. Kiam unu el la fondintoj de MEM, malnova komunisto S. Podkaminer³⁷ eksciis, ke li ne estas en la listo, li ekhavis koratakon. Li havis unu mankon — li estis judo, kaj en CK KPSU oni decidis, ke

³⁵ Pli frue — en 1949—50 (rim. de V.S. Aroloviĉ).

³⁷ MEM fondiĝis en 1953, kiam S.N. Podkaminer ankoraŭ ne vekigis (rim. de V.S. Aroloviĉ).

jam tro multaj judoj gvidas la organizaĵojn. Tio koncernis ne nur MEM. En Moskvo oni opiniis, ke ankaŭ UEA kaj TEJO estas cionismaj: H. Tonkin estis suspektita kiel judo pro la finaĵo *-kin*, kaj pri la judeco de israelano A. Wandel, gvidanto de TEJO³⁸, neniu dubis.

Kio pri UEA?

Rilate al UEA, en CK oni ne kredis, ke iu internacia organizaĵo povas esti neŭtrala. Favorante MEM, oni volis uzi ĝin kiel ilon por ekgvidi UEA kaj uzi ĝin por sovetiaj celoj. Al CK ne plaĉis Ivo Lapenna, kiun oni konsideris “internacia spiono”, eble pro tio, ke li helpis la rusan esperantiston Nikolaj Rytjkov enradikiĝi en Londono, kiam tiu restis en la libera mondo post la Eŭropa Esperanto-Konferenco en Vieno (1965).

Kiam iĝis klare, ke en la hamburga kongreso Lapenna estos eksigita, oni sendis al la kongreso sovetian delegacion kape kun prof. Isajev por elekti “indan prezidanton de UEA”. Sed lia influo estis limigita. Pli da influo havis drino F. Szabó-Felsö, sed ŝin ne impresis aŭ ne atingis instrukcioj de Moskvo. La homo, kiu povus ordoni al ŝi, tiutempe estis ne en Hamburgo, sed en Sofio. Li estis Nikola Aleksiev, prezidanto de MEM. Kiam Aleksiev eksciis, ke Tonkin fariĝis prezidanto de UEA, li indigne riproĉis al ŝi:

“Kiel vi allasis, ke reprezentanto de la ĉefa imperialista ŝtato estras UEA? Se vi mem ne maturiĝis politike, vi devis foriri al la tualetejo kaj survoje ricevi telefonan instrukcion de mi. Vi faris grandan politikan eraron!”

Pri tio raportis en mia ĉeesto al Peslĵak prof. Isajev. Kaj Aleksiev aspektis pli kaj pli kiel sovetia marioneto.

Sed nun Aleksiev³⁹ vokas al revivigo de la formortinta, kune kun Soveta Unio, MEM.

Por ne citi ies raportojn mi iom pli detale priskribos la propran sperton.

En la suna Bulgario

En 1978 aperis mia libro pri V. Eroŝenko, kaj oni fin-fine permesis al mi veturi eksterlanden, nome al Varna anstataŭ S. Podkaminer, kiu cedis sian lokon en la grupo (li mem vojaĝis laŭ alia invito) por partopreni en la jam menciita 63a UK. Por vidi la etoson de la kongreso — jen kelkaj okazoj:

Mian ĵus aperintan libron pri Eroŝenko mi donacis al konata ĉina esperantisto, kiu konis la blindan poeton. En la hotelo mi estis haltigita de KŜSano (ano de la Komitato de Ŝtata Sekureco — KGB), kiu prezentis al mi sian dokumenton kaj forprenis la libron de la ĉino, promesinte redoni ĝin post kontrolo de la paĝo.

Mi penis defendi S. Podkaminer, kiu — kiel mi jam skribis — ne estis elektita komitatano de MEM, sed V. Samodaj, kiu venis al Varna aparte (li eĉ loĝis aparte, plene pagite de SSOD), diris pri la “nacia balanco” en la komitato, kaj

³⁸ En 1978 A. Wandel ankoraŭ ne prezidis en TEJO.

³⁹ Esperanto, 1991, N 12 (noto laŭ “La Ondo de Esperanto”).

pro tio kelkaj homoj (li aludis mian judecon) ne devas defendi "siajn". Tio ne timigis min, kaj kiam dum diskuto kun gvidantoj de UEA temis pri aresto de siberia esperantisto, kaj Samodaj ordonis al ni proteste foriri, mi malobeis.

Apartan malpiaĉon trovis miaj noktaj paroloj kun la novaj amikoj el Usono, Ĉinio kaj Israelo. Kelkfoje oni avertis min dum miaj matenaj revenoj, kaj unufoje A. Berjoza (responsulo pri esperanto en SSOD, posta sekretario de ASE) diris: "Mi enigis vin en la grupon pro kompatato. Mi persone garantiis vian partoprenon." — "Sed kio pri la mono, pri 700 rubloj, kiujn mi pagis?" — Li respondis, ke ni ankoraŭ parolos en Moskvo. Tamen serioza parolo okazis ankoraŭ en Varna.

Kongresa "magnetofona servo"

Foje kunvenis kelkaj sovetiaj kaj du israelaj esperantistoj. Inter la niaj estis Eŭgeno Perevertajlo kaj Kutlukhan Ŝakirov el Taŝkento. Braha el Tel-Aviv ŝerce rimarkigis, ke la ruso Eŭgeno persekutas la aborigenon Kutluk. La lasta respondis, ke la afero estas tute kontraŭa, ĉar en Uzbekistano lokaj nacioj persekutas la alvenintajn rusojn. Poste parolo sin turnis al la juda problemo, al elmigro al Israelo. Eŭgeno penis pruvi, ke la tuta problemo estas "elsuĉita el la fingro", kaj la judoj ne volas formigri, ĉar ili estas preskaŭ rusoj. Mi eksplodis kaj diris ĉion, kion mi pensis pri la sovetia, tute antisemita registaro. Tiam mi ne imagis, ke unu el la ĉeestintoj sonbendigis la paroladon.

Post unu tago Berjoza invitis min al la ĉambro en la hotelo *Ĉjornoje More*, kie li loĝis. Ĉeestis ĉiuj ok personoj, kiuj akompanis nian grupon. Berjoza komencis: "Mi akceptis vin pro kompatato, ĉar oni ne rajtigis vin ellandiĝi multfoje, sed vi dissemas viajn cionismajn ideojn". Mi neis, tamen post tio li aŭdigis la sonbendon. Mi eksilentis. Berjoza diris, ke li volas helpi al mi, ke kelkaj veraj sovetianoj subskribis la leteron por forpeli la israelajn cionistojn el la kongreso, kaj se ankaŭ mi subskribus, li multon pardonus al mi. Mi petis montri la leteron. Li montris. Pri la enhavo diveni mem. Tamen min mirigis la jam subskribintoj: Samodaj, Aroloviĉ, B. Kolker⁴⁰... Mi respondis, ke mi subskribos, sed poste, ĉar mi devas pripensi. Tiam unu el la ĉeestintoj puŝis min kaj mi falis. Aliaj ekridis kaj komencis la ludon *serĉu la kvinan angulon*. Mi komprenis, ke se sur mia vizaĝo aperos konfuzoj aŭ vundoj, ili diros, ke mi falis ebria. Tamen mi ne subskribis.

La okazaĵo timigis Berjozan. La letero ne estis sendita al la bulgaraj aŭtoritatoj, kaj la israelanoj ne estis forpelitaj.

Post mia leĝa formigro el USSR (1981) okazis kunveno de moskvaj esperantistoj en SSOD por kondamni min kiel perfidulon. Post tio S. Kraĵnov cirkuligis pri mi antisemitan leteron.

⁴⁰ Noto de V.S. Aroloviĉ: "Mi absolute ne memoras, ke mi subskribus ion tian, nek imagas subskribon de Kolker. Do estas aŭ provoko de la uloj, kiuj falsis la subskribojn (sed tiam ili same povus falsi tiun de H. Mem), aŭ... deliraĵo de Ĥarĵkovskij! Laŭ Kolker, ĉio ĉi estas paranoja fantaziaĵo".

Neniu, absolute neniu estis kontraŭ tiuj aĉaĵoj.

MEM ne povis esti manipulata de Moskvo⁴¹

polemikaĵo de Vladimir Samodaj

Kun granda intereso mi tralegis la artikolon *MEM estis manipulata de Moskvo* de Aleksandr Ĥarĵkovskij (LOdE, 1994, N 5-6). Nun mi dank' al s-ro Ĥarĵkovskij, almenaŭ scios kia aĉulo mi estas. Mi senrezerve kredus al tiuj valoraj informoj, se mi ne scius la aferon de iom alia flanko, elinterne, kaj se ne estus al mi konata la delonga hobia de s-ro Ĥarĵkovskij miksi-konfuzi faktojn kaj prezenti tiujn miksaĵojn kiel aŭtentikan veron.

En la fragmento *MEM kaj la pacmovadoj* (p. 20) li skribas:

“Post kelkaj jaroj li (Anton Balague) kaj sovetiaj MEManoj atingis la celon — la partiaj subvencioj ebligis eldoni Pacon, organon de MEM en USSR kaj ties satelitoj en Eŭropo, eldoni propagandan literaturon, organizi konferencojn de MEM”.

La unua sovetia numero de *Paco* estis eldonita en 1968, dek kvin jarojn post la fonda de MEM. Por eldoni ĝin membroj de la Komisiono por internaciaj ligoj de sovetiaj esperantistoj — ĉefe E. Bokarev, K. Gusev kaj S. Podkaminer — longe persvadis la estrojn de SSOD. Finfine efektiviĝi la eldonon finance helpis la sovetia Pacofunduso, eble laŭ indiko de CK KPSU — tion mi ne scias, nur povas supozi. Kaj vere estis nekompreneble, kial Soveta Unio ne eldonas *Pacon*, se ĝin eldonadis, krom la socialismlandaj MEM-sekcoj, ankaŭ Aŭstrio, Francio, Britio, Japanio kaj ceteraj “eŭropaj satelitoj” de USSR. La “propaganda literaturo”, vere, estis eldonata — mizeraspekte, kontraŭstare, en la presejo de SSOD — laŭ la propra iniciato kaj laborfortoj de Konstantin Gusev. Se la partio subvencius tiuj eldonaĵojn, ili aspektus multe pli bone, kaj tiu laboro nepre estus pagata.

La sovetiaj numeroj de *Paco* vere aspektis bone, estis eldonataj en tipografio (dum la jaroj 1968 — 76 aperis nur kvar numeroj), tamen tiun laboron la esperantistoj faris ne laŭ ies ordono. Mi persone kompilis unu, la plej ampleksan en la historio de *Pacoj* numeron — kvaroblan, kaj eĉ restis iom da materialoj por la sekva numero. La SSOD-anoj ne enmiksigis en ĝian enhavon, krom unu okazo: ili aldonis kelkajn materialojn, kiam mi forestis en iu oficejo. Nur unu postulo estis — aldoni al la preparataj numeroj de *Paco* kaj la buitenoj *Por la Paco* du ekzemplerojn de la ruslingvaj materialoj por aprobo de la cenzuro kun la indiko “La E-tradukoj identas kun la ruslingvaj materialoj” kun subskribo de la preparinto.

Kio koncernas la konferencojn de MEM, ili neniam estis organizitaj en USSR, sed preskaŭ ĉiam pasis enkadre de la UK-oj.

Samiroke s-ro Ĥarĵkovskij skribas:

⁴¹ “La Ondo de Esperanto” N 5-6/1994, p. 20.

“La movadon gvidis vicprezidanto de SSOD M. Pesljak, kiu plenumis ordonojn de Valentin Ivanov, kiu kuratoris esperantistojn en la tre influa internacia departemento de CK KPSU. Pesljak postulis, ke la MEM-anoj en la socialisma bloko sekvu la partian linion, obeu la ordonojn de la partio kaj limigu la kvanton de esperantistoj.”

Mi dezirus, ke s-ro Ĥarjkovskij klarigu, kiamaniere M. Pesljak povus efektivi tiun gvidadon? Kiamaniere li povus postuli de eksterlandanoj plenumon de “la ordonoj de la partio”? M. Pesljak eĉ al ni, sovetianoj, nenion povis ordoni, ĉar ni ne estis liaj subuloj. La menciita Komisiono — kaj poste Asocio de sovetiaj esperantistoj (ASE) — estis libervolaj sociaj organizaĵoj, kaj se esperantistoj ne opiniis necesa ion fari, neniu rajtis ilin devigi. SSOD devis helpi al la Komisiono (ASE) efektivi la eksterlandajn ligojn, tre ofte ĝi bremsis la strebojn de esperantistoj, sed ne havis rajton ordoni, des pli ordoni al esperantistoj eksterlandaj. Kaj la vortoj de s-ro Ĥarjkovskij pri tio ke “Aleksiev aspektis pli kaj pli kiel sovetia marioneto” (p. 22) estas kruda mensogo, ĉar tio principe ne estis ebla, ja ankaŭ Aleksiev ne estis subulo de Sovetunio.

Mi kelkfoje preparolis kun s-ro Aleksiev niajn problemojn. Mia impresio estas jena: Nikola Aleksiev ne povis esti ies ajn marioneto. Kaj kiamaniere li povus “indigne riproĉi” (p. 22) al d-rino Szabó-Felső, se ŝi estis en Hamburgo, sed li — en Sofio? Kiamaniere M. Isajev povis ĉeesti tiun riproĉon? Ĉu estis **“oni”** tiel stultaj, por sendi al la kongreso sovetian delegacion kape kun prof. Isajev por elekti “indan prezidanton de UEA”, se prof. Isajev eĉ ne estis membro de ĝia Komitato, do havis absolute nenian influon? Ĉu li povus provi fari tion pere de la komitatoj el la socialismaj landoj, kiuj konsistigis en la Komitato malplimulton? Nur kondiĉe, se ili ĉiuj kune volonte konsentus tion fari, ja postuli tion de ili li ne rajtis. Kiamaniere “Nikola Aleksiev, prezidanto de MEM” povis ion ajn “ordoni” al d-rino Szabó-Felső (p. 22), se ŝi neniamaniere al li subigis? Kaj ĉu vere s-ro Aleksiev estis tia malsaĝa por “riproĉi” al ŝi tion, kion ŝi ne povus fari eĉ se ŝi dezirus?

Ni revenu al la paĝo 21, al la fragmento “Kiu mendis la muzikon?” La aŭtoro skribas:

“La sovetiaj aktivuloj de MEM antaŭ esperantistaj aranĝoj estis instrukciataj en la Domo de Amikeco en Moskvo pri la metodoj de propagando. Iliaj vojaĝoj estis pagataj de CK KPSU, kaj kiu pagas la muzikistojn, tiu mendas la muzikon”.

Verŝajne mi estas aŭ tro stulta, aŭ havas tro mizeran memoron, aŭ tro mensogemas, sed mi persone ne memoras iun ajn instrukcion pri la “metodoj de propagando”. Kutime oni invitis iun prelegiston, kiu rakontis pri tiumomenta internacia situacio, oni avertis kontraŭ eblecoj subiĝi al provokoj kaj pro tio rekomendis ne vagadi en la eksterlanda urbo sola. Kaj pagis la vojaĝojn nur al la tiel nomata “oficiala delegitaro”, konsistanta el du-tri personoj — unuavice la prezidanto Isajev plus unu-du aliaj prezidanoj, ne CK KPSU, sed SSOD, kiu havis en sia buĝeto iom da mono speciale por tiaj delegitaroj kaj kun ĝi parte uzis por aliaj celoj.

Ĥarjkovskij skribas:

“Mi mem partoprenis en 1976 similan konsultiĝon de esperantistoj el socialismaj landoj en Moskvo. La raportoj sonis kvazaŭ ĝi estus ne esperantista, sed kompartia konferenco”.

Pri tio mi povas diri, ke la afero estis natura, ĉar la reprezentantoj estis samideanoj ne nur kiel esperantistoj, sed ankaŭ kiel loĝantoj de samideologiaj landoj, havantaj similajn, eble eĉ komunajn problemojn.

Pri la judeco de Podkaminer, Ĥarjkovskij kaj ceteraj. Mi ne povas nei, ke en nia lando estis certa malfido al hebreoj, sed mi neniam aŭdis oficialajn alvokojn al tiu malfido. Tamen diversaj onidiroj kaj nedeklarataj baroj ekzistis. Do la sama sinteno, supozeble, povis esti ankaŭ en SSOD. Tie mi neniam similajn eldirojn aŭdis. Ne aŭdis mi ankaŭ pri la “judeco” de Tonkin. Pri tiuj teĵoj s-ro Ĥarjkovskij estas informita pli bone.

Nun pri tio, kio okazis kun Podkaminer en Sofio (pp. 21 — 22).

“Por la elekto de la Internacia Komitato de MEM estis prezentita listo kompilita de M. Peslĵak en Moskvo...”

Necesas precizigi: la listo de la sovetiaj reprezentantoj en MEM. Eble ĝin kompilis Peslĵak, almenaŭ kun li tio estis preparolita, evidente ne sen konsultiĝo kun M. Isajev. Mi nenion pri ĝi sciis. Mi mem tre miris, kiam Podkaminer ne estis nomita kaj inter la sep nomoj de sovetianoj sonis mia nomo. Poste mi parolis pri tio kun N. Aleksiev. Li diris, ke la gvidantaro de MEM volis protesti, sed Podkaminer mem petis ne fari tion.

Ĥarjkovskij skribas, kvazaŭ mi ion klarigis al li pri la “nacia bilanco” (kial *balanco*?) Eble, sed mi tion ne memoras. Tamen pri la “juda bilanco” ne povis temi absolute. Simple por ĉiu landa sekcio estis difinita limigita kvanto de reprezentantoj. La judecon de Ĥarjkovskij, de Podkaminer des pli mi aludi ne povis, ĉar tio min neniam interesis. S-ron Podkaminer mi tiutempe kaj ĝis lia morto konsideris la unua esperantisto de nia lando. Do tiu aserto de Ĥarjkovskij estas ordinara miskompreno.

Krome, se Ĥarjkovskij min prezentas kiel “kontraŭjudiston”, mi povas aldoni alian fakton: kiam dum la “liberiĝa” konferenco de ASE en 1989, en kiu la konferencanoj rompis kun SSOD kaj refondis SEU, oni elektis min prezidanto kaj proponis ke mi mem kandidatigu la vicprezidantojn, do inter kvin personoj mi nomis du hebreojn. Krome, li povas aludi, ke tiuj hebreoj estis Aroloviĉ kaj Kolker — nome tiuj, kiuj subskribis la leteron por forpeli la israelajn cionistojn el la kongreso, do miaj delongaj kunaĉuloj (p. 23, la lasta kolumno).

En la fragmento “En la suna Bulgario” (p. 22) Ĥarjkovskij skribas: “Samodaj ordonis al ni proteste foriri...”

Ankaŭ tio estas miskompreno, ĉar la vortoj *Samodaj* kaj *ordonis* estas nekunigeblaj. Dum la tuta vivo mi neniam ion ajn al iu ajn ordonis, eĉ kiam estris la araban redakcion aŭ prezidantis SEU. La ordonemo estas absolute fremda al mia karaktero, kaj mi konstante evitadis gvidajn postenojn (ne ĉiam

sukcese), ĉar malŝategas esti estro. La posteno de vicprezidanto de ASE, kiun mi okupis sufiĉe longe, tute ne postulis de mi "ordonadon" kaj ne donis al mi tiajn rajtojn.

Samloke: "V. Samodaj, kiu venis al Varna aparte (li eĉ loĝis aparte, piene pagite de SSOD)..."

Tiu aserto estas parte ĝusta. Mia veno al la kongreso estis plene pagita de SSOD, ankaŭ la loĝado. Mi loĝis ne sola, sed duope kun iu (mi ne memoras), malgraŭ ke mi, homo ermitema kaj solema, ĉiam preferas loĝi sola. Tamen ni veturis ne aparte, sed kune kun ĉiuj, kaj la aparta delegitaro estis afero tute formala. Tio estis la unuhura okazo, kiam mi veturis al la kongreso je la kosto de SSOD dum 24 jaroj de mia laborado en la Komisiono kaj ASE (18 jaroj kiel vicprezidanto).

Mi trafis en la "oficialan delegitaron" (dupersonan: Kameŝkov kaj mi) nur pro tio, ke Bulgario estis socialisma lando, ĉar veturis al la kongreso tri grupoj (preskaŭ 100 personoj) kaj la aliaj meritaj personoj, kiuj veturadis kiel oficialaj delegitoj al aliaj kongresoj, gvidis la grupojn. SSOD neniam en aliaj okazoj enigis min en delegitarojn, ĉar ne fidis al mi (mi havas plurajn atestojn pri tio), kaj proprakoste mi veturi ne povis, ĉar mi ne havis por tio monon. Ili ne fidis al mi unuavice pro tio ke mi ne estis partiano, pro tio ke mi tro pledis por la bezonoj de esperantistoj, por aliĝo al UEA, por eldonado de E-revuo, pro tio ke mi ofte kritikadis la agojn de la *respondecaj* sekretarioj kaj SSOD entute, donante al ili tro da nedezirata laboro. Sed toleris ili min en tiu posteno, ĉar mi tre multe aktivis en la sfero de publikado (post la foriro de K. Gusev mi estris la eldonan fakon). Eblus fari multe pli, se la SSOD-anoj ne bremsus tiun agadon. En la epoko de L. Ŝanina estis faritaj provoj min "detrongi".

Interalie, foje en SSOD mi renkontis iaman mian kunlerninton, kiu laboris kiel instruitoro de CK KPSU kaj ankaŭ kuratoris la araban fakon de SSOD. Li diris al mi: "La gvidantoj de SSOD suspektas, ke vi estas malamiko de la popolo. Jen antaŭnelonge unu via esperantisto fuĝis al Usono. Oni opinias, ke vi povas esti sub la influo de similaj personoj."

Mi ne havis pretekston ne kredi al li. Cetere, la aludita fuĝinto estis s-ro Ĥarjkovskij.

Pri la surbendigo mi povas diri nenion (p. 23, la fragmento "Kongresa magnetofona servo"). La parolo povis okazi. Ankaŭ al mi A. Berjoza minacis: "Memoru, ke mi scias ĉiun vorton, kiun vi eldiras en viaj SEJM-aj tendaroj" kaj simile. Li mem konfesis al mi, ke li ne transdonis miajn dokumentojn por veturi al unu el la kongresoj, ĉar mi ne estis partiano, do li opiniis neinda ke mi veturu. Tamen pri la puŝado mi forte dubas. Mi ne imagas tiajn stultajn agojn de tiom da personoj, kiuj laŭ sia laboro devus esti saĝaj.

Pri la "letero por forpeli la israelajn cionistojn el la kongreso" mi nenion memoras. Tute sincere mi tion diras: ne memoras ĉu ĝi ekzistis, ĉu ne ekzistis.

Ankaŭ pri la "kunveno de moskvaj esperantistoj en SSOD por kondamni min (s-ron Ĥarjkovskij) kiel perfidulon" mi ne memoras. Vere, en tiu jaro (1981) mi dum du monatoj laboris en Irako...

Mi ne deziris mencii pri la persona miskompreno inter s-ro Ĥarjkovskij kaj mi, ĉar ĝi ne havas seriozan signifon. Tamen mi klarigos la aferon.

S-ro Ĥarjkovskij akuzas min, kvazaŭ mi perfidus lin aŭ farus ion alian malbonan, rezulte de kio li ne estis elektita en la Prezidion de ASE. La afero okazis jene: kiam dum unu el la preparakunsidoj de la fonda konferenco de ASE estis preparolata konsisto de la Prezidio kaj sonis la nomo de s-ro Ĥarjkovskij, mi proponis ne enigi lin en la liston de kandidatoj pro lia troa babilemo kaj malrespekto al ĝustaj faktoj. Mi opiniis, ke en la Prezidio oni devas serioze strategie kaj taktike pridiskuti siajn problemojn, sed ne perdi vane tempon en pribabilo de flankaj, etaj detaloj, kiel tion tre ŝatis fari s-ro Ĥarjkovskij. La propono estis akceptita. Ekde tiam s-ro Ĥarjkovskij tre malŝatas mian personon kaj disvastigas pri mi sian opinionon.

Mi scias, ke mia konscienco estas pura, kaj ĝi ne estos pli malpura, se iu malpure pri mi pensos.

Ĥarjkovskij mistifikas⁴²

reago de Nikola Aleksiev

Mi ne scias, kial bezonas Ĥarjkovskij prezenti publike malverojn pri MEM kaj pri mi... Kiu konas liajn elpensajojn pri la 59-a UK en Hamburgo (1974), tiu nepre dubos ankaŭ pri ĉio, kion li publikigis en *La Ondo*.

Ĥarjkovskij skribas:

"... oni sendis al la kongreso sovetian delegacion kape kun prof. M. Isajev por elekti "indan prezidanton de UEA". Sed lia influo estis limigita. Pli da influo havis d-rino F. Szabó-Felső, sed ŝin ne impresis aŭ ne atingis instrukcioj de Moskvo. La homo, kiu povus ordoni al ŝi, tiutempe estis ne en Hamburgo, sed en Sofio. Li estis Nikola Aleksiev, prezidanto de MEM. Kiam Aleksiev eksciis, ke Tonkin fariĝis prezidanto de UEA, li indigne riproĉis al ŝi:

"Kiel vi allasis, ke reprezentanto de la ĉefa imperialista ŝtato estras UEA? Se vi mem ne maturiĝis politike, vi devis dum la elekta kunsido foriri al la tualetejo kaj survoje ricevi telefonan instrukcion de mi. Vi faris gravan politikan eraron!"

Pri tio raportis en mia ĉeesto al Peslĵak prof. Isajev. Kaj Aleksiev aspektis pli kaj pli kiel soveta marioneto".

Mi petas pardonon pro la longa citaĵo, sed ĝi vere estas juvelo de la mensogo kaj kalumnio. Tipa "Ario de la kalumnio".

Estas vivaj atestantoj pri la okazaĵo en Hamburgo, kaj ili povas senmaskigi la mensogulon Ĥarjkovskij. Jen ili estas: prof. d-ro Tonkin, d-rino Szabó-Felső, prof. d-ro Isajev, d-ro Blanke k.a. Ili povas atesti, ke Nikola Aleksiev ĉeestis la kongreson en Hamburgo⁴³ kaj estis elektita ĉefo de la Elekta Komisiono por

⁴² "La Ondo de Esperanto, N 6/1996, p. 20.

⁴³ La samon povas atesti la tuta UEA-anaro, ĉar kongresa foto kun N. Aleksiev en tiu rolo aperis en "Esperanto".

kandidatigi la membrojn de la nova Estraro de UEA. La protokoloj de la kongreso, gardataj en la arkivoj de UEA, entenas mian nomon kiel raportanto de la Elekta Komisiono. Ĉu prof. Isajev povus raporti ion alian ol tion, kio vere okazis? Ĉu la elpensaĵoj pri mia "riproĉo" (el Sofio?) al d-rino Szabó-Felső povas posedi verecon? Eĉ trivitan groŝon ne valoras tiuj elpensitaĵ, "elsuĉitaj el la fingroj" asertoj de Ĥarĵkovskij!

Li kvalifikas min "marioneto". Sed kial li sendis al mi sian libron pri Eroŝenko kun aŭtora aŭtografo, se fi taksis min marioneto?

En *der Esperantist* (1979, N 5) Ĥarĵkovskij publikigis⁴⁴ longan artikolon *Mi aplaudas al kreinto de Esperantista Asocio...*

Sendante al mi kseroksajn kopiojn de tiu artikolo kaj de la artikolo en *La Ondo de Esperanto* d-ro Blanke aldonis kelkajn liniojn: "Jen ŝmirajo de Ĥarĵkovskij pri MEM. En 1979 li kantis alimaniere. Vere fie."

Mi subskribigas sub la trafa kaj ĝusta pritakso de la hipokritulo Aleksandr Ĥarĵkovskij.

Sofio, 31.VII.96

Nikola Aleksiev

Honora membro de UEA

prezidanto de BEA (1964 — 1976)

honora prezidanto de MEM (depost 1978)

LABORO DE LA JUNULARA KOMISIONO

"Post la 2-a Tutsovetia ASE-Konferenco la konsisto de la junulara komisiono ŝanĝiĝis kiel kvante, tiel ankaŭ kvalite. En junio ASE-Prezidlo konfirmis kiel komisionestron N.N. Ŝorofova kaj rekomendis en la konsiston de la komisiono ASE-estraranojn V.J. Verigin, A.B. Kazakov, A.G. Patatjan, A.I. Popov..."⁴⁵

Por multaj niaj esperantistoj tiu agaddirekto estis bone konata, ĉar ili spertiĝis dum la SEJM-periodo. Des pli, ke kiel gvidanto de la komisiono estis elektita Viktor S. Aroloviĉ, siatempe kelkajn jarojn estinta SEJM-Komitano kaj du jarojn — SEJM-Prezidanto.

Mi opiniis, ke verki tiun ĉi ĉapitron estos por mi facile. Sed...

Evidentiĝis, ke jam de la unua jaro ne ĉio bonis en la komisiono.

⁴⁴ Evidente la artikolon la redakcio reprenis el la suplemento al "MN".

⁴⁵ Informbulteno de ASE, N 2-3 (29-30)/1983, p. 14.

Iom pli ol unu jaron gvidis la komisionon Viktor S. Aroloviĉ —



V.S. Aroloviĉ (meze de la grupeto)

dum la Estrarkunsido la 23-an de majo 1980 estis akceptita decido ŝanĝe al li elekti kiel komisionestron Anatolij B. Kazakov.

Aroloviĉ Viktor Semjonoviĉ naskiĝis en 1946 en Riga

(Latvio), laŭ profesio estas matematikisto, doktoro de fizik-matematikaj sciencoj (diplomiĝis ĉe AsAIS). Nun loĝas apud Moskvo.

Esperantisto ekde 1955. Arda aktivulo de la E-movado dum la preskaŭ tuta SEJM-periodo, estis Komitatano kaj Prezidanto de SEJM. Pro la aktivado en SEJM-laboro dediĉe al la 10-jara jubileo de SEJM li estis honorigita per titolo "Honora Aktivulo de SEJM". Ankaŭ dum la tuta ASE-periodo li same aktive laboris por prospero de la E-movado en la lando, komence gvidante la junularan komisionon de la Asocio, poste kiel redakciano de "Inforbulteno de ASE".

Post SEU-refunkciigo⁴⁶ li estis ties vicprezidanto kaj prezidanto.

Kazakov Anatolij Borisoviĉ (naskiĝis en 1952). Juna, agema kaj sperta esperantisto, li povus inde gvidi la komisionon, se ne obstaklus lia profesia okupo. Li elektis partian karieron — dum relative mallonga periodo li estis instruisto en distrikta kaj poste en Moskva urba partikomitato, kaj estis laboranta eĉ en CK de KPSU, kiel specialisto pri arkitekturo, okupiĝante pri arkitekturaj monumentoj en Moskvo..En 1989-1990 li estis vicprezidanto de SEU, poste deflankiĝis de la movado..

Ankaŭ Anatolij B. Kazakov ne daŭre gvidis la komisionon. Dum la 2-a Tutsovetia ASE-Konferenco (18.06.1982) kiel estro de la junulara komisiono estis elektita Natalja N. Ŝoroŝova, kaj jam ŝi estis la gvidanto ĝis la fino de la ASE-periodo.

⁴⁶ Post disfalo de USSR en 1991 SEU (Sovetrespublikara...) estis reorganizita je REU (Rusia...).



N.N. Šorofova dum REK en Latvio

Pri kio do okupiĝis la komisiono? Ĉu pozitivis tiu agado?

La plej gravaj atingoj en la laboro de la komisiono estas:

* organizo de apudmoskvaj E-tendaroj — OkSEJT-23 en 1981j. kaj MoskvEJT-1 en 1987;

* ĉiujara kompilado kaj aperigo de kalendaro de E-aranĝoj en Sovetio (tiun laboron fakte devus fari la organiza komisiono);

* okazigo de enketado por E-kluboĵ de Sovetio, surbaze de kio oni povas nun vidi evoluon de nombro de esperantistoj en USSR laŭjare, nombron de la E-kluboĵ, aliajn donitaĵojn.

Bedaŭrinde, malgraŭ plurfojaj provoj la komisiono ne sukcesis enkonduki soc. konkuradon inter kluboj⁴⁷.

STATISTIKAJ DONITAĴOJ DE E-MOVADO EN USSR FINE DE 1987

Unu el aktivecoj de la junulara komisiono en ASE estis enketado de E-kluboĵ kun ties posta analizo. Entute oni provis aranĝi tion 3-foje.

Rezulte de la 1-a enketado (1983) — ĝin partoprenis ĉ. 75 % de la kluboj — evidentiĝis, ke en USSR tiutempe estis pli ol

⁴⁷ Jam dum la Prezidikunsido la 11-an de februaro 1981 temis pri soc. konkurado: <Laŭ informo de A.M. Gonĉarov ASE-Prezidio aprobis proponon de la junulara komisiono ĉe ASE pri kondiĉoj de socialisma konkurado inter junularaj kluboj. Estas decidite post finprilaboro publikigi la kondiĉojn de la soc. konkurado en "Informbulteno" (v. la "Informbulteno de ASE" N 1(8)/1981, p. 2). La kondiĉoj efektive estis preparitaj kaj eĉ presitaj, sed lastmomente laŭ arbitra ordono de M.M. Peŝjak forigitaj el le jam distribu-preta "Informbulteno". Vidu N 2-3 (29-30)/1983, kun mankantaj paĝoj 15 · 18 kaj forstrekoj en la paĝoj 14 kaj 36.

5480 esperantistoj, el kiuj ĉ. 70 % estis junularo (ĝis 30-35 jaroj). La 2-a okazis en 1986 — oni planis ricevi pli objektivajn kaj pli konkretajn rezultojn pri evoluo de E-movado en USSR. Bedaŭrinde tiu 2-a provo estis malsukcesa — la enketadon partoprenis nur ĉ. 30 % de ĉiuj E-kolektivoj.

La 3-an fojon oni okazigis enketadon fine de 1987. Ĉi-foje la laboron aktive helpis la respondeca sekretario de ASE Lidija J. Ŝanina.

Resume plenigitajn enketilojn retrosendis 166 E-kolektivoj el la registritaj tiutempe en ASE 192, alivorte la enketadon partoprenis ĉ. 80 % de la kluboj (proksimume sama kvanto kiel en la jaro 1983). Tio donis la eblecon fari iujn komparojn.

KVANTO DE ESPERANTISTOJ EN KLUBOJ DE USSR

Respubliko	Klubaj membroj	
	1983	1987
RSFSR	2591	2610
Litovio	939	1028
Estonio	515	365
Ukrainio	480	872
Latvio	378	114
Beforusio	133	179
Armenio	100	93
Moldavio	80	68
Kartvelio	78	121
Uzbekio	65	86
Kazaĥio	65	35
Taĝikio	51	?
Azerbajĝano	5	12
Sume	5480	5588

Same estas interesaj donitaĵoj pri aĝo de la membroj kaj ties aparteno al partiaj kaj komsomolaj organizaĵoj:

Respubliko	Kvanto de kluboj	Klubaj membroj			
		Entute	Inter ili		
			Malpli ol 35 j.	membroj de VLKSM	membroj de KPSU
RSFSR	75	2610	1850	1120	210
Ukrainio	25	872	537	333	92
Belorusio	7	179	128	87	16
Uzbekio	2	86	46	36	9
Kazaĥio	2	35	24	18	3
Kartvelio	5	121	76	68	7
Azerbajĝano	1	12	8	2	2
Litovio ⁴⁶					
Moldavio					
Latvio	6	114	57	27	14
Armenio	4	98	80	39	16
Estonio	9	365	96	52	40
Sume	166	5588	3500	2202	513

Necesas aldoni, ke en preskaŭ ĉiu E-kolektivo ekzistis instru-metodika kaj kultura sekcioj, sekcio de MEM, kiuj agis ne pro fruktodona laboro de koncernaj ASE-komisionoj, sed pro la graveco de tiuj agadirektoj.

LISTO DE ASE-FILIOJ

Dato de la Fonda Konferenco (kurveno)	Loko de la Fonda Konferenco (kurveno)	Respubliko	Kvanto da partoprenintoj	Adreso
28.06.79	Leningrad	Rusio	80	191011, Leningrad-11, naberejnaja reki Fontanki, 21, Domo de amikeco
30.11.79	Vilnius	Litovio	100	232000, Vilnius, ul. Kostjuško, 36

⁴⁶ La ciferoj por Litovio kaj Moldavio, bedaŭrinde, mankas.

Dato de la Fonda Konferenco (kurveno)	Loko de la Fonda Konferenco (kurveno)	Respubliko	Kvanto da partoprenintoj	Adreso
30.11.79	Jerovjan	Armenio	pr. 100	375033, Jerevan, ul. Abovjana, 3, AUKS
29.01.80	Kievo	Ukrainio	47	252021, Kievo-21, ul. Kirova, 32, Ukraina SSOD
28.03.80	Riga	Latvio	70	226343, Riga, ul. Gorjkogo, 11-a
28.04.80	Tallinn	Estonio	100	209101, Tallinn, Olevimägi, 12
08.10.83	Tbilisi	Kartvelio	??	380026, Tbilisi, ul. Antonelli, 25
29.04.84	Krasnodar	Rusio	60	?

LABORO DE LA VIRINA KOMISIONO

"Bedaŭrinde dum ŝia vivo ne aperis ŝiaj versoj libroforme. Ili estis presitaj en E-revoj "Ondo de Daŭgava", "Litova Stelo", "Norda Prismo", "Heroldo de Esperanto" ktp..."⁴⁹

La opinio, kiun mi ŝatus ĉi tie prezenti, estas eble tre akra, sed laŭ mi ĝusta.

La virina komisiono estas mortnaskita infano de ASE.

Kiujn celojn havis tiu komisiono? Ĉu aktivigi niajn virinojn-esperantistinojn? Sed ĉu eblis pli aktivigi tiajn esperantistinojn, kiel ekz., Galina Armand-Tkaĉenko (Moskvo), Nadija M. Andrianova-Hordienko (Kievo), Hilda Dresen (Tallinn) kaj multajn, multajn aliajn? Sen la komisiono ili ja tre aktive partoprenis la E-vivon de la lando, inde reprezentis ĝin eksterlande,

⁴⁹ Nikolao Stepanov "Ludmila Jevsejeva, esperantistino kaj poetino" Sennacieca revuo* N 122/1994, p. 29.

Kiel moten por tiu ĉi ĉapitro eblis elekti ankaŭ ion alian, kie temas pri iu alia eminenta esperantistino de nia lando — ĉu pri N. Andrianova, ĉu pri H. Dresen, ĉu pri F. Lippe... Des pli, ke Ludmila Jevsejeva mortis januare 1980, antaŭ fonda de Latvia ASE-filio...

Aŭ SSOD-funkciuloj volis iel "laborigi" pli vastan tavolon de esperantistoj kaj ne vidis aliajn vojojn por tion efektiviĝi?

Ĉio ĉi restas vera enigmo.

Kelkfoje en la "Informa bulteno" de ASE aperadis sciigoj pri apartaj aranĝoj, organizitaj fare de la membroj de tiu komisiono (Galina Armand preparis kelkajn ekspoziciojn de infandeseĝnaroj...), sed ĉu tiuj aktivecoj ne estus farataj, se la komisiono tute ne ekzistis? Kaj multnombraj poeziaj kontribuajoj de niaj famaj poetinoj?

Memkompreneble, sen tiu surpapera komisiono la laboro estus farata kaj farus ĝin niaj esperantistinoj same fruktodone.

LABORO DE LA ELDONA KOMISIONO

"Nur tio taŭgas por priskribo, kio restas interesa ankaŭ post kiam verdiktos la historio"⁵⁰

Evidente ne plu estas bezonate pruvi la neceson de iuj ĵurnaloj, gazetoj, revuoj por altigi la nivelon en la agado de ajna E-organizaĵo. Dum la SEJM-a periodo ege popularis ties oficialaj eldonaĵoj "Juna esperantisto", "Akordo", "Aktuale", "KKK", "Kurte"... Estis de tempo al tempo eldonataj periodaĵoj kaj beletraĵoj, preparataj fare de membroj de la E-komisiono ĉe SSOD...

Eble tio influis al jena rezulto de la FK: du personoj, du spertaj esperantistoj — Vladimir V. Samodaj kaj Nikolaj B. Zubkov fariĝis gvidantoj de la eldonkomisiono ĉe ASE.

Laŭ anticipa planado oni decidis, ke Vladimir V. Samodaj okupiĝu pri kompilado kaj eldonado de "Moscow News"-suplementoj; ankaŭ pri preparo por eventuala eldono de diversaj literaturajoj. Ja ĝuste pri tio li estis plej kompetenta: plurajn jarojn kune kun Konstantin Gusev li preparadis literaturajn broŝurojn kaj revuetojn "Por la paco". Krom tio, dank al li aperis kelkaj suplementoj al "Moscow News"⁵¹.

⁵⁰ Stendhal (franca verkisto; 1783 — 1842).


⁵¹ Al la tempo de ASE tiuj suplementoj al "Moscow News" estas jam aperintaj.

La alia komisiongvidanto (Nikolaj B. Zubkov) devis zorgi pri regula aperigo de "Informbulteno" de ASE.

Komence kelkvorte pri la laboro de ASE-prezidiano Vladimir V. Samodaj.

Samodaj Vladimir Vladimirovič (1935) estas specialisto pri araba lingvo. krome bone scipovas ankaŭ la anglan, francan, italan kaj aliajn lingvojn. Siatempe li finis Moskvan universitaton, poste laboris en "Moscow News"-eldonejo, en kelkaj arabaj landoj (Alĝerio, Sirio, Irako...).

Estinte en Odeso en 1958 li ellernis Esperanton (en la sama grupo kun Anatolo J. Gončarov ĉe fama por Sovetio esperantisto Aleksej Iljič Veršinin) kaj de tiu tempo aktivis en la landa E-agado. Ne ofte oni povas trovi lian nomon inter Komitatanoj kaj fakestroj de SEJM, sed ĉiam spirite li estis arda helpanto por SEJM-anoj en pluraj demandoj.



V.V. Samodaj, partoprenanta E-tendaron en Apudmoskvo (somero 1981)

vuon "Scienco kaj kulturo". El-sub lia plumo aperas multaj poeziaj verkoj, bedaŭrinde ne ofte renkontataj en E-periodaĵoj. En 1999 aperis en Moskvo ("Impeto") lia libro "Ne nur legendoj, ne nur pri SEJM. Homoj kaj epizodoj"

Nun pri la alia komisiongvidanto Nikolaj B. Zubkov, kiu zorgis pri la regula aperigo de "Informbulteno" de ASE — tiel estis nomita presorgano de la Asocio.

Antaŭ la ASE-periodo, dum ĉe SSOD funkciis Esperanto-komisiono, Vladimir V. Samodaj estis ties vicprezidanto. Kaj poste dum la tuta ASE-agado li plenumis diversajn taskojn, estante vicprezidanto de ASE. Post kiam ASE refojmiĝis je SEU, la unuajn jarojn (1989 — 1990) li estis SEU-Prezidanto.

La lastajn jarojn V.V. Samodaj okupiĝas ĉefe pri literatura agado. Li gvidis en Moskvo literaturan E-klubon, surbaze de ties kunvenoj kompiladis ĉiumonatajn literaturajn broŝuretojn "Cerbe kaj kore"⁵², nun redaktoras ia re-

⁶² Ĝis nun aperis jam 50 numeroj de tiuj broŝuretoj (formato A5, po 20 paĝoj)

Zubkov Nikolaj Borisoviĉ, ruso, ĉinologo Naskiĝis 18(31).01.1918 en Moskvo. Finis historian fakultaton de Moskva universitato (1941), armean instituton de fremdaj lingvoj (1947), instruisto de mezlernejo en Kazahio (1941-1942); partopreninto en Granda Patria milito (1943-1945); instruis historion de orientaj landoj en Kazahia universitato (1948-1951), aspiranto de Moskva universitato (1951-1954). De 1955 labors en diversaj redakcioj.

Esperantistiĝis kaj ekmembriis en SEU en 1932; de 1934 ĝis decembro 1937 — instruisto de korespondkursoj de Esperanto de CK SEU. Post longa paŭzo reesperantistiĝis en 1970-aj jaroj. Vicprezidanto de ASE (1979-1989) — respondeca redaktoro de ties "Informbulteno". Post la 8-a Kongreso de SEU (Januaro 1989) — estrarano de SEU, redaktoro de ties "Informbulteno". Trifoje partoprenis UK-ojn.

Pri la ASE-bulteno necesas sendube esprimi pli vastan opinion. Entute dum ASE-ekzisto (11 jaroj) aperis 73 numeroj kun sume 1545 paĝoj (formato A5). Ŝajnas, tiuj ciferoj estas sufiĉe kontentigaj — ĉiujare aperadis averaĝe preskaŭ po 7 numeroj kun entute 148 paĝoj. Sed... Efektive estas pluraj "sed".

La unua numero aperis nur fine de la decembro 1979. Jen kion eblas tralegi en la populara tiuperiode kaj ofte aperigata "Kurte" (N 75 - 76):

"La 28-an de decembro 1979 aperis la unua numero de la 'Informa bulteno' de ASE, rusingve. La numero enhavas Statuton de ASE, decidon de la FK kaj liston de la Estraro de ASE. La tuta eldonkvanto de la 'Bulteno' (500 ekz.) estis destinita de SSOD por disvastigo enlande."

Dum la sekva jaro oni sukcesis aperigi jam 6 kajerojn/numerojn. Pluan evoluon de la aperigo en la "Bulteno" oni povas vidi en la suba tabelo:

APERIGO DE LA "INFORMBULTENO" DE ASE

Jaro	Kvanto de			Ruslingva parto (%)	Esperant-lingva parto (%)
	numeroj	kajeroj	paĝoj		
1979	1	—	20	100	—
1980	6	2	108	100	—
1981	9	3	164	100	—

Jaro	Kvanto da			Ruslingva parto (%)	Esperantlingva parto (%)
	kajeroj	duoblaj	paĝoj		
1982	11	5	207	92	8
1983	11	4	237	91,5	8,5
1984	11	3	244	80	20
1985	5	2	109	92,7	7,3
1986	4	1	95	86,8	13,2
1987	8	2	177	87	13
1988	6	1	149	91,3	8,7
1989	1	—	35	86	14
Sume	73	23	1545	90,5	9,5

Nun ni provu iom taksi la enhavon de la “Bulteno”.

La plej granda parto estis la tiel nomataj “oficialaj informoj” (pri kunsidoj de ASE-Prezidio, de ASE-Estraro...) kaj “ĉefaj” artikoloj (ekz., de M.I. Isajev pri lingvoj en USSR...). Rememorante la periodon, dum kiu agis ASE, pri tio neniu miris: ekzistis eĉ ne unu periodaĵo sen politikaj artikoloj. Kaj la konstanta SSOD-cenzuro ne permesus aperi ankaŭ nian bultenon, se ĝi ne enhavus similaĵon.

Multe meritas la ĉefredaktoro de la bulteno Nikolaj B. Zubkov (plej parte li estis ne nur “ĉefa”, sed ankaŭ “sola”, malgraŭ, ke estis notata tuta redakta komisiono), ke li strebis aperi ajnajn sciindaĵojn pri E-movado en nia lando, ĉu grandaj ili estis, ĉu malgrandaj. Kaj dank’ al tio ni havas nun eblecon iom ĝin kronologi⁵³.

Kial la bulteno aperadis tiom neregule? Ĉefe tio okazis pro severa kontrolado de la enhavo. Se al cenzuristoj ial ne plaĉis iu frazo aŭ eĉ vorto, ili postulis refaron, kaj la redaktoro devis prui la bezonon lasi la enhavon sensange. Kaj kontroli neniu

⁵³ N.B. Zubkov kolektadis la materialojn, tajpadis ilin, komponadis la numerojn kaj poste ĉio estis transdonata al la membroj de la redakta grupo. La finan kontrolon faris SSOD-oficistoj (rim. de V.V. Samodaj).

rapidis. Ni ne forgesu, ke por SSOD nia ASE estis aldona, ne-bezonata por ili ŝarĝolaboro kaj certe pri ĝi la funkciuloj okupiĝis (se eblas tiel diri) lastmomente, kontraŭvole...

Pli poste al la ĉefredaktoro estis aldonita helpgrupo — redakta komitato. Ĝin konsistigis diverstempe V.S. Aroloviĉ, A.J. Gonĉarov, I.G. Gonĉarova, G.J. Korotkeviĉ, V.V. Samodaj, S.N. Kuznecov kaj aliaj. Eble ankaŭ tio influis al pli operativa aperigo de la bulteno, al pli riĉa ties enhavo. Ankaŭ pluraj aliaj esperantistoj kontribuis al la bulteno. Ni prezentas al via atento liston, kiu montros, kiu el esperantistoj kiomgrade estis la kontribuanto (v. la suplementan parton).

Kaj iom pri la enhavo. Krom la menciitaj pli supre politikaj artikoloj kaj oficialaj informoj, en la bulteno estis regule publikigataj artikoloj pri gravaj E-eventoj en nia lando (E-tendaroj, renkontiĝoj, klubkunvenoj...) kaj eksterlande (kongresoj, renkontiĝoj k.a.). Multis informoj pri lokaj E-aranĝoj, pri laboro de ASE-filioj. Laŭdindas la strebo de Nikolaj B. Zubkov lanĉi konstantajn rubrikojn en la bulteno: "Paĝo de tradukisto", "Lingva konsultado", "El historio de E-movado", "Por E-instruistoj"...

Necesas ne forgesi ankaŭ plurajn politikajn eldonaĵojn, kiuj aperis en APN-eldonejo. Laborante tiutempe en la eldonejo kontribuis al la aperigo de la eldonaĵoj D.A. Perevalov (v. la p. 96).

ISSN 0287-3685

АССОЦИАЦИЯ
СОВЕТСКИХ
ЭСПЕРАНТИСТОВ




ASOCIO
DE SOVETIAJ
ESPERANTISTOJ

**ИНФОРМАЦИОННЫЙ
БЮЛЛЕТЕНЬ
4—5 (53—54)**

АПРЕЛЬ — МАЙ

1985

Tiel aspektas titolpaĝo de Informbulteno de ASE



Tiel aspektas kelkaj el aperintaj dum ASE-periodo libretoj, entenantaj politikajn kaj aliajn materialojn

EKSTERCENZURA ESPERANTO-LITERATURO EN USSR

Ĉar ĉiu eldonaĵo devis havi aperpermeson el Moskvo de CK de KPSU kaj esti kontrolita cenzure (Glavlit), sed "Amikeco" ne estis laŭleĝe permesita, la redaktorado devis esti singardema por eviti punon...⁵⁴

Skribi pri la eldona agado ne eblas ne menciinte tiel nomatan "ekstercenzuran E-literaturon" en USSR⁵⁵.

Ni, sovetianoj, al kutimiĝis vivi en la tempo, kiam ĉio, ĉiam kaj ĉiel estis kontrolata, sendube ankaŭ eldonaĵoj.

Oni ne rajtis ion presi aŭ multobligi sen ricevo de permeso ĉe Glavlit aŭ ties filioj (Obllit, Gorlit...). Pro tio multnombraj valoraj manuskriptoj estis perditaj, pluraj — kaŝitaj kaj malfacile troveblaj nun.

Dum SEJM-periodo ekzistis ekstercenzuraj periodaĵoj de SEJM ("Juna esperantisto", "Akordo", "Aktuale", "KKK", "Kurte" k.a.). Paralele aliaj esperantistoj laboris pri eldonado de aliaj periodaĵoj, ankaŭ literaturaj ("Unuiĝo", "Amikeco", "Ligilo", "Esperanto en soveta gazetaro"...). Ĉiuj ĉi eldonaĵoj ankoraŭ atendas siajn esploristojn. Krom la periodaĵoj ofte aperadis diversaj broŝuroj (materialoj de ĉiujaraj literaturaj konkursoj "Muzo", apartaj broŝuroj en Litovio, Ukrainio; multnombraj lerniloj...).

Dum ASE-periodo ne estis ĉesigita tiu grava sed ne ĉiam sendanĝera laboro — aperigo de ekstercenzuraj materialoj. La promesita oficiala "Bulteno" de ASE aperadis, sed tute ne regule kaj ne respondis al postuloj kaj deziroj de esperantistoj. Pro tio oni daŭrigis la eldonon de jam kutimaj periodaĵoj ("Kurte" k.a.). Krome diversregule ekaperadis pluraj aliaj periodaĵoj: "Eksciu, ke...", "Ekzakte"... (v. la aldonatan tabelon).

⁵⁴ Jaan Ojalo "Ekstercenzura Esperanta Literaturo" "Litova Stelo" N 6/1993, p. 2

⁵⁵ Pli vastajn informojn pri ekstercenzura E-literaturo eblas tralegi en samtitola artikolo de A. Vaitiavičius, J. Ojalo, V. Silas, S. Gaidamavičius en "Litova Stelo" NN 5 6/1993 kaj 1/1994.

Eblas menciĝi aliajn eldonaĵojn, sed jam per tiuj titoloj oni povas ilustrati aktivadon de niaj esperantistoj, kiuj agis ne por ASE, sed por la E-movado en nia lando. Pli sube estos prezentitaj pluraj aliaj informoj, kiel niaj aktivuloj eldonadis ekstercenzurajn E-literaturon.

LISTO DE DIVERSAJ EKSTERCENZURAJ INFORMILOJ KAJ PERIODAĴOJ, APERIGATAJ DUM ASE-PERODO

Titolo	Kiu kaj kiam eldonis
"Aktuale"	LKS, Odincovo (Apudmoskvo) kaj Riga — N 1(62)/1981, N 2(63)/1982. Noto: Ĝi daŭrigis la numeradon de "Aktuale" (SEJM), poste Tomska Esperanto-klubo transprenis la eldonadon (por siberiaj kaj for-orientaj esperantistoj).
"Amikeco"	Hmelnickij kaj Tallinn — NN 31, 32, 33, 34, 35 (1979); 36 (1980); 37, 38, 39, 40, 41, 42 (1981); 43, 44, 45, 46, 47, 48 (1982); 49, 50???
"Amiketero"	Ventspils.
"Eksciĉu, ke..."	Volgograda E-klubo "Rado" ĝis 1988 kaj Junulara E-Centro en Taŝtagol ekde 1989 — NN 1/1986, 2, 3/1987; 3(9)/1988; 6, 7-8, 9-10, 11, 2-13, 14, 15-16, 17-18 (29-30)/1989.
"Ekzakte"	Urala E-klubo ĝis 1988, Urala E-societo ekde 1989 — NN 1(10), 2, 3, 4/1984; 1, 2, 3, 4, 5/1985; 1, 2, 3, 4, 5, 6/1986; 1, 2, 3, 4, 5, 6/1987; 1, 2, 3, 4, 5, 6/1988; 1, 2, 3, 4, 5, 6/1989.
"Fakto"	Sverdlovskaja E-klubo — NN 2(8)/1983; 1/1988.
"Informa Foliĉeto de STK de ASE"	Scienc-teknika komisiono de ASE — NN 18/1981; 21/1982; 24, 25, 26/1983; 27, 28, 29, 30/1984; 31, 32/1985.
"Informa letero"	Boris Granat, Voroneĵ — 2 numeroj en 1983.
"Informletero de siberiaj E-kluboĵ"	Tomsk — NN 1, 2, 3, 4/1987; 5, 6/1988.
"Informletero de siberiaj kaj for-orientaj esperantistoj"	Tomsk — NN 7, 8, 9, 10/1988.
"Informletero de uralaj esperantistoj"	Urala E-Komitato — NN 1, 2, 3/1982; 4, 5, 6, 7, 8, 9/1983.
"Informletero por la aliĝintoj al la Iniciata grupo interlingvistiko"	iniciata grupo por interlingvistiko en Tĵumeno — N 2/1984.

Titolo	Kiu kaj kiam eldonis
"Informoskop"	neregula informilo de Kolektiva E-Biblioteko en Sverdlovsk — NN 2/1984; 3, 6/1985; 7, 8, 9/1986; 10, 11/1987; 12, 13, 14/1988; 15/1989.
"Kurte"	S. Gaidamavičius, Vilnius — NN 53 — 136/ 1979 — 1982.
"Literatura Skatolo"	Sebastopolo — NN 1, 2, 3, 4, 5/1984; 6/1985; 7, 8, 9, 10, 11, 12/1986; 1(13), 2(14), 3(15)/1987.
"Sezonoj"	Esperanta rondo Kulturo en Tjumeno, Sverdlovsk kaj Permĵ — NN 1,2/1984; 3, 4, 5, 6/1985; 7, 8, 9, 10/1986; 11, 12, 13, 14/1987; 15, 16, 17, 18/1988; 19, 20, 21, 22/1989.
"Survoje"	Uljanovsk — NN 0/1988; 1, 2, 3/1989.
"Tajpa letero de SK"	Minsk — NN 2/1984; 3, 4, 5, 6/1985.
"Tomaska E-klubo sciigas siajn membrojn"	2 numeroj en 1982.
"Utile"	Tomsk — NN 1/1981; 2, 3, 4, 5/1982.
"Informa folieto de esperantistoj el Gorĵkij"	(ruslingva) N 185/1980.
"Informa folieto"	(ruse); Volgograd — NN 2, 3, 4/1985.
"Esperanto v sovetskoj pečati" ("Esperanto en soveta gazetaro")	MIEK — NN 152/1979; 153, 154, 155, 156/1980; 157, 158-159, 160/1981; 161, 162, 163-164/1982.
"Esperanto-ekspres"	(ruse); Sverdlovsk E-klubo — NN 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 8, 9, 10, 11/1986; 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 8/1987; 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 8, 9, 10/1988; 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 8, 9, 10/1989.

LABORO DE LA KOMISIONO PRI INTERNACIAJ LIGOJ

"... 2. Por realigi tiujn celojn kaj taskojn la Asocio:

... 2.3. organizas kaj efektifigas ligojn kun internaciaj kaj naciaj E-organizajoj, reprezentas sovetajn esperantistojn en konformaj internaciaj konferencoj kaj renkontiĝoj..."⁵⁶

Evidente por plimulto da esperantistoj la plej gravaj agaddirektoj de ASE estis la organiza laboro, la instru-metodika k.a. Sed por ASE-funkciuloj, precipe — por

⁵⁶ El ASE-regularo — "Informbulteno" de ASE N 1/1979.

KURTE

Nr. 105

VILNIUS

Vilniusa junulara E-klubo "JUNECO" invitas
 bilon; (la klubo "Juneco" fondiĝis II-
 zos la 4-an - 5-an de julio sur
 ĉiela muzeo de popolvivkulturo.
 13-a horo. Loko de kolektiva
 ŝiskés. La 3-an de
 4-an ĝis la
 montri
 R...

La
 Kua
 "Va
 20-
 ĉe
 vaj 1
 konti
 I-a de

KURTE 127
KURTE
 GRATULCON OKAZE DE LA 1-a DE MAJO!

La 26-an de marto, 1982 en Moskvo ok
 elekta konferenco de ASE. Partopre
 uzad kaj informadon partoprenis
 H.R. to de junularaj fakoj, vic
 aj. Antaŭ la konferenco organizo
 la mondo. Estis malgranda kultur
 zidanto de ASE prof
 la faris vicprezidan
 ndata komisiono
 Elpaŝis kame
 Kolker, Ruk
 Mutalov, P
 Konkl
 soluc
 s Ba
 tis
 unua
 n kaj
 as elek
 damine.
 ĉefa an.
 ezidio de
 kun Kvinaj
 AES "infor
 je ĉefaj ag
 Ĉiuj loĝis
 atendu en

KURTE 136
 AL PARTOPRENANTOJ DE OKSEJIT-24 apud VORONEĜ!




Oksejt-24 enhavos kutilmajn tenderejn programarojn. Ĉiuj aktivu-
 loj estas petataj helpi en ties efektivigo, estas petataj reŝi an-
 kaŭ. La tendaro povas sukcesi nur per komunaj fortoj.
 La detalojn pri la tendaro estas en la informletero Nr. 1, jam delon-
 dissendita al 45 Ekluboj. Turnu Vin al Esperanto - klubo an ĉielfone 5-08-34 (c
 394000 Voroneĝ, ab. ja. 5, GRANAT Boris (de la 90 ĝis la 1800 h.)
 informis Granat B.
 Loka prepara komitato
 TASKENT
 sendablaj IO popularaj E-kanboj, plenumita de preskaŭ pro-
 ricevi la registraĵojn, bv. sendi kaseton au babena
 20-30 min kaj unu rub. al Nikolaj Georgijevič
 140, E-klubo.



oklas ciklo
 du partoj
 fam:
 ov,
 v



Kelkaj numeroj de "Kurte" (aperadis ĝis 1982)



Titolpaĝoj de kelkaj el aperintaj ekstercenzuraj literaturaj libretoj

SSOD-anoj — la internacia. Unue, tiuj funkciuloj al kutimiĝis gvidi ĝuste tiun agadon (kaj ĉe esperantistoj dum ekzisto de la Esperanto-komisiono ĉe SSOD, kaj ĉe aliaj sociaj organizaĵoj, formitaj kaj funkciataj ĉe SSOD). Due, tiu agado donis pli eblecon senpage vizitadi oficiale fremdlandojn (ni vidospis sube, ke diversaj funkciuloj, ĉefe el SSOD, ofte uzis tiun vojon). Tria, la funkciuloj emis montri al vasta E-mondo la agadon de sovetiaj esperantistoj tiel, kiel postulis la superaj instancoj.

Kiujn taskojn devis plenumi tiu ĉi komisiono, la komisiono pri internaciaj ligoj?

Evidente, ĝi devus:

- efektivi firmajn kontaktojn kun diversaj naciaj kaj internaciaj E-organizaĵoj, unuavice — kun UEA, aliĝinte al ĝi;
- pli vaste organizi partoprenon de niaj esperantistoj en diversaj internaciaj kaj naciaj E-aranĝoj;
- organizadi enlandajn E-aranĝojn kun partopreno de esperantistoj el aliaj landoj;
- prizorgi indan akcepton de alilandaj esperantistoj, venantaj en nian landon gaste aŭ alikaŭze;
- metodike kaj organize helpi al E-klubo de la lando en diversaj demandoj de internacia laboro k.t.p.

Kaj nun ni provu analizi tion flankon de ASE-agado. Unue, necesas esprimi la opinion, ke tute ne gravis, kiu estis nominala gvidanto de tiu ĉi komisiono — tutegale la “gvidadon” efektive gvidadis SSOD-funkciuloj, de kiuj dependis solvado de pluraj demandoj: ĉu okazos aŭ ne okazos iu E-aranĝo en la lando kun partopreno de alilandaj esperantistoj; ĉu veturos aŭ ne veturos niaj esperantistoj partopreni iun alilandan E-aranĝon kaj kiu persone veturos...

La kontaktoj kun naciaj E-organizaĵoj evoluis, ŝajnas, ne malbone. Precipe tio koncernas la rilatojn kun E-Asocioj el soc. landoj. Dum la tuta ASE-periodo reprezentantoj de nia Asocio partoprenis ĉiujarajn konsultiĝojn (v. la tabelon). Nur ne estas klara la efektiveco de tiuj konsultiĝoj.

Estis ankaŭ solvitaj demandoj pri pli proksima kunlaboro inter ASE kaj E-Asocioj de GDR kaj BEA:

- Kontrakto pri amikeco kaj kunlaboro inter ASE kaj E-Asocio en Kultur-ligo de GDR (30.03.1984);
- Kontrakto pri kunlaboro inter ASE kaj BEA (novembro, 1985).

Ne estis flanke ankaŭ apartaj E-kluboĵ. Ekz., E-kluboĵ de ĝemelurboj Soĉi (Rusio) kaj Rimini (Italio); Kievo (Ukrainio) kaj Karl-Marks-Ŝtadt (GDR) same kontraktis pri kunlaboro.

Nur ne tre bonis la afero pri proksimigo de ligoj ASE — UEA.

Ĝis tiu periodo multaj E-Asocioj el soc. landoj jam faris sian aliĝon al UEA:

- PEA — en 1948 kaj 1955 (fondita en 1945);
- BEA — en 1956 (fondita en 1907);
- HEA — en 1962 (fondita en 1960);
- ĈEA — en 1970 (fondita en 1969);
- SEA — en 1976 (fondita en 1969);
- GDREA — en 1976 (fondita en 1963).

Estis do preteksto, ke ankaŭ ASE aliĝu al UEA.

Komence SSOD-funkciuloj esprimis strebon pli rapide aranĝi la aliĝon de ASE al UEA. Pri tio temis dum Prezidikunsidoj de ASE, dum kunsidoj de ASE- kaj SSOD-oficialuloj, eble ankaŭ en CK de KPSU.

Oni komencis eĉ cerbumi, kie preni la monon, bezonatan por pagi la kotizon al UEA. En 1984 dum vizito de prezidanto de UEA Gregoire Maertens en Moskvo al li estis transdonita aliĝpeto de ASE⁵⁷.

Sed poste la procezo poiomete malhastiĝis kaj fine plene fiaskis. Jen kion skribas pri tio Ulrich Lins en sia letero de 31.12.1995, adresita al mi:

“...La korespondado inter UEA kaj ASE neniam estis tre intensa kaj/aŭ en-havoriĉa...

...Laŭ la memoro de Simo Milojeviĉ, ASE ne skribe informis, ke ĝi retiris la peton pri aliĝo...

... Ĉu vi scias, ke la delegacio de ASE en Lucerno donacis al la estraro de UEA grandan portreton de Zamenhof? Ĝi ornamas la ĉambregon de la ĝenerala direktoro en Rotterdam...”

⁵⁷ “Informbulteno” de ASE N 4 (42)/1984, p. 5.

Do, kiel estas videble, ni povas evidente taksu la tiudirektan agadon (kontaktoj ASE — UEA) nekontentiga. Ne estis ja atingita la plej ĉefa celo — aliĝo de ASE al UEA.

Eble la plej proksima al la eventoj opinio pri nealiĝo de ASE al UEA estas esprimita en la postparolo de Sergej N Kuznecov al la libro de Ulrich Lins "La danĝera lingvo" (la postparolo estas titolita "Danĝera libro pri danĝera lingvo"):

"...Ulrich Lins estas ĝuste tiu persono, kiu kulpas pri la fakto, ke la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE) neniam aliĝis al UEA.

...En 1984, dum la belepoko de nia landa "stagnado" (pri la perestrojko venonta sekvajare oni tiam eĉ ne imagis), ĉio jam estis preta por la longe atendita paŝo -- la aliĝo de ASE al la tutmonda organizacio de esperantistoj. La graveco de tiu paŝo, ne nur simbola, konsistis en tio, ke fakte la unio de sovetiaj esperantistoj neniam organizate apartenis al la monda esperantistaro. dum la Stalina tempo al tio malhelpis la batalo de la tiama SEU (...) kontraŭ la neŭtralisma UEA, dum la Ĥruŝĉeva tempo SEU jam ne ekzistis, kaj ASE ankoraŭ ne krejiĝis (ĝi estis fondita en 1979); dum la Brejneva tempo obstaklis la "patronoj" de ASE, kiuj suspekteme subkulis ties agadon.



Partoprenintoj de Internacia E-renkontiĝo en Volgograd (aprilo 1986); de maldekstre B Anohin, V Ĉernov, N Kjuĉukov, V Cvetkova, N Aleksiev, A Junusov, V Ĥromov

En 1984, tamen, la obstakloj ŝajnis pereintaj, kaj oni aspiris baldaŭan aliĝon al UEA. Oni jam planis komunajn servojn, kongrespartoprenojn, abonperojn kaj kion ankoraŭ oni ne povas plani en plansocio! Sed... venis Lins kaj ĉion detruis. Li permesis al si recenzi en la revuo "Esperanto" (1984, n-ro 4, p. 73) la libron de iama kunlaboranto de la Komunista Internacio, poste arestito kaj kondamnito K. Ŝtajner "7000 tagoj en Siberio". Tiu recenzo, laŭ ASE-funkciuloj, certe estis provoka, kontraŭsoveta elpaŝo; kaj la redakcio de "Esperanto" eĉ pliakrigis la provokon, presinte la recenzo de Lins flank-al-flanke ĉe alia recenzo, tute pri alia temo, sed verkita de sovetiano.

Tiuj fiagoj certe ne povis resti neresponditaj. ASE indigne protestis, reprenis sian promeson aliĝi al UEA kaj punis eĉ la Universalajn Kongresojn, al kiuj ĝi dum tri jaroj rifuzis sendi oficialajn delegitojn. Kaj la tutan perturbon kaŭzis tiu pekulo Lins kun sia 32-linia recenzo...⁵⁸

Ne tute bone statis la aferoj pri organizo en USSR de E-aranĝoj kun partopreno de esperantistoj el aliaj landoj. Vere gravas, ke helpe de SSOD estis organizitaj:

- Internacia E-renkontiĝo en Volgograd⁵;
- InterSET-1 en Rostov la Granda;
- InterSEJT-2 en Minsk (jam en 1989, post refunkciigo de SEU surbaze de ASE);
- 2-foje — konsultiĝoj de E-Asocioj el soc. landoj.

La internacia renkontiĝo en Volgogrado, titolita "Esperantistoj en batalo por la paco kaj malarmado", okazis 09 — 11.04.1986. Ĝi estis dediĉita al Internacia Jaro de Paco (tiel proklamis la jaron 1986 UNESCO). La renkontiĝon partoprenis ĉ. 200 esperantistoj el 15 landoj, esperantistoj el Sovetio

58 Ulruch Lins "La danĝera lingvo". Moskvo, "Progreso", 1990, p. 544. Pliajn detalojn pri la skandalo komunikis V.V. Sarnodaj:

"En 1984, kiam "bonaj" homoj denunciis pri la publikigo en "Esperanto" de pozitiva recenzo de Kolker pri *iu* E-libro eldonita en Israelo, oni vokis min al la menciita supre s-ro Peslĵak (...) Komenciĝis krudaj paroloj en la stilo: "(...) Tiaj agoj estas malamikaj al nia lando! Kial via amiko Kolker aŭdacis laŭdi libron aperintan en Israelo kaj eĉ publikigi ĝin apud la kontraŭsoveta artikolaĉo!" (...) La parolo estis naŭze aĉa, la fortoj estis malegalaj kaj, kvankam mi sukcesis iom malstreĉi la situacion, mi malgajnis, ĉar ne sukcesis preventi postan eksigon de B. Kolker el la Prezidio de ASE kaj malvalidigon de nia aliĝpeto al UEA, kiun unu monaton pli frue forveturigis el Moskvo tiama UEA-prezidanto G. Maertens" (oni — la SSOD-anoj kaj CK-anoj — decidis, ke la publikigo de Lins-a recenzo estis kontraŭsoveta ago de UEA kaj la tiama redaktoro de "Esperanto" S. Milojeviĉ, do tiun kontraŭsovetan organizaĵon ni ne devas aliĝi" ("Gerbe kaj kore", N 9 (21), 1992, p. 5-6).

reprezentis 56 urbojn de 10 uniaj respublikoj. Inter la ceteraj en Volgogrado estis honora prezidanto de MEM Nikola Aleksiev (Bulgario), prezidanto de MEM Imre Pethes (Hungario), sekretario de MEM Vasja Cvetkova (Bulgario), gvidantoj de E-Asocioj Dao Anh Kha (VPEA) kaj Hans Heinel (GDREA), vicprezidanto de UEA Yosimi Umeda (Japanio) kaj multaj aliaj.



Internacia E-renkontiĝo en Volgograd (aprilo 1986)

Programo de la renkontiĝo estis sufiĉe riĉa — labora kunsido de MEM-komitato, kunsido de E-komisiono pri solidareco kun Vjetnamio, Laoso kaj Kampuĉio, vizito al prezidanto de Urba Soveto, kiu rakontis pri pasinto, nuntempo de la urbo kaj perspektivoj de ties evoluo, vizito de muzeo-panoramo “Stalin-grada batalo”, ĉiuvesperaj koncertoj de profesiaj kaj amatoraj aktoroj...

Fakte, se niaj instancoj organizadis iun aranĝon, ĉu nacian, ĉu internacian, ili ĉiam strebis fari tion altkvalite. Do, de tiu vid-

punkto eblas diri, ke la renkontiĝo sukcesis. Jen estas kurta citaĵo de kanada esperantisto Normand Fleury, delegito de UEA por Montrealo:

"Estmataj,

Mi havis la grandan honoron partopreni la renkontiĝon: "Esperantistoj en batalo por mondpaco" en Volgogrado

Mi neniam forgesos mian partoprenon en Via aranĝo. Mi lernis pli pri Sovetunio kaj la Sovetianoj dum mia 2-semajna restado ol dum mia tuta vivo.

Mi navas nur iaŭdojn, ĉar la renkontiĝo plene sukcesis kaj ebligis intensan diskutadon pri la neceso de tutmonda paco. Mi invitas vin denove organizi similajn aranĝojn. Vi povas fieri pri via esperantista movado, kiu tiom bone aktivis favore al la paco. ."


Eblas ankaŭ indiki artikolon de Yosimi Umeda en la revuo "Esperanto" N 5/1986.

Iom malpli bonis la organizado de du InterSEJT — en Rostov-Velikij (12 — 19.04.1987) kaj Minsk (29.03 — 05.04.1989)⁵⁹.

En la unua InterSEJT, kiu samtempe estis OkSEJT-28, partoprenis, krom la niaj, esperantistoj el Hungario kaj Bulgario.

Malgraŭ la iniciantoj de InterSEJT-organizo estis ASE (alivorte — SSOD-funkciuloj ne povis jam iel malhelpi tion) la organizadon mem faris neniu (ni ne parolu pri elekto de loko por la tendaro, periodo k.s., temas pri la tendara programo — la plej grava parto de la organiza periodo).

Mi persone ne partoprenis tiun tendaron kaj povas juĝi pri ties sukcesoj kaj mankoj el aperintaj post ĝi artikoloj. Ĉefe



Internacia E-renkontiĝo en Volgograd (aprilo 1986; de maldekstre: V.J. Bespaŝov, B. Anohin, V. Ĉernov, G.M. Silo

⁵⁹ Mem aranĝo okazis jam dum la SEU-periodo, sed la prepara laboro estis okazigata dum la ASE-a.

indus baziĝi je la artikolo de Irina Gončarova en "Informbulteno" de ASE "Ne ripeti erarojn de la unua InterSEJT", kies citaĵojn mi prezentas al via atento:

"...Sperto de la unua organizita de ASE Esperanto-tendaro kun eksterlandanoj estas sendube interesa. Tiaj tendaroj nepre devas iĝi tradiciaj, kaj necesas pli vaste alvoki al la partopreno eksterlandajn esperantistojn...

Kiu estis la organizanto de OkSEJT-28 — restis enigmo por la partoprenintoj. Ni ne povas diri: ASE, ĉar ASE estas ni ĉiuj. Ni ne povas diri: la Junulara komisiono de ASE-Estraro, ĉar ties ekzisto, samkiel la ĉeesto de ĝia prezidantino N. Ŝorohova, neniel influis la laboron de la tendaro. Ni ne povas diri: Jaroslava E-klubo, ĉar ties reprezentantoj nur estis komisiitaj elaceti necesan kvanton da aliĝkartoĵoj por ITC, kaj ili mem konstante embarasiĝis koncerne la demandon — kiu do krom ili eniras la preparan komitaton. Unuafoje dum la solena malfermo de la tendaro la grupgvidantoj ne sciis, al kiu enmanigi salutdonacojn de la delegacioj...

...La sekvo iĝis ĉiuj seriozaj mankoj de la prepara periodo:

- informo pri la tendaro estis sendita eksterlanden tro malfrue kaj, laŭ aserto de bulgaraj kaj hungaraj partoprenantoj, ne ĉiuj dezirantaj sukcesis aranĝi vojaĝon al USSR, la esperantistoj el GDR tute ne povis veni;

- al la sovetiaj kluboj estis proponita minimuma kvanto da lokoj, la dua informletero ne estis dissendita, rezulte preskaŭ 80 aliĝkartoĵoj elacetiĝitaj per Jaroslava E-klubo, restis neuzitaj;

- la partoprenontoj ne estis anticipe enketitaj, kio povus ebligi skizon de ĉefaj labordirektoj;

- la programo de la tendaro ne estis anticipe kompilita kaj sciigita al la partoprenontoj, rezulte kelkaj tradiciaj aranĝoj, bezonantaj specialan preparon, ne povis okazi;

- la tendaro ne estis provizita per laŭtemaj insignoj kaj aliaj tradiciaj atributoj...

Multajn erarojn oni povus eviti, se ĉiuj organizaj problemoj de la unua internacia tendaro estus prenitaj sub kontrolon de ASE-Prezidio. Tamen la gvidantaro de ASE malmulte atentis la preparon de la tendaro, ne opiniis necesa partopreni ties laboron...

La unua varianto de la programo, haste kompilita dum la tago de alveno, inkluzivis preskaŭ nenion el la tradiciaj aranĝoj de SEJT-0j, kaj pli grave — tute ne konsideris la internacian karakteron de la tendaro..."⁶⁰

Eblas evidente daŭrigi tiun liston de malglataĵoj dum la tendaro, de ties mankoj. Sed mi opinias, ke tiu nelonga listo jam bone ilustras, ke en la tendaro estis pli da mankoj ol pozitivaj momentoj. Eble la ĉefa atingo estis la organizo de la tendaro mem.

⁶⁰ "Informbulteno" de ASE N 5-6 (63-64)/1987, p. 8-9.

Pri la alia tendaro — InterSEJT-2 — ni ne parolu, ĝi ja okazis jam dum la periodo de SEU...

Se paroli pri ankoraŭ unu agaddirekto de la komisiono — partopreno de niaj esperantistoj en alilandaj E-aranĝoj, eblas diri, ke ĝuste tio estis bone farata. Dum ASE-periodo delegacioj de ASE kaj specializitaj turistaj grupoj de niaj esperantistoj, akompanataj de neesperantistoj, SSOD-funkciuloj, partoprenis plurajn Universalajn Kongresojn (6 el 10). Ankaŭ ĉiuj konsultigoj de E-Asocioj el soc. landoj pasis kun ĉeesto de niaj delegitoj. Eblas prezenti proksimume jenan bildon de alilandaj E-aranĝoj, en kiuj partoprenis ASE-representantoj (en la listo estas nur tiuj, kien oni veturis helpe de ASE (SSOD; v. la tabelon). Ankaŭ ĉiujn UK-ojn dum ASE-periodo partoprenis oficialaj delegitoj, pripagitaj flanke de SSOD (inter tiuj estis iaj funkciuloj el SSOD, ne esperantistoj — v. la tabelon).



*Grupo de sovetiaj esperantistoj kun eks-sovetiano
dum la UK en Varsovio (1987)*

Partopreno de sovetaj esperantistoj en konsultiĝoj de E-Asocioj el soc. landoj

Jaro	NN de la konsultiĝo	Periodo	Loko de okazigo	Lando	Kvanto de reprezentitaj E-Asocioj	Oficialaj partoprenintoj de ASE
1979	12	06.04 — 09.04	Višegrad	Jugoslavio	8	Isajev M.I., ?
1980	13	19.04 — 23.04	Sofio	Bulgario	8	Isajev M.I., Makovskij A.I.
1981	14	16.04 — 22.04	Pŝerovo	ĈSSR	8	Makovskij A.I., Berjoza A.V.
1982	15	24.04 — 30.04	Jerewan	USSR	8	*
1983	16	18.04 — 20.04	Razdiejovico	Pollando	7	Isajev M.I., Matkovskaja G.N., Verigin V.J.
1984	17	26.03 — 31.03	Badsaarovo	GDR	7	Isajev M.I., Zubkov N.B., Maĉkalova S.A.
1985	18	15.04 — 20.04	Pisanica	Bulgario	9	Verigin V.Je., Ŝanina L.J.
1986	19	20.04 — 26.04	Poprad	ĈSSR	8	Isajev M.I., Ŝanina L.J., Verigin V.J.
1987	20	12.04 — 16.04	Budapeŝto	Hungario	7	Perevalov D.A.
1988	21	25.04 — 29.04	Ĉeske Budejovice	ĈSSR	9	Perevalov D.A., Ŝanina L.J., Kazakov A.B.
1989	22	18.04 — 21.04	Moskvo	USSR	10 **	

* De ASE partoprenis pluraj esperantistoj, ĉefe el Armena respublika filio, kiu estis ĉeforganizintoj;

** De USSR la 22-an Konsultiĝon partoprenis reprezentantoj de SEU (Anstataŭ ASE) kaj jam sendependa Litova E-Asocio

Partopreno de sovetaĵiaj esperantistoj en UK dum ASE-periodo

Jaro	NN de UK	Loko	Lando	Kvanto de		Senpage partoprenis de USSR
				partoprenintoj	landoj	
1979	64	Lucerno	Svislando	1630	49	Berjoza A.V., Isajev M.I., Kočetkov A., Zubkov N.B.
1980	65	Stokholmo	Svedio	1807	52	Isajev M.I., Zubkov N.B.
1981	66	Brazilia	Brazilo	1748	49	Isajev M.I., Berjoza A.V.
1982	67	Antverpeno	Belgio	1899	51	Boguŝevskij A., Isajev M.I., Kočetkov A., Matkovskij A.I., Verigin V.Je., Volkov V.
1983	68	Budapeŝto	Hungario	4834	51	Isajev M.I., Zubkov N.B.
1984	69	Vankuverno	Kanado	802		
1985	70	Augsburg	FRG	2311		
1986	71	Beĵing	Ĉinio	2482	54	Verigin V.J.
1987	72	Varsovio	Pollando	5946		Isajev M.I., Perevalov D.A., Verigin, V.J., Skupas A., Šamina L.A., Zorin
1988	73	Rotterdam	Nederlando	2321		
1989	74	Brajton	Britio	2280		

Partopreno de sovetiaj esperantistoj en internaciaj E-aranĝoj*

NN I/V	Lando	Periodo	Titolo de la aranĝo	Partoprenintoj
1	GDR	novembro 1979	Internacia seminario	Isajev M.I.
2	Hungario	novembro 1979	Studenta forumo	Jakovlev A.
3	GDR	aprilo-majo 1980		Podkaminer S.N., Korotkeviĉ G.J.
4	Bulgario	majo 1981	Scienc-praktika konferenco	Korotkeviĉ G.J.
5	GDR	majo 1981	3-a konferenco de E-organizaĵoj ĉe Kulturiligo de GDR	Samodaj V.V.
6	ĈSSR	novembro 1982		Loseva N.V.
7	ĈSSR	marto 1983	5-a renkontiĝo de esperantistoj- pabatalantoj	Samodaj V.V.
8	Bulgario	aŭgusto 1983	Internacia E-lernejo en Pisanica	Lazareva T.V.
9	ĈSSR	marto 1984	6-a renkontiĝo de esperantistoj- pabatalantoj	Majburova J. V., Skupas A.
10	ĈSSR	marto 1985	7-a renkontiĝo de esperantistoj- pabatalantoj	Perevalov D.A.
11	GDR	aŭgusto 1987	14-a Internacia kongreso de lingvistoj en Berlin	Kuznecov S.N.

* Ĉi tie estas prezentita tute ne plena listo de la partoprenintoj, krome, en ĝi povas esti malĝustajtoj.

LABORO DE LA SCIENC-TEKNIKA KOMISIONO

"La 26-an de marto 1985 ASE-Prezidio aŭskultis detalan informon de la ASE-estrarano A.J. Gončarov pri laboro de scienc-teknika komisiono ĉe ASE-Estraro dum 1984 kaj novan gvidanton de la komisiono profesoron, ASE-estraranon N.I. Ĉistjakov pri laborplano de la komisiono por 1985..."⁶¹

Dum lastaj kvin jaroj de SEJM-ekzisto (de 1974 ĝis 1979) unu el ties fakoj — la scienc-teknika — estis gvidata de Anatolo J. Gončarov, vere kompetenta persono pri tiu ĉi agaddirekto. Li aktive komencis la laboron, fondis komisionon, trovis bonegajn helpantojn, inter kiuj precipe aktivaj estis Vladimir A. Ebel (Barnaul), Aleksandr B. Kogan (Tiĥvin) — li gvidis terminologian centron de la fako, — Miĥail Ziskandoviĉ (Novosibirsk) — li gvidis la elektroteknikan sekcion.

Por iomete ilustrati la vere efektivan agadon de la fako (ĝi ne estis vaste priskribita en la libro "SEJM, Historia skizo"), eble, sufiĉas prezenti ĉi tie resumon de la laboro dum unu el periodoj kaj laborplanojn.

"RAPORTO PRI LA LABORO DE LA SCIENC-TEKNIKA FAKO DE SEJM POR LA PERIODO IX-1975 — VIII-1976

Dum la pasinta periodo estas farita jena laboro:

1. Estas kolektitaj 115 adresoj de E-sciencistoj en USSR.
2. Estas lanĉita informa buleteno de la Scienc-Teknika fako, en la buleteno aperis 32 materialoj sur 18 paĝoj.
3. Estas komencita bibliografio pri la temoj:
 - 1) scienc-teknikaj artikoloj en Esperanto;
 - 2) scienc-teknikaj libroj en E-o;
 - 3) E-o-teminaroj;
 - 4) scienc-popularaj artikoloj en E-presoj;
 - 5) Esperanto kiel laborlingvo de la scienco;
 - 6) E-lingvaj scienc-teknikaj artikoloj en ne-Esperanta presoj;
 - 7) Esperanto-lingvaj resumoj;
 - 8) prelegoj en la Internacia Somera Universitato;
 - 9) E-o en faka korespondado;
 - 10) sciencistoj kaj sciencaj organizadoj por Esperanto;
 - 11) E-o kiel lingvo por reklamoj;
 - 12) studentaj sciencaj verkoj pri E-temoj;

⁶¹ "Informbuleteno" de ASE N 2-3 (51-52)/1985, p. 4.

- 13) lingvaj baroj en la scienco;
- 14) scienc-teknikaj E-revuo;
- 15) problemaj artikoloj pri Esperanto en la scienco.
4. Estas mikrobendigitaj 14 Esperanto-terminaroj kaj 14 aliaj sciencaj E-lingvaj materialoj; estas plenumitaj 9 mendoj pri mikrobendoj (el 11).
5. 36 ĵarkolektoj de E-revuo estas detale trarigarditaj kaj surslipigitaj ĉiuj materialoj pri Esperanto en la scienco. Inter ili 14 ĵarkolektoj de la "Scienca Revuo".
6. ... Al la "Scienca Revuo" estas kolektitaj kaj senditaj 4 sciencaj artikoloj.
7. Estas fondita SEJM-biblioteko de faka literaturo en Esperanto.
8. Al SEJT-18 estis venigita ekspozicio de scienc-teknikaj libroj (revuoj) en Esperanto.
9. Estas legitaj por neesperantista publiko 3 prelegoj pri Esperanto en la scienco, 1 prelego en BET-17.
10. Je 15% estas plenumita la laboro pri traduko de Technisches Wörterbuch.
- Al la ST-fako aliĝis 62 personoj, krome al la Terminara grupo aliĝis 14 personoj.

A. Gončarov, estro de la ST-fako'

"Plano de la laboro de la scienc-teknika fako en 1976-1977:

1. Fine de la jaro fondi jenajn sekciojn: kernian, fizikan, biologian, matematikan, elektroteknikan.
2. Daŭrigi la terminaran laboron (la plano de la laboro por la Terminara Centro sekvos).
3. Aboni por USSR 150 ekzemplerojn de "Scienca Revuo".
4. Sendi al "Scienca Revuo" kaj aliaj E-periodaĵoj 10 scienc-teknikajn artikolojn.
5. Verki ruslingvan lecion pri Esperanto en la scienco.
6. Organizi 10 fakajn korespondigojn.
7. Komenci surperfokartan tutmondan adresaron de sciencistoj-esperantistoj.
8. Organizi, dume negrandan, korespondan E-kurson por sciencistoj.
9. Abonigi al "Scienca Revuo" la bibliotekon de Lenin kaj la fremdlingvan en Moskvo.
10. Kolekti materialon por la proksimestonta ruslingva bulteno "Esperanto v nauke" ["Esperanto en la scienco"].
11. Daŭrigi ĉiujn komencitajn kartotekojn.
12. Fari kolorajn lumbildojn de scienc-teknika literaturo en Esperanto.

Perspektiva plano de la laboro por la ST-fako en 1976 — 1981 jj:

1. Organizi du tutsovetiajn konferencojn de esperantistoj-sciencistoj.
2. Prepari oficialan elpaŝon en la Prezidio de la Akademio de sciencoj pri Esperanto en scienco.
3. Fari tutmondan kartotekon de sciencistoj-esperantistoj.
4. Pruvi science la taŭgecon de E-o por la scienco. Eble preparigi kandidatan disertacion pri la temo.

5. Sintumi perletere al la Scienc-fako de CK de la partio kun argumentoj por oficiala subteno de E-o en la scienco.
6. Ekeldonadi ruslingvan bultenon "Esperanto v nauke", kiun dissendadi al diversaj gravaj sciencaj instancoj de la lando.
7. Partopreni la Someran Universitatan Kurson en Belgio.
8. Verki kaj disvastigi apelon por E-o en la scienco inter famaj sciencistoj de la lando.
9. Organizati sociologiajn laboron pri Esperanto en la scienco⁶²

Mi speciale notis ĉi tie aktivecojn de Anatolo J. Gonĉarov dum SEJM-periodo por montri, ke ne vane ĝuste li estis proponita dum la FK de ASE kiel estro de la scienc-teknika komisiono kaj poste fariĝis tiu.

La unuan etapon de la agado de la komisiono povas ilustrati denove la komisionestro mem per la raporto, kiun oni aperigis en unu el numeroj de la "Informbulteno" de ASE⁶³, kiu estas ĉi-sube plene prezentata al via atento:

"En la scienc-teknika komisiono de la Estraro de ASE

La scienc-teknika komisiono (STK) de la Estraro de ASE estis fondita jam dum la unua kunsido de la ASE-Estraro en marto 1979. Je decembro 1983 la komisiono unuigas 149 personojn, inkluzive 3 akademianojn de scienc-akademioj de uniaj respublikoj, 7 profesorojn kaj doktorojn de sciencoj kaj 47 kandidatojn de sciencoj. Dum la lastaj jaro kun duono al la laboro de STK aliĝis 41 personoj.

Strukture la STK unuigas laboron de parencaj komisionoj de kelkaj filioj de ASE kaj de fakaj sekcioj: STK de Leningrada filio de ASE (gvidanto — kandidato de kemiaj sciencoj V. Gromov), Litova filio (gvidanto — docento, kandidato de teknikaj sciencoj S. Ŝimanauskas), Latva filio (gvidanto — universitata instruisto, estrarano de ASE A. Kalniņš), Estona filio (gvidanto — docento, kandidato de fizik-matematikaj sciencoj V. Hromov), kaj sekcioj de la STK de la Estraro de ASE — fizika (kandidato de fizik-matematikaj sciencoj M. Belogolovskij, Doneck [Ukrainio]), kemia (aspiranto A. Grafov, Kievo [Ukrainio]), medicina (kuracisto J. Kivajev, Joŝkar-Ola [Rusio]), elektroteknika (supera scienc esploristo M. Ziskandoviĉ, Novosibirsk), komputista (sekciestro de projekta instituto G. Ŝevljakov, Ĥarkiv [Ukrainio]), student-scienc (instruktoro de urba komitato de komsomolo A. Ionesov, Samarkand [Uzbekio]). En la laboro de STK partoprenas ankaŭ sciencistoj-esperantistoj, kiuj ne membras en kluboj kaj ne kontaktas kun respublikaj STK aŭ kun fakaj sekcioj.

Ekde la Dua Konferenco de ASE ni sukcesis fari certan laboron pere de Komisionoj de la ASE-filioj kaj fakaj sekcioj. Kelkajn imagojn pri la laboro eblas ĉerpi el la ĉi-subaj donitaĵoj.

⁶² "Informa Folieto de la Scienc-Teknika fako de SEJM", N 7 (9), (1976).

⁶³ "Informbulteno de ASE" N 10-11 (37-38)/1983, p. 2 — 4.

Kurte pri la laboro de STK en ASE-filioj. Pri la laboro en Leningrado sufiĉe detale rakontis V. Gofštejn kaj V. Gromov en la informo, apengita en "Informbulteno" de ASE (N 5/1983). En Estonio la STK organizis en Esperanto du sciencoteknikajn konferencojn, en majo 1982 pri la temo "Problemoj de ekologio kaj naturdefendo en la nuntempa mondo" en aprilo 1983 pri la problemoj de Finstruado. En Litovio kaj Latvio finiĝis organiza periodo de la komisionoj. Pri la laboro de Moskva klubo de sciencistoj-esperantistoj "Scio" (Klubssekretario I. Medvedev) estis informo en la sama numero de la "Informbulteno". Dum 1,5 jaroj membroj kaj gastoj de la klubo faris en Esperanto 20-foje sciencajn prelegojn. Pri la okazigita en la klubo pridiskuto de la problemoj de malamarmado estis publikajo en la revuo "Paco" (N 4/1983). La 30-an de novembro 1983 okazis tre interesa komuna kunsido de la sekcio pri sciencoteknika traduko de sciencoteknika societo pri radioelektroniko kaj komunikado en Moskva elektroteknika instituto de komunikado kaj la klubo "Scio", dum kiu la estro de la STK rakontis pri uzado de Esperanto en sciencoteknika literaturo kaj montris specimenajn de eldonoj en Esperanto pri naturaj kaj teknikaj sciencoj, kaj L. Vulfović pri granda laboro farita en nia lando post 1917 por eldono de vortaroj, inkluzive fakajn. La prelegoj elvokis multajn demandojn post kiuj sekvis vigla interŝanĝo de opinioj. Speciale al la kunsido estis preparita murgazeto pri la 68-a Universala Kongreso de Esperanto, siajn impresojn pri la kongreso rakontis vicprezidanto de ASE N. Zubkov.

Enkadre de la fizika sekcio de la STK de la Estraro de ASE estas komencita laboro pri la kompilado de minimuma fizika terminaro en kvin lingvoj, inkluzive Esperanton; tiun laboron gvidas M. Belogolovskij kaj V. Ŝarabkova (Kujbiŝev). Estas redaktata laŭ la rusa originalo la Esperanto-traduko de la fama lernolibro de L. Landau kaj J. Livŝic "Teoria fiziko. Volumo 1. Mekaniko", kiun tradukas hungaraj kolegoj.

La kemia sekcio de la STK ellaboris principojn de kompilado de kvinlingva kemia vortaro surbaze de komputilo. La laboron pri la kompilado de la vortaro komencis A. Grafov. Kandidato de fizik-matematikaj sciencoj M. Popov (Berdjansk) finis laboron pri kompilado de biokemia rus-esperanta vortaro. La sekcio redaktis esperantigitan el la hungara libron "Molekulo". La aktivulo de la sekcio B. Ŝvarc (Brest) tradukis kaj forsendis en la revuon "Sciencaj komunikajoj" du artikolojn el la revuo "Kemio kaj vivo". En la studoj de Ĉeĥoslovaka konferenco pri uzado de Esperanto en la scienco kaj tekniko estas publikigita artikolo de kvin lingvaj kemiistoj O. Muraŝko k.a.

En la listo de la medicina sekcio estas pli ol 100 medicinistoj-esperantistoj. J. Kivajev finis kompiladon de malneta varianto de rus-esperanta medicina vortaro. Estas komencita kompilado de medicinoteknika terminaro. La sekcio ekkontaktis kun analogiaj sekcioj en Bulgario kaj GDR.

La komputista sekcio preparis 12 prelegojn por internacia konferenco pri komputado "Interkomputo-82", okazinta en Budapeŝto. La sekcio laboras pri kompilado de Esperanto-rusa komputa vortaro kun uzado de komputiloj. Same kun uzo de komputiloj en Gorkij estas efektivigata laboro pri kompilado de ofteca vortaro de Esperanto. G. Sevljakov komencis verki lernolibron de Esperanto por komputistoj. S. Pokrovskij (Novosibirsk) esperantigis el la rusa kaj anĝla libron "Revizia informo pri Algol-60".

Nun estas fondata la geologia sekcio de la STK, kies aktivuloj jam preparis kvin artikolojn por scienca artikolaro "Geologio internacia", kiu devos aperi en 1984 en Budapeŝto. Por Scienca eldoncentro de UEA en Budapeŝto estas verkitaj kaj jam redaktataj du libroj — "Fundamentoj de teorio pri informado" de G. Tkeŝetaŝvili (Tbilisi) kaj "Popularaj rakontoj pri konduto de bestoj" de J. Ŝuvaĵev (Voroneĵ).

Krom la supre nomitaj vortaroj estas kompilitaj ankaŭ aliaj fakaj Esperanto-vortaroj: la botanika (akademiano J. Dagis, Vilnius), la matematika (V. Lebedev, Gusj-Ĥrustalnij), la metalurgia (L. Vulfoviĉ, Moskvo), vortaro de navigad-terminoj (A. Kogan kaj V. Gakalenko, Tihvin), la parazitologia (akademiano S. Bojev, Aĝna-Ata), la poligrafia (N. Starodubcev, Doneck) kaj la ĝardenkultura (S. Kraĵnov, Moskvo).

Kompreneble, en la laboro de la komisiono estas ankaŭ mankoj kaj ne nur objektiv-, sed ankaŭ subjektivkarakteraj. Ekzemple, fakte ne komencis labori la elektroteknika sekcio, ne finorganizigis STK en Ukrainia filio de ASE, kvankam jam nun pluraj sciencistoj-esperantistoj de tiu respubliko aktive partoprenas la agadon de la STK de la Estraro de ASE.

A.J. Gonĉarov,
komisionestro, kandidato de kemiaj sciencoj"

Tamen, tutegale la suprecitata raporto pri la agado de la STK estas ne plena. Ja tute ne eblas noti ĉiujn aktivecojn, kiuj estis dum tiu periodo. Multaj momentoj de tiu agado ne estis notitaj, kaj mi ŝatus mencii almenaŭ kelkajn el ili.

Unue, pri studentaj (kaj ne nur pri studentaj) sciencaj konferencoj. La komisionestro A.J. Gonĉarov notis en sia raporto ekziston de student-sciencia sekcio, kiun gvidis A. Ionesov. Sed ne estis notita eĉ unu studenta konferenco, okazinta tiuperiode, kio fakte ne signifas, ke tiaj ne okazadis.

Nur en Samarkanda ŝtata universitato ĉiujare estis efektivigataj tiaj konferencoj, enkadre de kiuj ekde 1979 laboris ankaŭ sekcio pri interlingvistiko kaj esperantologio. Ties sesiojn partoprenis studentoj-esperantistoj kaj invititaj gastoj el multaj urboj de USSR (Taŝkento, Kievo, Novosibirsk, Moskvo, Krasnojarsk, Sverdlovsk...). En 1981 la 20 —25-an de aprilo ĉe tiu sekcio estis prezentitaj 24 prelegoj pri la temo; en 1984 (17 — 18.04) estis 18 prelegoj...

Similaj sekcioj estis organizitaj ankaŭ en kelkaj aliaj universitatoj kaj institutoj. Ankaŭ tie estis prezentataj sciencaj prelegoj:

- en Leningrada Tehnologa instituto dum la konferenco en 1984 (26.03.07.04) estis 7 prelegoj en la sekcio de la lingvo Esperanto;
- en najproksima Vladivostok en Orienta supera mariemego dum la konferenco 02.04.1984 - 09.04.1984 ĉe sekcio de internacia edukado kaj interlingvistiko estis prezentitaj 15 prelegoj;
- en Kieva konservatorio dum aprilo 1981 ĉe studenta scienca konferenco estis prezentitaj 3 prelegoj pri E-temoj;
- en Sverdlovsk la 30-an de aprilo 1983 ĉe sekcio pri interlingvistiko kaj esperantologio estis prezentitaj 10 prelegoj;
- en ŝtata universitato de Permĵ dum la konferenco la 3-an de aprilo 1985 estis okazigita 3-a Urala konferenco pri interlingvistiko kaj esperantologio, kie oni aŭskultis 6 prelegojn de esperantistoj el 4 urboj...

Tiun liston eblus daŭrigi, sed indus ĝin fini per ankoraŭ 4 menciindaj faktoj:

- 09.10.1983 - 10.10.1983 scienc-praktika konferenco en Tartu (Estonio) pri la temo "Sociaj kaj lingvaj aspektoj de nuntempa komunikado";
- 02.06.1984 - 03.06.1984 seminario "La mondo, scienco, Esperanto" en Domo de sciencistoj en Leningrado. Ĝin partoprenis 73 personoj el 5 rusiaj urboj kaj el Uzbekio, Latvio, Estonio. Estis prezentitaj 18 prelegoj
- Junie 1985 seminario pri la sama temo denove estis organizita en Leningrado;
- La 17-an de aprilo 1983 en Ĥailinn estis okazigita 3-a respublika scienca konferenco pri la temo "Teoriaj kaj metodikaj aspektoj de la E-instruado" Ĝin partoprenis esperantistoj el 14 urboj.

Menciindas ankaŭ defendoj de diplomverkoj kaj disertacioj pri E-temoj. Ĉi tie mi povas noti nur kelkajn el ili:

- Andreo Peĉonkin en 1983 defendis diplomverkon "Tipologio de signaj sistemoj en la angla lingvo kaj Esperanto" en Sverdlovskia ŝtata pedagogia instituto;
- Dina G. Lukjanec la 31-an de majo 1983 defendis disertacion "Lingvistika analizo de esprimrimedoj de poezia parolo (surbaze de Esperanto kaj la franca lingvoj)": la scienca gvidanto estis M.I. Isajev profesoro pri lingvoscienco;
- La 25-an de aprilo 1985 Boris G. Kolker defendis disertacion "Influo de la rusa lingvo al formado kaj evoluo de Esperanto" ankaŭ lia gvidanto estis profesoro M.I. Isajev;
- Junie 1986 D. Nabijeva defendis diplomverkon "Interlingvistiko kiel ero de lingvoscienco" en Azerbajĝana pedagogia instituto de la rusa lingvo kaj literaturo;
- Leonid N. Mjasnikov en 1889 defendis disertacion "Principoj de stango kaj evoluo de italeologio en Esperanto kaj en etnaj lingvoj" (Moskvo)

- Aleksandro S. Melnikov el Rostov/Don defendis en 1990 (en Minsk) disertacion "Principoj de konstruado kaj funkcia evoluo de internacia planlingvo en nuntempa interlingvistiko"²²



Dina Lukjanec (dua dekstre) post defendo de sia kandidata disertacio

Ankoraŭ dum SEJM-ekzisto en Estonio Aŭgusto Kilk estis unu el iniciatintoj de naturdefendaj E-aranĝoj "Esperanto kaj naturo", dum kiuj estis populare prezentataj prelegoj pri tiu temo, organizataj laboroj pri medipurigo...

Dum ASE-periodo tiuj aranĝoj estis same kelkfoje organizitaj. En 1981 (ekde la 20-a ĝis la 25-a de julio) okazis jam 11-a tia renkontiĝo, en 1982 — la 12-a, en 1983 — la 13-a, en 1984 — la 14-a.

²² Referaĵoj de la sciencaj disertaĵoj estas notitaj laŭ la libro de A.S. Melnikov "Portreto de ideo kun strangujoj anstataŭ fono — aŭ la lingvo de doktoro Esperanto" (ruslingve) Rostov-na-Donu: eldonejo de Rostova ŝtata pedagogia instituto, 1997, p. 131

Kelkvorte pri faklibroj. La komisionestro en sia raporto indikis, ke kelkaj aktivuloj de la komisiono laboras pri diversdirektaj fakvortaroj kaj aliaj fakverkoj. Ĉi tie eblas noti, ke pluraj el ili estis finitaj:

- J.P. Kivajev finpreparis por eldono Esperanto-rusan kaj rus-esperantan medicinan vortaron. Pri tio eĉ informis ruslingva "Medicina gazeto" 16.01.1985;
- En la ŝtata universitato de Tartu (Estonio) laboras mondĉamaj esperantistoj-sciencistoj — akademiano Paul Ariste kaj profesoro Aleksandr Duŝenko. Ĉefe dank' al iliaj klopodoj kaj agado kaj surbaze de multfojaj sciencaj konferencoj pri lingvistikaj problemoj aperis kelkaj volumoj de "Interlinguistica Tartuensis":
 - volumo 1 — "Aktualnye problemy sovremennoj interlingvistiki" ("Aktualaj problemoj de nuntempa interlingvistiko"), 1982;
 - volumo 2 — "Teoria i istorija mejdunarodnogo jazyka" ("Teorio kaj historio de internacia lingvo"), 1983;
 - volumo 3 — "Istorija i sovremennoje sostojanije interlingvistiki" ("Historio kaj nuntempa stato de interlingvistiko"), 1984;
 - volumo 4 — "Voprosy obŝcej i ĉastnoj interlingvistiki" ("Demandoj de ĝenerala kaj speciala interlingvistiko"), 1987;
 - volumo 5 — "Interlingvistiĉeskaja teorija i praktika mejdunarodnogo vspomogatel'nogo jazyka" ("Interlingvistika teorio kaj praktiko de internacia helplingvo"), 1988;
 - volumo 6 — "Obŝĉaja interlingvistika i planovyje jazyki" ("Ĝenerala interlingvistiko kaj planlingvoj"), 1989;
 - volumo 7 — "Interlingvistiĉeskoje konstruivovanie i jazykovyje reformy" ("Interlingvistika konstruado kaj lingvaj reformoj"), 1990⁶⁵;
- En Duŝanbe estis presita unu el volumoj de "Geologio internacia" — volumo 6, 1987;
- En Taŝkento estis preparita kaj eldonita "Estona-Esperanto-rusa naturprotektanta vortaro", kompilita de J. Eilart kaj F. Eisen kaj redaktita de J. Ojalo, 1985;
- M.T. Popov (Berdjansk) preparis broŝuron "Pri karboksilo, karboksaco kaj karboksato", kiu estis eldonita, Gundelfingen, 1986;
- Valerija P. Cvetkova (Leningrado) kelkajn jarojn laboris pri E-literaturo, kiu estas en bibliotekoj de diversaj urboj de la lando. En 1987 en Harkiv estis eldonita libro "Katalogo de E-literaturo en bibliotekoj de USSR", kiun finpreparis kaj suprajgis Tradukista sekcio ĉe URF ASE;
- Leonid G. Kapustin (Gor'kij) iniciatis kaj multajn jarojn laboris pri la projekto ellabori oftecan Esperanto-rusan vortaron. Al la jaro 1984 estis jam analizitaj plurmiloj da vortoj kaj ties uzoj (laŭ informoj L. Berce el Cesis, Latvio analizis pli ol 10 mil uzojn de vortoj, preparinte tutan sliparon; Tatjana Koptjagina el Miass kaj F. Faizova el Satka — po 8 mil; entute la laboron partoprenis esperantistoj el 40 diversaj loĝlokoj de USSR). Al la jaro 1986 la laboro estis finata. Jen kion eblas legi en anonco de la laborestro Leonid G. Kapustin:

⁶⁵ Du lastaj volumoj (6 kaj 7) aperis jam dum SEU-ekzisto.

- En 1970-1986 sovetaj esperantistoj analizis milionon da vortoj kaj ties uzoj por kompili oftecan Esperanto-rusan vortaron "La tuta analizita materialo estas en 11 kartotekoj kaj 9 vortaroj. Por enkomputiligi ĉion estas bezonataj proksimume 1000 horoj da komputista laboro. Pro tio ni turnas nin al ĉiuj, havantaj obsolecan kaj deziron helpi pri tiu laboro, skribi al Leonid G. Kapustin, 803024, Gor'kiĵ, ul. Nevzorovyĵ, N 72, kv. 7^{ma}."

Memkompreneble tiu listo estas ne plena (ekz., mi scias, ke Bronislav Ĉupin el Kemerovo laboris pri kompilado de konstruista fakvortaro. Dum unu el BET-oj li raportis pri tiu ĉi verko. Sed kiun sorton ĝi havas nun?)

iom pri Anatolo J. Gonĉarov:

"Jen estas konata amik' Anatolo.

Li SEJM-on donavis al verda popolo "

Tiu ĉi dulinia teksto el populara kanto de M. Bronŝtejn respegulas vere, ke ĝuste Anatolo estas unu el la personoj, kiuj fondis SEJM-on.

Lerninte en unu el Odesaj institutoj (laŭ specialeco li estas kemiisto, kandidato de kemiaj sciencoj), li poste translokiĝis en Barnaulon, kie instruis en altlernejo.

Kune kun V.V. Samodaj en 1958 li finis elementan kurson de Esperanto ĉe A.I. Verŝinin kaj arde eklaboris en E-movado de nia lando. Verŝajne ne estos eraro esprimi la opinion, ke li estas ĉeforganizinto de SEJM, ties animo kaj senjaca multjara laboranto; ĉeforganizinto de SEJT-10 kaj OrSEJT-20 en Altaja provinco.

Dum lastaj jaroj de SEJM estis estro de scienc-teknika fakso. Dediĉe al la 10-jara jubileo de SEJM li estis honorigita per titolo "Honora Aktivulo de SEJM"



A.J. Gonĉarov

La bildo pri laboro de la STK estus ne plena, se ne menciis aktivecojn de ankoraŭ du gravaj sciencistoj, fondintaj ankoraŭ du sekciojn.

Sciencisto-lingvisto, profesoro Sergeo N. Kuznecov, kiu lastajn jarojn okupiĝis pri demandoj de interlingvistiko, komence de 1986 iniciatis fondon de Lingvistika komisiono, kiu efektive laboris paralele al la STK kiel memstara komisiono. Pro tio indus ĝian laboron prilumi en aparta ĉapitro.

* Tiu ĉi citaĵo estas prenita el kutima privateletero, siatempe sendita de L. G. Kapustin

Ankaŭ la alia subkomisiono (sekcio) — la ekologia ne estis fondita samtempe kun la ASE-apero, kvankam kelkaj sovetiaj esperantistoj delonge kaj aktive okupiĝis pri tiel nomata “verda movado”, alivorte — pri la naturdefendo. Eble, la iniciaton de tiu movado en la lando faris siatempe ankoraŭ David L. Armand, plurfoje kaj diversloke preleginte pri naturdefenda temoj. Poste la renkontiĝo “Esperanto kaj naturo”, regule organizata ĉefe de Aŭgusto Kilk, plene respondis al la taskoj kaj celoj de tiu “verda movado”.

Vere estonaj esperantistoj plej aktive okupiĝis pri tiu ĉi agaddirekto en la E-laboro. Ekde 1970 ĝis 1988 en tiu respubliko okazis 18 renkontiĝoj “Esperanto kaj naturo”, dufoje estis eldonita naturdefenda estona-Esperanto-rusa terminologia vortaro (en la unua eldono estis 90 terminoj, en la dua — 157); regule estis okazigataj ekspozicioj de esperantlingva naturdefenda literaturo; en 1980 ĉe Tallinna E-klubo estis fondita ekologia sekcio kaj jam en 1982 — organizita scienc-praktika konferenco “Problemoj de ekologio kaj naturdefendo en la nuntempa mondo”.

En Ukrainio pri ekologia laboro plej aktivis E-klubo de Ternopil kaj ĉefe ties membro Igorj Puŝkarj. En 1982 — 1985 la klubo iniciatis kaj okazigis kelkajn naturdefendajn ekspediciojn laŭ la rivero Dnestr kaj ties flankriveroj⁶⁷. En la jaro 1986 tian ekspedicion “Dnestr-86” partoprenis esperantistoj ne nur el Ukrainio, sed ankaŭ el Moskvo, Ivanovo kaj aliaj urboj, farinte tiel la ekspedicion tutsovetia. En ĝi partoprenis pli ol 200 personoj el 30 urboj de kvin respublikoj. Ankaŭ en 1987 okazis vica ekspedicio “Dnestr-87”, dum kiu estis efektivigita ankaŭ ĵurnalista stafeto, kiun organizis Unio de ĵurnalistoj kaj televidstudio de Moldavio.

La ekologia sekcio de la STK estis fondita en 1987. Ĝia gvidanto Leo Medvedev aktive laboris en Moskva scienca E-

⁶⁷ Se rigardi la revuon “Juna amiko” N 1 (84)/1998, en ĝi sur p.p. 6-7 eblas legi artikolon “Ekspedicio “Dnestro-97” pri okazigita jam 11-an fojon ekspedicio (malgraŭ neaktiva agado de ASE mem).

klubo. Krom la ekspedicioj, similaj al la Dnestraj, celoj de la sekcio estis:

- okazigo de seminarioj pri la temo;
- organizo de naturdefendaj laborbrigadoj;
- preparo kaj eldono de ekologia literaturo en Esperanto;
- ellaboro de terminologiaj vortaroj pri la temo k.s.

Estis iniciatita kaj poste okazigita internaciskale la Unua ekologia sabatlaboro, en kiu partoprenis pli ol 10000 personoj (ne nur esperantistoj) en 18 urboj de la lando. En 1988 okazis jam la dua sabatlaboro, kiu estis organizita jam ne nur en nia lando, sed samtempe en Aŭstralio, Bulgario, Hungario, Madagaskaro, Pollando kaj kelkaj aliaj landoj. Pri tiuj iniciatoj plurfoje estis diversaj sciigoj en gazetoj, ĵurnaloj, 2-foje okazis televid-elsendo.

Ŝajnas, jam tiuj aktivecoj bone ilustras la pozitivan agadon de la sekcio enkadre de la STK de ASE. Kompreneble, ke multe meritas pri tio la sekciestro:

Medvedev Lev Vladimirovič (1948-01.01 —). Esperantistiĝis en 1966. Instruistoj:— V.V. Samodaj, N.F. Danovskij, B.V. Tokarev.

En 1970 finis Moskvan Ŝtatan Universitaton, en 1984 defendis kandidatan disertacion pri biologiaj sciencoj, en 1991 iĝis post la defendo doktoro de natursciencoj ĉe AIS kaj docento laŭ ties Morfologia Scienca sektoro.

Ekde aŭtuno 1967 ekaktivis kiel esperantisto post la unua por li BET (en Kaltanenaj, 1967).

Oni elektis lin kiel prezidanto de E-societo ĉe Moskva Ŝtata Universitato (1968 — 1970), inter 1972 kaj 1975 estis sekretario de Moskva Internacia E-klubo.

En 1973 estis kreita E-familio kun Ludmila Jegorova (nun — Medvedeva), kie E-o estis sola familia lingvo kaj la unua lingvo por la filino Nadeĵda.

Dum 1980 — 1990 (kun)gvidis Moskvan sciencajn E-klubon kaj eldonadis informleterojn (ĉ. 90 numeroj) en la rusa kaj E-o. Ties abonantoj (ĉ. 200 personoj) loĝis diversurbe kaj multaj el ili estis sciencistoj. Entute en la klubo membris ĉ. 60 — 90 moskvanoj (proksimume duono — kun sciencaj gradoj kaj titoloj) kaj ĉ. 100 korespondaj membroj.

En 1986 la klubo iniciatis Jubilean Programon honore al la 100-jariĝo de E-o; L. Medvedev sekretario.

Ĉefaj ĉaroj de la Programo dum 1986 — 1988:

- soci-ekologia ekspedicio "Dnestr-86" (kunlabore kun Igorj Puŝkarj el Ternopil, Ukrainio). La ekspedicio havis 3 laborlingvojn - la rusa, ukraina kaj Esperanto. Ĝin partoprenis dum 3 monatoj 200 personoj el 30 urboj de 5 respublikoj,

- la unua internacia Ekologia labortago en Moskvo (oktobro 1987). Ĝi pasis en Nacia parko "Iosinij Ostrov" kun gvid-organiza rolo de esperantistoj;

- kiel daŭrigo sekvis "Verda Ondo" en 1988, 1989, 1990.

En 1989 L. Medvedev reprezentis ASE en fondo de Soci-Ekologia Unio de USSR.

Dum UK en Brajton iniciatis Rusan AISesion kaj kun subteno de la Senato organizis ĝin en Moskvo kaj Sankt-Peterburgo en 1991/1992.

Kaj fine necesas menciigi, ke la 16-an de marto 1985 estro de la scien-teknika komisiono anstataŭ Anatolio J. Gonĉarov fariĝis profesoro N.I. Ĉistjakov, kiu tamen neniel montris siajn sperton kaj kapablojn en la organiza laboro.



L.V. Medvedev

LABORO DE LA LINGVISTIKA KOMISIONO DE ASE

"...celante ordigi faratajn en ASE laborojn pri la lingvo Esperanto ASE-Estraro la 17-an de januaro 1986 decidis fondi Lingvistikan Komisionon (LK) de ASE-Estraro, gvidatan de doktoro de filologiaj sciencoj S.N. Kuznecov"⁶⁶

Nun ni revenu al la lingvistika komisiono, pri kiu temis en la antaŭa ĉapitro.

Pri la taskoj de tiu ĉi komisiono kaj pri rimedoj kiel solvi la taskojn temas en la unua informletero de la komisiono:

⁶⁶ "Informbulteno" de ASE, N 1-2 (55-56)/1986, p. 4

Pri taskoj kaj programo de la Lingvistika Komisiono de la Estraro de ASE

Dum ASE-ekzisto evidentiĝis neceso de lingvistika bazo por la agado de sovetiaj esperantistoj. Dum uzado de Esperanto aperas teoriaj kaj praktikaj demandoj, kiuj stimulas ĉiutempe kreskantan intereson al interlingvistiko kaj esperantologio. Lastatempe surbaze de diversaj universitatoj kaj institutoj estas okazigataj konferencoj pri interlingvistiko (Tomsk, Samarkand, Sverdlovsk k.a.), dum E-tendaroj oni organizas "Somerajn universitatojn" kaj seminariojn pri esperantologiaj temoj, spontane aperas esplorgrupoj (pri E-historio, bibliografio k.s.). Tamen, foresto de inda koordinado kaj centralizo de la esploroj malaltigas ties teorian nivelon. ASE eidonas gravajn politikajn kaj informajn dokumentojn, kiuj prilumas la vivon de Soveta Unio. Tio influis al akumulo de konsiderinda sperto en la traduko de informaj tekstoj, kiu devas esti konsiderata kaj sistematigata por certigode sinsekveco en la traduko de terminoj de politika kaj alia enhavo. En tiu ĉi demando dume ne estas ellaborita kunordigita linio (kion montris diskuto, okazigita suprajge de la "Informbulteno" de ASE, pri esprimo en Esperanto de terminoj de administraj unuoj de USSR).

Ĝis nun mankas ankaŭ konstanta lingva kontrolo pri kvalito de publikigata lernomaterialo kaj beletraj verkoj en Esperanto. Altigo de lingva kulturo de esperantistoj antaŭvidas ankaŭ okazigon de lingva praktiko kun ellaboro de lingvistike motivitaj rekomendoj pri ĉefaj demandoj de Esperanto-gramatiko, esprimo de stiliaj nuancoj de naciaj lingvoj, prevento de tipaj eraroj. Tiusence estas sufiĉe pozitiva sperto (rubriko "Lingva konsultado" en la "Informbulteno").

Atentante ĉion supre esprimitan kaj por ordigo de farataj en ASE laboroj pri la lingvo Esperanto la ASE-Estraro la 17-an de januaro 1986 decidis fondi Lingvistikan Komisionon de ASE subgvide de doktoro de filologiaj sciencoj S.N. Kuznecov.

La taskoj de la Lingvistika Komisiono (LK) estas:

1. koordinado kaj planado de esperantologiaj esploroj, kiujn faras ASE-membroj, helpo okazigi esperantologiajn konferencojn kaj seminariojn surloke, okazigo de laboraj renkontiĝoj por LK-membroj;
2. ĝeneraligo de sperto en la traduka laboro de esperantistoj, preparo de leksikografiaj materialoj pri la lingvo Esperanto;
3. ĝeneraligo de praktiko de la lingva funkciado de Esperanto, preparo de rekomendoj pri supero de la lingvaj malfacilaĵoj, eltrovo de tipaj eraroj en la tekstoj de parolantoj kaj verkantoj;
4. preparo de esperantologiaj materialoj de sovetiaj aŭtoroj por publikigo en la landa kaj eksterlanda gazetaro (la demandoj pri la publikigo estos solvataj pere de ASE laŭ akceptita ordo);
5. partopreno en aranĝoj, dediĉitaj al la 100-jara jubileo de Esperanto en 1987.

Por plenumo de tiuj taskoj LK fondas jenajn laborgrupojn:

Leksikografia — por ellaboro de vortaraj sliparoj kaj kritika reviziado de nuntempe ekzistantaj vortaroj.

Perspektiva celo de la grupo — ellaboro de "Granda Esperanto-rusa vortaro" kaj "Granda rus-esperanta vortaro".

Historiografia — por koordinado de esploroj pri historio de Esperanto en USSR (kun engaĝo de E-veteranoj).

Perspektiva celo de la grupo — preparo de "Enlanda enciklopedio de Esperanto".

Bibliografia — por priskribo de interlingvistikaj eldonoj, ekzistantaj en bibliotekoj de USSR, kaj laboro pri aktuala bibliografia informado.

Perspektiva celo de la grupo — verkado de resuma bibliografia informlibro "Interlingvistikaj eldonoj en bibliotekoj de USSR".

Tradukista — por esperantigo (kun posta publikgigo) de interlingvistikaj laboroj de sovetiaj aŭtoroj.

Perspektiva celo de la grupo — verkado de antologio "Nuntempa sovetia interlingvistiko".

LK-membro povas esti ĉiu esperantisto, kiu plenumas konkretan laboron laŭ la plano de la LK kaj konstante raportas pri ties plenumo.

Konstantan gvidadon de la laborgrupoj efektivas ties sekretarioj. La koordinon de la LK-agado efektivas sekretario de la komisiono. Familinomoj kaj adresoj de la sekretarioj estos publikigitaj en sekvaj informleteroj.

Dezirantoj partopreni LK-agadon estas petataj plenigi la aldonatan registrkarteton kaj sendi ĝin kun proponoj pri LK-laboro laŭ adreso:

103888, MOSKVO, pr. Kalinina, 14, ASE,
al prezidanto de la LK Kuznecov S.N."

Kiel videblas el tiu unua informletero, perspektivoj de la laboro estis grandaj, sed bedaŭrinde ne tiom efektiviĝis. La komisionestro mem Sergeo N. Kuznecov multe laboris (kaj laboras ankaŭ nun) pri ĉiuj ĉi agadirektoj. Rezulte en 1991 (jam post ASE) aperis ruslingva libro "Problemoj de internacia helplingvo", en kiu per artikoloj kontribuis, krom S.N. Kuznecov, ankaŭ M.I. Isajev, A.D. Duliĉenko, J. Ojalo, D.G. Lukjanec, B.V. Tokarev kaj aliaj. Estas domaĝe, ke nun tiu laboro ne prosperas.

PARTIA GRUPO EN ASE KAJ TIES FUNKCIADO

"Restas aktualaj la ĉefaj partiaj taskoj pri disvolvo kaj plifirmigo de la socialismo, ĝia laŭplana kaj diversfanka perfektigo, la plua antaŭeniro de la sovetia socio al la komunismo..."⁶⁹

Estas iom ne kutime, sed la partia grupo en ASE fondiĝis nur fine de ASE-ekzisto, sed ne jam dum la FK — tio okazis septembre 1988 dum la Estrarkunsido de ASE en Moskvo. Gvidado de la partia grupo estis elektita Anatolij B.

⁶⁹ M. Gorbaĉov "Politika raporto de la Centra Komitato de KPSU al la 27-a Kongreso de partio", Moskvo, "APN", 1986, p. 107.

Kazakov (Moskvo). Evidente, le ĉefa celo de la grupo estis ĉiuspeca kunagado kun KEK, post la aliĝo al tiu internacia organizajo.

Estraranoj de ASE positive decidis la demandon pri aliĝo de Sovetia partia grupo al KEK (nur du personoj kontraŭis tiun decidon — G. Korotkeviĉ kaj N. Zubkov). Tamen, la demando pri oficiala aliĝo al KEK estis prokrastita ĝis la 3-a raport-reelekta ASE-Konferenco (oni planis prepari materialojn, pruvantajn utilon de KEK al Sovetia E-movado, kaj prezenti tiujn materialojn al ASE-Prezidio antaŭ la Konferenco).

Tiu ĉi 3-a ASE-Konferenco efektive estis la aranĝo, dum kiu "feliĉe forpasis" ASE kaj estie refunkciigita SEU. Do, la partia grupo ekzistis de-fakte nur 4 monatojn kaj neniel povis sin prezenti. Nur unusola informletero de la partigrupestro estis naskita dum tiuj monatoj kaj nenio plu.

Restas vera enigmo, ĉu pozitivus la momento, ke la partigrupo ekzistis nur 4 monatojn, aŭ ĝi povus tamen doni ion utilan al la landa E-movado.

AGADO DE LENINGRADA FILIO DE ASE

"En la gitara, solkanta koncerto de Mikaelo Bronŝtejn ni aŭdis finnan kanton pri aŭtuno, baladon, kanzonon franceskan pri Johana d'Arko, kabaret-kanzonon movadan..."⁷⁰

Leningrado⁷¹ estis unika urbo por Sovetio. Ĝin en 1703 fondis la rusa caro Petro la Unua kaj tuj ĝi fariĝis la ĉefurbo de Rusio kaj estis tia ĝis la revolucio en 1917. Post la revolucio la ĉefurbo de la lando denove fariĝis Moskvo, sed signifo de Leningrado por Rusio (Sovetio) estis tre granda.

Ankaŭ de E-vidpunkto la urbo havas plurajn meritojn.

⁷⁰ "Esperanto" N 9 (1073)/septembro 1995, p. 153.

⁷¹ La origina nomo de la urbo estas *Sankt-Peterburgo*, poste oni nomis ĝin — *Petrogrado* (inter 1914 kaj 1924) kaj *Leningrado* (ekde 1924 ĝis 1991); nun la urbo denove nomiĝas *Sankt-Peterburgo*.

Ĝi estas urbo, kie aperis unu el la unuaj E-kolektivoj en la mondo — la societo “Espero”⁷²; en Peterburgo okazis unua literatura konkurso en 1896⁷³; A. Postnikov organizis la unuan E-unuiĝon en Rusio — “Ruslanda Ligo Esperantista” (1909) kaj la Unuan Rusan E-Kongreson en 1910. En Peterburgo komencis aperadi la unua E-periodaĵo en nia lando — “Ruslanda Esperantisto” (en 1905).

En 1921 en Petrogrado okazis ankaŭ la 3-a Tutrusia Kongreso de Esperantistoj, dum kiu estis fondita SEU; kaj en 1926 tiu urbo estis la urbo de la 6-a SAT-Kongreso⁷⁴...

Evidente tio influis ankaŭ, ke ĝuste en Leningrado aperis la unua ASE-filio.



Dum ripozo en Tihvin, 1979. De dekstre: S.N. Podkaminer, B.N. Stefanov (sidantaj) kaj V.K. Gornov (staranta)

⁷² Laŭ libro de Zakrzewski “Historio de Esperanto” la societo estis fondita en 1891, sed solena malfermo okazis 24.03.1892; B. Stefanov en artikolo en “Informbulteno” de ASE (N 10-11 (26-27)/1982, p. 23) notas alian daton de la malfermo - 17.05.1892. Estas ankaŭ interese ke en 1918 gvidintoj de “Espero” estis E. Drezen kaj V. Devjatnin.

⁷³ “Enciklopedio de Esperanto” represo de la unua eldono, Budapesto, HEA, 1979, p. 551.

⁷⁴ 70 jarojn poste, en 1996, en la urbo, kiu denove nomiĝas Sankt-Peterburgo, okazis jam la 69-a SAT-Kongreso. Pri la Kongreso en 1926 estas aperigitaj materialoj en “Senanciulo” N 6 (1092)/1996, p. 63-65 kaj pri la Kongreso en 1996 — “Senanciulo” N 8-9 (1094-5)/1996, p. 87-88..

* * *

La Fonda Konferenco de la Leningrada filio de ASE okazis la 28-an de junio 1979. Ĝin partoprenis ĉ. 80 esperantistoj el Leningrad, Tiĥvin kaj Vsevolojnsk.

Antaŭ ĝi estis efektivigita sufiĉe granda preparlaboro, la lasta kunsido de la Organiza Komitato okazis la 26-an de junio, du tagojn antaŭ la Fonda Konferenco. Dum la Konferenco estis elektita Estraro el 15 personoj⁷⁵.

La 1-a kunsido de la Estraro solvis demandojn pri distribuo de postenoj, rezulte:

1. Podkaminer Semjon Naumoviĉ — honora prezidanto de la filio;
2. Stefanov Boris Nikolajeviĉ — prezidanto de la filio;
3. Kovygin Gennadij Fjodoroviĉ — vicprezidanto (organiza laboro);
4. Kolesnikov Oleg Lvoviĉ — junulara agado;
5. Dobroserdov Igorj Andrejeviĉ — junulara agado;
6. Kameŝkov Boris Nikolajeviĉ — informa kaj propaganda agado;
7. Volkov Vjaĉeslav Vladimiroviĉ — respondeca sekretario;
8. Cvetkova Valerija Petrovna — respondeca vicsekretario (helpanto);
9. Bronŝtejn Moisej Caleviĉ — membro de la Estraro;
10. Dymnikov Aleksandr Dmitrijeviĉ — membro de la Estraro;
11. Korostyŝevskij Samuil Jakovleviĉ — membro de la Estraro;
12. Kuzin Viktor Aleksandroviĉ — membro de la Estraro;
13. Medvedeva Serafima Nikolajevna — membro de la Estraro;
14. Mitjurev Ivan Vasiljeviĉ — membro de la Estraro;
15. Skorobogatov Viktor Olegoviĉ — membro de la Estraro;
16. Verbickij Miĥail Ivanoviĉ — membro de la Estraro.

⁷⁵ En la prezentata ĉi sube listo de tiuj personoj estas menciitaj 16. Evidente, la Honora Prezidanto estas eksternumbra.

Dank' al Valerija Cvetkova, kiu plenumis sekretarian laboron (almenaŭ dum la komenca periodo), estis konservitaj malnetaĵoj de protokoloj de Estrar- kaj Prezidikunsidoj, el kiuj eblas ĉerpri sciigojn — pri kio okupiĝis esperantistoj de Leningrado kaj la provinco, kiujn agaddirektojn en la laboro ili havis, kiel aktivis... Fakte, ankaŭ sen tio ni povus juĝi pri la laboro, ĉar multo estis farata kun sciigoj tra nia E-mondo (enlanda). Sed el la paperoj ni trovis interesajn notojn pri partopreno de Estraranoj kaj Prezidianoj en la kunsidoj, kiuj okazadis pli-malpli regule. Dum la komenca periodo estis jenaj kunsidoj:

PREZIDIKUNSIDOJ DE LENINGRADA ASE-FILIO DUM LA KOMENCA PERIODO

N 1 — 28.06.1979;	N 10 — 07.02.1980;	N 18 — 22.01.1981;
N 2 — 03.07.1979;	N ? — 13.03.1980;	N 23 — 04.06.1981;
N 3 — 23.07.1979;	N 11 — 10.04.1980;	N 24 — 01.10.1981;
N 4 — 26.07.1979;	N 12 — 15.05.1980;	N 25 — 24.11.1981;
N 5 — 06.09.1979;	N 13 — 05.06.1980;	N 26 — 04.02.1982;
N 6 — 11.10.1979;	N 14 — 03.07.1980;	N 27 — 04.03.1982;
N 7 — 01.11.1979;	N 15 — 17.09.1980;	N ? — 10.05.1982...
N 8 — 06.12.1979;	N 16 — 16.10.1980;	
N 9 — 10.01.1980;	N 17 — 04.12.1980;	

Bedaŭrinde, ankaŭ tiu bildo de la okazigitaj kunsidoj havas, eble, malĝustaĵojn. Sed almenaŭ ian imagon pri ili ni povas havi.

La 2-a Konferenco de la filio okazis 15.05.1982. Nova Estraro konsistis el 17 personoj. Kiel Prezidanto de la filio denove estis elektita Boris Nikolajeviĉ Stefanov.

Sur la sekvaj paĝoj ni prezentas tabelon, kiel partoprenis la kunsidojn Estraranoj (Prezidianoj) de la filio. El ĝi estos videble, ke leningradaj esperantistoj ne ignoris la kunsidojn, sed aktive ilin partoprenis. Kaj same kiel en ASE mem, funkciuloj tute ne strebis aktivi.

La ĉefaj agaddirektoj en la laboro de la filio estis — la scienc-teknika, la propaganda (informa), la instru-metodika kaj la kultura.

Tabelo de partopreno en Estrar-kaj Prezidikunsidoj de Leningrada filio de ASE (komenca periodo)

	1979							1980						
	N 3	N 4	N 5	N 6	N 7	N 8	N 9	N 10	N 11	N 12	N 14			
	23.07	26.07	06.09	11.10	01.11	06.12	10.01	07.02	13.03	10.04	15.05	03.07		
A. Estraranoj:														
1. Bronŝtejn M.C.	—	—	+	+	—	—	—	—	+	—	—	—		
2. Cvetkova V.P.	+	+	+	+	+	+	+	+	+	+	+	+		
3. Dymnikov A.D.	—	—	—	+	—	+	+	+	—	—	+	—		
4. Dobroserdov I.A.	—	—	—	—	—	—	—	—	—	—	—	—		
5. Kameŝkov B.N.	?	+	+	+	+	+	+	+	+	+	?	+		
6. Kolesnikov O.L.	—	—	—	—	—	—	—	—	—	—	—	—		
7. Korostjĥevskij S.I.	—	—	—	+	—	—	+	—	—	+	—	—		
8. Kovygin G.F.	+	+	+	+	+	+	+	+	—	+	+	+		
9. Kuzin V.A.	—	—	—	—	—	—	—	—	—	—	—	—		
10. Medvedeva S.N.	—	—	—	+	+	—	+	—	—	+	+	+		
11. Mitjurev I.V.	—	—	—	—	—	—	—	—	—	—	—	—		

	1979										1980			
	N3	N4	N5	N6	N7	N8	N9	N10	N?	N11	N12	N14		
	23.07	26.07	06.09	11.10	01.11	06.12	10.01	07.02	13.03	10.04	15.05	03.07		
12. Podkaminer S.N.	+	+	+	+	+	+	+	+	+	+	?	+		
13. Skorobogatov V.O.	-	-	+	+	-	-	-	-	-	-	-	-		
14. Stefanov B.N.	?	+	+	+	+	+	+	+	+	+	+	+		
15. Verbitskij M.I.	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	+		
16. Volkov V.V.	+	+	+	+	-	+	-	+	-	-	+	+		
B. Invittitaj:														
1. Abojskaja M.S.	-	-	+	-	-	+	-	-	+	+	-	-		
2. Ande	-	-	+	-	-	-	-	-	-	-	-	-		
3. Belova	-	-	+	-	-	-	-	-	-	-	-	-		
4. Ĉerkasova	-	-	+	-	-	-	-	-	-	-	-	-		
5. Gagina	-	-	+	-	-	-	-	-	-	-	-	-		
6. Greckij	-	-	-	-	-	-	-	+	-	-	-	-		
7. Grindband	-	-	+	-	-	-	-	-	-	-	-	-		
8. Iljin	-	-	+	-	-	-	-	-	-	-	-	-		

	1979							1980						
	N 3	N 4	N 5	N 6	N 7	N 8	N 9	N 10	N 11	N 12	N 14			
	23.07	26.07	06.09	11.10	01.11	06.12	10.01	07.02	10.04	15.05	03.07			
9. Jakovlev	—	—	+	—	—	—	—	+	—	—	—			
10. Koršneva	—	—	+	—	+	—	—	—	—	—	—			
11. Motov	—	—	—	+	—	—	—	—	—	—	—			
12. Novojilov	—	—	+	—	—	—	—	—	—	—	—			
13. Popkov	—	—	—	—	+	—	—	—	—	—	—			
14. Simakova V.I.	—	—	+	—	+	—	—	—	—	—	—			

- La donitaĵoj povas havi lajn maĝustajojn, ĉar ne ĉiuj protokoloj (pli ĝuste — protokolaj mainetaĵoj) havas klarajn notojn pri la partopreno de lokaj esperantistoj en la Estar- kaj Prezidikunsidoj. Ne estas eĉ notitaj ĉiuj komencoliteroj de la antaŭnomoj.

Pri la scienc-teknika laboro — ĝin gvidis profesoro pri fizik-matematikaj sciencoj G.S. Cejtin (eble ne de la komenca periodo kaj ne ĝis la fina). Mi ne povas juĝi pri li kiel pri organizanto, sed la sekcio laboris sufiĉe fruktodone. Tion oni povas vidi el oftaj publikaĵoj en "Informbulteno" de ASE, el la jam notitaj pli supre protokoloj de la kunsidoj (ofte la demandoj por la pridiskuto estis ĝuste pri la scienc-teknika laboro)... Mi povas supozi, ke tiu aktiva agado de la scienc-teknika komisiono estis ankaŭ dank' al tio, ke pluraj membroj de la Estraro (kaj S.N. Podkaminer, kaj B.N. Kameškov, kaj B.N. Stefanov, kaj G.F. Kovygin, kaj aliaj) estis sciencistoj, havantaj sciencan gradon "kandidato" aŭ "doktoro" de iuj sciencoj.

Tuj post la fondo de la filio estis organizita vasta informa laboro pri problemoj de lingvistiko-interlingvistiko kaj pri esperantologio. La tutan aron da prelegoj oni faris dum 6 monatoj (poste estis metita demando pri trimonata lekciado, sed ne klaras, ĉu la demando estis solvita). La grupo de prelegantoj estis kompilita el la spertuloj — ĝin eniris S.N. Podkaminer, B.N. Kameškov, B.N. Stefanov, M.S. Abolskaja, V.P. Cvetkova. Poste al tiu grupo estis aligitaj aliaj leningradaj esperantistoj. 13.03.1980 estis resumitaj la prelegoj, kiuj okazis dum aŭtuno 1979 — printempo 1980. Entute okazis 13 prelegoj, kiujn vizitadis proksimume 150 personoj (la halo estis por proksimume 250 personoj); pri la prelegoj estis konstantaj informoj per afiŝoj, anoncoj per radio...

La 02 — 03-an de junio 1984 la scienc-teknika kaj MEM-sekcioj de la Leningrada ASE-filio kune kun E-klubo "Amikeco" ĉe Domo de sciencistoj organizis seminarion "Mondo, scienco, Esperanto" por pli vasta propagando de la lingvo inter sciencistoj. Al ĝi venis 73 partoprenintoj, kiuj aŭskultis 18 prelegojn pri diversaj temoj (la prelegintoj estis reprezentantoj el Moskvo, Leningrado, Taŝkento, Tallinn, Novosibirsk, Samarkand). Rezulte de la seminario estis akceptita decido okazigadi similajn aranĝojn ĉiujare.

Ankoraŭ unu aktiva agadirekto de la filio estis la kultura. Precipe meritas mencion la unua, eble, en la lando profesia E-teatro⁷⁶.

La Leningrada E-teatro estis fondita decembre 1978. En la repertuaro de la teatro estis spektakloj laŭ poeziaĵoj de J. Liiv (Estonio), "Ni estas ei Gabrovo" (humuraĵoj laŭ bulgaraj kurtaj ŝercaj rakontoj), "Hamleto" de Ŝekspiro, "Trosaligis" de A. Ĉeĥov k.a.

Marte 1982 la Leningrada E-teatro partoprenis Budapeŝtan Printempan Festivalon — renkontiĝon de E-teatroj. Por ili tio estis la unua vojaĝo eksterlanden.

La teatro vizitis la urbojn Vilnius, Tallinn, Tartu, Tiĥvin. Tie ili faris prezentadojn por lokaj esperantistoj.

Aktoroj de la teatro Oleg Popkov, Nikolaj Lavrov, Raŝid Ĥajrullin, Genadij Rudenko; reĝisoro: Aleksandr Iovlev.

Menciindas agado de E-klubo de nevidantaj esperantistoj "Amikaro". Unu el fondintoj de la klubo⁷⁷ estas Miĥail Ivanoviĉ Verbickij. Januare 1984 okazis solena kunsido de la klubo, dediĉita al la 80-jara jubileo de M.I. Verbickij.

Mem M.I. Verbickij blindiĝis, estante 14-jara knabo; esperantistiĝis en 20-aj jaroj, laŭprofesie li estas muzikisto, instruisto de nota legoscio, ofte *prelegadis pri diversaj temoj*. Post fondo de la klubo "Amikaro" li estis ties unua prezidanto, pli poste — honora prezidanto.

Menciindas ankoraŭ ĥora ensemblo "Eterna muziko", kies repertuaron povis aŭskulti multaj esperantistoj de nia kaj aliaj landoj, ĉar ĝi kelkfoje partoprenis internaciajn E-aranĝojn⁷⁸; kaj leningrada esperantistino T.S. Andrejeva, kiu verkis multajn originalajn rakontojn, partoprenante diversajn literaturajn konkursojn.

Kaj estas nepre menciinda konstante aktiva agado de E-familio Cvetkova.

⁷⁶ Kompreneble, temas pri la postmilita periodo, ĉar estas bone konate, ke la unua teatra prezentado okazis en Smolensko 27.09.1896.

⁷⁷ La klubo de nevidantaj esperantistoj "Amikaro" estis fondita fine de 1979, 26.10.1984 okazis kunsido, dediĉita al la 5-jara jubileo de la klubo.

⁷⁸ En 1989 Leningrada filio de landa firmao "Melodija" aperigis grandformatan diskon "Eterna muziko".

Jen kion skribis pri Cvetkova Varvara Petrovna en unu el siaj artikoloj "Ruslanda Esperantisto"¹⁹:



Varvara Petrovna Cvetkova

de majo en la malproksimega 1910-a jaro en Peterburgo -- tiama ĉefurbo de Ruslando. La malfacila infareco kaj juneco (ŝin tro konkrete tuŝis la teruroj de la interna milito en Peterburgo kaj Ukrainio) ne forprenis ŝian entuziasmon. Kaj en 1928 ŝi eklernis Esperanton, kiu fariĝis nedisigebla parto de ŝia vivo.

Multajn profesiojn ŝi provis (purigisto, produktaj-kontrolisto, majstro) ĝis ricevi prientristan diplomon en 1940. En la tempo de la naŭcent-taga sieĝo ŝi laboris en Peterburgo²⁰ kiel vartistino (kaj tial ŝi ricevadis laboristan, ne oficistan manĝokarton).

Post la renaskiĝo de Esperanto ŝi revenis al aktiva esperantista vivo: kune kun la filino (kompreneble, ankaŭ tiu iĝis aktiva esperantistino), gvidis ekskursojn, akceptis gastojn kaj ĉiel helpis al aliurbaj esperantistoj. Jam sesdekjara Barbara Cvetkova la unuan fojon sukcesis partopreni Universalan Kongreson en Vieno dank' al invito de sia unua korespondamiko el Aŭstrio, mirakle rekontaktinta ŝin post tiom da jaroj.

Malgraŭ la estiminda aĝo, onklino Barbara ne forlasas Esperanton. Eĉ pli: ŝi reprezentis Peterburgon en la pasintjara [1994] Ruslanda Esperantista Kongreso en Nijnij Novgorod. En 1995 la Komitato de UEA elektis ŝin Honora Membro de UEA.

Varvara Cvetkova forpasis en 1999.*

"En nia Esperantujo ekzistas homoj, kiuj ne prezidas asociojn kaj klubojn, ne verkas librojn, eĉ ne redaktas gazetojn, sed ili ĝuas amon de la esperantistoj pro la granda animo, komprenemo kaj helpemo. Ĝuste tial, kiam ni rememoras pri Peterburgo, ni tuj pensas pri Varvara Petrovna Cvetkova -- nia onklino Barbara.

Oni povas kredi aŭ ne kredi, sed ĉi-maje [1995] ŝi havas 85-an naskiĝdatrevenon. Jes, Barbara Cvetkova naskiĝis la 4-an

¹⁹ "Ruslanda Esperantisto" N 5(47)/1995

²⁰ Fakte tatempe la urbo nomiĝis Leningrado

Cvetkova Valerija Petrovna, filino de Varvara Petrovna (naskiĝis 28.07.1936), leningradano, emerito (eksa bibliotekistino); esperantistiĝis en 1956, membro de tiama E-grupo "Aŭroro".

De 1961 aktive partoprenas multnombrajn E-tendarojn kaj renkontiĝojn en nia lando (BET-oj, SEJT-oj, Konferencoj ...) kaj eksterlande (Internacia Junulara E-seminario en Bulgario — 1964, 22-a TEJO-Kongreso en Hungario — 1966...).

En SEJM aktivis kiel fakestro --- gvidis bibliografian fakon; laboris pri kompilado de Katalogo de libroj pri kaj en Esperanto⁸¹.

instruas Esperanton ĉe elementaj kursoj; en 1979 finlernis instruistan kurson en Burgas (Bulgario).

Estrarano de Leningrada filio de ASE (1979 — 1989).



Valerija Cvetkova dum jubilea vespero, dediĉita al la 80-jariĝo de S.N. Podkaminer

Mi tre bedaŭras, ke ne sukcesis trovi kaj prezenti materialojn pri la agado de la filio dum la lastaj jaroj de ASE (ankaŭ pri la reelekta konferenco, dum kiu kiel prezidanto estis elektita V. Gromov, malgraŭ rezisto de oficialuloj)⁸².

⁸¹ La libro "Katalogo de E-literaturo en biblioteko de JSSR" (dono (multoblige) en 1987 en Ĥarkiv).

⁸² Vidu "Informbulleteno" de ASE N 5-6 (63-64) 1987, p. 16 kaj N 3 (69) 1988, p. 5.

AGADO DE ARMENA RESPUBLIKA FILIO DE ASE

*"Ĉu vi ne aŭdas, ĉu vi ne scias?
Jen fenomeno en nia medio --
En Esperanto manifestacias
Sian programon Armena radio" ⁸⁴.*

Se paroli pri Armena respublika filio de ASE, eblas esprimi miron, ke ĝi estis fondita. Ja laŭ la statuto ASE-filion oni povas fondi, se ekzistas ne malpli ol 5 E-kolektivoj⁸⁴. Sed en la tuta Armenio ekzistis nur 4 E-klubo, ĉiuj en la ĉefurbo — Erevan (v. la liston en la suplementa parto).

Evidente, tio estas mia supozo, la filio estis fondita dank' al eminenta armena esperantisto Gurgen G. Sevak.

SEVAK (Grigorjan) Gurgen Grigorjeviĉ naskiĝis 15.04.1904 en Tbiliso (Kartvelio) en familio de laboristoj; specialisto pri armena lingvo — tridek jarojn li gvidis katedron de la armena lingvo en Erevana universitato. De la jaro 1971 — akademiano de la Scienca Akademio de Armenio. Aŭtoro de kelkaj libroj pri armen-kartvelaj kulturaj kaj lingvaj kontaktoj.

Esperanton li ellernis en 1921 kaj en 1923—1924 estis sekretario de Kaŭkazia societo de esperantistoj, ekde 1924 — gvidis E-organizaĵojn en Armenio. En 1930 aperis lia lernolibro por armenoj; li multe laboris pri traduko de diversaj armenaj verkoj en Esperanton. Unu el fondintoj de Internacia Asocio de revoluciaj verkistoj-esperantistoj.

Membro de Internacia MEM-Komitato. kelkfoje partoprenis Universalajn Kongresojn de Esperanto. Ekde la FK de ASE li estis ties estrarano kaj prezidanto de Armena respublika filio de ASE; membro de Akademio de Esperanto.

La 14-an de septembro 1981 li forpasis.

Ĝuste li la unuan periodon depost la fondiĝo ekgvidis la filion. La Estraron el 7 personoj eniris ankaŭ S.A. Maĉkalova kaj A.G. Patatjan (kiel vicprezidantoj), T.M. Belousova (kiel re-

⁸⁴ En Sovetio oni ŝatis anekdotojn, inter kiuj estas ankaŭ serio da tiel nomataj anekdotoj: "Armena radio", el kanto de M. Bronŝtejn.

⁸⁵ V. punkton 3.1 de la Statuto. (La aserto ne estas ĝusta. La kondiĉo validis por urbaj filioj. la respublikajn oni fondis libere: "Informbulteno" de ASE N 1. p. 4. 5 (21), p. 6 [rim. de V S. Arotoviĉ]).

spondeca sekretario)⁸⁵, G.C. Abramjan, V.V. Engibarjan kaj R.G. Stepanjan (kiel anoj). Pro la aĝo G. Sevak ne povis multon fari, sed li edukis bonajn anstataŭantojn, kiuj estis Susana A. Maĉkalova kaj Avetis G. Patatjan (1952 — 1999) — postaj gvidintoj de la filio (la unua gvidis la filion ekde 1982 ĝis la reelekta konferenco, kiu okazis 21.12.1987, kaj la dua estis elektita dum tiu konferenco; kiel vicprezidantoj dum la konferenco estis elektitaj N. Tomasov kaj L. Elbakjan).

Ne tiom facile estas bone prezenti la agadon de la Armena respublika filio de ASE. Ĉefe ili laboris respublikskale (pli ĝuste — urbskale, ĉar multaj provoj fondi E-kolektivojn en aliaj lokoj de la lando ne sukcesis). Plurfoje estis organizataj diversaj E-aranĝoj en la urbo kaj ekster ĝi (en regiono Agveran, kiu plaĉis al la esperantistoj kaj estis vere pitoreska...), konstantaj kursoj por komencantoj...



Avetis Patatjan (maldekstre) kaj M. Lineckij dum OkSEJT-27 (Kujbiŝev, 1986)

Aktive partoprenis armenaj esperantistoj ankaŭ la E-vivon en Sovetio: venante al tutlandaj E-aranĝoj ili nepre havis bone preparitan programon...

Menciindas ankaŭ du tutlandaj E-aranĝoj, kiujn organizis ĉefe armenaj esperantistoj. Temas unuavice pri la tradicia SEJT — en 1984 la vica OkSEJT-26 okazis en la sama bela regiono Ŝuŝan (Agveran), ĝin partoprenis 280 esperantistoj el 59 loĝlokoj de la lando. Kaj bone organizita estis ankaŭ la vica 15-a konsultiĝo de E-asocioj el socialismaj landoj. Komprene-

⁸⁵ T.M. Belousova laboris en AOKS, sed konstante subtenis la E-movadon en Erevano (iaŭ opinioj de lokaj esperantistoj mem).

ble al tiu preparlaboro multe kontribuis SSOD kaj AOKS. Necesas diri, ke AOKS konstante ĉiuflanke helpis al armenaj esperantistoj. Al la 15-a konsultigo estis preparita eldono de du broŝuroj "Armena esperantisto".

Eblas noti ankoraŭ kelkajn aktivecojn de la filio:

- oktobre 1982 en Agveran okazis E-renkontigo, dediĉita al la 60-jariĝo de USSR, kiun partoprenis 72 personoj el 18 loĝlokoj;
- en la sama loko maje 1983 estis organizita seminario por esperantistoj de la filio;
- decembre 1987 en la sama loko okazis vica aranĝo — la 4-a Konferenco de Transkaŭkaziaj esperantistoj, dediĉita al la 100-jara jubileo de Esperanto; ĝin partoprenis proksimume 60 reprezentantoj de Kartvelio, Azerbajĝano kaj Armenio;
- 21.03.1983 armenaj esperantistoj akceptis gaston el la germana urbo Bremen;
- fine de aprilo 1984 armenaj esperantistoj akceptis gastojn el Svedio;
- junio 1984 Erevanon vizitis esperantistoj el ĈSSR;
- maje 1983 en la televida programo "Erevano kaj la loĝantaro" okazis renkontigo kun la membroj de Erevana E-klubo;
- dediĉe al 100-jara jubileo de Esperanto membroj de la filio sukcese prepari insignojn "Armena esperantisto" kaj diversajn T-ĉemizojn samtitolajn.



*Arušan Ovsepjan, unu el aktivuloj de
Armena E-movado*

En la ĉapitro "Agado de la komisiono pri internaciaj kontaktoj" mi jam menciis pri kontribuo de armenaj esperantistoj al kultura programo de Universalaj kongresoj. La prezentata ĉi sube foto pruvas tion.



Armenaj esperantistoj prezentas siajn naciajn kantojn kaj dancojn dum UK-72 (Varsovio, 1987)⁸⁶



Armenaj esperantistoj prezentas spektaklon dum unu el OkSEJT

⁸⁶ La foto el la revuo "Esperanto" N 9 (981)/1987, p. 157.

AGADO DE BALTIAJ RESPUBLIKAJ FILIOJ DE ASE

"... ĝia [de Litovio] movado ŝajnas pleje prosperi el inter tiuj teritorio de la eksa USSR. Kiel kaj kial ĝi faras tion?"

Jen — nur kelkaj skizetoj. LEA sukcesis donacigi al si la iaman domon de la Zamenhofa bopatro (cetere, ĝia adreso estas: Zamenhof-str., 5). La ĉirilataj klopodoj daŭris preskaŭ dekon da jaroj (1984 — 1993) kaj kaŭzis multajn seniluziigojn... Nun LEA posedas 300 kv. m., kiujn ĝi uzas por la propra oficejo, biblioteko, centro de E-instruado, sidejo de la Kaunasa E-klubo, muzeo de L. Zamenhof kaj litova E-movado, redakcio de "Litova Stelo", vojaĝagentejo kaj gastejo...

Diference de la plejparto el la eks-Sovetiaj E-organizoj LEA ne spertis membro-ŝrumpnan krizon. En ĝi anas 450 individuoj kaj 32 kolektivoj⁸⁷

"... La movado suferas ankaŭ en Riga pro la novaj prioritatoj, sed restas aŭ revenas modera optimismo. La juna prezidanto de Latvia E-Asocio, Māris Jākobsons, sukcesas inspiri siajn kunagantojn, inter kiuj superregas inoj. La heredajon flegas Saulcerite Neilande: ŝi faras esplorojn pri la historio de la latva movado. La tradiciaj Baltaj E-Tendaroj havas nun malgrandan nombron da partoprenantoj, ĉefe pro la vojaĝproblemoj de rusoj, sed ankaŭ okcidentaj turistoj estas malhelpataj de la komplikeco de limtrapaso. Tamen mi kuraĝigis la e-istojn en Riga jam nun pensi pri regiona Esperanto-kongreso en 1997"⁸⁸.

"Karakteriza trajto de tiu unua estona E-movado estas la persista uzado de E[speranto] en la societa vivo kaj en la intersamdeanaj rilatoj"⁸⁹.

Baltiaj landoj, eksaj sovetiaj respublikoj, ĉiam estis okcident-orientitaj, eble pli evoluintaj. Necesas ne forgesi, ke al Sovetio ili estis aligitaj nur en 1940 laŭ la interkonsento Hitler — Stalin (Molotov — Ribbentrop). Kaj la unuaj eliris el tiu granda Imperio (en 1990 en Litovio kaj Latvio, en 1991 ankaŭ en Estonio estis akceptita decido pri la sendependeco).

Pri la agado de tiuj respublikaj filioj de unu flanko estas facile verki, ĉar la agado estis ege intensiva kaj riĉa. Sed de la alia

⁸⁷ El la libro de A.S. Melnikov "Babilaĵoj de esperantisto", lavango n-ro 1; Rostov-na-Donu, 1995 (p. 14).

⁸⁸ U. Lins "Espero, Fenikso, Bude Borjan" — "Esperanto", N 1 (1066)/1995, p. 5.

⁸⁹ "Enciklopedio de Esperanto", represo de la unua eldono, Budapesto, HEA, 1979, p. 127.

estas tamen iom malfacila tasko, ĉar Litovio, Latvio kaj Estonio estas for de Ukrainio, nun plene sendependaj ŝtatoj kaj ne atingeblaj sen vizo. Kvankam mi interkonsentis kun tieaj esperantistoj, ke ili helpos min ĉiamaniere, mi ne havis eblecon viziti nun tiujn landojn kaj labori tie por bone prilumi la efektivigitan sistempe agadon.

Mi povas ĉi tie noti ankaŭ, ke baltiaj esperantistoj konstante estis en la unuaj vicoj de esperantistoj el Sovetunio. Pri tio eblas juĝi el la jenaj ciferoj: laŭ statistikaj donitaĵoj de 1988 en Litovio agis 31 E-kolektivoj, 7 E-kolektivoj — en Latvio kaj 11 E-kolektivoj — en Estonio⁹⁰; inter la plej aktivaj E-kluboĵ de la lando dum la SEJM-periodo (inter la jaroj 1965 — 1979) estis tiuj el Klajpeda kaj Vilnius (Litovio) kaj Riga (Latvio)⁹¹.

* * *

Kiel estis jam notite pli supre, la filio en Litovio estis fondita 30.11.1979 dum la okazigita en Vilnusa kulturpalaco de sindikatoj fonda konferenco. Ĝin partoprenis 100 reprezentantoj de 20 E-kluboĵ de la respubliko. Estis elektita Estraro de la filio, kiun ekgvidis prezidanto de la filio A. Skupas. Unu el vicprezidantoj estis A. Vaitilavičius.

Vaitilavičius Adomas, litovo, nask. en 1915, mikrobiologo laŭ la profesio, doktoro de medicinaj sciencoj. Esperantisto ekde 1926. Loĝante en malgrandaj urboj ĝis 1950 estis izolita kaj post translokiĝo en Vilnison aktivis en urba E-klubo (estis ties prezidanto dum trideko da jaroj gvidis E-kursojn, instruis tradukistojn) kaj respublikscale. Post fondo de ASE estis ĝia estrarano kaj vicprezidanto de la Litova respublika filio.

Partoprenis multnombre diversajn E-aranĝojn, ankaŭ la internaciajn (UK — en Varsovio, 1959, 1987, en Hago, 1964; en Helsinko, 1969, en Budapeŝto, 1983; E-konferencojn por medicinistoj — en GDR, 1985 kaj Pollando, 1987).

Verkis pli ol 40 diversajn esperantologiajn artikolojn kaj beletron (ekz. en 1988 aperis tradukita de li "Koko kantisto kokerikisto"). Li kompilis ĉiujn dek numerojn de "Horizonto de Soveta Litovio"

Mortis li 19.12.1996.


⁹⁰ V. "Informbulleteno" de ASE N 3 (69)/1988, p. 15 — 17.

⁹¹ V. la libron de D. Cibulevskij "SEJM. Historia skizo", p. 77

Listo de BET-oj, kiuj okazis dum ASE-periodo

Titolo	Periodo	Loko	Respubliko	Organizinto	Kvanto da partoprenintoj	Kvanto da reprezentitaj loĝlokoj
—	1979	—	—	BET ne okazis	—	—
—	1980	—	—	BET ne okazis	—	—
—	1981	—	—	BET ne okazis	—	—
—	1982	—	—	BET ne okazis	—	—
BET-20	01 — 10.07.1983	Kaunas	Litovio	Litova filio de ASE	358	?
BET-21	06 — 15.07.1984	Kuldiga	Latvio	Riga E-klubo "Fenikso"	337	74
BET-22	03 — 10.08.1985	Kose	Estonio	Tallinna E-klubo	?	?
BET-23	10 — 20.07.1986	Smalininkai	Litovio	Litova filio de ASE	550	?
BET-24	11 — 19.07.1987	Saulaine	Latvio	Riga E-klubo "Fenikso"	406	?
BET-25	24 — 30.07.1988	Tallinn	Estonio	Tallinna E-klubo	500	?
BET-26	11 — 20.08.1989	Kaunas	Litovio	Litova filio de ASE	638	?

Alia grava kontribuanto por la prospero de la E-agado en Litovio estis **Povilas Jegorovas**, aktiva esperantisto ankoraŭ dum SEJM-periodo. Li naskiĝis en 1955. Diplomiĝis pri juro en Vilnusia universitato, nun laboras kiel advokato (ekde 1978) en Kaunas. Esperanton lernis en 1970. Dum 1974 — 1976 li estis prezidanto de Vilnusia junulara E-klubo "Juneco" dum 1975 — 1979 — vicprezidanto de SEJM pri sekretariaj aferoj (ankaŭ tio helpis al li atente kaj skrupule zorgi pri "paperaj" aferoj, konservante ĉiujn donitaĵojn pri tiuj laboroj).



Povilas K. Jegorovas inter Louis C. Zaleski-Zamenhof (maldekstre) kaj Osmo Butler (dekstre) dum la malfermo de la Bjalistoka Zamenhof-centro⁵²


Dum ASE-periodo li tuttempe estis vicprezidanto de Litova respublika filio de ASE, helpante al la prezidanto (A. Skupas) pri organizaj demandoj. 1983 — 1988 — estrarano de ASE. Ekde decembro 1988 li estis la unua vicprezidanto de registrita Litova E-Asocio, poste li estis elektita ties prezidanto.

Ekde 1989 — estrarano de Esperanta Jura Asocio (EJA) kaj Komitato de UEA. Dum la periodo 1995 — 1998 li estis estrarano de UEA, respondecante pri landa agado (Orienta Eŭropo, Azio kaj Oceanio).

En la jaro 1996 li estis unu el organizintoj de renkontiĝo de UEA-prezidanto Lee Chong Yeong kun tiama Prezidento de Litovio Algirdas Brazauskas.

Aŭtoro de kelkdeko da priesperantaj artikoloj en litova gazetaro. Evidente ĉefa persono, dank' al kies klopodoj la fama Zilbernik-domon en Kaunas (strato Zamenhof, N 5) la urbaj superaj instancoj transdonis plene je la dispo de Litova E-Asocio. Ĉetorganizinto de kelkaj BET-oj, aliaj E-aranĝoj, inter kiuj ankaŭ SAT-Kongreso en Kaunas en 1992 (tiun Kongreson partoprenis, verŝajne, "rekorda" kvanto da esperantistoj).

⁵² La foto el la revuo "Esperanto" N 12 (1087)/1996 kovnirpaĝo.



*Lee Chong Yeong, prezidanto de UEA renkontiĝas kun Algirdas Brazauskas,
Prezidento de Litova Respubliko*⁹³

La 10-an de januaro 1981 en Vilnius okazis jarkunveno de la filio, dum kiu oni post pridiskuto de la E-agado elektis gvidantojn de 7 sekcioj:

- | | |
|-----------------------------------|--------------------------------------|
| • organiza — P. Jegorovas; | • eldon-redakcia — A. Vaitilavičius; |
| • MEM-sekcio — S. Paliulis; | • scienc-teknika — E. Laiconas; |
| • junulara — D. Liaubaite; | • kultura — T. Lukoševičius kaj |
| • instru-metodika — V. Grigaitis; | A. Lukoševičiute-Kelene. |

23.04.1983 okazis la 2-a respublika konferenco de la filio. Ankaŭ ĝin, kiel la unuan, partoprenis proksimume 100 esperan-

⁹³ La foto el la revuo "Esperanto" N 5 (1081)/1996, kovrilpaĝo.

tistoj el 20 E-klubo (el 16 loĝlokoj de la respubliko). Estis elektita 15-persona Estraro kaj 9-persona Prezidio. Kaj denove A. Skupas fariĝis prezidanto kaj la vicprezidantoj denove estis elektitaj A. Vaitilavičius kaj P. Jegorovas. Respondeca sekretario — V. Marcinkevičius.

Vica agadperiodo estis jam 5-jara. La 3-a respublika konferenco de la filio okazis 21.05.1988 en Vilnius. Ĝin partoprenis 120 esperantistoj el 40 loĝlokoj. Ĉi-foje la partopreno estis libera kaj sen iaj limigoj. La unuan fojon oni efektivigis sekretan balotadon, elektinte 15-personan Estraron kaj 8-personan Prezidion. Denove kiel antaŭe estis elektitaj la samaj prezidanto (A. Skupas) kaj vicprezidantoj (A. Vaitilavičius kaj P. Jegorovas). En la Estraron oni elektis inter la ceteraj oficistoj de la respublika partia CK A. Ĵukas, kiu estas esperantisto kaj eĉ gvidis antaŭ 19 jaroj E-klubon en Klajpeda.

Estis fomitaj sekcioj kun la gvidantoj:

- | | |
|--|--|
| <ul style="list-style-type: none">• MEM — A. Skupas;• organiza — P. Jegorovas;• eldon-redakcia — A. Vaitilavičius;• instru-metodika — R. Stramkauskas;• junulara — K. Tamošetis; | <ul style="list-style-type: none">• kultura — T. Lukoševičius;• scienc-teknika — I. Šimakauskas;• inform-propaganda — P. Rukšėnas;• medicina — V. Lašene. |
|--|--|

Pasis iom da tempo, kaj denove esperantistoj kunvenis jam en la gastama Kaunas. Ĉi-foje por la 4-a ekstervica respublika konferenco de la ASE-filio. Dum tiu ĉi konferenco estis metita demando pri likvido de la filio kaj restaŭro (refunkciigo) de la ekzistinta dum 1919 — 1940 Litova Esperanto-Asocio (LEA).

Jen kiujn decidojn akceptis la konferenco:

DECIDOJ

de la 4-a ekstervica respublika konferenco de Litova filio de ASE —
24-a refunkciiga kongreso de LEA

Kaunas, 10.12.1988

Celante restaŭri historian veron kaj plibonigi kondiĉojn por E-agado en Litovio la konferenco decidis:

1. Likvidi Litovan respublikan filion de ASE.

2. Refunkciigi la ekzistintan dum 1919 - 1940 Litovan Esperanto-Asociion.
3. La 4-an ekstervicinan konferencon de Litova respublika filio de ASE konsideri la 24-a refunkciiga kongreso de la Litova Esperanto-Asocio (LEA).
4. Konfirmi Statuton de LEA.
5. Peti Ministran Konsilion de Litovio registri LEA-n.
6. Komisiono al Estraro de LEA daŭrigi tradiciojn de litovaj esperantistoj
7. Komisiono al Estraro de LEA solvi demandojn pri formoj kaj strukturo de kunlaboro kun ASE.
8. Peti Komitato de UEA akcepti LEA kiel aliĝintan landan Asociion de la organizado.
9. Elekti Estraron kaj Revizian Komisionon de LEA.
10. Komisiono al la Estraro de LEA solvi demandojn pri reapero de la periodaĵo "Litova Stelo".
11. Elekti honorajn membrojn de LEA.

Evidente mi eĉ ne notas la elektitajn organojn de la nova (malnova) E-organizado — tio estas jam kampo por nova verko...

* * *

La Fonda Konferenco de la Latva respublika filio okazis 28.03.1980. Ĝin partoprenis proksimume 70 personoj. Fine estis elektita 22-persona Estraro de la filio kaj 7-persona Prezidio.

Prezidanto — J. Rukšans;

Vicprezidantoj — A. Kalninš. kaj J. Smildzinš;

Respondeca sekretario — A. Juška.

En "Informbulteno" de ASE, de kie mi ĉerpis diversajn donitaĵojn pri ASE-agado, bedaŭrinde, mankas sufiĉe da informoj pri la konferencoj de Latva respublika filio de ASE⁹⁴. Feliĉe en informilo de nova organizado de Latvio (LatEA) estis tia informo.

⁹⁴ Pri la 2-a konferenco estas tute neniam sciigoj kaj pri la tria en N 1 (73)/1989 sur p. 20 estas aperigita jena sciigo: "Laŭ ricevitaj de la redakcio informoj, konferenco, kiu likvidis la respublikan filion kaj fondis novan E-organizaĵon, okazis ankaŭ en Litovio." La sciigon apudis informoj pri likvido de la filioj en Litovio kaj Estonio

Laŭ ĝi la konferenco de latviaj esperantistoj okazis la 11-an de decembro 1988 en la Industria politeknikumo de Riga. Pri ĝi estis informitaj ĉiuj E-klubo kaj grupoj de la respubliko. Ĉiu partopreninto estis plenrajta delegito. Entute la konferencon partoprenis proksimume 80 esperantistoj. La raporton pri la laboro de la ASE-filio faris Talis Bercis, vicprezidanto de la filio.

La konferenco decidis reorganizi la Latvian filion de ASE je sendependa Latvia E-Asocio; estis konfirmitaj la Statuto de la Asocio kaj du rezolucioj — pri la Internacia Lingvo kaj pri Popola Fronto de Latvio.

Estis elektita 36-persona konsilantaro de LatEA, ĉefaj taskoj por kiu estis:

1. Kunlabori kun la Komitato de la popola edukado kaj Latvia Popola Fronto en la sfero de komunaj intereso.
2. Esplori la eblecon aliĝi al UEA kaj TEJO.
3. Esplori la eblecon reeldoni la vortaron kaj konversacian vortaron de E. Jaunvalks.

La nova elektita Estaro de Latvia E-Asocio:

- | | |
|------------------------------------|--|
| • Māris Jākobsons — prezidanto; | • Aldis Bušs — mastrumajo; |
| • Tālis Bercis — vicprezidanto; | • Iveta Daine — informo; |
| • Aivars Kalniņš — vicprezidanto; | • Roalds Lapsa — scienco, medicino; |
| • Jāzeps Šlars — vicprezidanto; | • Biruta Rozentfelde — kulturo kaj arto; |
| • Kāris Vecbrālis — vicprezidanto; | • Margarita Zelve — individuaj membroj. |
| • Sofija Soskina — kasisto; | |

* * *

La Fonda Konferenco de la Estona respublika filio okazis 26.04.1980 en Tallinn. Ĉefan prelegon pri la stato de E-movado en la respubliko faris prezidantino de E-komisiono ĉe respublika societo de amikeco E.E. Kuuskül. La konferenco pasis produktive kaj rezulte estis elektita 21-persona Estraro kaj 12-persona Prezidio.

Prezidanto de la filio estis elektita Ferdinand Eisen, ministro pri edukado de Estona respubliko.

Vicprezidanto de la filio — Vjaĉeslav Ĥromov, filologo, kandidato de filologiaj sciencoj.

Sekretario — Jaan Ojalo.

Estis fonditaj komisionoj kaj elektitaj ties gvidantoj:

- Instru-metodika — Madis Linnamägi;
- Scienca — Vjaĉeslav Ĥromov;
- informa — Jaan Ojalo;
- MEM-sekcio — Eduard Raus;
- Junulara — Peeter Aitai;
- Eldona — Eela Kuuskül;
- Mastruma — Haari Listra.

La 2-a konferenco de la respublika ASE-filio okazis 10.04.1983 en antikva urbo Viljandi⁹⁶. Same, kiel antaŭe, estis elektitaj F. Eisen — prezidanto de la filio, V. Ĥromov — vicprezidanto kaj J. Ojalo — sekretario.

La 3-a konferenco okazis 22.10.1988. Ĝi akceptis la decidon pri likvido de la respublika ASE-filio kaj refunkciigo de plene sendependa (de ASE) Esperanto-Asocio de Estonio (EAE), kaj la konferenco mem estis daŭrigata jam kiel la 22-a (konsiderante la antaŭajn) Konferenco de EAE. Estis elektita 29-persona Konsilantaro kaj 11-persona Estraro...

Kaj ankoraŭ pri unu aranĝo necesus ĉi tie mencii. La 10 — 11-an de septembro 1988 en Kaunas okazis 4-a konferenco de esperantistoj el Baltio (la unuaj tri okazis dum antaŭmilita periodo). Tiu konferenco metis la komencon de refunkciigo de antaŭaj E-organizadoj en la Baltiaj respublikoj.

* * *

Mi ŝatus mencii ĉi tie la plej gravajn agaddirektojn de baltiaj esperantistoj. Tio estis tradiciaj por Estonio renkontigoj “Esperanto kaj naturo”, scienc-teknikaj

⁹⁶ Viljandi en 1983 festis sian 777-jariĝon. krome en 1933 (antaŭ 50 jaroj) en ĝi okazis la 11-a konferenco de E-Asocio de Estonio.

konferencoj, arangoj de junulara sekcio (ĝin gvidis P. Aitaj); tradiciaj por Latvio REK, "Ora folio" kaj "Neĝfloketo"; tradiciaj por Litovio "Giruliai", "Muzo", "Boatado"... Kaj kompreneble estis tradiciaj por ĉiuj ĉebaltaj respublikoj kaj tre popularaj inter ĉiuj esperantistoj de nia lando Baltlandaj E-Tendaroj.


BET, kiel komence junulara arango, havas sian historion. Iniciatis tiun arangon riga esperantisto E. Mozerts en 1959. Tiu unua E-arango, kiun partoprenis nur 30 junaj esperantistoj titoliĝis ĈET (Ĉebalta Studenta Esperanto-Tendaro). Post 4 jaroj la titolo ŝanĝiĝis al BET. En 1967 de tiu tendaro, kiun partoprenis ĉiutempe pli kaj pli da dezirantoj, apartiĝis junulara parto, kiu komencis organizadi SEJT-ojn^{*}. Pli poste oni diferencigis deĉifron de tiu mallongigo ("Baltlandaj E-tagoj"; BEK "Baltlanda E-Kongreso")...



A. Kaĵninsk salutas partoprenantojn de BET-24 en Saulaine (1967)

^{*} Iom pli vastan historieton pri BET kaj SEJT-olas trovi en la libro de O. Cibulevskij "SEJM. Historia skizo" p.29-65


Sur la p. 144 estas aperigita tabelo de BET-oj kiuj okazis dum ASE-purodo.



Grupo de esperantistoj dum BET-23 en Smalininkai



Solena fermo de la tendaro (BET 21 en Kuldiga)



Komuna foto de partoprenintoj en BET-22 (Kose, Estonio)



J. Ojalo anoncas rezultojn de KGS-konkurado dum la BET-22 (Kose)



En halo de "Kongresejo", inter partoprenintoj de BET-22 (Kose, Estonio)

“Muzo” — kultur-literatura konkurso de litovaj esperantistoj. Devenas de turismaj marŝoj de Vilniusa junulara E-klubo “Juneco”. Iniciatinto de la aranĝo estas Vitaŭtas Šilas. Tiel membroj de la klubo celis fortigi sian kolektivon, altigi lingvonivelon de siaj anoj. La unua marŝo okazis en Druskininkai en 1969. Sekvajare (1970) al la aranĝo estis invititaj jam amikoj el aliaj urboj (Kaunas, Kolomna). Tiam aperis ideo titoli la renkontiĝon “Muzo” kaj dediĉi pli da atento al beletro. La programo antaŭe multe similis tiun de la aliaj E-renkontiĝoj (kantoj, tujdoj ĉe fajro...), sed oni laŭtlegis versaĵojn...

Ankaŭ “Muzo-71” okazis en Druskininkai, sed la sekva “Muzo-72” kunvenigis literaturŝatantojn al kastelmontoj de Kernavė (la unua ĉefurbo de Litovio). Dum “Muzo-73”, okazinta apud Vilnius, konkursis deklamantoj, kantplenumantoj, originalaj poetoj.

Definitivan direkton por estontaj “Muzoj” donis la vica en 1974, kiu okazis sur insulo Vilnoja (ĉ. 20 km for de Vilnius). Por valorigi la programon estis anoncita foresta partopreno de poetoj kaj prozistoj. Venis la unua kontribuajo de foresta partopreninto Ludmila Jevsejeva. Okazis konkursoj pri deklamado, bela lego, rakontado, originala melodio kaj interpretado.

“Muzo-75” kunvenigis 35 personojn el 10 lokoj; “Muzo-76” — 29 el 5 lokoj; jubilea 10-a “Muzo-78” venigis 35 personojn el 10 lokoj; al la sekva “Muzo-79” venis 40 personoj — jen estas nur kelkaj ciferoj pri partopreno en la aranĝo.

Post fondiĝo de la filio pri “Muzo” okupiĝis kaj “Juneco” kaj la filio⁹⁷.

Eldonagado en ĉiuj tri respublikoj estis tre aktiva. E-literaturon oni eldonadis konstante en Estonio (eldonejo “Eesti Raamat”), en Latvio (ĉefe, lerniloj), en Litovio (ĉefe, periodaĵoj). La liston de eldonitaj materialoj v. en la suplementa parto.

Interesan agaddirekton havis latvaj esperantistoj — kelkfoje ili organizadis seminariojn por korespondkursanoj, kio kompreneble multe helpis al la lernantoj de la lingvo.

En Estonio multe da atento estis al lernejoj. En kelkaj lernejoj oni instruis Esperanton fakultative. Dum someroj kelkfoje estis organizataj someraj E-aranĝoj speciale por lernejoj, kiuj lernas la lingvon. Ankaŭ estis konkursoj pri lingvoposedo.

⁹⁷ Kurtan skizoj pri “Muzo” helpis al mi verki S. Gaidamavičius (Vilnius).

Sciindaĵoj pri partopreno en literaturaj konkursoj "Muzo" (Rezultoj)

	Muzo-79 (11-a)	Muzo-80 (12-a)	Muzo-81 (13-a)	Muzo-82 (14-a)	Muzo-83 (15-a)	Muzo-84 (16-a)
Periodo	28—30.09.79	17—19.10.80	24—26.10.81	18—19.10.82	07—09.10.83	22—23.09.84
Eniute partoprenis	45	183	?	?	100	150
Kvanto da reprezentitaj loglokoj	10	37	?	?	?	?
Deklamado:						
1-a loko	Liaubaite D.	Tamoŝiuniene I.	Tamoŝaŝkaite V.	?	Vaŭtklaviĉiute L.	Tamoŝiuniene I.
2-a loko	Tamoŝiuniene I.	Hajkovskij A.	Tamoŝiuniene I.	?	Ĉirvinskaite I.	Ĉirvinskaite I.
3-a loko	Abromas L.	Tamoŝaŝkaite V. Danuŝaŝiute L., Stepanova I.	Skirmantaitė R.	?	Tamoŝiuniene I., Andrejeva T.	Braŝiŝkiete R., Ŝauklis V.
Laŭdaj mencioj			Kruzs A. Sav E. Virŝila V. Danuŝaŝiute L.		.	
Bela (arta) legado:						
1-a loko	Tamoŝiuniene I.	Pacijuko V.	Andrianova N.		Andrejeva T.	Tamoŝiuniene I.
2-a loko	Laubaite D.	Tamoŝiuniene I.	Tamoŝiuniene I.		Tamoŝiuniene I.	—
3-a loko	Oŭkene G.	Dzjuba S.	Sav E.		Vaŭtklaviĉiute L.	Laur A.

Originala prozo:						
1-a loko	Tamoŝiuniene I.	Andrejeva T.	Tamoŝiuniene I.	Korotkov M.	Tamoŝiuniene I.	Tamoŝiuniene I.
2-a loko	Tamoŝiuniene I.	Tonti A.	Martinovič J.	Tamoŝiuniene I.	Korotkov m.	Kruz A.
3-a loko	Beinoriene V.	Tamoŝiuniene I.	Tonti A.	Andrejeva T.	Kalmet K.	Skubulniks A.
Originala poezio:						
1-a loko	Andrianova N.	Skuja H.	Tamoŝiuniene I.	—	Apollo A.	—
2-a loko	Tamoŝiuniene I.	Pacjurko V.; Prudko S.; Tamoŝiuniene I.	Vaitkievičius A.	Tamoŝiuniene I.	Tamoŝiuniene I.	—
3-a loko	Pacjurko V.	—	Lebedev S.	—	—	—
Laŭdej mencioj	—	—	Andrianova N.; Tonti A.	—	—	—
Originala melodio:						
1-a loko	Lukoŝevičiute A.	Lukoŝevičiute A.	Kakovskij T.	—	—	—
2-a loko	Kotova V.	Vasagan V.	Kakovskij T.	Spicko N.	—	—
3-a loko	—	Miĉjurina M.; Zakarkaitė N.	Tonti A.	Lukoŝevičiute K.	Jakovlev P.	—
Rakontado:						
1-a loko	Tamoŝiuniene I.	Ĥarĵkovskij A.	Tamoŝiuniene I.	—	—	Tepnevičiute J.
2-a loko	Kopmanis N.	Tamoŝiuniene I.	Vaitilavičius A.	—	—	Laitonas E.
3-a loko	Mamedov M.; Vaitilavičius A.	Pacjurko V.; Abromas I.	Berce L.	—	—	Ĉirvinskaite I. Tamoŝiuniene I.

Laŭdaj mencioj			Kuŝnirik V.; Dorojinskij O.		
Kantado:					
1-a loko	—	—	Jurova T.; Podgurskij D.	Nasevičiute I.; Gudlianskaj I.	Ensemblo el Liepaja; Verhova A. dueto
2-a loko	—	—	Petkavičiute I.; Petkavičiute D.	Kairo N.; Orlanskaite R.; Balaiŝite V.	Petkevičiute
3-a loko	—	—	Kakovskij T.	Ŝauklis V.	horo el E-klubo de Panevežis

Daŭrigo (la jaroj 1985 — 1989)

	Muzo-85 (17-a)	Muzo-86 (18-a)	Muzo-87 (19-a)	Muzo-88 (20-a)	Muzo-89 (21)
Periodo	?—??.85	0507.10.86			
Enlace partoprenis	120	200			
Kvanto da reprezentintaj loglokoj	?	?			
Deklamado:					
1-a loko	Kacas G.				
2-a loko	Tamoŝturniene I.				
3-a loko	Civinskaite I.; Vaitkevičiute L.				

Bela (arta) legado:		
1-a loko	Tamoŝtuniene I.	
2-a loko	Andrejeva T.	
3-a loko	Vaikiavičiute L.	
Originala prozo:		
1-a loko	Kruza A.	
2-a loko	Korotkov M.	
3-a loko	Andrejeva T.	
Originala poezio:		
1-a loko	Apollo A.	
2-a loko	Silnova L.	
3-a loko	Belonenko E.; Ternavskij M.	
Originala melodio:		
1-a loko	Gurov A.	
2-a loko	Kopistjanska O.	
3-a loko	Ŝapoŝnikova A.	
Originala kantoteksto:		
1-a loko	Kopistjanska O.	
2-a loko	Dolgin G.	

3-a loko	Kopistjanska O.			
Rakontado:				
1-a loko	Tamoŝuniene I.			
2-a loko	Cirvinskaite I.			
3-a loko	Andrejeva T.			
Kantado::				
1-a loko	Viharev V.; fiaro el E-klubo de Paneveziŝ			
2-a loko	Kopistjanska O.			
3-a loko	Papina S.; Bogomzakov V. kaj Umarov M. (dueto)			

Loĝlokoj de la venkintoj:

Aluksne — Kruzs A.; Skubulknieks A.
 Alsedžiai — Vaitkevičius A.
 Butrimonis — Šauklis V.
 Cesis — Berce L.
 Ĉkalovsk — Verhova A.
 Jarvakandi — Kalmet K.
 Jurbarkas — Abromas I.; Abromas L.
 Kaunas — Laiconas E.; Vaitkievičiute L.
 Kemerova provinco — Korotkov M.
 Kievio — Andrianova N.; Mamedov M.; Prudko S.

Krasnojarsk — Mičurina M., Stepanova I.
Leningrad — Andrejeva T.; Bogomzakov V.; Lebedev S.; Ppina S.; Umarov M.
Lviv — Kopistjanska O.; Martinovič J.; Pacjurko V.; Vasagan V.
Minsk — Gurov A.; Silnova L.; Višarev V.
Moskvo — Džuba S.; Harjkovskij A.; Tontj A.;
Odeso — Dolgin G.
Panevejis — Kacas G.; Skirmantaitė R.; Viršila V.; Zakarkaite N.
Pasvalys — Čirvinskaitė I.; Danušaitytė L.; Danušanskaitė L.; Petkevičiute D.; Petkevičiute I.; Tepkevičiute J.
Riga — Skuja H.
Rostov/Don — Belonenko E.
Simferopol — Ternavskij M.
Šiauliai — Tamašianskaite V.
Tallinn — Apollo A.; Laur A.; Sarv E.
Taškento — Sapošnikova A.
Ternopil — Dorožinskij O.; Jurova T.; Kakovskij T.; Kušnirik V.; Podgurskij I.
Vilnius — Brašiškietė R.; Lukosevičiute A.; Oukienė G.; Tamošiuniene I.; Vaitilavičius A.

Kelkaj donitaĵoj pri aktivado de E-klubo el Baltio dum SEJM-a periodo *

	Prelegoj aŭskultintoj		Individual korespondiligoj landoj		Kursfinintoj	
	1973	1974	1973	1974	1973	1974
	1974	1975	1974	1975	1974	1975
	Agadperiodoj					
Kapsukas (Litvio)	1 / 40	4 / 141	5 / 4	5 / 5	1	—
Kaunas (Litvio)	2 / 105	5 / 200	—	46 / 16	—	9
Kedainiai (Litvio)	—	—	—	102 / 19	—	—
Klaipeda (Litvio)	11 / 259	7 / 236	435 / 38	388 / 37	39	30
Liepaja (Latvio)	—	3 / 65	33 / 13	35 / 6	—	15
Riga (Latvio)	43 / 1509	41 / 1367	121 / 19	272 / 21	29	20
Tallinn (Estonio)	—	2 / 41	—	—	—	6
Viljandi (Estonio)	4 / 120	7 / 213	—	204 / 31	27	—
Vilnius (Litvio)	8 / 246	6 / 640	130 / 20	125 / 21	68	—

* V. "Aktuale" N 9 (24)/1975, p. 113 — 114. La striketo "—" signifas, ke donitaĵoj pri la aktiveco ne estis en la raporto.

Laŭ la libro de D. Cibulevskij "SEJM. Historia skizo" (p. 77), resume dum 9-jara agado (1969—1978) E-klubo de Riga okupis 2-an lokon en la soc. konkurado inter E-klubo de Sovetio (kun sume 15438 poentoj), Klaipeda E-klubo — la 3-an lokon (kun sume 15378 poentoj) kaj E-klubo de Vilnius — 4-an (kun sume 9232 poentoj).

AGADO DE UKRAINA RESPUBLIKA FILIO DE ASE

"Ukraina respublika filio (URF) de ASE kaj Ukraina respublika unio de sindikatoj okazigis la 7 — 9-an de oktobro 1983 en Kievo respublikan seminarion de esperantistoj, dediĉitan al la 40-jara jubileo de liberigo de Kiev el sub german-faŝistaj okupantoj..."⁹⁸

Iom pli facile por mi estis verki tiun ĉi parton de la historio. Unue, mi kiel ukrainiano la tutan periodon estis senpera partopreninto de la eventoj; due, veraj aktivuloj de la agado Jekaterina V. Majburova (tutperioda Prezidanto de URF ASE) kaj Vladimir A. Miŝĉenko⁹⁹ ĉiumaniere helpis min, korektante kaj ĝustigante la jam verkitan.

Sed tutegale eblas trovi plurajn "malglataĵojn" — la profokolaro restis en manoj de la ĉefa nia kunfondinto — la Ukraina Societo de Amikeco kaj kulturaj ligoj kun eksterlando (plena nomo de la respublika Societo de Amikeco [Ukraina SA])...

* * *

Do, la Ukraina respublika filio de ASE (URF ASE) estis fondita la 29-an de januaro 1980.

Al la Fonda Kunveno de la filio estis kolektitaj esperantistoj de la tuta Ukrainio. Vere, reprezentateco de esperantistoj, sed ne funkciuloj, estis sufiĉe alta: el 47 partoprenintoj estis 37 esperantistoj, kiuj reprezentis 10 respublikajn provincojn (Donecka, Ĥarkova, Ĥmelnickia, Kieva, Krimea, Lvova, Odesa, Poltava, Ternopola, Zaporozĵa). La ceteraj 10 personoj estis el Ukraina SA (4), Ukraina respublika sindikata Konsilantaro (3) kaj LKSMU (3).

Kaj same kiel dum la FK de ASE en Moskvo ĉiuj alvenintoj en la ĉefurbon de Ukrainio havis en la koroj ian festan senton — jen venis fin-fine ankaŭ al nia strato festo (laŭ ruslingva proverbo).

⁹⁸ Informbulteno de ASE N 10-11 (37-38)/1984, p. 7.

⁹⁹ Bedaŭrinde, forpaso de V.A. Miŝĉenko ne donis eblecon ĝis la fino helpi la eventualan korektadon.

Iom amargis la humoron la antaŭkunvena kunsido de komunisto grupo, dum kiu estro de la Ukraina SA G.A. Tiĥolaz sin turnis al la kunsidintoj kun la peto atenti dum la kunveno, ke ĝi pasu trankvile, kun ordo inda kaj ke en la Estraron de URF ASE estu elektitaj la plej bonaj homoj.

Ne tiom pompe kiel la FK de ASE, sed pli efike pasis la Fonda Kunveno de la filio: malpli daŭre prelegis ASE-Prezidan-



to M.I. Isajev (ankaŭ li partoprenis la Fondan Kunvenon en Kievo kiel gastoj), pli konkretaj estis la paroloj dum pridiskuto, pli bone konis la ĉeestintoj personojn, proponitajn por la Estraro.

Rezulte estis elektita 23-persona Estraro de URF ASE, inter kiuj pli ol duono (15 personoj) estis veraj esperantistoj. Jen kiel aspektis la listo de tiu Estraro:

1. Artamonov V.N. --- Kievo (funkciulo el LKSMU),
2. Bajanov J.B. --- Kievo,
3. Bileckij A.O. --- Kievo,
4. Cibulevskij D.M. --- Ĥarkiv,
5. Grigorenko V.V. --- Pollava,
6. Ivanov A.A. --- Kievo (funkciulo el Ukraina respublika sindikata Konsilantaro),
7. Ivassenko V.V. -- Borispil,

8. Kamanin A.J. — Kievo (funkciulo el Ukraina SA),
9. Koroleviĉ A.I. — Lviv,
10. Korsun V.V. — Ĥmelnickij,
11. Kudrenko P.S. — Kievo (funkciulo el Ukraina respubliko sindikata Konsilantaro),
12. Lozovaja A.S. — Ĥarkiv,
13. Majburova J.V. — Kievo,
14. Maliŝko N.I. — Kievo,
15. Medvedeva A.F. — Zaporozje,
16. Miĥajlenko O.G. — Kievo (funkciulo el Ukraina SA),
17. Miŝĉenko V.A. — Kievo,
18. Pacjurko V.P. — Pustomiti,
19. Starodubceŭ N.N. — Doneck,
20. Ŝpakoviĉ T.I. — Kievo (funkciulo el Ukraina SA),
21. Vaiĭ M.B. — Kievo,
22. Vajnblat S.I. — Odeso,
23. Vatamanjuk N.N. — Lviv.

Iom pli poste estos videble, ke ne ĉiuj estraranoj en la laboro aktivis, eble, nur dum (aŭ ĉe) vica jarkunveno de la Estraro. Tamen, gravis ankaŭ la fakto, ke 8 provincoj de la respubliko (el 25) estis en ĝi reprezentitaj.

Sufiĉe trankvile kaj rapide okazis dum la unua estrarkunsido elekto de Prezidio el 9 personoj, kien eniris:

1. Majburova J.V. — Prezidanto de URF ASE,
2. Maliŝko N.I. — vicprezidanto, respondeculo pri rilatoj kun eksterlando,
3. Miŝĉenko V.A. — vicprezidanto, respondeculo pri enlanda laboro, organizo,
4. Kamanin A. J. — sekretario,
5. Artamonov V.N. — prezidiano, respondeculo pri kultura laboro, junularo,
6. Cibulevskij D.M. — prezidiano, respondeculo pri traduka laboro,
7. Ivasenko V.P. — prezidiano, respondeculo pri informa laboro,
8. Koroleviĉ A.I. — prezidiano, respondeculo pri instru-metodika laboro,
9. Kudrenko P.S. — prezidiano, respondeculo pri kultura laboro.

Kaj nun ni provu karakterizi la laboron de URF ASE entute kaj ties gvidintoj aparte.

Antaŭ ĉio evidente necesus dividi la tutan agadperiodon je du malsamaj partoj: la elektita dum la Fonda Kunveno Estraro (kaj la Prezidio) de URF ASE agis dum la periodo inter tiu kunveno kaj 27.12.1986, kiam okazis la reelektaj de la Estraro kaj Prezidio. Tio fakte ne signifis, ke dum la unua preskaŭ sepjara periodo laboris ĉekape de la organizaĵo ĉiuj tiuj personoj, kiuj estis elektitaj dum la Fonda Kunveno. Feliĉe la partoprenintoj

de la Fonda Kunveno donis sian permeson en necesaj okazoj fari eventualajn ŝanĝojn kaj kooptojn en la Estaron kaj Prezidion.

Evidentiĝis, ke tiu permeso estis trafa kaj plurfoje uzita — dum kelkaj prezidikunsidoj estis levitaj demandoj pri tiaj ŝanĝoj.

Ni komencu prilumi la agadon de Ukraina respublika fillo de ASE ekde la

LABORO DE LA ORGANIZA KOMISIONO (URF ASE)

"Lingvaj problemoj havas siajn specifojn en ĉiu lando. Kaj ni ne devas forgesi, ke la problemoj de interkomunikado estas tre diversaj kaj tre komplikaj. Ili prenas diversajn formojn depende de la socia vivo, agado kaj evoluo. Pro tio nia tasko estas serĉi solvojn en la apliko de diversaj sistemoj de kompreniĝo"¹⁰⁰

Kiel estis notite pli supre, la Prezidion eniris 9 personoj, inter kiuj estis 5 esperantistoj kaj 4 funkciuloj. Jam dum la Fonda Kunveno kaj tuj post ĝi ektemis pri fondo (organizo) de la plej necesaj komisionoj. Tiuj estis la organiza (ties laboron ekgvidis Vladimir A. Miŝĉenko), komisiono pri eksterlandaj kontaktoj (la gvidinto — Nikolaj I. Maliŝko), instru-metodika komisiono (respondeculo — Aleksandr I. Koroleviĉ), kultura komisiono (du gvidintoj, du funkciuloj — V.V. Artamonov kaj P.S. Kudrenko), komisiono pri informa agado (la gvidinto — V.P. Ivasenko) kaj la tradukista (la gvidinto — Dmitrij M. Cibulevskij).

La organizan komisionon (tiun direkton oni nomis ankaŭ "enlanda laboro") ekgvidis tre akurata esperantisto kun granda sperto Vladimir A. Miŝĉenko. Multe da atento al la laboro donis ankaŭ la Prezidanto de URF ASE Jekaterina V. Majburova. Rezulte eblas nomi la laboron sufiĉe kontentiga. Tamen ankaŭ en ĝi estis mankoj.

La estrarkunsidoj estis organizataj ĉiujare laŭ la Statuto; regule okazadis ankaŭ la prezidikunsidoj — po 4 ĉiujare. Kom-

¹⁰⁰ M.I. Isajev "Pri bazaj metodologiaj problemoj de interlingvistiko" — en "Sociopolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado", Budapeŝt, HEA, 1986, p. 214.

pare kun la prezidikunsidoj de ASE, en Ukrainio tiuj estis malpli oftaj (eble, duone), sed ĉiam plenrajtaj, ĉar ilin partoprenis ĉiuj aŭ preskaŭ ĉiuj prezidianoj (ne konsiderante la funkciulojn, plejmulto el kiuj simple ignoris siajn devojn).

Evidente por la komenco indus prezenti la bildon kiel evoluis la konsisto de la Prezidio dum la tuta periodo. Ja en Ukrainio ni ne atendis la reelektajn konferencojn por forigi nelaborantajn prezidianojn kaj koopti tiujn, kiuj kapablis kaj pretis labori. La kooptado estis ankaŭ bezonata por certaj funkciuloj (iuj lasis siajn postenojn, forirante al aliaj laboroj, samtempe ĉesante agi en URF ASE-Prezidio; ŝanĝe al ili venadis novaj funkciuloj.

Same kiel pri ASE mi ŝatus meti ĉi sube la bildon pri estrar-kaj prezidikunsidoj de la respublika filio. Sed pro manko de dokumentoj (la dokumentaro restis en Ukraina SA kaj ne estas reakirebla, eble eĉ malaperigita) kelkaj datoj mankas.

LA PREZIDIKUNSIDOJ DE URF ASE

1 — 29.01.1980;	14 — 11.04.1983;	27 — ???.1986;
2 — 16.04.1980;	15 — 08.05.1983;	28 — 06.10.1986;
3 — 20.05.1980;	16 — 08.10.1983;	29 — 27.12.1986;
4 — 28.11.1980;	17 — 06.02.1984;	30 — ???. 1987;
5 — 23.01.1981;	18 — 14.04.1984;	31 — 02.05.1987;
6 — 27.02.1981;	19 — 29.05.1984;	32 — 05.10.1987;
7 — 28.04.1981;	20 — 06.08.1984;	33 — 19.12.1987;
8 — 27.11.1981;	21 — 13.10.1984;	34 — ???.1988;
9 — 19.03.1982;	22 — 01.02.1985;	35 — 14.05.1988;
10 — 16.04.1982;	23 — 06.04.1985;	36 — 10.09.1988;
11 — 19.09.1982;	24 — 06.10.1985;	37 — 29.09.1988;
12 — ???.1982;	25 — 21.12.1985;	38 — ???.1989;
13 — 26.02.1983;	26 — 23.03.1986;	39 — 20.05.1989.

(Necesas atenti, ke la 25-a prezidikunsido estis daŭrigata sekvan tagon, la 22-an de decembro 1985 kaj la 37-an kunsidon (29.09.1988) partoprenis nur kieva grupo de la Prezidio — laŭ la interkonsento kun la ceteraj prezidianoj).

Laŭdindas tre grava aktiveco de la URF ASE-Estraro kaj Prezidio. Tio estas regule okazigataj seminarioj kaj konferencoj de la respublika ASE-filio. Entute okazis 9 konferencoj (v. la

tabelon)¹⁰¹. Multe helpis ĉi-direkte respublika Sindikatkonsilantaro (kaj ties reprezentanto en la URF ASE-Prezidio A.G. Miĥajlenko)

La prezidanto de la respublika ASE-filio Majburova Jekaterina Viktorovna naskiĝis 05.12.1913 en Verĥoturje (nun — Sverdlovsk provinco, Rusio), finis mezlernejkon, muzikan teknikumon kaj konservatorion (fortepiano) en Uralo; tie ŝi defendis ankaŭ kandidatan disertacion pri historio de muzika kulturo. De 1935 ŝi laboris kiel instruisto pri muziko kaj ties historio en Uralo (Sverdlovsk) kaj Kievo (ekde 1953).

J.V. Majburova havas plurajn librojn, iernilojn kaj broŝurojn pri la temo "muzika literaturo kaj historio de muziko".

En la E-movado J.V. Majburova estas ekde 1970. En 1980 dum la fonda kunveno de URF ASE ŝi estis elektita prezidanto de URF ASE kaj estis tia ĝis la majo 1989, kiam dum vica URF ASE-Konferenco la respublika filio estis reorganizita je sendependa E-Asocio — UkrEA. Ankaŭ en tiu Asocio ŝi aktivis kiel prezidanto de kontrol-revizia komisiono (1989 — 1995). Dum pluraj jaroj gvidis E-kursojn por komen-cantoj. Nun ŝi estas pensiulo.

Membro de Kieva E-klubo "Ora Pordego", individua membro de UEA kaj fakdelegito de UEA (pri muziko) por Kievo.

La alia aktivulo pri organizaj problemoj en la E-movado estis V.A. Miŝĉenko

Miŝĉenko Vladimir Afanasjeviĉ naskiĝis 20.10.1936 en la vilaĝo Vinarivka (Kieva provinco) en familio de kamparano.

Lerni en ternejo li komencis nur post la milŝto, kaj la unuajn 7 jarojn li lernis en la sama vilaĝo; en apuda vilaĝo li daŭrigis la lernadon kaj tie finis mezlernejon kun "ora medalo" (1955)¹⁰².

Samjare li studentiĝis en Kieva universitato — fizik-matematika fakultato.

En 1983 li defendis kandidatan disertacion pri fizik-matematika temo (nuklea energio).

Dum la studentaj jaroj li esperantistiĝis kaj de tiu tempo ne lasis la E-movadon. Ne aktivinte por la tuta lando (por Sovetio), li multan atenton donis al la E-movado de Ukrainio kaj de sia urbo Kievo; multe laboris pri historio de E-movado en Ukrainio kaj en Kievo.

Multjara fakdelegito de UEA.

¹⁰¹ La unua el tiuj, okazinta en Ĥarkiv, estis organizita helpe de urba komsomolkomitato sen helpo de la sindikatoj.

¹⁰² En Sovetio fini mezlernejon "kun ora medalo" signifas ricevi fine de la lernado ĉiujn perfektajn poentojn.

Gvidantoj de la komisionoj kaj aliaj respondeculoj en URF ASE laŭ la agadjaroj

	Agadjaroj											
	1979	1980	1981	1982	1983	1984	1985	1986	1987	1988	1989	
Komisionoj kaj ties gvidantoj (ASE-prezidantoj kaj ASE-estraranoj):												
1. Prezidanto: * Majburowa J. V.												
2. Organiza komisiono: * Miŝčenkop V.A. * Kovtonjuk J.I.N.												
3. Instru-metodika komisiono: * Korolevič A.I. * Ŝilo G.M. * Horbačuk V.T.												
4. Respublika MEM-sekcio: * Maliŝko N.I. * Pacjurko V.P. * Lupickij Jk.V.												
5. Komisiono pri internaciaj kontaktoj: * Maliŝko N.I.												

	Agadlaro											
	1979	1980	1981	1982	1983	1984	1985	1986	1987	1988	1989	
Komisionoj kaj ties gvidantoj (ASE-prezidianoj kaj ASE-estraranoj):												
6. Junulara komisiono: * Zaharija J. G.								—	—			
7. Scienc-teknika komisiono: * Grafov A. V. * Zelinskij J. B.					—		—	—	—			
8. Kultura komisiono: * Artamonov V. N. * Kudrenko F. S. * Miĥajlenko A. G.		—	—	—	—		—	—	—			
9. Komisiono pri informado: * Ivasenko V. T. * Kuŝnerov V. G. * Krasuckij A. V.		—	—	—	—		—	—	—			
10. Tradukista (literatur-tradukista) sekcio * Cibulevskij D. M. * Pacjurko V. P.		—	—	—	—		—	—	—			

Komisionoj kaj ties gvidantoj (ASE-prezidianoj kaj ASE-estraroj):	Agadjaroj										
	1979	1980	1981	1982	1983	1984	1985	1986	1987	1988	1989
11. Rezentanto de LKSMU — KMO: * Nelip M.I. * Kurasov I.Jb.					—	—	—	—	—	—	—
12. Prezidiano sen definitiva posteno: * Koroleviĉ A.I.				—	—	—	—	—	—	—	—
13. Jubilea komisiono: * Koroleviĉ A.I.									—		
14. Respondeca sekretario de ASE-filio: * Kamanin A.Jb. * Kušnerov A.G. * Stasjuk Ju.V. * Zorin A.M.		—	—	—	—	—	—	—	—	—	—

Respublikaj E-konferencoj kaj seminarioj

N ^o	Loko	Periodo	Titolo	Kvanto de		
				Prelegoj	Partoprenintoj	
I/V				Loĝlokoj		
1	Harkiv	06 — 07.12.1980	Seminario de E-tradukistoj	5	50	?
2	Lviv	27 — 28.11.1981	Konferenco de klubvidantoj	9	50	13 *
3	Poltavo	07 — 09.05.1983	Seminario de E-instruistoj kaj konferenco de MEM-sekcio	10	75	25
4	Kievo	07 — 09.10.1983	Seminario de E-tradukistoj kaj klubgvidantoj (dediĉita al 40-jariĝo de Kiev-liberigo)	9	125	27 **
5	Poltavo	05 — 07.10.1985	Seminario de E-instruistoj kaj E-tradukistoj	13	72	14 *
6	Doneck	05 — 07.10.1986	Seminario de E-instruistoj kaj klubgvidantoj	11	70	16 *
7	Kievo	01 — 03.05.1987	Jubilea konferenco, dediĉita al 100-jariĝo de Esperanto	10	150	26 **
8	Luck	14 — 15.05.1988	Seminario de klubgvidantoj kaj aktivuloj	8	106	36 **
9	Poltavo	20 — 21.05.1989	3-a respublika Konferenco kaj seminario de klubgvidantoj	5	101	47 **

** Prezentiĝaj E-kolektivoj.

* Prezentiĝaj provincoj de Ukrainio;

УКРАИНСКОЕ РЕСПУБЛИКАНСКОЕ ОТДЕЛЕНИЕ
АССОЦИАЦИИ СОВЕТСКИХ ЭСПЕРАНТИСТОВ
ХАРЬКОВСКИЙ
ОБЛАСТНОЙ КОМИТЕТ ЛКСМ УКРАИНЫ
ХАРЬКОВСКИЙ ОБЛАСТНОЙ ЭСПЕРАНТО-КЛУБ

ПРОГРАММА
РЕСПУБЛИКАНСКОГО СЕМИНАРА
ЭСПЕРАНТИСТОВ-ПЕРЕВОДЧИКОВ

6—7 декабря 1980 г.
г. Харьков

Programo-invito de la seminario de tradukistoj en Harkiv vintre 1980

En 1973 li edziĝis, poste naskiĝis filino Zorjana kaj filo Vjaĉeslav, la tuta familio estas esperantista ¹⁰³.
22.09.1997 pro malsano li mortis.

LABORO DE LA INSTRU-METODIKA KOMISIONO (URF ASE)

**Facila, sed ne facilega,
Ĝi estas la lingvo belega.
Internacia komprenilo
Ne estas iudilo.
Por ĝin ekregi
Oni devas legi,*

*Multe paroli,
Ĉiun vorton kontroli,
Lerni insiste kaj volonte,
Skribi kaj rakonti.
Donace venos la kono
Al ĉiu persono*.*

Adolf A. Kerner

Tiun ĉi gravan agaddirekton gvidis sum la ASE-periodo 3 personoj. La unua, kiel jam estas notite pli supre, estis Aleksandr I. Koroleviĉ (Lviv), profesia instruisto (multajn jarojn li laboris kiel profesoro pri desegnado en unu el ĥovaj superlernejoj). Li gvidis la komisionon 3 jarojn — ekde la januaro 1980, kiam estis fondita URF ASE, ĝis fino de 1982, kiam en la Estraron de URF ASE estis kooptita Genadij M. Ŝilo (Slavjansk). Profesia juristo, advokato, li tamen havis grandan sperton pri instruado de Esperanto kaj estis bona organizanto. Lia gvidado de la komisiono daŭris ĝis la reelekta respublika konferenco (27.12.1986). Dum tiu konferenco la gvidadon pri la komisiono oni komisiis al Vasilij T. Gorbaĉuk (Slavjansk). Ankaŭ tiu estis profesia instruisto, specialisto pri ukraina lingvo kaj literaturo. Sed kiel organi-

¹⁰³ Tiuj ĉi donitaĵoj pri vivo kaj agado de Vladimir Miŝcenko prezentis nuna UkrEA-prezidanto V.V. Hordienko.

zanto Vasilij T. Gorbaĉuk tute ne havis sperton, kaj la gvidado ne sukcesis.

Komenca etapo en la laboro evidente estis la plej malfacila. Sed la komisionestro Aleksandr I. Koroleviĉ faris ne malbonan starton. Dum la unuaj du jaroj (1980 — 1981) estas preparitaj, pridiskutitaj kaj aprobitaj du programoj. La unua estis por fundamenta E-kurso, la alia — por studentaj la lingvon fakultative en altlernejoj kaj teknikumoj ĉe tiel nomataj FOP — tiu formo de edukado estis sufiĉe populara en nia lando, ja paralele kun la ĉefa profesio dezirantoj povis ekposedi iun alian, socian. Ankaŭ estis finpreparita por eldono kaj transdonita en presejon "Libro pri Esperanto", kiun oni povis uzi kiel lernilon. Ĝi estis eldonita en la jaro 1989.

Koroleviĉ Aleksandr Iosifoviĉ naskiĝis 09.02.1913 en Lviv en familio de grek-katolika pastro. Studis en Lvova politeknika instituto, kiun finis en 1940 (inĝeniero pri vojoj kaj pontoj).

Ekde 1948, kiam en Lviv estis fondita arbarteknika instituto, A.I. Koroleviĉ laboris en ĝi kiel instruisto pri geodezio, iom poste — pri desegnado. En 1953 li defendis kandidatan disertacion kaj plue li laboris jam kiel docento kaj profesoro (ekde 1973). Dum sia vivo A.I. Koroleviĉ verkis kaj publikigis pli ol 40 diversajn sciencajn kaj metodikajn librojn.



Aleksandr Iosifoviĉ Koroleviĉ

Pri Esperanto A.I. Koroleviĉ ekinteresiĝis, laborante en Ternopil en la 30-aj jaroj (li lernis tie en mezlernejo). Kiam en 1957 fama por Galicio esperantisto Anatolij Koŝ organizis E-kurson, A.I. Koroleviĉ finis tiun kurson kaj tuj poste komencis instrui la lingvon por komecantoj.

En 1974 ĉe Lvova Domo de sciencistoj estis fondita E-klubo "Primavero" (fakte ekde 1958 en la Domo de sciencistoj jam estis funkcianta E-kolektivo kiel sekcio, gvide de A. Koŝ, sed post ties morto en 1964 la sekcio ĉesis ekzisti), kiun gvidis ĝis sia morto A.I. Koroleviĉ. Estas interesa la vastplana laboro de la klubo. En ĝi estis funkciantaj sekcioj: MEM, inform-propaganda, scienca, instru-metodika, historia (pri E-movado), literatura, muzik-drama, turista, geografia...

Tuj post la fondo de URF ASE (ekde 1980) A.I. Koroleviĉ gvidis en ĝi instru-metodikan laboron (ĝis 1983), poste estis gvidanto-organizanto de jubileaj aranĝoj dediĉe al la 100-jariĝo de Esperanto.

Li multe okupiĝis pri literatura agado — tradukis en Esperanton poeziaĵojn el T. Ŝevĉenko, I. Franko, R. Gamzatov kaj aliaj poetoj. En 1989 estis eldonita ampleksa "Libro pri Esperanto". En 1993 en Ternopil aperis alia tla E-libro "Esperanto-ukraina frazlibro".

Kelkfoje A.I. Koroleviĉ partoprenis internaciajn E-aranĝojn: en Bulgario (1976, 1978), en Stokholmo (1980), en Ĉeĥoslovakio (1984), en Hungario (1989).

Ekde 1981 A.I. Koroleviĉ estis membro-subtenanto de Internacia E-Muzeo en Vieno.

Mortis A.I. Koroleviĉ la 21-an de novembro 1995.

La plej evolua periodo por la komisiono estis, kiam ĝin gvidis Gennadij M. Ŝilo. La plej gravaj meritoj de tiu gvidado estis:

- aperigo de regula informilo de IMK (la informilo estis lanĉita jam en la 1983 kaj aperadis ĝis 1990 — fine jam kiel informilo de UkrEA, organizaĵo, formita surbaze de URF ASE);

- rapida konsistigo de la komisiono — sekve la gvidanto ne laboris sola, sed kun bona "teamo", kien eniris fine de 1983 11 personoj:

1. Ŝilo Gennadij M. — Slavjansk, komisionestro,
2. Kornilov Vladimir A. — Doneck, vicedstro,
3. Cibulevskij Dmitrij M. — Ĥarkiv, membro de la komisiono,
4. Gorbaĉuk Vasilij T. — Slavjansk, membro de la komisiono,
5. Kerner Adolf A. — Ĥirovograd, membro de la komisiono,
6. Koroleviĉ Aleksandr I. — Lviv, membro de la komisiono,
7. Paĉjuiko Vladimir P. — Pustomiti, membro de la komisiono,
8. Pogorelaja Svetlana M. — Kievo, membro de la komisiono,
9. Vajnblat Semjon I. — Odeso, membro de la komisiono,
10. Vaŝĉišina Marija V. — Morŝin, membro de la komisiono,
11. Zimeis Leon Ŝ. — Ternopil, membro de la komisiono;

- okazigo de kelkaj seminarioj pri la temo — instru-metodika laboro en la respubliko (fakte jam dum la unua seminario de klubgvidantoj en Lviv fine de 1981 la komisionestro Aleksandr I. Koroleviĉ faris prelegon "Pri taskoj de instru-metodika laboro en la kluboj kaj ties koordinado kun la komisiono de URF ASE"); la unua respublikita seminario de E-instruistoj okazis 07 — 09.05.1983 en Poltavo;

- enkonduko de soc. konkurado inter la kluboj de la respubliko pri instru-metodika laboro.

Nun eblas iomete ilustrati la rezultojn de tiu aktivado pri la instru-metodika laboro (v. la tabelon).

Rezultoj de soc. konkurado pri instru-metodika laboro
inter E-kolektivoj en Ukrainio laŭ lernejaroj

NN I/V	Urbo	Nomo de E- klubo	1983		1984		1985		1986	
			1983	1984	1984	1985	1985	1986	1986	1987
1	Borispol	"Flugo"	107	10	56	12	49	10	—	—
2	Doneck	"Esperanto"	—	—	55	13	12	12	—	—
3	Feodosio		25	13	47	15	—	—	—	—
4	Ĥarkiv	"Optimisto"	274	2	275	2	150	7	—	—
5	Ĥerson		—	—	—	—	—	—	140	6
6	Ĥmelnickij	"Amikeco"	18	15	142	8	—	—	106	9
7	Ivano- Frankivsk	"Ĉekarpata stelo"	134	7	184	5	12	13	—	—
8	Jajta	"Verda haveno"	160	6	80	11	159	6	69	10
9	Kievo	"Ora pordego"	197	4	158	7	257	2	202	4

NN l/v	Urbo	Nomo de E- klubo	1983		1984		1985		1986	
			1983	1984	1984	1985	1985	1986	1986	1987
10	Kirovogrado		90		95					
			11		10					
11	Lviv	"Primavero"	166		173		250		205	
			5		6		3		3	
12	Morsin (Stril)	"Fajrero"	70		52		60		53	
			12		14		9		11	
13	Nikolajev		130							
			8							
14	Odeso	"Blanka akacio"	213		265		335		426	
			3		3		1		1	
15	Poltavo								181	
									5	
16	Poltavo (provinca)								115	
									8	
17	Rava- Russkaja	"Rava- Esperanto"			10					
					16					
18	Sevastopol'	"Velo"	21		134		117			
			14		9		8			
19	Slavjansk	"Esperanto"	318		283		164		220	
			1		1		5		2	
20	Terнопil	"Espero"	113		234		227		119	

NN I/V	Urbo	Nomo de E- klubo	1983		1984		1985		1986		1987	
			1983	1984	1984	1985	1985	1986	1986	1987	1987	1987
21	Vorošilovgrad	"Fajtero"	9	—	4	—	4	—	4	—	7	—
Kvanto da kur- sfinin- toj (sume)									22	11	?	?
			358		363				345		?	

Notoj:

- Supre estas notita kvanto da poentoj, perlaboritaj dum la lernojaroj kaj malsupre — okupita loko en la konkurado.
- Bedaŭrinde, multaj el respublikaj E-kolektivoj ne sendadis siajn raportojn, kaj nun ne eblas prezenti plenan bildon; ja sendube ĉie tra la respubliko okazadis E-instruado kaj estis iaj aktivecoj tiudirektaj.

Pri la informilo. Entute dum la jaroj 1983 — 1989 aperis 155 numeroj kun sume 411 paĝoj. Laŭjare la bildo aspektas tiel:

1983	— 15 numeroj	— 28 paĝoj,
1984	— 24 numeroj	— 49 paĝoj,
1985	— 24 numeroj	— 50 paĝoj,
1986	— 24 numeroj	— 61 paĝoj,
1987	— 16 numeroj	— 37 paĝoj,
1988	— 23 numeroj	— 72 paĝoj,
1989	— 29 numeroj	— 114 paĝoj.

La informilo estis vere utila por la agado de esperantistoj en Ukrainio. Necesis konsideri, ke tiuperiode krom ĝi kaj la "Informbulteno" de ASE estis eĉ ne unu regula informilo (tre populara ĉie tra la lando periodaĵo "Kurte" ĉesis ekzisti jam en 1982), kiu vaste informadis pri E-eventoj en nia lando kaj ekster ĝi. Kaj se konsideri, ke la "Informbulteno" estis presata en tre limigita kvanto kaj certe ne sufiĉis por ĉiuj enlandaj E-kolektivoj (jam ne parolante pri unuopuloj), do la informilo de IMK en la respubliko fariĝis sola.

Ne mirindas do, ke ĝiaj abonantoj estis ne nur en Ukrainio, sed en ĉiuj anguloj de USSR; kaj se komence en IMKI temis nur pri instrua kaj metodika agado en la respubliko (kaj en la lando), do poste la legantoj povis trovi en ĝi novaĵojn pri ĉiuj direktoj de la E-movado.

La seminarioj. Pli supre estis aperigita tabelo de respublikaj E-konferencoj kaj seminarioj, okazigitaj dum la tuta periodo de URF ASE (v. p. 172). En ĝi estas indikitaj 3 seminarioj por E-instruistoj, kiuj okazis:

- la unua — en Poltavo inter la 07 kaj 09 de majo 1983;
- la dua — en Poltavo inter la 05 kaj 07 de oktobro 1985;
- la tria — en Doneck inter la 06 kaj 07 de oktobro 1986.

Dum tiuj seminarioj estis prezentitaj pluraj prelegoj pri la temo, kiujn preparis tre spertaj E-instruistoj, inter tiuj — Leon Ŝ. Zimels, Irina G. Gonĉarova, Nikolaj N. Starodubcev, Vladimir A. Kornilov, Svetlana M. Pogorelaja kaj aliaj. Efektive okazis pli da seminarioj. La ceterajn oni povas nomi "regionaj". Tri el tiuj okazis en Slavjansk (novembre 1983, junio 1984 kaj novembre 1984) kaj ankoraŭ unu estis oktobre 1985 en

Kiŝinev dum la 13-a Kiŝinev-Odesa Renkontiĝo. Sekve pridis-
kuti la problemojn de la instruado kaj ties metodikon niaj E-
instruistoj povis sufiĉe ofte kaj efike. Ne estas nur klare, ĉu tiel
okazis aŭ tiuj seminarioj estis nur renkontiĝoj de bonaj amikoj.

Ĉi tie mi ne indikas konferencojn kaj eĉ "lernejojn" por E-
instruistoj, kiuj estis okazigataj pli vaste, ne por unu respub-
liko.

Kiel ekzemplon mi povas noti nur unu. Jen kion eblis legi
en IMKI N 20(59)/1985:

"Instruista kurso en Kose (apud Tallinn) okazis la 27-an de julio — 10-an
de aŭgusto. Ĝin gvidis Madis Linnamägi. La kurson partoprenis pli ol 70 per-
sonoj el 9 respublikoj. Dufoje ĉiutage okazadis prelegaroj, samtempe — in-
terŝanĝo de instruista sperto..."

Soc. konkurado inter E-kolektivoj. La Prezidio de URF ASE
plurfoje levis tiun demandon dum siaj kunsidoj, sed ne sukce-
sis enkonduki la soc. konkuradon inter la E-kolektivoj en la
respubliko. Tamen, almenaŭ pri unu agaddirekto la soc. kon-
kurado estis lanĉita. La komisionestro Gennadij M. Ŝiŝo ellabo-
ris sistemon de la taksado de aktivecoj pri instru-metodika la-
boro kaj laŭ ĝi kelkajn jarojn gvidis la resumadon.

Rezulte nun eblas ĉerpi el tiuj ciferoj, kiel agis niaj E-klubo-
j kaj kiom da kursfinintoj estis en la respubliko laŭjare (v. p.
177).

**POENTA SISTEMO DE LA SOC. KONKURADO
POR LA LERNOJARO 1984/1985**

NN l/v	Aktivecoj	Poentoj
1.	Eldonita aŭ multobligita lernilo	30
2.	Eldonita aŭ multobligita metodiko pri E-instruado	10
3.	Organizo de interregiona E-IM-seminario	10
4.	Publikaĵo beletra (poezia aŭ proza) en E-revuo aŭ gazeto, aperigo de kluba almanako (pli ol 10-paĝa)	10
5.	Aginta en la raporta periodo E-instruisto	5
6.	Partopreno en eksterlanda E-aranĝo	5
7.	Lekcio pri Esperanto por neesperantistoj	5
8.	Prezento de E-teatraĵo (pli ol 30-minuta)	5
9.	Publikaĵo pri E-IML en E-revuo aŭ gazeto	5
10.	Publikaĵo pri E-IML en IMKI aŭ alia E-periodaĵo	3

NN lv	Aktivecoj	Poentoj
11.	Publikigo pri E-IML en ASE-bulteno aŭ alia neesperantlingva periodaĵo	1
12.	Nova en la raporta periodo eksterlanda E-korespondanto	1
13.	Fininto de E-kurso en la raporta periodo	1
14.	Partopreno de 1 persono en E-tendaro aŭ alia interurba E-renkono	1
15.	Eldono aŭ multobligo de E-kantaro aŭ vortaro	20

Kompreneble, oni povas multe diskuti pri taŭgeco de la taksado de tiu/aliaj aktivecoj, sed gravas, ke la konkurado estis lanĉita kaj daŭris kelkajn jarojn.

Kaj ankoraŭ unu aktivecon indus mencii ĉi tie. Preskaŭ tuj post unu el respublikaj seminarioj Gennadij M. Ŝilo kompilis kaj multobligis materialojn de tiu seminario. Krome, en Slavjansk estis eldonitaj du almanakoj "Venko" kun beletra materialo (bedaŭrinde, mi persone tiujn almanakojn ne vidis).

Pri la laboro de nia tria komisionestro Vasilij T. Gorbaĉuk eblas skribi tre kurte, ĉar kiel organizanto li estis tute ne sperta.

Rezulte, la soc. konkurado inter la kluboj estis ĉesigita jam ekde lemojaro 1987/1988, post 1986 ne plu estis okazigataj respublikaj seminarioj por E-instruistoj; kaj la informilo de IMK aperadis nur dank' al ties nova redaktoro — Semjon I. Vajnbjat (Odeso).

Malgraŭ ĉio evidente eblas sume taksi la laboron de tiu komisiono kontentiga, ĉefe dank' al ties unuaj du gvidantoj Aleksandr I. Koroleviĉ kaj Gennadij M. Ŝilo.


LABORO DE LA RESPUBLIKA UKRAINIAJ MEM-SEKCIO

"En la sfero de ekstera politiko nia kurso estas klara kaj konsekvenca. Ĝi estas kurso de la paco kaj progreso"¹⁰⁴.

MEM-sekcio en Ukrainio estis fondita la 29-an de novembro 1980. Kiel ties gvidanto estis elektita sperta esperantisto V.P. Pacjurko, kiu gvidis ĝin ĝis la reelekta konferenco en 1986. Ŝanĝe al li estis elektita J.V. Lupickij, kiu, bedaŭrinde, ne tiom aktive okupiĝis pri la laboro.

Pacjurko Volodimir Petroviĉ (1943 —), filologo-ukrainisto, lerneja instruisto (nun laboras kiel direktoro en mezlernejo). Espe-

rantisto ekde 1958. Verkas poezion kaj prozon, tradukas (ĉefe el la ukraina). Publikadoj en "Paco", "Bulgara esperantisto", "Heroldo de Esperanto", "Ukraina stelo" k.a. Kompilis kaj redaktis la poezikolekton "Dumoj miaj, kantoj miaj" de T. Ŝevĉenko (la kolekto estas preta por eldono). Kelkfoja diplomito de la konkursoj "Muzo", okazantaj en Vilnius. Estris respublikan sekcion de MEM ĉe URF ASE, literaturan sekcion de UkrEA. Aŭtoro de ukraina-Esperanta vortaro. Partoprenis UK en Varna (Bulgario, 1978). Budapeŝto (Hungario, 1983). Varsovio (Pollando, 1987).



Volodimir Petroviĉ Pacjurko

¹⁰⁴ Laŭ la sendevia kurso de la paco kaj progreso. Materialoj de la Ekstervica Plenkunsido de CK KPSU la 11-an de marto 1985. Moskvo, APN, 1985, p. 15.

Por ilustri la agadon de la sekcio eblas noti kelkajn aktivecojn:

- MEM-sekcioj estis fonditaj kaj agis en 14 E-kluboĵ de la respubliko, inter tiuj la plej aktivaj estis en la kluboj de:
 - Poltavo,
 - Odeso,
 - Slavjansk,
 - Ivano-Frankivsĵk,
 - Doneck,
 - Jalta (E-klubo "TERO"),
 - Ternopiĵ,
 - Lviv,
 - Ĥarkiv;
- En 1981 — 1982 estis organizita kolektado de subskriboj sub la devizo "Ni ne permesu eksplodigi la mondon" (iniciato de la ĵurnalo "Komsomolskaja pravda");
- En 1983 estis efektivigita aktiva partopreno en la pacmarŝo de sovetia junularo;
- Konstante aperadis en diversnivelaĵ periodaĵoj en la lingvoj rusa kaj ukraina artikoloj sub komuna devizo "Esperanto servas al paco". Plej aktivis ĉi direkte M. Vaŝĉiŝina, I. Kiriljuk, I. Galajĉuk, S. Sonjaĉnij k.a.;
- Konstante oni tradukis pripacajn verkojn de ukrainaj verkistoj (por E-lingva gazetaro) kaj originale verkis en Esperanto. Avangardis N.M. Andrianova kaj V.P. Pacĵurko.

LABORO DE LA TRADUKISTA SEKCIO

"...Kion montris la pasintaj du kunvenoĵ?

Ili montris, ke verkemuloj bezonas esti aŭditaĵ-legitaĵ, ke la kontribuantoĵ ŝatas iom tro longe resti ĉe la podio...¹⁰⁵

Tiu ĉi sekcio estis organizita dum la Fonda Kunveno de la respublika filio de ASE kaj kiel ties unua gvidanto estis elektita mi. Tiu ĉi mia laboro daŭris ĝis la raportreelektita konferenco de URF ASE (decembro 1986), post kiu la gvidadon transprenis alia persono — Volodimir P. Pacĵurko.

¹⁰⁵ "Cerbe kaj kore", N 2, junio, 1990, p. 1 — 2.

Ne estas facile taksu la laboron, ĉu ĝi estis malbona aŭ kontentiga. Pli facilas evidente noti ĉion, kio estis farita dum tiu 10-jara periodo.

Povas esti, sufiĉus prezenti tri gravajn erojn en la laboro, kiuj regule okazadis. Tio estas seminarioj de tradukistoj, konkursoj por tradukistoj kaj aperigo de broŝuroj kun beletraĵoj kaj aliaj materialoj.

Pri la seminarioj. Entute estis organizitaj 3 seminarioj de tradukistoj (v. tabelon sur p. 172), dum kiuj pri tradukarto estis prezentitaj 14 prelegoj. Inter la prelegintoj estis vere spertaj kaj famaj esperantistoj Anatolij J. Gonĉarov, Vladimir V. Samodaj. Volodimir P. Pacjurko, Leon Ŝ. Zimels, Nikolaj F. Danovskij (foreste) kaj aliaj.

Eble indas indiki titolojn de kelkaj prelegoj, prezentitaj dum la seminarioj. Tio estis:

- A.J. Gonĉarov "Traduko de scienc-teknikaj tekstoj";
- A.J. Gonĉarov "Sufikso -UM- kaj ĝia uzado dum traduko";
- N.F. Danovskij "Kontribuo de rusa soveta poezio al beletra E-literaturo";
- N.F. Danovskij "Pri poezia traduko";
- V.V. Samodaj "Ĉefaj principoj de la traduko";
- B.V. Tokarev "Ritmoj de E-poezio";
- B.V. Tokarev "Traduko de poeziaj verkoj".

Iom pri la konkursoj, kiuj estis organizataj same regule kiel la seminarioj. Entute okazis 6 konkursoj por tradukistoj, kiujn partoprenis esperantistoj el 17 ukrainiaj kaj 17 alirespublikaj urboj. Sume ĉiujn 6 konkursojn partoprenis 70 esperantistoj kun 97 originalaj kaj tradukitaj kontribuajoj. Por la konkursoj estis proponataj temoj:

- originala kaj tradukita poezio;
- tradukita populara fabelo;
- originala kaj tradukita humuraĵo;
- tradukitaj porinfanaj kaj prinaturaj rakontoj kaj aliaj.

**TABELO DE PARTOPRENO EN LA TRADUKISTAJ KONKURSOJ
DE LA TRADUKISTA SEKCIO ĈE URF ASE**

Urboj-partoprenintoj	1980	$\frac{1981}{1982}$	1983	1984	1985	1986
1. Ukrainio:						
1.1. Ĥarkiv	1	1	1	1	—	1
1.2. Kievo	2	1	2	—	—	—
1.3. Poltavo (kun la provinco)	2	—	—	—	—	—
1.4. Lviv	1	—	1	—	—	—
1.5. Krasnoarmejsk	2	1	—	—	—	—
1.6. Feodosio	3	—	—	—	—	—
1.7. Sebastopolo	—	2	—	—	—	1
1.8. Eŭpatorio	—	—	1	—	—	—
1.9. Zaporolje	—	1	1	—	—	—
1.10. Krivij Rig	—	1	1	—	—	—
1.11. Nikolajev	—	2	3	2	—	—
1.12. Ĉernigiv	—	—	1	—	—	—
1.13. Slavjansk	—	—	3	—	—	—
1.14. Ternopil	—	—	1	—	—	—
1.15. Moršin	—	—	1	—	—	—
1.16. Popasnaja	—	—	—	1	—	—
1.17. Ivano-Frankivs'k	—	—	—	1	—	1
Sume	11	9	16	5	—	3
2. Aliaj respublikoj:						
2.1. Leningrado	—	2	2	—	2	—
2.2. Kislovodsk	1	—	—	—	—	—
2.3. Krasnodar	—	1	—	—	—	—
2.4. Jesentuki	—	1	1	—	—	—
2.5. Taganrog	—	1	—	—	—	—
2.6. Smolensko	—	1	1	1	1	1
2.7. Sterlitamak	—	1	—	—	—	—
2.8. Salavat	—	1	—	—	—	—

Urboj-partoprenintoj	1980	$\frac{1981}{1982}$	1983	1984	1985	1986
2.9. Tifvin	—	—	3	—	—	—
2.10. Altaja provinco	—	—	1	—	—	—
2.11. Volgogrado	—	—	1	—	—	—
2.12. Bakuo	—	—	1	—	—	—
2.13. Minsko	—	—	—	—	1	2
2.14. Ĉkalovsk	—	—	—	—	1	—
2.15. Georgievsk	—	—	—	—	1	—
2.16. Kemerova provinco	—	—	—	1	—	—
2.17. Jelec	—	—	—	—	1	—
Sume	1	8	10	2	7	3
Entute	12	17	26	7	7	6

Ankoraŭ unu agaddirekton, pri kiu okupiĝis la tradukista sekcio, eblas noti ĉi tie. Ĝi estas la eldonlaboro. Vere, dum la periodo de ASE oni fakte ne permesis oficiale okupiĝi pri la eldonado. Tio estis privilegio de superaj instancoj; tamen, tutegale esperantistoj serĉis ajnajn vojojn por fari ankaŭ tiun laboron (v. "Ekstercenzura E-literaturo").

La tradukista sekcio sukcesis kompili kaj multobligi preskaŭ 10 broŝurojn (la liston de la broŝuroj v. en la suplementa parto).

Mi povas aldoni al tio ankoraŭ, ke iom da atento estis donita (bedaŭrinde ne tiom multe) al preparo de Ukrainia antologio. Sed tiu vere kolosa laboro estas nur en komenca periodo. Malgraŭ tio ĝi estas ege bezonata kaj fari ĝin devas pli liberaj, spertaj kaj kompetentaj esperantistoj.

LABORO DE LA KOMISIONO PRI INTERNACIAJ LIGOJ (URF ASE)

"Ukraina SSR ludas aktivan rolon en internacia vivo, gvidas lenin'an politikon de paco kaj amikeco inter popoloj, politikon de firmigo kaj evoluigo de ekonomiaj, kulturaj kaj societaj ligoj inter ŝtatoj, sendepende de lia socia ordo"¹⁰⁶.

Se en la tutlanda E-organizaĵo estis ia agado de la komisiono pri internaciaj ligoj, almenaŭ kelkaj pozitivaj momentoj, pri kio jam temis pli frue, do pri la laboro de la komisionoj en ASE-filioj mi ne povus esprimi saman opinion.

En la Ukraina ASE-filio al la posteno de la komisionestro komence oni elektis montrintan sin aktiva Nikolaj I. Maliŝko. Fininta Ĥarkovan juran instituton, li translokiĝis en Kievon kaj tie faris bonan bonan ofican karieron — preparis kaj defendis kandidatan disertacion kaj laboris kiel scienclaboranto en scienc-esplora instituto pri la ŝtato kaj juro de la respublika Sciencakademio.

Tamen, kiel evidentiĝis, lia aktivado estis ne pli ol bela babilado kaj tuj post la Fonda kunveno li faris nenion por la komisiono kaj nenion por la E-movado entute. (Same estis ankaŭ poste — kiam li reaperis en la movado, denove estis elektita jam en UkrEA-Estraron kaj denove nenion faris...)

Preskaŭ samjare Nikolaj I. Maliŝko estis eksigita el la Prezidio kaj Estraro de la ASE-filio. Kaj la taskojn, tiujn ne multajn taskojn de la komisionestro, transprenis la Prezidanto Jekaterina V. Majburova, al kiu helpis (post 1986) novelektita vicprezidanto Jevgenij N. Kovtonjuk.

Pri la potenco de la komisiono eblas juĝi el la decido de Prezidio, akceptita 16.04.1980:

"...organizo de eksterlandaj vojaĝoj estas ekster kompetenco de URF; la problemoj devas esti decidataj en ĉiu aparta kazo surloke de

¹⁰⁶ "Ukraina Soveta socialisma respubliko", Kievo, eldonis Ukraina SA, 19??, p. 20.

USA¹⁰⁷, sindikataj kaj komsomolaj organizadoj, kiuj laŭ anticipaj pet-skriboj inkludas esperantistojn en siajn turistajn grupojn aŭ (se eblas) organizas specialajn grupojn de esperantistoj, ĉe subteno de la Prezidio de URF ASE. Kandidatecoj de esperantistoj, inkludataj en la turis-tajn grupojn, estu konfirmataj en la kunsidoj de la URF-Prezidio..."

Tiu decido klare montras, ke fakte la komisiono estis denaske nelaborpova. Ĉiujn eksterlandajn vojaĝojn planis, kompiladis la grupojn nur la centra komisiono en Moskvo (alivorte — SSOD-oficialuloj); kaj la kandidatojn el la respublikoj proponadis Prezidioj de ASE-filioj. Kiel ekzemplo mi ŝatus prezenti al vi ankoraŭ unu decidon de Prezidio de URF ASE¹⁰⁸:

"... rekomendi 2 membrojn de E-klubo el Siavjansk, 2 membrojn de Poltava E-klubo kaj 1 membron de Lvova E-klubo kiel kandidatojn por veturi en Bulgario en la konsisto de speciaa turista grupo aŭguste 1984; rezervo — 2 membroj de Kieva E-klubo..."

Do, eblas evidente resumi, ke la laboro de la komisiono tute "ne floris".

LABORO DE LA JUNULARA KOMISIONO ĈE URF ASE

"La estonteco estas multe determinata per tio, kamaradoj, kian junularon ni edukas hodiaŭ. Tio estas la tasko de la tuta partio, de la tuta popolo..."¹⁰⁹

Estas malfacile prilumi tiun ĉi agadon de esperantistoj, ĉar preskaŭ tute ne restis spuroj pri ĝi. Feliĉe post mia kelkfoja peto la eksgvidanto de la komisiono faris por mi kvazaŭ raporton pri tiu agado. Kaj mi povas nur enmeti ĝin ĉi tien eble eĉ sen aldonaj komentoj.

Do:

¹⁰⁷ Ukraina Societo de Amikeco.

¹⁰⁸ La prezidikunsido okazis 31.05.1984.

¹⁰⁹ Miĥail Gorbaĉov "Politika raporto de Centra Komitato de KPSU al la 27-a Kongreso de la partio". Moskvo, APN, 1986, p. 67

"Respondeci pri junulara agado de Ukraina ASE-filio mi bonŝancis dum relative favoraj tempoj: tiu periodo estis dua ondo de disfloro de Esperanto inter junularo en Sovetio.

Malgraŭ la registara kontrolo kaj severa patronado la agado estis dank' al entuziasma antaŭenpuŝado de SEJM-anoj. Ili alportis romantikon, inspiron kaj energion de glora SEJM. Pro la tempo ĉiuj aktionuloj maturiĝis kaj dum ASE-periodo ili, kritikante oficialigon kaj "katenigon" de la movado per ASE-fondo, tamen pozitive influis al la E-aferoj, movante ĝin antaŭen, fakte (!).

Tiamaj oficialaj instancoj (Komsomola Unio, Sindikatoj, Ukraina SA) postulis apartajn listojn de junaj esperantistoj, apartan planon de la junulara laboro kaj raportojn pri ĝi. Ni tion plenumis, sed por mi persone tiam (kaj ĝis nun!) tiu "eltranĉado" estis stranga, ĉar la tuta tendara, turisma kaj kultura esperantista vivo ĝuste estis la junulara!

Anoj de la junulara komisiono de URF ASE estis Aleksandr Griŝenko, Vladimir Gordienko, Svetlana Fedotova. Ili mem (ĉiu) gvidis E-kursojn, rondetojn. Tintempe E-organizaĵoj (kolektivoj) estis en proksimume 20 provincoj de Ukrainio. Dum unu jaro en ĉiu regiono (okcidenta: Lviv, Ivano-Frankivsk, Ternopil, Kamjanec-Podilskij, Ĥmelnickij; orienta: Ĥarkiv, Doneck, Poltavo, Zaporijja, Slovjansjk; suda: Jalto, Odeso, Ĥerson, Mikolajiv; centra: Kievo, Ĉernigiv, Sumi) okazis po 3 - 4 E-aranĝoj de malgrandaj (po dekoj da esperantistoj) ĝis grandaj (preskaŭ centoj da personoj).

Ni menciis nur kelkajn el ili: "Velura sezono", "Vintro apud Ĥarkovo", "Hoverlana" (karpatia supreniĝo, dediĉita al venkotago), "Vintraj karpataj fabeloj" (renkontiĝoj apud Zbruč), Dnistraj Esperanto-ekologiaj ekspedicioj (navigadoj), apudkievaj aranĝoj, bicikladoj k.t.p. Esperantista junularo povas nomi tiun periodon periodo de belegaj kartoj de Volodja Soroka. Verŝajne sub tiu muzika stelo mi povos iom trakti ĝin. Krom la ensemblo de V. Soroka kaj Marina

Korotj¹¹⁰ funkciis ankoraŭ kelkaj junularaj kantgrupoj, inter ili: ĉe E-klubo "Primavero" (Lviv, ĝin gvidis Olena Kopistjanskaja), "Blanka akacio" (Odoso), ĉe E-klubo el urbo Slavjansk, "Ĉekarpata Stelo" (Jvano-Frankivs'k)...

Junularo de URF ASE abunde partoprenis ankaŭ multnombrajn regionajn E-aranĝojn, tutsovetiajn E-tendarojn, renkontiĝojn, feriadojn, estis en la grupoj (vere ne multnombro), kiuj partoprenis internaciajn E-aranĝojn en Pisanica, Poprad ks.

Problemo estis: ni povis Esperantumi plejparte ene de Sovetstataj limoj; viziti eksterlandajn E-aranĝojn povis nur oficialuloj. Eĉ se eblis pleneleĝe kolekti monon por tiuj vojaĝoj, aliĝi al ia specializita turista grupo por junularo ne eblis¹¹¹. Restis do por ni nur korespondaj kontaktoj. Ŝtataj reguloj malhermesis privatajn vojaĝojn al leteramikoj. Ankaŭ inviti E-amikojn el eksterlando ni ne povis¹¹².

Ĉi-rilate mi povas mencii jenon — dum 2 raportperiodoj ni ne sukcesis efektiviĝi junularan labortendaron en Ukraina SSR, malgraŭ tio, ke ĝi estis planita ambaŭfoje en Vorosiloograda provinco¹¹³ (Jvano-Frankivs'ka provinco, ekz., estis tute fermita oficiale por eksterlandaj turistoj ĝis 1988!). Ĉiam okazis iuj "malfacilaĵoj", kiam organizantoj sin turnis al oficialaj instancoj por ricevi necesajn permesojn.

Informon pri ĉiuj grandaj kaj malgrandaj planataj (kaj okazigitaj jam) E-aranĝoj estis aperigataj en esperantista gazeto: kaj en Informilo de JMK ĉe URF ASE, kaj en tutlandaj E-presorganoj, kaj en la eksterlandaj.

¹¹⁰ Ambaŭ muzikistoj-kantistoj apartenis al la sama muzik-ensemblo "Inspiro".

¹¹¹ Iom pri tio estas notite ankaŭ en la ĉapitro "Laboro de la komisiono pri internaciaj ligoj (URF ASE)".

¹¹² Malgraŭ tiu aserto oni tamen veturadis eksterlanden laŭ privataj invitoj kaj same estis akceptataj gastoj el eksterlando.

¹¹³ Evidente temas pri Donecka provinco, ĉar ĝuste tie, proksime de Slavjansk, estis planataj tiuj respublikaj E-tendaroj.

Aparte en la komisiono ni taksis, kaj ĝuste tio postulis specialan rilaton kaj metodon de laboro, — la infan-junularan agadon.

Ĉi-direkte laboris Anna Vojnaroviĉ (Aodejevka, Donecka provinco), Svetlana Pogorelaja kaj Svetlana Fedotova, Miliĥail Lineckij kaj Katerina V. Majburova (ĉiuj el Kievo), Tatjana Anderskaja (Odeso). Ĉiujare funkciis ĉe URF ASE 4 — 5 grupoj de lernejanoj (po pr. 14 — 20 personoj en ĉiu).

Mi nur menciis, ke la laboro kun lernejanoj, instruado por ili, laboro en rondetoj postulis veran talenton ĉe la gvidantoj. Dank' al ilia laboro esperantistaro ricevis multajn adektojn, potencialajn esperantistojn.

Resumante eblas esprimi jenan opinion: kaj mi, kaj aliaj anoj de la junulara komisiono estas kontentaj pri la aktivado dum ASE-periodo.

Kaj ankoraŭ kelkaj resumdinioj:

- junaj esperantistoj ne emas (eble, pro ĥigreco) preparadi skribajn raportojn pri la efektivegita laboro. Pro tio niaj raportoj ne abundis je ciferoj, okazaĵoj, malgraŭ tio, ke surloke ili estis, kaj la junularo ilin organizis, partoprenis kaj organizas ankaŭ nun, allogante al E-ideo multnombrajn siajn amikojn;*
- instruado de la Lingvo Internacia sen transdono al la instruatoj de internacia ideo de Esperanto ne esperantigas la homojn; ni ĉiam memoru tion por prospero de Esperanto.*

Jaroslav Zakarija

20.12.1997"


**KELKAJ AKTIVULOJ DE LA E-MOVADO
EN UKRAINIO DUM ASE-PERiodo**




V.A. Miščenko, Kijiv



M.J. Lineckij, Kijiv



S.I. Vajnblat, Odeso




V. Kononjuk, Kijiv (nun — Germanio)



J. Zaharija, Ivano-Frankivsk



J.V. Lupickij, Ĥarkiv



N.N. Starodubcev, Doneck



S.M. Pogorelaja, Kijiv

AGADO DE KARTVELA RESPUBLIKA FILIO DE ASE

— Kion Vi faras nun?

— Mi finpreparis por eidono aforismojn el la poemo "Kavaliro en tigra felo" de Ŝota Rustaveli..."¹¹⁴

La Kartvela respublika filio de ASE estis fondita la 08-an de oktobro 1983. Laŭ "Informbulteno" de ASE (N 1 [39]/1984, p. 11), kie oni aperigis informon pri la fondo de la filio, estas notite, ke en la respubliko funkciis tiuperiode 10 E-kolektivoj¹¹⁵. Krome estis ĉe Instituto pri fremdaj lingvoj de Tbilisi socia fakultato (FOP) pri lernado de Esperanto.

Estis elektita 23-persona Estraro. Kiel prezidanto estis elektita I.M. Tabagua; 4 vicprezidantoj fariĝis D.M. Ioseliani, G.K. Tkeŝelaŝvili, L.M. Toidze kaj E.N. Kapanadze.

Komisionestroj en la filio —

- E.N. Kapanadze — instru-metodika komisiono,
- G.K. Tkeŝelaŝvili — scienc-teknika komisiono,
- V.A. Cukuriŝvili — kultura komisiono,
- I.M. Topuridze — virina komisiono,
- M.A. Cukrikidze — infana komisiono...

Ĉi tie mi devas denove esprimi domaĝon, ke mankas pli vastaj materialoj por prilumi la agadon de esperantistoj en tiu kaŭkaza respubliko. Nek en la "Informbulteno" de ASE, nek en internacia E-gazetaro estis aperigataj iuj informoj. Kaj kontaktoj kun tieaj esperantistoj ĉe mi, bedaŭrinde, mankas. Des pli nun, en tiuj novaj kondiĉoj.

¹¹⁴ Laŭ intervjuo de G. Korotkeviĉ kun la tradukinto de la poemo "Kavaliro en tigra felo" de Ŝ. Rustaveli en Esperanton Zurab Makaŝvili — "Informbulteno de ASE" N 2—3 (29—30)/1983, p. 30—31; fine de 1983 eldonejo "Mecniereba" aperigis la libron kun aforismoj el la poemo en la lingvoj kartvela kaj Esperanto (fine de la libro — kurta Esperanto-kartvela vortaro). La plena poemtraduko aperis en Tbilisi en 1989.

¹¹⁵ Fakte laŭ la sama "Informbulteno" — N 10-11(48-49)/1984, p. 10 — registritaj estis nur 4 kolektivoj (en Tbilisi — 2, en Batumi kaj Suĥumi po 1); kaj en "Informbulteno" N 3 (69)/1988, p. 15 — 5 E-kolektivoj (aldoniĝis ankoraŭ unu en Tbilisi).

AGADO DE KRASNODARA REGIONA FILIO DE ASE

"Krasnodar (ĝis 1920 Jekaterinodar) — urbo en Rusia Federacio, centro de Krasnodara regiono..."¹¹⁶

La fonda konferenco de la filio okazis 29.04.1984. Ĝin partoprenis 60 delegitoj el 8 kluboj kaj rondetoj kaj 20 gastoj. Bedaŭrinde, pro ne klaraj kialoj ĝis 1984 laŭ informoj en "Informbulteno" de ASE estis registritaj en la regiona filio nur 2 E-kolektivoj (en Krasnodar kaj Novorossijsk), eĉ mankis malnova E-klubo de Soĉi¹¹⁷; kaj en 1988 tiu nombro estis kreskinta ĝis 4 (en Krasnodar, Armavir, Novorossijsk, Soĉi)¹¹⁸. Sed estas interese, ke en N 10 (majo 1984) de la revuo "Bloknot propagandista" ("Notlibro por propagandisto") de krasnodara regiona partia organizaĵo estis publikigita informo de A. Ivasko pri E-agado en la regiono, pri la okazinta fonda konferenco de la filio. Laŭ ĝi en Krasnodar mem estis proksimume 250 esperantistoj, ne konsiderante 700 kursfinintojn.

Kelkaj aktivecoj de esperantistoj de la filio:

- En 1984 okazis 2-foje televidelsendoj (po 15 minutoj) kaj 3-foje radioelsendoj per urba radioondo;
- Ekde 29.04 ĝis 02.05.1985 tuj post la fonda konferenco okazis E-renkontiĝo de Sudrusio, kiun partoprenis krom la suprenotitaj 80 personoj ankoraŭ 40 gastoj el Kislovodsk, Novoĉerkassk, Rostov/Don, Ŝaĉti, Jalta (10 el ĉiuj estis nevidantaj esperantistoj);
- Komence de januaro 1986 okazis kunsido de regiona sekcio de nevidantaj esperantistoj;
- Novembre 1986 en Novorossijsk okazis sudrusia E-renkontiĝo, kiun partoprenis 36 esperantistoj.

¹¹⁶ El ruslingva CD-enciklopedio "Kiril kaj Metodi".

¹¹⁷ "Informbulteno" de ASE N 10-11 (48-49)/1984, p. 2.

¹¹⁸ "Informbulteno" de ASE N 3 (69)/1988, p. 6. [Pro nekomprenebla kaŭzo en la listo de ASE-filioj (p. 4-5) la Krasnodara mankas].

AGADO DE ESPERANTISTOJ EN UZBEKIO

Uzbekio (Respubliko Uzbekio) — ŝtato en Meza Azio (447,4 mil kvadrataj kilometroj) kun loĝantaro 21179 mil personoj (1992), ĉefe uzbekoj laŭ nacieco. La ĉefurbo estas Taŝkento¹¹⁹.

Uzbekio estis sola el Mezaziaj respublikoj, kie estis E-agado, en la ceteraj (Taĝikio, Kirgizio, Turkmenio) estis nur esperantistoj-soluloj aŭ ne vastaj kaj ne aktivaj E-kolektivoj (ekz., en Duŝanbe — Taĝikio)¹²⁰. Ŝajnas, ankaŭ nun la situacio ne ŝanĝiĝis.

Dum la periodo, kiam ĉe SSOD ekzistis Esperanto-komisiono (antaŭ ASE-fondiĝo), ankaŭ ĉe Uzbeka Societo de Amikeco funkciis Esperanto-komisiono. Kaj post apero de ASE tiu komisiono ne ĉesis ekzisti, ne reformiĝis je ASE-filio (des pli, ke en la respubliko aktive agis esperantistoj nur en la ĉefurbo Taŝkento kaj Samarkando); lokaj esperantistoj opiniis superflua ŝanĝi la kutiman strukturon, ja ĝi ne malhelpis al ili bone prezenti sian agadon.

Malgrandaj notoj: en Samarkando E-kolektivo (KID "Esperanto") estis fondita en 1978; la fondintoj — elektromuntisto Anatolo Ionesov, docento de loka medicina instituto Vladimir Lemelev, studento de fremdlingva fakultato ĉe Samarkanda universitato Ŝavkat Ĥamrakov kaj sekretario de urba komsomolkomitato Lenuze Keljamova. Ĉefaj agaddirektoj de la klubo: korespondado kun eksterlando (estis korespondigoj kun esperantistoj el trideko da landoj); vesperoj de amikeco; konstantaj ekspozicioj pri diversaj temoj; studentaj sciencaj konferencoj pri interlingvistiko kaj esperantologio...). Ekde novembro 1979 en Samarkando aperis dua E-kolektivo — E-fakultativo ĉe mezlernejo N 29; poste (en 1981) aperis ankoraŭ unu E-fakultativo ĉe mezlernejo N 46).

Laŭ statistikajoj de 1979 en Uzbekio estis entute 4 E-kolektivoj — Taŝkenta E-klubo ĉe Domo de sciencistoj; KID "Esperanto" ĉe Samarkanda komsomola urbkomitato; sekcio de junaj esperantistoj-sciencistoj ĉe Uzbeka Komsomola CK kaj E-komisiono ĉe Uzbeka Societo de Amikeco. Entute tie estis proksimume 200 esperantistoj. La tutan re-

¹¹⁹ El ruslingva CD-enciklopedio "Kiril kaj Metod".

¹²⁰ Dum USSR-tempo Kazaĥio estis konsiderata aparte de Mezaio. Ankaŭ en ĝi ne estis vasta E-agado. Tamen, en ĝi funkciis ne malaktive E-klubo de Ustj-Kamenogorsk.

spublikan E-laboron gvidis tiama prezidanto de la E-komisiono K. Ŝakirov.

Komsomola CK de Uzbekio en 1981 (la 24-an de januaro) pro internacia edukado de junularo enmanigis honorfoliojn al M.M. Abbasov, A.I. Ionesov, V.R. Lemelev (ĉiuj el Samarkando) kaj V.P. Masakin el Taŝkento.

La 20-an de junio 1981 A.I. Ionesov defendis en Samarkanda universitato diplomverkon "Kelkaj specifajoj en frazeologio de la angla lingvo kaj Esperanto".

Pli supre jam estis notitaj kelkaj aktivecoj de esperantistoj el Uzbekio (konstantaj prelegoj pri interlingvistiko kaj esperantologio dum sciencaj studentaj konferencoj en Samarkanda superlernejo, ekspozicioj...).

Notindas organizita en 1981 jaro la tradicia por Sovetio ORSEJT-23 apud Taŝkento. Ĝin partoprenis 315 esperantistoj el 77 loĝlokoj. Menciindas, ke dum la tendaro estis okazigita enketado (bedaŭrinde, ne restis ĝiaj spuroj).

Kelkfoje uzbekiaj esperantistoj okazigadis siajn respublikajn E-aranĝojn — la unua estis organizita 15 — 16.12.1979 (par-toprenis ĉ. 50 esperantistoj); la dua — en Samarkando 26 — 28.04.1980 (partoprenis ĉ. 100 esp.); la kvara — en Samarkando (17—19.04.1981)¹²¹ ...

Konstante aktivis samarkandaj esperantistoj. 23.05.1981 per loka televidstacio okazis 40-minuta televidelsendo pri KID "Esperanto". La 21-an de decembro 1981 en Samarkando okazis solena inaŭguro de loka regionesplora muzeo, en kies ĉambro, dediĉita al historio de komsomolo, estis materialoj pri internaciaj ligoj de samarkandaj esperantistoj. Kaj en 1986 — estis organizita socia muzeo de paco kaj solidareco, kiun iniciatis KID "Esperanto".

Aktive laboris uzbekiaj esperantistoj pri literaturo. La forpasinta Roman Grinŝpan multe okupiĝis pri tradukado de diversaj verkoj¹²². En bona literatura stilo faras tradukojn Eŭge-

¹²¹ Ankaŭ ĉi tie mi ne povas prezenti ĉiujn bezonatajn ciferojn kaj faktojn.

¹²² En 1998 aperis infanlibreto kun traduko de R. Grinŝpan kaj E. Perevertajlo. Ĝi nomiĝas "Telefono" de Kornej I. Ĉukovskij.

no Perevertajlo. HEA en 1982 eldonis tradukitan de li romanon de A. Gajdar "Timur kaj lia taĉmento".

Bonaj kontaktoj kun gazetaro permesis interkonsenti pri aperigo de E-lecioj surpaĝe de uzbekia revuo "Soveta Uzbekistano". Ĝuste tiu revuo (de la Uzbeka Societo de Amikeco) komencis ekde januaro 1982 aperigadi esperantlingvan aldonon (rotaprinte, 8-paĝan)¹²³.

Aktivis uzbekiaj esperantistoj ankaŭ dum tutlandaj E-aranĝoj. La sama E. Perevertajlo kontribuis al la programoj per instruado ĉe paroligaj kursoj. Estante bona instruanto, poste li uzis siajn kapablojn, vizitante Francion (kastelon Grésillon) kaj gvidante tie perfektigajn kursojn. Diversgradajn E-kursojn li gvidis ankaŭ dum siaj vizitoj de Taĝikio, Hungario, Italio, Germanio. La E-kursojn, gvidataj de li, vizitadis ankaŭ studentoj el Azio, Afriko kaj Suda Ameriko, lernintaj tiuperiode en superlemejoj de Taŝkento.

Uzbekio estas sufiĉe alloga terpeco el turista vidpunkto. Ĝuste pro tio kelkfoje uzbekiaj esperantistoj akceptadis alilandajn gastojn, kiuj vizitadis la orientan respublikon kun turistaj grupoj kaj memstare. 10.04.1982 Uzbekion vizitis grupo de svedaj esperantistoj (poste ankaŭ maje 1984), 27.12.1982 kun anglaj turistoj — sekretario de Londona E-klubo, 21.02.1983 — geedza paro el Finnlando.

Kaj pri ekspozicioj. En Samarkando, eble, ĉiujare estis organizataj grandampleksaj diverstemaj ekspozicioj. Iuj estis dediĉitaj al iu certa lando (al Bulgario, GDR, Vjetnamio...), aliaj — pli ĝeneralaj (ekz., "Uzbekio per okuloj de eksterlandaj amikoj").

Ŝajnas, nur en Taŝkento estis interkonsento kun loka ekskursburoo pri ebleco mendi ĉiĉeronon, kiu povus organizi ek-

¹²³ Nuntempe la revuo nomiĝas "Uzbekistan-Contact" kaj aperas en 10 lingvoj.

Entute aperis 23 tutpaĝaj E-rubrikoj kun 22 lecionoj en uzbeka, rusa, germana, angla, araba, persa, urdua, hispana, franca kaj daria lingvoj. Bedaŭrinde, tiun unikan fenomenon la E-mondo ne aprezis plenmezure. Almenaŭ pri tio eĉ ne unu anonco, recenzo, sciigo pri abonebleco ks. aperis en E-gazetaro (noto de E. Perevertajlo).

skurson esperantlingve. Tio ne signifas, ke en aliaj urboj de la lando ne estis homoj, pretaj gvidi similan ekskurson Esperante, sed ne estis oficiala interkonsento.

AGADO DE SOVETIAJ ESPERANTISTOJ EKSTER ASE

Nikolaj M. Fedotov (1902 — 1998) forpasis la 14-an de aprilo en Novoĉerkassk (Rusio). Esperantisto ekde 1916, li agadis en la jaroj 20-aj organize, varbe kaj per artikoloj. En la 70-aj jaroj li aktiviĝis kiel tradukisto: liaj esperantigoj el la poezio de i.a. Puŝkin, Lermontov, Fet kaj Gorĵkij aperis en "Literatura Foiro", "Paco" k.a.¹²⁴

"Tamen restis granda baro
Sur la voj' de leporaro:
Pleje gravis kverka vol'
Por la sorto de l' popolo!"¹²⁵

Ne necesas kompreni, ke dum la ASE-periodo ĉio en la lando estis farata kadre de tiu Asocio. Fakte multaj aktivajoj okazadis kontraŭvole de la centra organizaĵo, kiu strebis ĉiel malpermesi tiujn.

Tiel estis, ekzemple, pri fama "Kurte". La Asocio ne havis rapidan enhavoriĉan informan periodaĵon. Kaj S. Gaidamaviĉius daŭrigis eldonadi popularan dum la SEJM-a tempo informilon "Kurte", kiu regule kaj konstante prezentis al vasta E-rondo freŝajn kaj aktualajn novaĵojn. Sed la oficialuloj ne bonvenigis tiun ekstercenzuraĵon kaj en 1982 strikte malpermesis ĝin. Mem S. Gaidamaviĉius estis punita.

Ne enkadre de ASE agis niaj literaturistoj. Nadija M. Andrianova-Hordienko senĉese laboris kaj sukcesis dum ASE-periodo aperigi du librojn: "Ukrainaj popolaj fabeloj" (ŝiaj tradukoj; eldonis BEA, 1983) kaj "Vagante tra la mondo maltrankvila" (eldonis HEA, 1987).

¹²⁴ "Esperanto", N 10 (1107)/1998, p. 184.

¹²⁵ B. Tomado [B.V. Tokarev] "La leporoj en arbaro" — "Cerbe kaj kore" N 7 (38)/1996, p. 5.

En la revuo "Hungara vivo" estis konstante presataj versaĵoj de alia ukraina E-poeto el Simferopolo — Mikaelo Ternavskij. Bedaŭrinde, aŭguste 1998 li mortis. Liaj multnombraj versaĵoj estas disigitaj tra E-gazetaro.

E. Belonenko el Rostov/Don kaj V. Glazunov el Voroneĵ konstante partoprenis Belartajn Konkursojn de UEA (v. la ĉapitron "Agado de la kultura komision de ASE"); krome ĉe la eldonejo "Fonto" en 1988 aperis libro de V.A. Glazunov "La Sfinkso de Steplando".

Ne malpli fama estis ankoraŭ unu tradukistino — Antonina Romanovna Tonti. Ŝiaj multaj tradukoj aperadis konstante en "Paco", "Bulgara Esperantisto", en aliaj eldonaĵoj. Partoprenis ŝi ankaŭ konkursojn "Muzo"...

Nikolaj Faddejeviĉ Danovskij — ankoraŭ unu eminenta esperantistoj por la tuta lando, fame konata ankaŭ tra la tuta mondo. Laŭ miaj scioj li ne sukcesis trovi iajn kontaktojn kun ASE kaj ties filio kaj devis aktivigi memstare. Kelkfoje li proponadis al "Informbulteno" de ASE siajn artikolojn pri diversaj temoj, sed ial tiuj ne estis akceptitaj.

Eblas aldoni, ke li ne ĉesis aktivigi. En 1983 aperis lia libro (ekstercenzure) "Vvodnoje slovo v iskusstvo perevoda" ("Enkondukata vorto en la tradukarton"), preparita de handikapita esperantisto N. Griŝin por la eldono kaj multobligita en Ĥarkiv. Kiam la tuta eldonkvanto estis elĉerpita, en Kaunas oni reeldonis ĝin. Fine de la 80-aj jaroj li preparis sian libron "Meditoj" kun aro da artikoloj pri lingvistika, historia kaj literatura temoj. La libro (same ekstercenzure) aperis en 1990.

En ukraina urbo Berdjansk loĝis sufiĉe agema esperantisto-solulo Miĥail Timofejeviĉ Popov, kiu estis, eble, sola akademiano de AIS por Sovetunio¹²⁶. Li ne aktivis en kadro de ASE, same kiel li ne aktivis dum SEJM-a periodo, eble nur ĉe ties scienc-teknika sekcio. Sed liaj konstantaj artikoloj en loka

¹²⁶ Dum sovetia periodo civitanoj de nia lando ne kontaktis kun AIS. Sed M.T. Popov aŭguste 1986 estis elektita en la Akademion kiel adjunkto kaj septembre 1987 — kiel asociita docento, t.e. fakta akademiano (el aŭtobiografio de M.T. Popov). [Ĉu asociita docento kaj akademiano estas egalaj, dubindas - noto de V.S. Aroloviĉ].

gazetaro influis al bona prezento de Esperanto kaj de la movado al vasta loka loĝantaro. Menciindas ankaŭ da artikoloj presitaj en loka ukrainlingva gazeto "Pivdena Zorĵa" ("Suda Aŭroro") kun komuna titolo "Esperantistoj, kiuj ili estas?"¹²⁷

Tiun liston de ekzemploj eblus daŭrigi, sed, ŝajnas, ĉi tiu temo estas bona tereno por pli profundaj esploroj.

OPOZICIO AL ASE-GVIDANTOJ

"...Sen permeso — eĉ ne paŝ'!"
"Nu, amikoj, tia
Viv' teruros nia!
Ni Betulon haku for!" —
Kriis la lepora ĥor'.
Kaj leporo, jam grizhara,
Sen respekt' al ieĝ' arbara,
Prenis tuj hakilon — bat'!
Hakis l' arbon sen kompat'..."¹²⁸

Multaj esperantistoj en nia lando antaŭvidis la nekontentigan agadon de ASE, pli ĝuste — de ties funkciuloj; pluraj aliaj komprenis tion preskaŭ tuj post la FK.

Ediventiĝis, ke tiuj supozoj, bedaŭrinde, ne estis la eraraj — ofte diversmaniere ASE bremsis enlandan agadon, strebis malvastigi ĝin kaj uzis nur la eblojn por diversrangaj funkciuloj senpage veturi eksterlanden por "partopreni" tie iujn E-aranĝojn.

Jam komence de 1980 aperis la fama "Letero 1" de Vitaŭtas Ŝilas, kiu estas plene prezentata ĉi-sube.

¹²⁷ Laŭ liaj propraj kalkuloj li aperigis 54 esperantlingvajn publikaciojn en 16 landoj; la saman kvanton de publikacioj li havas en la ukraina lingvo (el la aŭtobiografio de M.T. Popov). En la Esperanto-katalogo de UEA (eld. 1994) en la ĉapitro "Terminaroj" eblas trovi libreton de M.T. Popov "Pri karboksilo, karboksaco kaj karboksato" (p. 44).

¹²⁸ B. Tomado [B.V. Tokarev] "La leporoj en arbar" — "Cerbe kaj kore" N 7 (38)/1996, p. 4.

“LETERO 1

la 21 -an de feb. 1980

KARAJ GEAMIKOJ

Iris ni al la oficialiĝo (longe!) kaj esperis, ke kun ĝi malaperos baroj por ekhavi normalajn klubojn, por organizi amasajn kursojn, tendarojn (kun partopreno de eksterlandanoj), eblis vaste informadi la popolojn per centra gazetaro, libere akiradi eksterlandajn E-eldonajojn ktp., ktp. Ni kredis, ke novfondita E-Asocio serioze analizos spertojn de SEJM (sen neglekti ĝin kiel fakto) kaj transprenos de ĝi ĉion pozitivan, unuavice ĝian demokratian laborstilon. Sed...

Jam tio, kiel okazis preparo por la fondo (sekretoj, malkonfido al SEJM-Konsilantaro) devis nin sobriĝi. Tamen, SEJM-aktivuloj, inspiritaj de tiamaĵ SEJM-prezidanto Melnikov kaj SEJM-sekretario Jegorovas, trompitaj de la festona atmosfero de la fonda kunveno, tuj malfondis SEJMon (kvazaŭ por doni "verdan" vojon al ASE). Tiel malaperis grava socia forto, kiu povus instigi la Asocion agi aktive.

Pasis jam preskaŭ jaro kaj ni devas konstati, ke ASE preskaŭ neniom servas por interesoj de E-kluboĵ. eĉ bremsas tiujn personojn, kiuj volus tion fari. Tre bone ilustras "agadon" de ASE la 1-a Bulteno (rustingval), kiu anstataŭ aperi en daŭro de 4-5 tagoj post la fonda kunveno, aperis preskaŭ post jaro! Kreiĝis interesa situacio en ASE, kiam la Estraro nenion valoras, kiam decidas eĉ ne Prezidio (en sia plena konsisto!), sed ne esperantisto k-d Berjoza...

SEJMon ni ne revivigos. Nenion ni organizos anstataŭ ASE, sed opozicii al la nunaj "stirantoj" de ASE ni devas, por atingi, ke

1. Laborstilo de ASE iĝu pli demokratia,
2. ASE-prezidantoj eklaboru por interesoj de E-kluboĵ aŭ rifuzu siajn postenojn.
3. ASE-Prezidio operative informadu la klubojn pri demandoj, diskutitaj,
4. ASE ekhavi ankaŭ celon popularigi E-on en SU,
5. ASE-bultenoj aperadu ofte kaj ne nur en la rusa,
6. Laborplanoj de ASE estu kompilitaj ĝustatempe, surbaze de klubaj raportoj kaj estu publikigitaj,
7. ASE interesiĝu pri loka E-agado kaj helpu ĝin,
8. ASE estu respondeca pri okaz[ig]o de E-tendaroĵ, zorgu partoprenon de eksterlandanoj en ili.

Ĉiun el la supraj celoj eblas konkretigi, eblas aldono de pliaĵ celoj. Kiel ni agu — estas temo de mia sekva letero. Unu afero estas klara — ni devos malkaŝi faktojn ligitajn kun fondo de ASE, ligitajn kun ĝia nefunkciado (malhelpoj al agado de esperantistoĵ) ktp.

Se Vi volas eniri OPOZICION kaj kunagi (se Vi deziras, Via nomo ne publikigoĵ), aŭ simple, ricevadi Leterojn (por esti informita), skribu al mi: V. Ŝilas, Daukanto 8-9, 232009, Vilnius, Litovio.

NLINE SILENTU !

Via V, Ŝilas"

Reeĥe al tiu ĉi letero venis al la aŭtoro pluraj respondoj, surbaze de kiuj estis verkitaj "Letero 2" kaj "Letero 3". Ili ambaŭ enhavas citaĵojn de la tuta leteramaso, veninta responde al la "Letero 1"; pro tio indas prezenti ilin plene, ĉar ili respegulas sentojn kaj opiniojn de multaj sovetiaj esperantistoj.

"LETERO 2

la 25-an de marto 1980

KARAJ GEAMIKOJ,

Al mia letero 1 venis 67 viaj leteroj el 50 lokoj de Sovetio. Krom kelkaj ĉiuj konsentas pri neceso rekonstrui laboron de ASE. Kelkaj mise konkludis, ke ni opozicias al ASE, sed ne al tiuj kiuj ĝin malĝuste stiras kaj gvidas. La ricevita materialo sufiĉas por tuta "Aktuale" (cetere, multaj bedaŭris planatan ĉesigon de "Kurte"). Mi prezentas sube nur la plej elokventajn fragmentojn.

MALFONDO DE SEJM ESTIS ERARO

Mi plene subtenas Vian Leteron. Estas rimarkeble, ke tuj post la fondiĝo de la Asocio preskaŭ ĉio malvigligiĝis.

F. VOLOSNYĤ, Bjiŝk

La malfondo de SEJM, laŭ mia opinio, estis neĝustatempa kaj grandega eraro.

N. VERVEJKO, Mukaĉevo

Oni ekvidis, ke E-movado en nia lando fariĝis jam forta kaj decidis fari al ni jugon — ASE. Mi konvinkigis, ke ASE estas forta bremsilo, bonkvalite farita. Mi preferas ne publikigi mian nomon, ĉar mi estas partiano.

Multaj iam diris, ke por ĉesigi E-movadon, necesas ĝin oficialigi. Ĝis nun ni ne havas lokon kaj kolektiĝas en klubo de tramistoj nelaŭleĝe.

M. LINECKAJA, Kievo

Certe, SEJM estis pli aktiva, ol nove fondita ASE. Oni devas instigi la Prezidion de ASE, ke ĝi aktivigu la movadon kaj regule eldonadu bulletonon ne nur ruslingve, sed ankaŭ en Esperanto.

J. DAGYS, Vilnius

Mi plene konsentas, ke ASE ne plenumas eĉ iun el siaj promesoj kaj devoj. Necesas radikala turno en ASE por [ke] ĝi almenaŭ iom anstataŭu SEJMon.

G. IVANIŜĈENKO, Lubny

KION FARAS ASE ?

Kluboj estas tute ne informitaj pri la nuna situacio. Ĉiuj nur interdemandas unu la alian: kion faras tiu ASE, kio estos estonte?

T. LUKOŝEVIĈIUS, Panevežys

Antaŭ kelkaj monatoj mi provis ligiĝi kun ASE, sed la letero restis sen respondo. Kion fari?

V. ŜELKOV, Belaja Kalitva

Maigraŭ mia ne plena fido al ASE mi gloris ĝin en du lokaj ĵurnaloj. En julio kaj septembro 1979 mi skribis al ASE (al Beĵoza) du leterojn. En ili mi raportis pri miaj sukcesoj kaj malfacilaĵoj. Petis helpon. Sed ĝis nun neniu respondis, eĉ la 1-an bultenon en la rusa mi ne ricevis.

G. GAFUR, Svobodnyj

Vere mankas agoj de tiel longe atendita ASE. Eble ili, tamen, ion faras, sed ni ne estas informitaj. Se malaperos ia soia fonto de novaĵoj — "Kurte", ni estos en mallumo.

V. LÖIV, Viļjandi

Mi estas membro de ASE-prezidantaro, sed tie faras fakte nenion. Mi sendis kelkajn proponojn, sed sen rezulto. Mi petis persone k-dojn M. Isajev kaj A. Beĵoza konstante sendadi al mi oficialan inviton por kunsidoj de la prezidantaro, sed, bedaŭrinde, ĝis hodiaŭ mi ricevis nenion. Mi korespondas kun aliaj membroj de la Prezidantaro, nemoskvanoj S. Podkamner kaj B. Kotker kaj scias, ke ankaŭ ili ne partoprenas la kunsidojn.

A. KOROLEVIĈ, Lvov

Pasintjare mi skribis kelkajn leterojn al ASE, sed ĝis nun havas nenian respondon. Mi turnis min al regiona komsomola komitato pri la decido de Komsomola CK (menciita en "Kurte"). Ili longe serĉis kaj diris, ke tiu decido estis sekreta, ke legis nur du personoj (la sekretario kaj unu el sindikato) kaj poste la decido revenis al CK. Strange kaj interese! Ĉu ASE kaj helpo de komsomolo estu sekretaj?

S. ANIKEJEV, Viadivostok

(Rim. La 14-n de marto 1980 k-do Anikejev sendis leteron al prez. de ASE i.a. kun demandoj — pri kio okupiĝis la Estraro de ASE dum la jaro? Kion akiris landa E-movado ekhavinta ASE-n?)

DU FLANKOJ DE LA MEDALO

En la movado aperis faktoroj kiel pozitivaj tiel negativaj. Pozitivaj, ekz. "Molodj Ukrainij" ("Junularo de Ukrainio") kaj "Nauka i suspiilstvo" ("Scienco kaj socio") presas ampleksajn kursojn de Esperanto. Dank' al tio fariĝis pli facile spiri. Oni jam ne traktas nin stranguloj.

Negativaj? Esperanto al neniu donis profiton, male. Nun ĉio ŝanĝiĝis. Tio certe elvokis deziron resti ĉe iu ajn stirilo longe aŭ poreterne. Alterne al idealistoj venas profitemaj burokratoj. Via ideo pri organizo de tendaroj far ASE prezentiga tre danĝera; ili tiel organizos, ke neniu tien veturos.

Ju. LUPICKIJ, Ĥarkov

Opozicii al la revo, kion mi tiel longe atendis, mi ne povas. Ja pasintaj "opozicioj" de SEJM-aktivuloj kontraŭ "onktoj" kaj inverse, nenion, krom malfortigo de movado, pozitivan donis. Do, ĉu indas denove dispartigi ne tro densajn niajn vicojn?

V. BANIULAITIS, Klaipeda

SEJM-Prezidianoj* volonte ne rifuzos siajn postenojn, ĉar ili havas profiton — ĉiujare vojaĝi eksterlanden al E-Kongresoj. Ĉu ni, geesperantistoj, estas

malbona parto de l' civitanoj (inter ni estas multe de partianoj, komsomolanoj) — eĉ somera E-tendaro (dusemajna) estas malpermesita?

G. GALCEVA, Ufa

(* — evidente, la aŭtoro volis nomi "ASE-Prezidianoj")

Mi ŝatus esti informita pri Via "opozicio". Tio tute ne signifas, ke mi subtenas tiun "opozicion". Male.

P. JEGOROVAS, Kaunas

Mi opinias, ke pasiveco de la novbakita Asocio ne estas planita, sed ordinara burokrateco, tre konata en multaj aliaj aferoj. Mi opinias, ke fondiĝo de ASE estos fin-fine pozitiva afero. H. TONKIN foje diris: "Esperantistoj ne povas influi eventojn, sed devas utiligi ilin por siaj celoj". Cetere, ni rajtas zorgi pri nombrigo, ne "nur pri kvalito", ja en ĉiu urbo la kvanto de esperantistoj estas tute ne komparebla, ekz., kun kvanto de filatelistoj aŭ hundamatoroj.

V. ĈERNOV, Kaluga

Ekzistado de ASE estas utila afero, ĉar ni povas agi kiel oficiala movado. Se ASE ne malhelpas — tio jam estas por ni sufiĉe. La opozicio ne helpas la movadon.

B. TOMĈIN, Klaipeda

Estas klare, ke ni havas malamikojn de Esperanto kaj de ASE. Mi ne konsentas, ke "stirantoj" aŭ Prezidianoj de ASE "rifuzu siajn postenojn" — ni devas ilin helpi. K-do Samodaj diris al mi: "ASE estos progresiva!". Ni deziru sukcesojn al ĝi!

P. BOJKO, Pavlograd

Ĉu envere pri la stato kulpas nur la prezidio? Ĉu ne povas io okazi ekster ĝi? Ekz., tiu letero de Pastuĥov, dissendita nur al urboj, kies kluboj sin anoncis al ASE (temas pri cirkulero de 06.11.79 al Regionaj komsomolaj komitatoj). En la lasta punkto de tiu ĉi letero estis skribite, ke necesas helpi al E-kluboj por [ke] ili kresku kvalite, sed ne kvante!!! Agi do necesas, sed ĉu opozicio?

V. ZAĤAROV, Tjumenj

(Rim. La menciitan leteron preparis prezidiano de ASE A. Makovskij.)

Demandu Vin mem, ĉu ne krias en via animo ofendita honoro? Se ne, mi subtenas vin, sed dubas pri sukceso. ASE havas multajn mastrojn, kaj ili, ne esperantistoj, decidas, permesi aŭ ne, laŭ sia deziro. Ĉu ni povas ŝanĝi ion en tiu ĉi situacio? Versajne ne... Estas multaj taskoj por ni. E-lemolibroj, E-literaturo, vortaroj, E-periodaĵoj, E-kursoj por instruistoj k.t.p., eĉ simplaj — insignoj...

A. FJODOROV, Sevastopolj

VENIS TEMPO POR REAGI.

Ĉiam pli da homoj komprenas, ke jam venas tempo por starigi pli efektivan laboron de ASE. Ni ĉiuj kunagu konforme al la Statuto de ASE kaj sovetaj leĝoj. Eble ni skribu niajn opiniojn al la Estraro de SSOD aŭ CK de VLKSM?

N. STARODUBCEV, Doneck.

Ne taŭgas aludi identecon inter "la betulo" kaj la tuta Estraro kaj Prezidio de ASE. La Estraranoj kaj Prezidianoj estas meritaj homoj — ne nur kiel espe-

rantistoj. Mia opinio, la ĉefa manko de la nuna konsisto de la Prezidio kaj Estraro estas tio, ke ne multaj el ili estas organizantoj.

Necesegas semajna aŭ dusemajna "Kurte" por internaj laborceloj. La rusa ASE-bulteno estas destinita nur por ekstera informado. Necesas porinstruistaj kursoj kun oficiala rajtigo instruadi Esperanton.

A. NATINJ, Petropavlovsk/Kamĉatskij.

La kluboj kaj republikaj filioj postulu, ke ASE eklaboru sur la bazo de la decidoj de fondkurveno.

V. RIIS, Pärnu.

Estas tre dezirinde, ke Estraro de ASE eldonu de la jaro 1981 propran gazeton en la lingvo Esperanto, kion geesperantistoj povu libere aboni kaj aĉeti.

I. PALKIN, Moskvo.

Mi aldonus proponon, ke membri en ASE rajtu ankaŭ individuoj; ja ekzistas multaj soluloj, en kies loĝloko mankas E-klubo.

R. GRINŜPAN, Taŝkent.

Mi subtenas vin kaj deziras aldoni al la punkto 5 la vortojn "en sufiĉa kvanto", al la punkto 8 la vortojn "kaj helpu partoprenon de sovetaĝ geesperantistoj en eksterlandaj E-tendaroj".

K. ŜARAPOV, Gurjev.

Mi plene subtenas vian leteron kaj aldonas ankoraŭ:

9. ASE devas regule eldoni E-literaturon (lemolibrojn, vortarojn k.a.).

10. ASE devas gaste invitadi eksterlandajn grupojn (delegitojn) de geesperantistoj.

11. ASE devas kontakti kun la plej ĉefaj E-organizajoj (UEA, TEJO, MEM).

12. ASE devas akiradi E-literaturon el diversaj landoj.

13. ASE devas sendadi grupojn de sovetaĝ geesperantistoj eksterlanden por diversaj konferencoj, naciaj kongresoj, renkontiĝoj, festivaloj, k.t.p.

14. ASE ne devas malhelpi al sovetaĝ esperantistoj aperigi eksterlande la tradukojn, se ASE mem ne konsentos eldoni ĝin (ekz.: tradukojn de S. Rublov, fablojn de Krilov).

15. ASE devas organizi komisionon por prepari E-instruistojn en Sovetunio.

S-ro D.

Ankaŭ ni, komencantoj, bezonas diversajn esperantaĝojn (librojn, bultenojn) kaj kontaktojn kun samideanoj. Mi tre envias al esperantistoj de Hungario, Bulgario...

V. FILATOV, Daugavpils.

Mi entros neniun opozicion, tamen mi agas kaj agos por fari el ASE vere laboran E-organizaĝon. Vian leteron ieningradanoj taksas kiel provoka. Mi konsentas kun preskaŭ ĉiuj mankoj, kiujn vi indikis. Leteroj el ASE, restintaj sen respondo, kaj personaĝ konversacioj kun Berjoza konvinkis min pri aroga far-

mieno de tiu ulo. Eĉ tio, kion li tamen faras, estas direktila al bremsado de la movado.

M.

Mi plene subtenas ĉion skribitan en la letero. necesas plendi al superaj instancoj pri ASE (al Sindikatoj, CK de partio). Kiel tion scias kievanoj, ASE bremsas la tendarajn aferojn. En Ivanovo rajtos partopreni nur 150 esperantistoj, ĉar 300, kiel estis en Kievo, estas "ĉjort znajet ĉto" ("diablo scias kio") kaj la tendaroj devos daŭri nur 5 tagojn.

ASE ne helpas al ni, kievanoj, — multaj niaj leteroj tute ne estas responditaj (k-do M. Isajev diris dum la Fonda Kunveno de URF de ASE, ke k-do A.V. Berjoza ofte malsanas kaj ne havas eblecon respondi ĉiujn leterojn). Ĝis nun ni ne scias, kiel nia klubo povas membriĝi al ASE (sen tio ni ne povas trovi taŭgan ejon).

V. ĈARIN, Kievo.

Kial Melnikov rapidis ĉesigi SEJM-on neniu scias, sed ĉiuokaze tio estis malprudenta paŝo: oni kraĉis en malnovan puton antaŭ ol la nova pretis! ASE estas oficiala organizaĵo kaj ĝia ekzisto al ni gravas. Ni uzu kaj utiligu prudente la fakton de ĝia ekzisto. Ni surloke iom-poiom agante montros realajn kapablojn de la lingvo kaj favorigos la publikan opinionon. Do ni ne malkonstruu ASE-n, sed nur rekonstruu, elpelonte Berjozojn el ĝi. M.I. Isajev estas senkaraktara kaj nekapabla organizi, al B.G. Kolker kaj A.J. Gonĉarov oni ne donas nun vorton — sed se ni agados surloke kuraĝe, tiam ni atingos ankaŭ, ke en ASE regos esperantistoj.

J. PALU, Tallinn.

Jen plenumiĝis miaj malbonaj aŭguroj pri sekvoj de senpripensa likvido de SEJM. Estas aĉe, ke la junulara movado tiel rapide, tute senbatale kapitulaciis. Eble oni povas komenci de nulo — de tio, ke iuj kolektos ioman kvanton de veraj esperantistoj, kiuj ekster ASE ekagos — kunvenos somere en tendaro, pripensos la situacion kaj planos agadon. Tio eblus enkadre de iu ĉebalta tendaro. Mi esperas, ke Ĉebaltio daŭrigos siajn tradiciojn.

G. GERCIKOV, Talgar.

Al mi ŝajnas, ke necesas iri la vojon de k-do S.N. Podkaminer, kiu unufoje jam plendis al la plej superaj instancoj, ke E-Komisiono (tiama) ne plenumas siajn taskojn k.t.p.

Situacio en nia respubliko. La Societo de Amikeco preparis la fandan konvenon tute senkonsulte kun ni. Rezulte kelkaj senutilaj personoj trafis estraron de la filio. Jen la freŝaĵoj: en ĉi jaro neniuj renkontiĝij (sub la preteksto de Olimpika Jaro) en Ukrainio; malgraŭ konsilo de ASE-Prezidanto pri la interna respublika informilo, oni eĉ aŭdi tion ne volas, des pli, ke ASE-bulteno aperis nur post 9 monatoj...

M. LINECKIJ, Kievo.

KION ENTREPRENI NUN?

Vi atente tralegis opiniojn de viajn gesamideanojn kaj multaj el vi jam scias KION vi faros. Mi dezirus atentigi vin pri kelkaj momentoj.

Demandu ĉe ASE (registrit-letere!), kie, kiam, ĉe kiuj kondiĉoj okazos ĉi jare OrSEJT, OkSEJT, BET. — Petu por trastudo projekton de tipa Regularo

de E-klubo. — Interesiĝu, kiam okazos la unua post-fondkurveno de ASE-Estrararo.

ASE-Estraranoj postulu, ke estu fiksitaj datoj de Prezidikunsidoj, por ke ili en okazo de veno al Moskvo povu ĉeesti la kunsidojn.

Ni postulu en la leteroj al ASE, ke oni sciigu al ni, pri kio respondecas ĉiu el la prezidianoj, eventuale estraranoj, publikigu ties korespondadresojn (ceterre, pravigi nerispondadon de niaj leteroj per malsanoj de A.V. Berjoza estas ridinde neserioze — ĉiu ASE-respondeculo devas havi rajton sur formular-papero de ASE respondi pri sia demando).

Ĉiuj, kies leterojn ASE ne respondis, registrit-letere plendu al pli altaj instancoj, eĉ al centra gazetaro.

NINE SILENTU!

Via V. Ŝilas"

"LETERO 3

La 14-an de julio 1980

KARAJ GEAMIKOJ!

Ankaŭ post la 2-a letero venis multe da reeĥoj. La plej aktualajn mi citos al vi ĉiuj. Ĉe iuj aperis dubo, ĉu indas nomi nin "opozicio"? Kaj venis samtempe atentigo, ke laŭ vortaroj "opozicio" estas malplimulto, sekve en opozicio estas k-do Isajev kun Berjoza, sed ne ni, kiuj deziras pli ageman, pli helpeman, pli demokratian ASE. Ni akceptu tion.

ASE DEPENDAS ANKAŬ DE NI!

ASE estas eĉ tre necesa por E-movado — por organizi ĝin, helpi, sed ĝi malhelpas. Ĉu skribi al Berjoza? Mi jam dufoje skribis. Kompreneble, neniuj respondo. Mi tre atendas vian 3-an leteron.

N. KOVNATOR, Daugavpils.

De ASE ni atendis novan impulson por disvolvo de E-movado en nia lando. Anstataŭ unuigi ĝi disigis la klubojn. Pri tio mi skribis al Isajev (09.04.80). Ankaŭ pri neceso havi laborplanon, kontribui propagandon de E., organizadon de E-kursoj, helpi akiradon de eksterlanda E-literaturo. Respondo mi atendas.

N. VERVEJKO, Mukaĉevo.

Kelkfoje ni turnis nin al ASE kun peto helpi nin. Eĉ ne respondo, ne dirite pri helpo. Ekzemple, Omska profesia pupteatro dum 3 jaroj kun nia helpo prepariĝis por festivalo de pupateatroj en Jugoslavio. La aktoroj vizitis E-kurson, provludis. La tekston kaj fotojn de la spektaklo ni sendis al la festivala komitato kaj ricevis oficialan inviton partopreni Festivalon. Kopio de la invito venis al ASE; letero kun ĝi kuŝis ĉe k-do Berjoza dum 3 monatoj eĉ ne legita (eble, ĉar estis en E.?!). Ni telefonis al li kaj li rifuzis la partoprenon — "vi malfruis... kaj ĝenerale eĉ la ĉefurbaj pupateatroj ne partoprenas tiun festivalon kaj ekdeziris la provinca!" Stulte? Certe!

Ni estas certaj, ke ankaŭ aliaj kluboj havas similajn faktojn. Omskaj esperantistoj plene subtenas vin.

22 SUBSKRIBOJ, Omsk.

L. ZIMELS el Ternopol sciigis, ke li sendis leteron al "Izvestija", en kiu li petis kontroli misagadojn de ASE-gvidantaro. Estis aldonita referaĵo kun atentiĝo, ke nedisvastigo de E. fortikiĝas poziciojn de la angla.

Danĝero por ni estas pasiveco. Se iu estis pasiva antaŭ la fondo de ASE, tiu ne plu havas rajton resti tia. Ne estas sekreto, ke en ioma parto de esperantistaro ĝis nun regas timemo kaj malcerteco. Por ili la oficialiĝo estis io sankta. Al tiuj, kiuj opinias, ke ĉiuj atingoj de sov. esperantistaro estis ne bataliritaj, la opozicio aspektas kiel anaro de arogantaj aĉuloj, kiuj strebas dispartigi sov. esperantistaron. Mi tutanime subtenas la opinion de Palu. Ni devas agi tiel, ke malamikoj fariĝu amikoj, sed ne inverse. Cetere, la letero al ASE de 14.03.80 restis dume nerespondita.

S. ANIKEJEV, Vladivostok.

Kia estos ASE — dependas de ni. Homoj, kiuj esperas pri leĝa kaj baldaŭa restrukturo de ASE, estas naivuloj, ĉar forgesis, kie ili loĝas. Ion ŝanĝi povas nur sekva konferenco. Diru, ke ASE nenion faras — signiĝas nenion diri. Mi proponas kompari laboron de nia Asocio kun laboro de aliaj landaj kaj internaciaj E-Asocioj dum la unuaj jaroj de ilia ekzisto. Kaj nur tio estos pruvo, ke ASE nenion faras, bremsas k.t.p.

S. URĜA, Kievo.

La novaj kondiĉoj postulas de ni, ke nia batalo por aktivigo kaj plibonigo de ASE okazu en kadroj de ASE mem kaj en kadroj de ties statuto. Ni ekagu por akiri veran forton!

V. KULIKOV, Omsk; veterano.

KIU NE KONAS PROPBAN HISTOBION, NE VALORAS ESTONTON!

Vi faras bonan provon, sed mi ne esperas, ke vi sukcesos. Gvidantoj de ASE estas pupoj. Vi komprenu, ke oni antaŭ ĉio konsiliĝas kun "superaj instancoj"... La Asocio kun individua membreco, aparta eldonejo k.t.p. — ĉi tiu neniam estos. Vi devas klopodi ne antaŭ ASE, SSOD, nur antaŭ CK de KPSS.

Mainova esperantisto.

En SU ĉio oficiale nova komenciĝas nur post kiam tion oni decidas en CK de KP. Tion ĉiuj scias. Dum 25 jaroj iris leteroj al CK de KPSS. Individuaj, grupaj. Oni bone memoras pri tiuj de partianoj, de sciencistoj. En la leteroj oni atentigadis, ke sov. esperantistoj povas helpi disvastigon de sov. ideologio, kontribui porpacan batalon, se enin internaciajn E-organizaĵojn, partopreni internaciajn E-kongresojn, eldonadi poeksterlandan literaturon k.t.p., sed por tio necesas "permesi Esperanton", "restarigi SEŬ", "krei E-Asocion" k.t.p. La leteroj sinkis en tirkestojn de iu Ivanov el scienca fako de CK — sen iri supren. Intertempe aperis BET-oj, SEJM kun SEJT-oj, E-komisionoj ĉe SSOD-oj (tamen, laŭ instrukcio el CK!). Kaj jen...

En la unua duono de marto 1978 en CK okazis kunsido "pri ordigo de E-movado en SU". Temis pri tio, ke en SU estas ĉ. 10000 esperantistoj, kiuj senkontrole agadas, organizas tendarojn, eldonadas ne ĉiam taŭgajn eldonaĵojn. La akceptita decido devigis SSOD-on, Komsomolon kaj Sindikaton dum 3 monatoj organizi E-Asocion. Ĝi proponis vaste uzi Esperanton por in-

ternaciaj kontaktoj kaj atentigis, ke la Asocio ne celu disvastigi Esperanton al milionoj, sed gvidu la klubojn.

La decidon plenumi oni ne urĝis. Komence, ĉar k-do Berjoza estis okupata pri UK en Bulgario. Poste (aŭtune) malsanis Saakov R.R. (la estro de Berjoza). Fine la 19-an de decembro 1978 estis subskribita kontrakto pri la fondo de ASE inter SSOD (subskribis Kruglova Z.M.), Komsomolo (subskribis B.N. Pastuĥov), Sindikato (subskribis Sibajev). Samjare la prepara grupo jam antaŭvidis prezidanton de ASE, konsiston de la Prezidio, amplekson de la Estraro, notis la fondodaton kaj kvanton de fondontoj (La projekto de ASE-Regularo estis preta jam antaŭ tiu tempo).

Kiel funkciis ASE dum la unua jaro vi jam scias.

* * *

Finmarte fondiĝis Latva filio de ASE. Kun granda bruo la kunveno atingis, ke la Estraron eniru ankaŭ kelkaj neriganoj (eminentaj esperantistoj) el Riga centra klubo akiris 8 lokojn (en buroo estas nur ili kaj tri neesperantistoj). Dum la unua estrara kunveno N. Kopmanis el Daugavpils proponis, ke laborlingvo de la Estraro estu Esperanto. Al tio Prezidanto de Latvia SSOD Brolisĥ kriis, ke ĝi estu nur la rusa (eĉ ne latva), ĉar la Estraron eniras ankaŭ neesperantistoj. Pri la aldona propono, ke "ĉiuj neesperantistoj-estraranoj dum duonjaro ellernu bazon de la lingvo", li indigniĝis, ke "oni ne rajtas devigi"...

* * *

Iom konatiĝinta kun Litova, Latva, Ukraina, Leningrada ASE-filioj mi konkludas, ke siajn nemultajn sukcesojn ili dankas al *personaj* konatecoj kun lokaj oficialuloj, kaj la fakto de ASE-ekzisto, sed ne al ASE-gvidantoj. Ĝenerale, la filioj estas preskaŭ senpovaj helpi al lokaj kluboj (sed malhelpi — jes!), preskaŭ senrajtaj ion decidi. Bele tion ilustras la historio kun BET.

Laŭtradicie BET devis okazi en Litovio jam pasintjare. Kiam esperantistoj tiam iris al CK de litova KP por ricevi aprobon, oni diris: "fнду filion de ASE, tiam ni parolos". Sed litovaj esperantistoj jam de januaro 1979 finis fondi ne filion, sed Litovan E-Asocion (Moskvo malkonsentis tion!). Fine esperantistoj cedis: "ni fondos filion, permesu la tendaron". "Komence fнду" — oni respondis. Decembre 1979 fondiĝis la filio kaj tuj akceptis la decidon: en 1980 organizi BET. Denove iro al CK — tie oni postulas "paperon el Moskvo". Berjoza promesis ĝin, sed malgraŭ personaj intervenoj de vicprezidantoj de litova filio A. Vaitilavičius kaj P. Jegorovas, sendas iun paperon nur al komenco de junio! Finjunte la sekretario de CK L. Ŝepetis sakramentas: "la papero venis tro malfrue; krome, ĉi-jare ni havas multe da gravaj aranĝoj... BET okazi ne povas"

JARKUNVENO DE ASE

La 20-an de marto 1980 okazis kunsido de ASE-Prezidio. R.R. Saakov riproĉis min pro la L-1 kaj asertis, ke ĝi estas praktike kontraŭ E., ke el pluraj lokoj oni telefonis kaj protestis, ke mi estas "laŭsence prava, laŭforme — absolute neprava". Li petis al P. Jegorovas (kiu speciale venis la kunsidon), ke li influu min (kaj vere li vizitis min kaj admonis min ĉesi leteri, eĉ... Kiel mi komprenis, onin maltrankviligis ne ekskluziva apero de la Leteroj en Okcidento). Mi enmanigis al li la freŝan L-2 kaj diris, ke L-3 devas aperi.

Dum la kunsido estis decidite la 16-an de aprilo kunvoki kunsidon de ASE-Estraro. Poste Berjoza "en labora ordo" ĉion renversis kaj en sekva kunsido de

ASE-Prezidio oni eksciis, ke okazos kunsido kun moskvaj aktivuloj kaj rajtoj de ASE jarkunveno. Sub certa premo, oni promesis sendi sciigon pri la kunveno ankaŭ al aliaŭbanoj, sed decidis prokrasti la kunvenon ĝis la 14-a de majo aŭ... ĝis aŭtuno.

Nu, la kunveno okazis la 23-an de majo. Multaj aliaŭbanoj pri ĝi eksciis lastmomente (Soĉi, ekz., la 22-an). El 59-persona Estraro venis 36 por rapide fini. La komencon oni metis al malfrua horo (la 15-a). Oni kunsidis dum 4 horoj senpaŭze sub minaco esti baldaŭ forpelotaj.

La unua parolis M. Isajev — dum pli ol 40 min, multon pri nenio (ekz., ke E. estas ne internacia, sed helpa lingvo; komp. "Inf. bult." N 3-4) por delogi atenton de problemoj li instigis kritiki Moskvan E-klubon, kiu neagordite kun ASE organizis dum la maja festo elurbigon kun ĉeesto de iu franco, profesoranta en Moskvo [Francisko Simonnet — Red.] (kritikis moskvaj olduloj, ankaŭ Pesiĵak). Krome, li mallaŭdis tiujn, kiuj malkontente pri ASE skribadas leterojn.

Pri eldona aktivuleco parolis N.B. Zubkov — la bulleno aperados regule, en 1981 aperos E-lemolibro de Isajev kaj Semjonova, vortaro de Bokarev, B. Kolker petis helpon por prepari E-instruistojn, eldoni E-lemilojn, kritikis Berjozan, pro kiu malsukcesis E-tendaro apud Ufa. Akre elpaŝis S. Podkaminer. Li rekte akuzis "Berjoza-n" ke tiu ne respondas leterojn de enlandaj aktivuloj kaj de eksterlandaj funkciuloj, ekz., tiujn de GDR, kritikis la Prezidion pro neeldono de promesita "Paco".

Estis ankaŭ skribaj demandoj. Ne ĉiujn oni respondis (ekz., pri preparo de E-instruistoj, pri forestaj E-kursoj, kvanto de neresponditaj leteroj ĉe Berjoza). Al granda parto de demandoj oni respondis preterglite. Al demando pri ebleco de eksterlandaj vojaĝoj M. Isajev diris, ke ili okazas — al Kongresoj. Pesiĵak diris, ke "Pacon" anstataŭas suplementoj al "Moscow News". Berjoza klarigis, ke anstataŭ letter respondi al eksterlandanoj li kun ili intertelefonas (versajne, post elĉerpigo de paciento tiuj mem telefonas).

Poste Makovskij tralegis liston de komisionaroj, ĉiu Estrarano de nun apartenas al iu komisiono.

Fine oni proponis voĉdoni por la tipa kluba regularo, kiun antaŭe oni ja ne studis. Pasis tiel: B. Tokarev legis popunkte la regularon kun aliaj rimarkoj. Isajev diris, ĉu akcepteblas ili aŭ ne. La kunveno hore aprobadis popunkte. Baldaŭ la paciento de Isajev elĉerpigis: "Donu viajn rimarkojn skribe, ni poste studos". La kunveno ekbruis. Tiam Isajev: "Ni akceptu la regularon kiel provizora". La kunveno akceptis por unu jaro (cetere la regularo estas vere referenda, ne nur pro sia kategorieco, sed ankaŭ pro absurdaj punktoj, kiel tiu laŭ kiu E-klubo korespondas kun eksterlando pere de ASE). Post la kunveno Berjoza insistis, ke la vorto "provizora" malaperu, ĉar tio ne decas por solida organizajo.

Estis akceptita rezolucio. El punktoj, kiujn mi scias — pri "Paco", zorgi pri lernolibroj, vortaroj, plibonigi respondadon al leteroj. Laŭ insisto de D. Cibulevskij — paralele al "profesia esperantisto" Berjoza enoficiigi duan personon (ĉe la fondo oni promesis eĉ ses pagatajn etatojn).

HO, KIEL NI ESTAS FELIĈAJ!

Ni ĉiuj sentas, ke E-movado ne havas apogon el registara flanko. Ni estas nur tolerataj. Nia oficialigo okazis nur por bridi nin per niaj propraj manoj. Laŭ mi, nia tasko estu laŭebla aktivigo de niaj filioj.

B. TRIMAKIENE, Liudvinavas.

* * *

Venis ankaŭ kelkaj leteroj kun provo ekspliki kaŭzojn de nedeziro disvas-
tigi Esperanton (ekz., pro deziro doni plian avantaĝon al la rusa); tion jesus ĝia
ekĉijara enkonduko la 1-ajn klasojn de litovaj lernejoj. La leterojn mi dume
konservas en mia tirkesto, sed ĉar jam ektemis pri la rusa, mi atentigas, ke a-
pero de la rusingva bulteno estas la fakto *pozitiva* — oficialaj kaj aliaj “neverdaj”
instancoj povos informiĝi pri esperantistoj. Malbono konsistas en tio, ke la
bulteno aperis ne suplemente al esperantlingvaj “Aktuale” kaj “Kurte”, sed an-
stataŭ ili. Ne necesus forgesi, ke la tradicio de esperantistoj uzi inter si Espe-
ranton havas ne nur la praktikan, sed ankaŭ edukan valoron. Se informilo,
aparta por sovetaj esperantistoj ne eblas, ni postulu, ke almenaŭ parto de
ASE-bulteno estu en la Internacia lingvo.

* * *

SANKTA KREMLO. 18-persona grupo de sovetanoj (el ili — 11 espe-
rantistoj) el TEJO-Kongreso revenis ne tro kontenta. Unue, la kongresan koti-
zon necesis pagi el sia magra poŝmono, due, oni ne povis libere elekti kaj viziti
deziratajn kongreserojn. Al preskaŭ ĉiuj aranĝoj oni iris kaj foriradis kolektive
sub gvido de la grupestro Volkov (el Leningrado). Ĉiutage, kiam en kongresejo
kulminis kantoj kaj dancoj (je 23 h.) oni devis kolektiĝi en la ĉambro de Volkov
por raporti kiu kie estis, kun kiu pri kio parolis.

Kuriozis la historio de Liga Berce. Ŝi donacis al iu hispano olimpikan in-
signon kun kremlo. Tiu siavice donacis al ŝi pienmanon da hispanaj moneroj
(ŝi kolektas). Volkov indigniĝis — kiel vi povis vendi la sanktan por ni simbolon.
Nun terurigiĝis Liga (diablo scias, kion eblas atendi de li) kaj kun larvoj disdonis
al ĉiuj la kapitalisman valuton

Postkongresaj konkludoj? Volkov opinias, ke TEJO kaj ĝiaj kongresoj es-
tas neseriozaj, kaj partopreno de sovetanoj en TEJO ne havas sencon.

ĈU VI ESTAS EL ASE? En la bulteno 3-4 de ASE aperas letero de sindi-
kato pri helpo (legu atente!) al E-klubo, fondataj en kadroj de ASE. Sed kiel
pruvi, ke via klubo jam estas en ASE, se Berjoza al petoj pri tio silentas?
Cetere, al li delonge necesas memorigi la veron: ne kraĉu al popolo, ĉar la
popolo vin tiel superkraĉos, ke vi ne savelnaĝos! Se li mem libervole ne rezig-
nos sian postenon, ni almenaŭ ne reelektu lin dum la reelekta kunveno!

* * *

Oni demandas pri miaj pluaj faroj en “novaj kondiĉoj”. Nu, mi ne planas
reokupiĝi pri movadaj, organizaj demandoj. Eble pli multe ol antaŭe, tradukadi
kaj ĉefe okupiĝi pri sferoj neligitaj kun Esperanto.

* * *

RESPONDO. La “sekreta” komsomola cirkulero pri E. estas N 6121 de
06.11.1979. Onidire ĝin kaj tiun de la sindikato verkis la sama persono —
Makovskij

SUKCESOJN AL VI, OPTIMISMON!

V. Ŝifas

NI NE PRISILENTU — MALKAŜU FAKTOJN, REGISTRU ILIN!”

Tiuj ĉi famaj leteroj de V. Ŝilas. reeĥoj al ili oi diversaj anguloj de nia vasta lando nature montris, ke esperantistoj en Sovetio tute ne kontentis pri la situacio, kiu estis en ASE — ja nek ties Estraro, eĉ nek ties Prezidio ion valoris kaj decidis, nur neesperantisto A.V. Berjoza, okupinta gravan postenon en ASE (respondeca sekretario), kaj liaj estroj — SSOD-funkciuloj povis permesi aŭ malpermesi ion. Sed nenio, krom ĉiama grumblado kaj leterumado, estis aŭdebla.

La eksplodo okazis en 1982 post la 2-a Tutlanda Konferenco de ASE, dum kiu oni balotante ne elektis A.V. Berjoza, solan personon en la lando, kiu salajris pro tiu laboro, en la Estraron.

Tamen tuj post la Konferenco dum la Estrarkunsido de ASE A.V. Berjoza estis kooptita al la Estraro kaj elektita en la Prezidion de ASE kaj denove okupis la saman, jam kutiman por li postenon de respondeca sekretario.

Tiun “kraĉon en la animon” neniu jam povis elteni. Kaj samjare somere dum OkSEJT en Latvio estis organizita fermita partia kunveno (ĝin rajtis partopreni nur partianoj), dum kiu unuanime estis akceptita decido sendi plendleteron al L.I. Breĵnev. La letero ne estis longa, sed konkreta, kaj ĝin subskribis 13 partianoj. Jen ĝi estas:

“LETERO AL L.I. BREĴNEV

*Al la ĝenerala sekretario
de CK de KPSU
k-do L.I. BREĴNEV.*

Ni, komunistoj, partoprenintoj de Esperanto-tendaro en Latvio, estas devigitaj peti Vian helpon.

Esperanto-agado en nia lando ekzistis ankoraŭ dum la vivo de V.I. LENIN, bazinte sin sur la efektiva ŝtata helpo kaj subteno de progresivaj tutmonde konataj sovetiaj aŭtoritatoj — F.E. Dzerĵinskij, A.M. Kollontaj, Kerjencev, M.Gorĵkij, A. Lunaĉarskij...

Dum lastaj dek jaroj antaŭ la fondo de ASE de tempo al tempo estis eldonataj lernolibroj, vortaroj, revuoj; dum ĉiujaraj E-tendaroj estis resumataj soc. konkuradoj inter Esperanto-kolektivoj de la lando.

La 14-an de marto 1979 en USSR ĉe SSOD estis fondita Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE). Ĝia fondiĝo en multaj momentoj malfaciligis efektivigon de sociutila laboro, malgraŭ ke laŭ la Statuto la Asocio devis perfektigi ĝin.

Kvaran jaron helpe de ASE malordiĝas la agado de esperantistoj en la lando. Post la ASE-fondiĝo estis ĉesigita eldono de Sovetiaj numeroj de "Paco", "Por la paco", informperiodaĵoj en Esperanto. "Informbulteno" de ASE aperas 3-4 foje dumjare, neregule, ne plenumas eĉ malgrandan eron de siaj funkcioj.

Ĉio ĉi nekontentige prezentas la agadon de sovetiaj esperantistoj al la esperantistoj de eksterlando.

Kulpas pri tio kelkaj SSOD-Prezidianoj, ASE-Prezidianoj kaj vera malamiko de Esperanto, respondeca sekretario de ASE A.V. Berjoza, kiu dum la raportreelekta Konferenco la 27-an de marto 1982, kiun partoprenis ankaŭ reprezentanto de CK de KPSU, estis balotfalgita dum la voĉdonado, sed samtage spite al ĉiuj konferencanoj li estis kooptita en la Prezidion kaj en la sama ofico daŭrigas ĝian malordigan agadon.

Ni petas por plibonigo de la laboro de sovetiaj esperantistoj:

1. Refunkciigi la soc. konkuradon inter E-kolektivoj de la lando;
2. Plenumante decidojn de ASE-Konferenco komenci eldonon de ĉiumonata soci-politika revuo en la lingvo Esperanto;
3. Organizi radiostacion por regulaj radioelsendoj en la lingvo Esperanto por eksterlandaj esperantistoj;
4. Eldonadi ĉiusemajnan informfolieton pri la agado de sovetiaj esperantistoj;
5. Ĉiujare organizi tradiciajn somerajn tendarojn de sovetiaj esperantistoj;

6. Organizi eldonon de instru-metodika kaj belarta literaturo en la lingvo Esperanto.

Ni petas Vian helpon en la decido de la metitaj demandoj. Ni opinias, ke tempas fini la senrespondecon, kiu ne povas ne malhelpi al la efektivigo de la taskoj de la Esperanto-movado — batalo por la paco, propagando de soveta vivmaniero eksterlande, internacia edukado de junularo.

Cibulevskij D.M., —
310024, Ĥarkiv-24, ul. Ĉajkovskogo, N 25, kv. 11.

Voznaja N.V., —
343220, Slavjansk, ul. Maršala Vasilevskogo, N 19, kv. 47.

Borisov L.N., —
140402, Kolomna, ul. Dzeržinskogo, N 21, kv. 27.

Titajev A.B., —
690079, Vladivostok, ul. Puškinskaja, N 23, kv. 11.

Mitrofanov G.S., —
347908, Taganrog, Nijnjaja linija, N 25, kv. 23.

Vajnblat S.I., —
270007, Odesa, ul. Kujbiševa, N 18, kv. 2.

Krilov E.K., —

281900, Kamenec-Podolsk, ul. Moskovskaja, N 41, kv. 12.

Šilo G.M., —
343220, Slavjansk, per. Baŭjuka, N 10, kv. 24.

Zozulja B.A., —
344101, Rostov/Don, pr. Staĉki, N 16, kv. 52.

Aitai P.A., —
Pämu, Estonio, LIU
Medinš A.V., —
Latvio, 226002, Riga-2, Ed. Smilga, N 34, kv. 5.

Lenskaja G.V., —
143400, Krasnogorsk Moskovskoj obl., ul. Lenina, N 47 — 3 — 235.

Natinj A.J., —
Petropavlovsk/Kamĉatskij, bul. Ribackoj Slavi, N 3, kv. 10.

15.08.1982^r

La unua inter la subskribintoj estis mi, kaj la letero estis sendita el mia urbo (laŭ komiso de la ceteraj). Do, SSOD-funkciuloj decidis¹²⁹, ke ĝuste mi estis iniciatinto de tiuj kunveno kaj letero¹³⁰.

Reeĥe oktobre samjare mi ricevis respondon el SSOD:

¹²⁹ Ankoraŭ unu stranga kaj nekomprenebla kutimo: plendletero, adresitaj al partia CK, estis transsendataj al la instancoj, kiuj kulpis pri la situacioj elvokintaj ilin.

¹³⁰ Vera iniciatinto de la kunveno estis Gennadij M. Šilo el Slavjansk.

“La 25-an de oktobro 1982,
N 713
Al k-do Cibulevskij D.M.

Estimata k-do Cibulevskij,

Buroo de la SSOD-Prezidio pridiskutis leteron de grupo de esperantistoj kun Vi ĉekape en CK de KPSU, en kiu temas pri mankoj en la laboro de la Asocio de Sove-tiaj Esperantistoj.

Buroo de la SSOD-Prezidio komisiis al ASE-Prezidio kune kun la fako pri informado kaj sovetia kulturo prepari kaj pridiskuti dum vica ASE-Prezidikunsido la demandon pri nuntempa situacio kaj aktivigaj rimedoj por plibonigo de la situacio en la Esperanto-movado.

Ni petas pri tiu ĉi respondo informi aliajn kamaradojn, subskribintajn la leteron.

**VICPREZIDANTO DE
LA SSOD-PREZIDIO**

M.M. PESLJAK”

Post tio, bedaŭrinde, estis farita nenio rilate al daŭrigo de la letera epopeo. Eble ne venis ankoraŭ nia tempo.

Ne restis sen postsekvoj nia “leterumado kun k-do L.I. Breĵnev” — mi estis invitita al vica kunveno de ASE-Prezidio (ŝajnas, tio entute estis sola invito de ekstermoskva Prezidiano al la kunsido). Dum ĝi estis pridiskutita maldeca konduto de la Prezidiano, kiu “anstataŭ interne solvi demandojn organizas preskaŭ kontraŭleĝajn kunsidojn kaj transkape leterumas al plej supraj instancoj”. Mi supozas, ke se la kunsido en SEJT estus ne partia, se la leteron sendus ne partianoj, mi kiel prezidiano estus punita multe pli severe kaj ne nur pervorte.

Malgraŭ ĉio kaj la letero, kaj pli antaŭa balotfaligo de A.V. Berjoza dum la Konferenco influis al tio, ke post kelka tempo li estis anstataŭigita per alia respondeca sekretario.

Mi ŝatus mencii ĉi tie ankoraŭ kelkajn gravajn laŭ mi leterojn, senditajn siatempe al diversaj landaj E-aktivuloj, kiuj prezentas kromajn mankojn en la ASE-agado. Tio estas la

leteroj de S. Krajnov, P. Jegorovas, A. Melnikov kaj V. Kauts (parte v. la suplementan parton).

La politika vivo en la lando rapide ŝanĝiĝis post la morto de L.I. Breĵnev. Poiomete demokratiĝis la socio, fariĝis eble sentime kritiki, esprimi sian veran opinion, sed ne opinion de la plimulto. Kaj kiel sekvan etapon en la "opozicia agado" eblas konsideri kolektivajn kritikajn vortojn, direktataj al ĉiuj superaj instancoj. Mi prezentas ĉi tie kelkajn el ili (v. la suplementan parton):

- Decido de URF ASE-Konferenco en u. Luck;
- Letero-raporto de P. Jegorovas;
- Letero de A.S. Melnikov.

Estas ankaŭ pluraj aliaj decidoj, akceptitaj dum diversaj E-aranĝoj. Sed la enhavo ofte ripetas la samajn momentojn, tuŝitaj en la jam prezentataj. Pro tio mi opinias sufiĉa prezenti al via atento nur la supre notitajn.

Multe influis al aktivigo de la opozicia agado la planoj de ~~SSOD-funkciuloj~~ fari reorganizon de ASE-strukturo.

Ĉio ĉi rezultiĝis per akcepto de nekutima punkto en la Decidoj de la Estrarkunsido 27.09.1988:

"Taksi la laboron de la Prezidio nekontentiga..." (v. la suplementan parton)

Kaj komence de 1989 dum la 3-a Tutlanda raport-reelekta Konferenco de esperantistoj estis akceptita alia decido, kiu efektive ĉesigis ekziston de ASE kaj refunkciigis SEU-agadon.

Sed tio jam estas alia historio...

SUPLEMENTA PARTO

CIRKULERA LETERO DE CK KPSU ¹³¹

**Komunista partio de Soveta Unio
Centra Komitato**

Absolute sekrete

28.03.1978

**Ekstrakto el la protokolo № 98 p. 10 c
de Sekretariaro de la CK**

Pri la ordigo de aktivado de sovetiaj esperantistoj

1. Konsenti la proponojn, prezentitajn en la noto de fakoj de CK KPSU (aldonata).
2. Komisiĝi al la prezidio de Unio de sovetiaj societoj de amikeco kaj kultura ligo kun eksteraj landoj, VCSPS kaj CK VLKSM en trimonata periodo ellabori kaj akordite kun la koncernaj fakoj de CK KPSU aprobi regularon pri asocio de sovetiaj esperantistoj kaj aranĝojn por ĝia fondo. La proponojn, postulantajn decidojn de la gvidaj organoj, prezenti por konsidero de CK KPSU.

**Sekretario de CK
(subskribo)**

* * *

**Komunista partio de Soveta Unio
Centra Komitato**

Absolute sekrete

**Ekstrakto el la protokolo № 98 p. 10 c
de Sekretariaro de la CK**

Pri la ordigo de aktivado de sovetiaj esperantistoj

Suplemento

Konkorde kun la komisiono de fakoj de CK KPSU kun partopreno de interesitaj organizaĵoj kaj institucioj estis esplorita la stato de la esperantista movado en Soveta Unio kaj eksterlande.

Nuntempe naciaj organizaĵoj de esperantistoj funkcias en 80 landoj. Precizaj informoj pri la kvanto de esperantistoj en la mondo ne ekzistas. Laŭ diversaj fontoj ĝi nombros de 1 ĝis 8 milionoj da personoj. La plej reprezenta internacia organizaĵo estas **Universala Esperanto-Asocio (UEA)**, havanta konsultan statuson ĉe **UNESCO**. UEA unuigas 38 naciajn organizaĵojn, vicon da fakaj organizaĵoj kaj ankaŭ individuajn mem-

¹³¹ Tiu ĉi eliraĵo kaj la sekva estas prenita el la libro de V.V. Samodaj «Ne nur legendoj, ne nur pri SEJM», M., «Impeto», 1999, p.153.

brojn. En la kongresoj de UEA partoprenas kutime 3 — 3,5 mil personoj. En UEA membras naciaj organizaĵoj de Bulgario, Hungario, Pollando, ĈSSR kaj Jugoslavio. En esperano estas eldonataj pli ol 100 ĵurnaloj kaj revuoj, el kiuj 10 — 12 aperas regule kaj havas vastan intereson inter esperantistoj; estas eldonata instrua, beletra, soci-politika kaj scienco-teknika literaturo. Reprezentantoj de okcidentaj landoj, kaj ankaŭ Ĉinio penas uzi eblecojn de la esperantista movado por siaj ideologiaj celoj.

En socialismaj landoj la plej signifaj asocioj de esperantistoj estas en Bulgario, Vjetnamio, Hungario, Pollando, Jugoslavio kaj Ĉeĥoslovakio. Ili havas elektatajn-organojn kaj funkcias kiel sociaj institucioj ĉe sindikataj konsilioj (Hungario), Nacia komitato de Patrolanda fronto (Bulgario), Kulturbund (GDR), Packomitato (Pollando). Partopreno de esperantistoj el socialismaj landoj en la agado de UEA kontribuis ĝian pli progreseman direkton; estis kreita Mondpaca Esperantista Movado (MEM), subskribinta en 1974 komunan deklaron pri kunlaboro kun Tutmonda Packonsilio.

En Soveta Unio, laŭ ne plenaj informoj estas proksimume 10 mil personoj, interesiĝantaj pri Esperanto, el ili ĉirkaŭ 3 mil personoj lernas Esperanton en pli ol 100 rondetoj, funkciaj ĉe sindikataj kluboj, kulturdomoj, urbaj kaj distriktaj komsomolaj komitatoj. La ĉefaj labor-formoj estas: lernado de la lingvo, legado de literaturo, aranĝo de vesperoj, korespondado kun eksterlandaj esperantistoj k.t.p. Lastatempe komenciĝis organizado de ĉiujaraj kunvenoj de esperantistoj en someraj tendaroj.

Celante ordigon de internaciaj ligoj de sovetiaj esperantistoj, konforme al decido de CK KPSU en 1962 ĉe SSOD estis fondita komisiono, farinta pozitivan laboron tujdirekte. Sovetiaj esperantistoj partoprenis kiel observantoj kongresojn de UEA, aktive partoprenas agadon de MEM. Estis enterprenitaj agoj por disvastigi en eksterlando informojn en Esperanto pri Soveta Unio. Laŭ sankcio de CK KPSU estis eldonitaj kaj disvastigitaj 13 numeroj de la revuo "Por la Paco", en kiuj estis publikigita vico da plej gravaj dokumentoj de la partio kaj registaro, materialoj dediĉitaj al 100-jara jubileo de V.I. Lenin, 50-jariĝo de USSR, Pacprogramoj, paroloj de K-do Breĵnev kaj aliaj. Estis tradukitaj kaj eldonitaj en Esperanto pluraj verkoj de sovetiaj kaj rusaj verkistoj. Estas preparitaj por eldono materialoj, dediĉitaj al 60-jariĝo de la Granda Oktobro kaj al la nova Konstitucio de USSR.

Tamen en la agado de sovetiaj esperantistoj, tiusfere ankaŭ en iliaj internaciaj ligoj, ekzistas seriozaj mankoj kaj negativaj trajtoj.

Rondetoj kaj kluboj de esperantistoj funkcias dise, sen deca kontrolo kaj helpo el la flanko de koncernaj sovetiaj organizaĵoj kaj departementoj, kaj en vico de okazoj — ĉe ilia kontraŭago. Ekzistas akuta manko de lerniloj kaj alia literaturo en Esperanto, kies eldonado estas fakte malpermesata. La laboro, efektivigata amatore en la someraj tendaroj, fakte ne estas kontrolata kaj ĝia politika gvidado forestas. Rezulte de tio ekzistas danĝero, ke la esperantistan movadon povas uzi suspektindaj kaj mafamikaj elementoj.

Estas fiksitaj faktoj, kiam estis kaŝe vendataj lerniloj, libroj kaj broŝuroj en Esperanto, eldonitaj memstare aŭ ricevitaj el eksterlando, tiukvante ankaŭ trockista literaturo. En la kongresoj de Universala Esperanto-Asocio ofte partoprenas, krom la oficialaj sovetiaj delegitaroj, ankaŭ hazardaj personoj el sovetiaj esperantistoj, venintaj eksterlanden laŭ personaj invitoj.

Lige kun tio estus necesa direkti atenton de partiaj, komsomolaj kaj sindikataj organizaĵoj al plio de kontrolo pri agado de esperantistoj kaj helpo al ili. Ĉe tio necesus

intensiĝi la atenton ne por grandigi la kvanton de esperantistoj, sed por altiĝi la nivelon de politika laboro kun ili¹³².

Por ordigi de la agado de esperantistoj enlande kaj plibonigi ilian laboron en la sfero de internaciaj ligoj estas celkonforme permesi kreon en USSR de asocio de sovetiaj esperantistoj.

Konsiderante la akumulitan sperton en koordinado de internaciaj ligoj de sovetiaj esperantistoj kaj ekziston de koncerna aktivularo en la komisiono de SSOD, estus celkonforme fondi la menciitan asocion ĉe Unio de sovetiaj asocioj de amikeco kaj kultura ligo kun eksteraj landoj.

Samtempe, surbaze de tio, ke esperantistaj rondetoj ekzistas ĉe laboristaj kluboj, kulturdomoj, distriktaj kaj urbaj komsomolaj komitatoj, estus utile alifiri VCSPS kaj CK VLKSM al partopreno en la kreo de asocio de sovetiaj esperantistoj..

Kiel ĉefajn taskojn de la asocio de sovetiaj esperantistoj eblus difini:

- efektiviĝi kontrolon pri la agado de rondetoj kaj aliaj organizaj formoj de sovetiaj esperantistoj kun la celo altiĝi la politikan nivelon de ilia laboro, edukadi ĉe la sovetiaj esperantistoj sentojn de patriotismo kaj internaciismo, de senkompromisa rilato al la burĝa ideologio;
- helpi la lernantajn de Esperanto en disponigo de ejoj, eldonado de lerniloj kaj alia literaturo en Esperanto, kaj ankaŭ okazigo de seminarioj k.t.p.;
- uzi la esperantistan movadon por informa-propaganda laboro en eksterlando per eldonado en Esperanto kaj disvastigo de literaturo pri Soveta Unio, pri ĝiaj atingoj kaj pri la interna politiko de la Soveta ŝtato, per partopreno en la agado de internaciaj esperantistaj organizaĵoj, koordinado de tiu laboro kun la konformaj organizaĵoj de la frataj socialismaj landoj.

La praktikajn problemojn, ligitajn kun la kreo en USSR de esperantista organizaĵo, estus celkonforme komisi al la prezidido de SSOD kune kun VCSPS kaj CK VLKSM.

Internacia fako de
CK KPSU

Propaganda fako de
CK KPSU

Fako pri scienco kaj lerninsti-
tutoj de K KPSU

Marto, 22, 1978.

¹³² Evidente ĝuste tiuj substrekitaj de mi vortoj elvokis postajn oftajn debatojn inter esperantistoj (D. Cibulevskij).

DECIDO

Buroo de Prezidio de
Unio de sovetiaj socie-
toj de amikeco kaj kul-
tura ligo kun eksteraj
landoj

N 181/P

Sekretariaro de Tutso-
vetia Centra Konsilio
de sindikatoj

N 30

Sekretararo de Centra
Komitato de Tutsovetia Le-
nina Komunista unuiĝo de
junularo

N C-29/16 a

de la 27-a de decembro 1978

PRI LA FONDO DE LA ASOCIO DE SOVETIAJ ESPERANTISTOJ

Celante ordigi agadon de sovetiaj esperantistoj kaj plibonigi ilian laboron en la sfero de internaciaj kontaktoj Buroo de SSOD-Frezidio, Sekretariaro de VCSPS kaj Sekretariaro de CK VLKSM decidas:

1. Subteni venintajn en SSOD, VCSPS kaj CK VLKSM proponojn pri la fondo de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj.

Determini, ke la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj estas fondata ĉe Unio de sovetiaj societuj de amikeco kaj kultura ligo kun eksteraj landoj kun partopreno en la fondo kaj plua agado de VCSPS kaj CK VLKSM.

2. Por fondi la Asocion de Sovetiaj Esperantistoj organizi februare-marte 1979 Tutsovetian Konferencon de reprezentantoj el kolektivoj de sovetiaj esperantistoj.

3. Principe aprobi projekton de la "Statuto de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj" kaj proponi aprobi ĝin dum la Tutsovetia Konferenco.

4. Preparlaboron de la Tutsovetia Konferenco kaj fondo de la Asocio komisii al Organiza Komitato en la konsisto:

- | | |
|----------------------------------|---|
| PESLJAK Miĥail
Miĥajloviĉ | — vicprezidanto de SSOD-Prezidio (prezidanto de la Organiza Komitato); |
| KANAJEV Georgij
Jelisejeviĉ | — vicesiro de internacia fakto de VCSPS (vicprezidanto de la Organiza Komitato); |
| NAĤODKIN Vsevolod
Georgijevič | — sektorestro pri internaciaj ligoj en KMO (vicprezidanto de la Organiza Komitato); |
| ISAJEV Magomet Izma-
jloviĉ | — supera scienca laboranto en Instituto de lingvoscienco de la Sciencakademio de USSR, prezidanto de E-komisiono pri koordinado de internaciaj ligoj de sovetiaj esperantistoj ĉe SSOD (vicprezidanto de la Organiza Komitato); |
| KOROLEVIĈ Aleksandr
iosifoviĉ | — profesoro de Lvova arbarteknika instituto, prezidanto de E-klubo en Lvovo; |
| MAKOVSKUJ Anatolij
Ivanoviĉ | — supera konsultanto de justicministerio de USSR; |

PAŜĈENKO Miĥail Fjodoroviĉ	— pensiulo, membro de la E-komisiono pri koordinado de internaciaj ligoj de sovetaj esperantistoj ĉe SSOD;
PODKAMINER Semjon Naumoviĉ	— pensiulo, prezidanto de la E-komisiono ĉe Leningrada filio de SSOD;
SAAKOV Rafael Rubenoviĉ	— estro de fako pri informado kaj soveta kulturo ĉe SSOD;
SAMODAJ Vladimir Vladimiroviĉ	— supera redaktoro de arablingva eldono de "Moskvaj Novajoj", vicprezidanto de la E-komisiono pri koordinado de internaciaj ligoj de sovetaj esperantistoj ĉe SSOD;
BERJOZA Anatolij Va- siljeviĉ	— respondeca sekretario de la E-komisiono pri koordinado de internaciaj ligoj de sovetaj esperantistoj ĉe SSOD;
PEREVALOV Dmitrij Aleksandroviĉ	— kontrolredaktoro en la eldonejo "Progress";
KUUSKŪL Eela Eduar- dovna	— ĉefredaktoro de politikaj eldonoj en la eldonejo "Eesti raamat", prezidanto de la E-komisiono ĉe Estona societo de amikeco.

Komisii al la Organiza Komitato klarigi la reton de ekzistantaj en la lando E-organizaĵoj, fiksi la ordon de delegado por la Konferenco, la daton de ties organizo, reglamenton de la laboro, prepari konformajn materialojn de la Konferenco.

La laboro de la OK estu koordinata de la Unio de sovetaj societoj de amikeco.

Antaŭvidi partoprenon de SSOD, VCSPS kaj CK VLKSM en financado de la rimedoj por la preparo kaj okazigo de la Konferenco. en «Profizdat» kaj eldonejo "Molodaja gvardija" ("Juna gardo") antaŭvidi eldonon de materialoj, ligitaj kun la okazigo de la Konferenco kaj fondo de la Asocio.

Prezidanto de SSOD-
Prezidanto
Z.M. KRUGLOVA

Sekretario de VCSPS
S.V. KOZLOV

Unua sekretario de CK
VLKSM
B.N. PASTUŤOV

LISTO DE PARTOPRENINTOJ EN LA TUTSOVETIA FONDA KONFERENCO DE SOVETIAJ ESPERANTISTOJ ¹³³

1. Aroloviĉ Viktor Semjonoviĉ — Moskvo
2. Babin Klimentij Aleksejeviĉ — Mejdureĉensk
3. Berjoza Anatolij Vasiljeviĉ — Moskvo
4. Bespalov Vladimir Ivanoviĉ — Soĉi
5. Boriseviĉ Vasilij Nikolajeviĉ — Minsk
6. Bronov Sergej Aleksandroviĉ — Krasnojarsk

¹³³ La prezentata listo estas ne tute fidinda; ĝi entenas 106 personojn, sed laŭ la raporto de la Mandata Komisiono estis 101 (mi la ĉi-d-d-d-d-d-d-d-feron memoras, ĉar estis ties membro kaj kalkulis statistikojn...) — noto de V. Aroloviĉ.

7. Bronštejn Moisej Calevič — Tiŝvin
8. Burgmeĵter Mirdza Eduardovna — Riga
9. Buŝs Aldis Janovič — Riga:
10. Cvetkova Valerija Petrovna — Leningrad
11. Cvilcneva Nina Jurjevna — Ufa
12. Cibulevskij Dmitrij Miĥajlovič — Ĥarkiv
13. Danovskij Nikolaj Faddejevič — Riga
14. Donskaja Lubovj Ivanovna — Moskvo
15. Donskih Pjotr Miĥajlovič — Moskvo
16. Eisen Ferdinand Miĥkelevič — Tallinn
17. Golovin Valerij Ivanovič — Kievo
18. Gončarov Anatolij Jevgenjevič — Bamaul
19. Gončarov Aleksandr Miĥajlovič — Moskvo
20. Grigorenko Vasilij Vasiljevič — Pottava
21. Grigorov Valerij Miĥajlovič — Moskvo
22. Grigorjev Viktor Petrovič — Moskvo
23. Ĥarjkovskij Aleksandr Samuilovič — Moskvo
24. Ĥjakkonen Andre — Tallinn
25. Ionesov Anatolij Ivanovič — Samarkand
26. Isajev Magomet Izmaĵlovič — Moskvo
27. Isakov Vladimir Aleksejevič — Novosibirsk
28. Jaunvalks Eduard Karlovič — Riga
29. Janusovič Algimantas Antanovič — Vilnius
30. Jegorovas Povilas Kazevič — Kaunas
31. Jerjuĥina Ludmila Vladimirovna — Moskvo
32. Jusjkovič Vasilij Fomič — Moskvo
33. Kaganova Tiu Udovna — Moskvo
34. Kameŝkov Boris Nikonovič — Leningrad
35. Kanajev Georgij Jelisejevič — Moskvo
36. Kanajev Janis Jekabovič — Riga
37. Kapanadze Emzar Nikolajevič — Tbilisi
38. Kazakov Anatolij Borisovič — Moskvo
39. Kinskaja Nonna Stepanovna — Moskvo
40. Kolesnikov Oleg Lvovič — Leningrad
41. Kolker Boris Grigorjevič — Ufa
42. Kolobova Galina Aleksejevna — Moskvo
43. Kopilenko Moisej Miĥajlovič — Alma-Ata
44. Korolevič Aleksandr Iosifovič — Lviv
45. Koroljov Anatolij Pavlovič — Moskvo
46. Korotkevič Georgij Jakovlevič — Moskvo
47. Korčagin Vladimir Vladimirovič — Moskvo
48. Kollarov Stanislav Jevgenjevič — Mejdurečensk
49. Kocarj Sergej Vladimirovič — Krasnodar
50. Kočetkov Aleksandr Viktorovič — Moskvo
51. Krajnov Sergej Nikolajevič — Moskvo
52. Kudrjavcev Viktor Vasiljevič — Ĉeljabinsk
53. Kulagin Fjodor Jakovlevič — Moskvo
54. Kurepina Tatjana Nikolajevna — Rostov/Don
55. Kuuskül Eela Eduardovna — Tallinn

56. Kuzin Viktor Aleksandrovič — Leningrad
57. Kuznecov Sergej Nikolajevič — Moskvo
58. Laanest Lembe Eristovna — Tallinn
59. Lazareva Lubovj Petrovna — Moskvo
60. Lopatina Ludmila Jevgenjevna — Moskvo
61. Mačkiavičius Jonas Jonovič — Vilnius
62. Majburova Jekaterina Viktorovna — Kievo
63. Makovskij Anatolij Ivanovič — Moskvo
64. Malm Anastasija Konstantinovna — Moskvo
65. Medvedev Lev Vladimirovič — Moskvo
66. Medvedeva Ludmila Ivanovna — Odincovo, Moskva regiono
67. Melnikov Aleksandr Sergejevič — Rostov/Don
68. Mušin Nikolaj Nikolajevič — Moskvo
69. Neilande Saulcerite Emiljevna — Riga
70. Novikova Ludmila Leonidovna — Miass
71. Ojalo Jaan Hansovič — Tallinn
72. Ostrojnjkova Jelizaveta Petrovna — Moskvo
73. Ostrojnjkova Vera Petrovna — Moskvo
74. Palkin Ivan Ivanovič — Moskvo
75. Paščenko Miĥail Fjodorovič — Moskvo
76. Patatjan Avetis Gevorkovič — Jerevan
77. Perevalov Dmitrij Aleksandrovič — Moskvo
78. Pesljak Miĥail Miĥajlovič — Moskvo
79. Pirojnaja Nina Sergejevna — Soči
80. Podkaminer Semjon Naumovič — Leningrad
81. Poltirev Viktor Saveljevič — Ivanovo;
82. Popkov Oleg Viktorovič — Leningrad
83. Rjabceva Nadejda Konstantinovna — Moskvo
84. Saakov Rafael Ruberovič — Moskvo
85. Samodaj Vladimir Vladimirovič — Moskvo
86. Sapoĵnikov Vladimir Sergejevič — Krasnojarsk
87. Sevak Gurgen Grigorjevič — Jerevan
88. Sibircev Vladimir Afanasjevič — Novosibirsk
89. Skupas Laurinas Algimantas Jozovič — Vilnius
90. Smetanina Svetlana Viktorovna — Ivanovo
91. Stanešnikov Fjodor Fjodorovič — Moskvo
92. Starodubcev Nikolaj Nikitovič — Doneck
93. Šakirov Kutlukhan Aliĥanovič — Taškent
94. Šiško Valerij Rafaelovič — Minsk
95. Šoroĥova Natalja Nikolajevna — Moskvo
96. Teljatnikova Emma Gavrilovna — Zaporozje
97. Tezekbajev Timur Amrejevič — Alma-Ata
98. Tkeĥelašvili Georgij Konstantinovič — Tbilisi
99. Toidze Levan Malĥazovič — Tbilisi
100. Tokarev Boris Vladimirovič — Moskvo
101. Tuganov Jevgenij Nikolajevič — Moskvo
102. Vaitilavičius Adomas Jonovič — Vilnius
103. Valina Irina Germanovna — Moskvo
104. Volkov Vjačeslav Vladimirovič — Leningrad

105. Vulfoviĉ Lev Borisoviĉ — Moskvo

106. Zubkov Nikolaj Borisoviĉ — Moskvo.

Resume ¹³⁴: El la partoprenintoj estis —

- * funkciuloj — 34 personoj;
- * elektitaj en ASE-Estraron — 59 personoj;
- * moskvanoj — 48 personoj;
- * leningradanoj kaj ukrainianoj — po 7 personoj;
- * reprezentantoj el Estonio — 4 personoj;
- * reprezentantoj el Litovio — 5 personoj;
- * reprezentantoj el Latvio — 6 personoj;
- * reprezentantoj el Armenio, Kartvelio, Kazafio, Uzbekio kaj Belorusio — po 2 personoj;
- * reprezentantoj el Rusio (la urboj Rostov/Don, Mejdureĉensk, Krasnodar, Krasnojarsk, Novosibirsk, Ufa, Ĉeljabinsk, Ivanovo, Soĉi) — po 2 personoj.

PREZIDIO DE LA FONDA KONFERENCO DE ASE

1. Ananjev Vladlen Sergejeviĉ — respondeca funkciulo de CK KPSU;
2. Grigorov Valerij Miĥajloviĉ — sekciestro pri biblioteka laboro de kultur-amasa fako en VCSPS, kandidato de filozofiaj sciencoj;
3. Ejsen Ferdinand Miĥkeleviĉ — ministro pri edukado de Estona SSR;
4. Ivanov Valentin Vasiĵjeviĉ — respondeca funkciulo de CK KPSU;
5. Ĥajjev Magomet Izmaĵloviĉ — profesoro, doktoro de filologiaj sciencoj, supera scienca laboranto de la instituto de lingvoscienco de la Sciencakademio de USSR;
6. Kanajev Georgij Jelisejeviĉ — respondeca funkciulo de VCSPS;
7. Kolker Boris Grigorjeviĉ — prezidanto de E-klubo en Ufa, estro de la tradukista grupo de scienc-esplora instituto "Neftepromgeofiziko";
8. Koroljov Anatolij Petroviĉ — vicedro de internacia fako de CK VLKSM;
9. Koroleviĉ Aleksandr Iosifoviĉ — profesoro de Lvova arbarteknika instituto, prezidanto de E-klubo "Primavero";
10. Kuznecov Valerij Aleksejeviĉ — respondeca funkciulo de CK KPSU;
11. Kurepina Tatjana Nikolajevna — edukanto en infan-vartejo en Rostov/Don;
12. Makovskij Anatolij Ivanoviĉ — ĉefa konsultanto en Justicministerio de USSR;
13. Muĥin Nikolaj Nikolajevič — prezidanto de Studenta Konsilio de USSR;
14. Neilande Saulcerite Emiljevna — elektomuntisto de la uzino VEF en Riga;
15. Paŝenko Miĥail Fjodoroviĉ — pensiulo, Moskvo;
16. Pesljak Miĥail Miĥajloviĉ — vicprezidanto de SSOD-Prezidio;
17. Podkaminer Semjon Naumoviĉ — prezidanto de E-komisiono ĉe Leningrada SSOD-filio;
18. Saakov Rafael Rubenoviĉ — estro de la fako pri Informado kaj sovettia kulturo de SSOD;
19. Samodaj Vladimir Vladimiroviĉ — ĉefredaktoro de la gazeto "Moskvaj Novajoj" en la araba lingvo;

¹³⁴ Ankaŭ tiuj ciferoj povas esti iom ne ĝustaj.

20. Sevak Gurgen Grigorjeviĉ — akademiano de la sciencakademio de Armenio, profesoro de Jerevana universitato, prezidanto de E-komisiono ĉe Armena societo de amikeco;

21. Skupas Algimantas Jozoviĉ — docento de Vilnusia ŝtata universitato je la nomo de Kapsukas;

22. Tkeŝelaŝvili Georgij Konstantinoviĉ — profesoro de katedro pri aŭtomatiko kaj telemekaniko de Kartvela politeknika instituto, doktoro de teknikaj sciencoj, Tbilisi;

23. Zubkov Nikolaj Borisoviĉ — vicĉefredaktoro de la Ĉefa redakcio de orienta literaturo de la eldonejo "Scienco", honora kulturaganto.

TAGORDO DE LA TUTSOVETIA FONDA KONFERENCO DE LA ASOCIO DE SOVETIAJ ESPERANTISTOJ (LA 14-AN DE MARTO 1979)

(Domo de Amikeco kun eksterlandaj popoloj)

10.00 — 14.20 — Matena kunsido

- Malfermo de la Konferenco.
- Elekto de Prezidio, mandata komisiono, sekretario, redakta komisiono.
- Akcepto de la tagordo kaj konferenca reglamento.
- Prelego "Pri la stato kaj pliefikigo de laboro de sovetiaj esperantistoj kaj plibonigo de iliaj internaciaj ligoj" — profesoro, doktoro de filologiaj sciencoj k-do Isajev M.I.
- Prelego "Pri la fondo de la Asocio de sovetiaj esperantistoj".
Preleganto — vicprezidanto de SSOD-Prezidio k-do Pesljak M.M.
- Pridiskuto de la prelegoj.

14.20 — 16.00 — Tagmanĝopaŭzo

16.00 — 19.00 — Taga kunsido

- Pridiskuto de la prelegoj.
- Akcepto de la Regularo pri la Asocio.
- Elekto de gvidorganoj de la Asocio.
- Akcepto de la decidoj.
- Fermo de la Konferenco.

GVIDORGANOJ DE ASE POST LA FONDA KONFERENCO

1. Estraro de ASE:

- 1.1. Aroloviĉ Viktor S. — Moskvo,
- 1.2. Berjoza Anatolij V. — Moskvo (SSOD-funkciulo),
- 1.3. Bespalov Vladimir I. — Soĉi,
- 1.4. Buŝs Aldis J. — Riga,
- 1.5. Cibulevskij Dmitrij M. — Ĥarkiv,
- 1.6. Donskaja Lubovj I. — Moskvo,
- 1.7. Eisen Ferdinand M. — Tallinn,
- 1.8. Gonĉarov Aleksandr M. — Moskvo,

- 1.9. Gončarov Anatolij J. — Barnaul,
- 1.10. Grigorjev Viktor P. — Moskvo,
- 1.11. Grigorov Valerij M. — Moskvo (funkciulo el VCSPS),
- 1.12. Isajev Magomet I. — Moskvo,
- 1.13. Jusjkovič Vasilij F. — Moskvo,
- 1.14. Kameškov Boris N. — Leningrad,
- 1.15. Kanajev Georgij J. — Moskvo (funkciulo el VCSPS),
- 1.16. Kazakov Anatolij B. — Moskvo,
- 1.17. Kocarj Sergej V. — Krasnodar,
- 1.18. Kolesnikov Oleg L. — Leningrad (funkciulo el VLKSM),
- 1.19. Kolker Boris G. — Ufa,
- 1.20. Kopilenko Moisej M. — Alma-Ata,
- 1.21. Korolevič Aleksandr I. — Lviv,
- 1.22. Koroļov Anatolij P. — Moskvo (funkciulo el VLKSM),
- 1.23. Korotkevič Georgij J. — Moskvo,
- 1.24. Kotļjarov Stanislav J. — Mejdurečensk,
- 1.25. Krajnov Sergej N. — Moskvo,
- 1.26. Kuuskül Ealla E. — Tallinn,
- 1.27. Kuznecov Sergej N. — Moskvo,
- 1.28. Lazareva Lubovj P. — Moskvo (funkciulo el VCSPS),
- 1.29. Lopatina Ludmila J. — Moskvo,
- 1.30. Majburova Jekaterina V. — Kievo,
- 1.31. Makovskij Anatolij I. — Moskvo (SSOD-funkci-ulo),
- 1.32. Medvedeva Ludmila I. — Apudmoskvo,
- 1.33. Melnikov Aleksandr S. — Rostov/Don,
- 1.34. Mušin Nikolaj N. — Moskvo (funkciulo el VLKSM),
- 1.35. Neilande Saulcerite E. — Riga,
- 1.36. Novikova Ludmila L. — Miass,
- 1.37. Ojalo Jaan H. — Tallinn,
- 1.38. Paščenko Mihail F. — Moskvo,
- 1.39. Pataĵan Avelis G. — Jerevan,
- 1.40. Perevalov Dmitrij A. — Moskvo,
- 1.41. Podkaminer Semjon N. — Leningrad,
- 1.42. Poltirev Viktor S. — Ivanovo,
- 1.43. Saakov Rafael R. — Moskvo (SSOD-funkciulo),
- 1.44. Samodaj Vladimir V. — Moskvo,
- 1.45. Sapojnikov Vladimir S. — Krasnojarsk,
- 1.46. Sevak Gurgen G. — Jerevan,
- 1.47. Sibircev Vladimir A. — Novosibirsk,
- 1.48. Skupas Laurinas Algimantas -I. — Vilnius,
- 1.49. Stanešnikov Fjodor F. — Moskvo,
- 1.50. Šakirov Kutlukhan A. — Taškento,
- 1.51. Ŝiško Valerij R. — Minsk,
- 1.52. Tkešelašvili Georgij K. — Tbilisi,
- 1.53. Toidze Levan M. — Tbilisi,
- 1.54. Tokarev Boris V. — Moskvo,
- 1.55. Tuganov Jevgenij N. — Moskvo (SSOD-funkciulo),
- 1.56. Vaitilavičius Adomas J. — Vilnius,
- 1.57. Valina Irina G. — Apudmoskvo,

- 1.58. Vulfoviĉ Lev B. — Moskvo,
- 1.59. Zubkov Nikolaj B. — Moskvo.

2. Prezidio de ASE:

- 2.1. Prof., d-ro Isajev Magomet I. — Prezidanto;
- 2.2. Zubkov Nikolaj B. — vicprezidanto;
- 2.3. Makovskij Anatolij I. — vicprezidanto;
- 2.4. Podkaminer Semjon N. — vicprezidanto;
- 2.5. Samodaj Vladimir V. — vicprezidanto;
- 2.6. Berjoza Anatolij V. — respondeca sekretario;
- 2.7. Kanajev Georgij J. — prezidanto;
- 2.8. Kolker Boris G. — prezidanto;
- 2.9. Koroleviĉ Aleksandr I. — prezidanto;
- 2.10. Kuuskül Eela E. — prezidanto;
- 2.11. Muĥin Nikolaj N. — prezidanto;
- 2.12. Perevalov Dmitrij A. — prezidanto;
- 2.13. Saakov Rafael R. — prezidanto.

3. Komisionoj kaj sekcioj de ASE kaj ties gvidantoj:

- 3.1. Organiza komisiono — Makovskij A.I.;
- 3.2. Instru-metodika komisiono — Kolker B.G.;
- 3.3. Kultura komisiono — Staneŝnikov F.F. kaj Novikova L.L.,
- 3.4. Komisiono pri gazetaro kaj eldonagado — Zubkov N.B. kaj Samodaj V.V.,
- 3.5. Komisiono pri internaciaj rilatoj — Perevalov D.A.,
- 3.6. Sovetia sekcio de MEM — Podkaminer S.N.,
- 3.7. Junulara komisiono — Aroloviĉ V.S.,
- 3.8. Virina komisiono — Medvedeva L.I.,
- 3.9. Scienc-teknika komisiono — Gonĉarov A.J.

REGULARO PRI LA ASOCIO DE SOVETIAJ ESPERANTISTOJ ¹³⁵

La Asocio de Sovietiaj Esperantistoj estas socia organizaĵo, unuiganta klubojn, kolektivojn, rondetojn kaj aliajn grupojn de sovetiaj civitanoj, posedantaj la lingvon Esperanto aŭ lernantaj ĝin.

La Asocio de Sovietiaj Esperantistoj (sube — la Asocio) agas laŭ tiu ĉi Regularo.

1. Celoj, taskoj kaj agado de la Asocio

1.1. Ĉefaj celoj kaj taskoj de la Asocio estas:

1.1.1. Partopreno kun uzo de Esperanto en plifirmigo de amikeco kaj vastigo de kulturaj ligoj de la sovetia popolo kun eksterlandaj popoloj cele al forta paco, sekureco kaj kunlaboro;

1.1.2. Koordino de internaciaj ligoj de sovetiaj esperantistoj;

1.1.3. Helpo al esperantistoj lerni kaj profundigi la sciojn pri Esperanto;

¹³⁵ Traduko de oficiala rusa teksto «Положение об Ассоциация советских эсперантистов», publikigita en «informateno de ASE», N 1(1979), p. 1—7.

1.1.4. Eduko de sovetiaj esperantistoj pri patriotismo kaj internaciismo, senkompromiseco al reakcia ideologio, faŝismo, koloniismo, rasa diskriminacio, socia malfjusteco.

1.2. Por plenumi tiujn celojn kaj taskojn la Asocio:

1.2.1. Konatigas alilandan socion kun soveta realeco kaj vivo de la sovetia popolo, kun evoluo de ekonomio, scienco, kulturo en USSR, kun en- kaj eksterlanda politiko de Soveta ŝtato;

1.2.2. Helpas al sovetiaj esperantistoj konatiĝi kun historio, kulturo, ekonomio de eksterlandaj popoloj, ties lukto por solvo de sociaj kaj politikaj problemoj;

1.2.3. Starigas kaj efektivas ligojn kun internaciaj kaj naciaj E-organizaĵoj kaj apartaj agantoj de E-movado, reprezentas sovetiajn esperantistojn en konformaj internaciaj konferencoj kaj renkontiĝoj;

1.2.4. Esploras la stacion de instrua kaj eduka agado en E-kolektivoj kaj rondetoj, helpas perfektigi kaj pliefikigi la laboron.

1.3. Praktika agado de la Asocio estas efektiva per:

1.3.1. Korespondado kun konformaj alilandaj organizaĵoj, interŝanĝo kun ili de E-periodaĵoj kaj aliaj informaj materialoj, interŝanĝo de delegitaroj, prelegantoj, specializitaj turistaj grupoj, okazigo de internaciaj renkontiĝoj, partopreno en kongresoj kaj konferencoj de internaciaj kaj naciaj E-organizaĵoj;

1.3.2. Okazigo aŭ helpo pri organizo de instruaj kaj kulturaj aranĝoj — konferencoj, seminarioj, prelegejoj k.s.;

1.3.3. Eldono laŭ fiksita ordo de lerniloj, soci-politika, instru-metodika, belarta literaturo en Esperanto, partopreno en disvastigo de sovetiaj eldonaĵoj eksterlande kaj konatigo de sovetiaj esperantistoj kun progresema eksterlanda E-literaturo;

1.3.4. Atendiĝo de amaskomunikiloj al la agado de sovetiaj esperantistoj.

2. Membreco en la Asocio

2.1. Membroj de la Asocio povas esti kluboj, kolektivoj, rondetoj de esperantistoj, fonditaj kaj funkciaj ĉe lokaj sindikataj, komitatoj, urbaj aŭ distriktaj komsomolaj komitatoj, agnoskantaĵaj celojn kaj taskojn de la Asocio kaj agantaj laŭ tiu ĉi Regularo.

2.2. Membreco en la Asocion faras Prezidion de la Asocio laŭ peticio de E-klubo, rondeto.

2.3. Membroj de la Asocio rajtas:

2.3.1. Esti reprezentitaj en konferencoj kaj kunvenoj de la Asocio, ankaŭ en ties gvidorganoj;

2.3.2. Prezenti al la Asocio proponojn pri ĉiuj demandoj, pri kiuj ĝi kompetentas;

2.3.3. Efektivigi instruan kaj kulturan laboron kun ilin konsistigantaj esperantistoj;

2.3.4. Uzi materialojn, destinitajn por organizaĵoj — membroj de la Asocio.

2.4. Membroj de la Asocio devas:

2.4.1. Obei la Regularon pri la Asocio;

2.4.2. Aktive partopreni agadon de la Asocio;

2.4.3. Plenumi decidojn de gvidorganoj de la Asocio;

2.4.4. Raporti al gvidorganoj de la Asocio pri sia laboro.

2.5. E-klubo aŭ kolektivo rajtas ĉesi membrecon en la Asocio post akcepto de konforma decido kaj ĝustatempa sciigo pri tio al la Asocio.

2.6. Membroj de la Asocio povas esti eksmembritaj fare de la Estraro de la Asocio pro sistema neglekto de la Regularo de la Asocio kaj decidoj de ties gvidorganoj.

3. Strukturo kaj gvidorganoj de la Asocio

3.1. En sia strukturo la Asocio baziĝas sur la principo de demokratia centrismo.

3.2. La Asocio havas jenan organizan strukturon:

- E-kolektivoj (klubo, rondetoj, grupoj);
- urbaj kluboj (se en la urbo ekzistas kelkaj kolektivoj);
- regionaj (teritoriaj) filioj, se en la regiono (teritorio) ekzistas kelkaj E-klubo;
- respublikaj filioj (respublikaj Asocioj);

La menciitaj suborganoj agas surbaze de tiu ĉi Regularo kaj tipaj Regularoj, aprobataj de la Estraro de la Asocio.

3.3. La gvidorganoj de la Asocio estas:

3.3.1. Tutsovetia Konferenco;

3.3.2. Estraro de la Asocio;

3.3.3. Prezidio de la Asocio.

3.4. La Tutsovetia Konferenco estas la plej supera gvidorgano de la Asocio. La Konferenco estas organizata de la Estraro unufoje dum tri jaroj. Laŭbezone la Estraro povas organizi eksternican Konferencon.

La elekton de delegitoj el organizaj — membroj de la Asocio por la Konferenco kaj la reprezentantojn difinas la Prezidio de la Asocio. La Konferenco estas legitima, se en ĝi estas ne malpli ol 2/3 de la elektitaj delegitoj.

3.5. La Tutsovetia Konferenco de la Asocio:

3.5.1. Aŭskultas kaj aprobas raporton de la Estraro de la Asocio;

3.5.2. Traktas, revizias, kompletigas la Regularon pri la Asocio;

3.5.3. Difinas agadirektojn de la Asocio, aprobas la perspektivan laborplanon;

3.5.4. Elektas Estraron de la Asocio;

3.5.5. Traktas aliajn eventualajn demandojn.

3.6. La Estraro estas plenuma kaj administra organo de la Asocio, gvidas ties agadon inter la Konferencoj. La kunsidoj de la Estraro estas organizataj ne pli malofte ol unufoje dum jaro.

La Estraro de la Asocio:

3.6.1. Organizas realigon de la decidoj de la Tutsovetia Konferenco, kontrolas ties plenumon, ankaŭ obeon de tiu ĉi Regularo;

3.6.2. Traktas kaj aprobas jarajn laborplanojn de la Asocio, raportojn kaj proponojn de Prezidio de la Asocio;

3.6.3. Pridiskutas demandojn, litigitajn kun partopreno de la Asocio en agado de internaciaj E-organizaj kaj akceptas decidojn pri ili;

3.6.4. Organizas Tutsovetiajn Konferencojn de la Asocio;

3.6.5. Fondas laŭbezone komisionojn kaj sekciojn;

3.6.6. Kooptas novajn estraranojn;

3.6.7. Elektas la Prezidion de la Asocio.

3.7. La Prezidio de la Asocio efektivas konstantan gvidadon de la agado de la Asocio. La Prezidio estas elektata de la Estraro por trijara periodo en la konsisto: prezidanto, vicprezidantoj, respondeca sekretario kaj 7 — 9 prezidianoj. La Prezidio kunvenas laŭbezone, sed ne pli malofte ol unufoje dum tri monatoj.

La Prezidio de la Asocio:

3.7.1. Realigas decidojn de la Tutsovetia Konferenco kaj la Estraro, baziĝante sur ili kompilas la laborplanojn de la Asocio, traktas kaj operative solvas ĉefajn kaj teknikajn demandojn de la agado;

3.7.2. Traktas peticiojn pri membriĝo en la Asocio;

3.7.3. Organizas kunsidojn de la Estraro;

3.7.4. Gvidas eldonagadon de la Asocio, aprobas programajn kaj instruajn planojn pri instruado de Esperanto;

3.7.5. Organizas kaj subtenas ligojn kun eksterlandaj E-organizaĵoj kaj apartaj esperantistoj;

3.7.6. Aŭskultas raportojn de reprezentantoj de la Asocio pri ties laboro en internaciaj E-organizaĵoj;

3.7.7. Efektivigas registradon de agado de la Asocio kaj preparas periodan resuman raporton;

3.7.8. Informas sovetian kaj aliandan socion pri agado de la Asocio;

3.7.9. Reprezentas la Asocion en konformaj organizaĵoj;

3.7.10. Solvas aliajn demandojn, rilatantajn al agado de la Asocio.

3.8. Ĉiuj gvidorganoj de la Asocio estas elektataj per malfermita balotado laŭ ordinara plimulto de la voĉoj.

4. Kunlaboro kun sociaj organizaĵoj kaj institucioj

Asocio de Sovetiaj Esperantistoj kiel kolektiva membro membras en Unio de sovetiaj societoj de amikeco kaj kultura ligo kun eksteraj landoj.

La Asocio efektivas sian laboron helpe de centraj kaj lokaj sindikataj kaj komso-molaj organizaĵoj, kiuj disponigas al E-rondetoj ejojn en kluboj, domoj de junularo por temado kaj kultur-amasaj aranĝoj, helpas okazigi seminariojn k.s.

La Asocio kontaktas ankaŭ kun aliaj sociaj organizaĵoj, instancoj kaj institucioj.

5. Monrimedoj de la Asocio

Monrimedoj de la Asocio estas formataj el:

5.1. Profito de la eldonagado;

5.2. Enspezoj de kolektivaj membroj (por organizo de instrua laboro, seminarioj kaj aliaj aranĝoj);

5.3. Enspezoj de sociaj organizaĵoj, instancoj kaj institucioj.

Ordon en la elspezado de la monrimedoj determinas Estraro de la Asocio.

6. Jura stato de la Asocio

6.1. La Asocio ĝuas la rajton de jura persono.

6.2. En interrilatoj kun sovetiaj kaj eksterlandaj organizaĵoj la Asocion reprezentas la Prezidio.

6.3. La Asocio havas stampon kaj sigelon laŭ aprobita modelo kun sia titolo.

DECIDO DE LA TUTSOVETIA FONDA KONFERENCO DE LA ASOCIO DE SOVETIAJ ESPERANTISTOJ

La Tutsovetia Konferenco, reprezentanta Esperanto-klubojn kaj Esperanto-organizaĵojn de urboj, provincoj, regionoj, aŭtonomaj kaj uniaj respublikoj, *DECIDAS*:

1. Fondi la Asocion de Sovetiaj Esperantistoj (ASE).
2. Konfirmi la Regularon pri la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj.

DECIDO DE LA TUTSOVETIA FONDA KONFERENCO DE LA ASOCIO DE SOVETIAJ ESPERANTISTOJ

Aŭskultante kaj pridiskutinte la raporton pri la stato kaj rimedoj por plibonigo de la esperantista laboro en la lando kaj demandon pri fondo de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE), la Konferenco, reprezentanta Esperanto-klubojn kaj Esperanto-organizaĵojn de urboj, provincoj, regionoj, aŭtonomaj kaj uniaj respublikoj, aprobas la decidon de Unio de sovetiaj societoj de amikeco kaj kulturaj ligoj kun eksteraj landoj (SSOD), Tutsovetia Centra Konsilantaro de Profesiaj sindikatoj (VCSPS) kaj Centra Komitato de Tutsovetia Lenina Komunista Junulara Unuiĝo (CK VLKSM) pri kreo de la Asocio kaj akceptas ĝin kiel esprimon de zorgo kaj helpo pri ordigo kaj evoluigo de la Esperanto-movado en nia lando.

Ĝenerala Sekretario de CK KPSU, Prezidanto de Prezidiumo de Supera Soveto de USSR kamarado L.I. Breĵnev plurfoje substrekis la grandegan signifon de la fortoj de sociaktivularo en solvo de gravaj internaciaj problemoj. La sovetiaj esperantistoj opinias sia unuaranga devo aktive partopreni, kune kun vastaj randoj de la sovetia sociaktivularo, en la nobla lukto por ĉiurimeda larĝigo de la fronto de pacadeptoj. Ni konsideras la internacian helpan lingvon Esperanto kiel unu el iloj por disvastigi la veron pri nia sovetia realeco, pri evoluo de ekonomio, scienco kaj kulturo en USSR, pri la interna kaj ekstera politiko de nia ŝtato kaj disvastigi la ideojn de interkompreno, kunlaboro kaj interpopola amikeco, malstreĉiĝo de la internacia tensio, tutmonda paco. Esperanto devas helpi al la sovetiaj esperantistoj pri konatiĝo kun la vivo, laboro, kulturo, sociaj problemoj de laboruloj en eksteraj landoj, plifirmigi la aferon de internaciismo. La decido pri kreo de la Asocio metas sur nin altan respondecon kaj devigas ne nur vastigi, sed ankaŭ profundigi nian agadon en la sfero de evoluigo kaj firmigo de internaciaj ligoj, fari ilin pli efikaj.

Dezertante la fondon de la Asocio de sovetiaj esperantistoj, la Konferenco *DECIDAS*:

1. Konsideri ĉefa tasko de la Asocio kaj ĝin enirantaj esperantistaj organizaĵoj partopreni, helpe de la lingvo Esperanto, en firmigo de amikeco kaj evoluigo de kulturaj ligoj de la sovetia popolo kun popoloj de eksteraj landoj por interesoj de firma paco, sekureco kaj kunlaboro; helpi al esperantistoj pri studado aŭ profundo de scioj de la lingvo Esperanto; eduki ĉe la sovetiaj esperantistoj la sentojn de patriotismo kaj internaci-

ismo, nekompromisemo al reakcia ideologio, al faŝismo, koloniismo, rasa diskriminacio kaj socia maljusto. La Asocio kontribuos al evoluigo de la internaciaj ligoj de sovetiaj esperantistoj kaj kunordigos la agadon de lokaj Esperanto-organizaĵoj en la interna kaj internacia sferoj.

2. Proponi al la Estraro de la Asocio en laŭeble nelonga tempo en intima kontakto kun la sindikataj kaj komsomolaj organizaĵoj efektiviigi laboron pri ordigo de antaŭviditaj en la Regularo lokaj organizaĵoj (klubo, rondetoj, urbaj, provincaj, regionaj kaj respublikaj filioj aŭ Asocioj) por altiri ilin al aktiva laboro pri vastigo kaj firmigo de la internaciaj ligoj kun eksterlandaj esperantistoj en la komuna lukto por interkompreno, malstreĉiĝo, malmado kaj tutmonda paco. Dum 6 monatoj ellabori kaj konfirmi tipan regularon pri Esperanto-klubo.

3. Por pli efika organizo de laboro rekomendi al la Estraro krei specialigitajn sekciojn aŭ komisionojn (organiz-amasan, pri internaciaj ligoj, pri gazetaro kaj informado, pri akcepto kaj helpo al eksterlandaj esperantistoj-turistoj, junularan, virinan k.a.).

Komisii gvidon de la sekcioj kaj komisionoj al spertaj kaj kvalifikitaj aktivuloj-esperantistoj.

4. Komisii al la Estraro peti ĉe SSOD, VCSPS kaj CK VLKSM prepari la demandon pri establo de eldonado de soci-politika kaj literatur-belarta revuo en Esperanto kaj informa bulteno de la Asocio en la rusa lingvo kaj ankaŭ pri eldonado de lerniloj, soci-politika kaj belarta literaturo en Esperanto. Starigi kontakton kun administretoj pri rimedoj de amasa informado (preso, agentejo APN, Ŝtata komitato pri televido kaj radio) por prilumadi la agadon de la Asocio kaj utiligi Esperanton el la vidpunkto de taskoj de ASE.

5. Rekomendi al la Estraro evoluigi kontaktojn kun internaciaj esperantistaj organizaĵoj tiel universalkarakteraj (UEA, TEJO), kiel fakaj kaj naciaj. Entrepreni rimedojn por garantii aktivan partoprenon de la Asocio en la 64-a Kongreso de UEA kaj 35-a Kongreso de TEJO kaj studi la demandon pri kunlaboro kun tiuj organizaĵoj.

6. La Estraro kaj lokaj organizaĵoj aktive partoprenu la laboron de MEM.

7. Praktiki pli vastajn interŝanĝojn kun Esperanto-organizaĵoj de socialismaj landoj, uzi por realigo de ligoj kaj kontaktoj kanalojn de specialigita turismo, interŝanĝo de literaturo k.t.p.

8. Komisii al la Estraro ekkontakti koncernajn organizaĵojn por garantii aktivan organizatan partoprenon de sovetiaj esperantistoj en gravaj soci-politikaj aranĝoj de proksimaj jaroj (efektivigo de la Jaro de Infano, Olimpiko-80 k.a.).

9. Proponi al la Estraro de la Asocio ĉe ellaboro de planoj por praktika laboro konsideri la sugestojn, prezentitajn de delegitoj dum la laboro de la Konferenco kaj entrepreni rimedojn por ties realigo.

La Konferenco alvokas ĉiujn sovetiajn esperantistojn aktive partopreni laboron de la Asocio, kiu devas esti farata sub signo de firmigo de la internacia solidareco de laboruloj en lukto por paco, amikeco, libero, egaleco, frateco kaj feliĉo de ĉiuj popoloj.

* * *

La Konferenco certigas, ke la sovetiaj esperantistoj, kiel unu el laĉmentoj de sovetia soci-aktivularo, kune kun la sovetia popolo subtenados kaj realigados la internan laĉksteran politikon de Soveta Ŝtato, KPSU, Politburoo de CK de nia partio fronte kun kamarado L.I. Breĵnev.

DECIDO DE LA ESTRARO DE ASOCIO DE SOVETIAJ ESPERANTISTOJ (23.05.1980)

Aŭskultinte kaj pridiskutinte la raporton de M.I. Isajev "Decido de SSOD-Prezidio "Pri la stato kaj pliefikigo de profesiaj ligoj de SSOD-asocioj kaj sekcioj kun alilandaj socioj" kaj taskoj de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj" la Estraro de ASE notas, ke dum la periodo de post la Fonda Konferenco la Asocio faris certan laboron por plenumi la taskojn, determinitaj en la ASE-Regularo kaj decido de la Konferenco. En la agado ASE konstante gvidis sin per Decido de CK KPSU "Pri plua plibonigo de la ideologia kaj politik-eduka laboro", parolojn de L.I. Breĵnev pri aktualaj demandoj de ekstera kaj enlanda politiko de Soveta Ŝtato.

Celante ordigi organizajn formojn de la Esperanto-movado en USSR estas fonditaj ASE-filioj en Ukrainio, Litovio, Latvio, Armenio, Estonio kaj Leningrado, estas preparita Tipa Regularo pri klubo de sovetiaj esperantistoj, komencita eldonado de "Informbulteno". Rerezentantoj de ASE partoprenis kelkajn duflankajn kaj multflankajn E-aranĝojn (64-a UEA-Kongreso en Lucerno, kunsidoj de MEM, seminario pri interlingvistiko en GDR, konsultaj renkontiĝoj de reprezentantoj de E-organizaĵoj el socialismaj landoj en Budapeŝto kaj Sofio k.t.p.). Por distribui verajn informojn pri la ekstera kaj enlanda politiko de Sovetio estas eldonitaj en Esperanto 5 suplementoj al la gazeto "Moscow News", distribuitaj en preskaŭ 50 landoj. En sovetia gazetaro por eksterlandaj legantoj kaj en organoj de eksterlandaj E-organizaĵoj estis aperigitaj artikoloj de ASE-aktivuloj pri sovetia vidpunkto al pluraj demandoj de nuntempo.

La Estraro de ASE opinias sia devo noti, ke en la laboro de la Asocio estas ankaŭ signifaj mankoj, restis neplenumitaj kelkaj eroj de la decido de la Fonda Konferenco. Ekzemple, ne estas finita organiza ordigo de la E-movado en la lando, ne estas realigita eldonado de instrua literaturo; signifajn mankojn havas organizo kaj okazigo de tendaroj kaj interurbaj E-renkontiĝoj, en kelkaj urboj ne sufiĉas ligoj de E-organizaĵoj kun lokaj sindikataj kaj komsomolaj instancoj.

La Estraro *DECIDAS*:

1. Aprobi kaj akcepti por plenumo Decidon de SSOD-Prezidio "Pri la stato kaj pliefikigo de profesiaj ligoj de SSOD-asocioj kaj sekcioj kun alilandaj socioj".

2. Komisii al la ASE-Prezidio ĝis la 1-a de aŭgusto pridiskuti kaj aprobi laborplanojn de ASE-komisionoj kaj sekcioj, antaŭvidantaj la konkretajn aranĝojn por plenumo de la Decido de SSOD-Prezidio.

3. Konsideri necesa pluan vastigon de informagado de la Prezidio kaj lokaj ASE-organizaĵoj (filioj, kluboj) pere de kolektiva kaj individua korespondado, aperigo laŭ starigita ordo de artikoloj kaj sciigoj de sovetiaj esperantistoj en eksterlandaj E-eldonaĵoj.

4. Peti SSOD-Prezidion pridiskuti la demandon pri ebleco eldoni revuon de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj kaj distribui ĝin en USSR, kaj en eksterlando.

REZOLUCIO DE LA DUA TUTSOVETIA KONFERENCO DE LA ASOCIO DE SOVETIAJ ESPERANTISTOJ (26.03.1982)

Aŭskultinte kaj pridiskutinte raporton de la Prezidanto de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj profesoro M.I. Isajev "Pri laboro de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj kaj taskoj en la batalo por la paco, malstreĉiĝo, malarmado" la delegitoj de la konferenco notas, ke la agado de la Asocio dum la raporta periodo okazis en la kondiĉoj de plua firmigo de la lukto de progresemaj fortoj por internacia malstreĉiĝo, por la triumfo de la politiko de paca kunekzistado de ŝtatoj kun diversaj sociaj sistemoj, por la paco en la tuta mondo.

La Konferenco konstatas, ke malgraŭ kreskintaj penoj de imperialismaj registaroj, unuavice la nova usona administracio, kaj aliaj reakciaj fortoj, en la mondo restas dominantaj la tendencoj al malstreĉiĝo kaj interkompreniĝo inter popoloj, plifirmigo de la movado por malarmado.

Insistaj kaj sinsekvaj penoj de Soveta Unio, aliaj socialismaj landoj kaj ĉiuj progresemaj fortoj de nia planedo, direktitaj al plisaniĝo de la internacia klimato, plifortigo de la malstreĉiĝo, plifirmigo de la paco kaj internacia kunlaborado, alportis siajn fruktojn. Popoloj de Eŭropo pli ol 36 jarojn loĝas en kondiĉoj de paco. La strebo de popoloj konservi la proceson de plisaniĝo de la internacia medio estas konvinka atesto, ke atingo de forta paco estas vere reala tasko, por kiu eblas kaj necesas labori plenforte.

La Dua Konferenco de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj okazas en la tempo, kiam la sovetia popolo prepariĝas celebri la 60-jaran datrevenon de fondiĝo de USSR — la unua en la mondo unueca unia multnacia ŝtato de laboristoj kaj kamparanoj. La sesdekjariĝo de USSR estas grava evento en la vivo de sovetia popolo, eminenta atesto de triumfo de lenina nacia politiko de KPSU, de la historiaj atingoj de socialismo. En ĉi tiu glora datreveno Soveta Unio sin prezentas antaŭ la tuta mondo kiel amikeca familio de egalrajtaj respublikoj, komune konstruantaj komunismon. Monolita estas la soci-politika kaj idea unuiĝo de nia socio. Estas nerompebla la solidareco de la sovetia popolo kun nia Komunista partio, ties Centra Komitato, kun fidela sekvanto de la lenina afero kamarado L.I. Breĵnev ĉekape.

Sian grandan feston la sovetianoj renkontas per novaj atingoj en ĉiuj sferoj de la socia vivo, per persista krea laboro efektivigante la planojn de komunisma kreado, ellaboritajn de la 26-a Kongreso de KPSU.

Bazante sin sur decidoj de la Kongreso, la partio kaj la popolo insiste batalas por forigo de militminaco kaj plifirmigo de la paco sur la tero. La sovetiaj esperantistoj, kiel la tuta sovetia popolo, celas doni sian laŭfortan kontribuon al la plenumo de la taskoj, metitaj de la Kongreso. Preteco de la Komunista partio kaj Soveta registaro konstante profundigi kaj vastigi la internacian kunlaboradon kaj kulturajn ligojn donas novan fortan impulson al nia agado pri plifortigo de la amikecaj rilatoj inter la popoloj de USSR kaj eksterlando.

La Konferenco rimarkas, ke dum la raporta periodo la Asocio faris pozitivan laboron pri ordigo de la E-movado en nia lando. Agante sub la gvido kaj ĉiufanka helpo de la Unio de sovetiaj societoj de amikeco kaj kulturaj ligoj kun eksteraj landoj, en proksima kontakto kun sindikataj, komsomolaj kaj aliaj sociaj organizaĵoj, ASE efektivigis

fondon de ASE-filioj en kvin uniaj respublikoj (Ukrainio, Litovio, Latvio, Armenio kaj Estonio) kaj en Leningrada provinco. (En Belorusio, Uzbekio, Kazahio, Kartvelio, kie ne tiom multas E-klubo, agas E-komisionoj ĉe respublikaj societoj de amikeco). Rektajn sufiĉe regulajn kontaktojn la Prezidio de la Asocio havas nun kun E-klubo el proksimume 60 urboj.

Ekde la fino de 1979 la Asocio komencis eldonadi Informbultenon. Jam estas eldonitaj 18 numeroj kun eldonkvanto po 500 ekz. En la bulteno estas levataj aktualaj demandoj de nuntempa batalo por la paco, estas informoj pri laboro de la ASE-gvidantaro, pri agado de respublikaj filioj, kluboj kaj rondetoj.

Dum la raporta periodo esperantistoj faris laboron pri edukado de junularo kaj aktiviloj en spirito de sovetia patriotismo kaj socialisma internaciismo. En kelkaj kluboj (Vilnius, Krasnodar, Krasnojarsk, Kujbiŝev, Niĵnevartovsk, Samarkand, Jaroslavl k.a.) estis okazigataj vesperoj de internacia amikeco kun popoloj de eksterlando, kunveno, dediĉitaj al batalo por la paco, ekspozicioj de materialoj, ricevitaj de eksterlandaj korespondantoj, unuavice de esperantistoj el frataj socialismaj landoj.

La Konferenco kun kontento konstatas, ke la Asocio dum la raporta periodo faris pozitivan laboron ankaŭ pri evoluigo kaj plifirmigo de kontaktoj kun eksterlanda E-socio. Tiu ĉi laboro unuavice estis direktita al konatigo de alilandaj esperantistoj kun atingoj de USSR en plenumo de la deka kvinjara plano kaj decidoj de la 26-a Kongreso de KPSU, kun efektiviĝo de tenina eksterlanda politiko de Soveta registaro, realigo de la nova Konstitucio de USSR, kun atingoj pri kreado de komunista socio en nia lando.

Pli aktiva kaj celdirektita fariĝis partopreno de sovetiaj esperantistoj en internacia E-movado, en ĉiujare okazigataj konsultigoj de gvidantoj de E-organizaĵoj el socialismaj landoj, dum kiuj estas elaborataj komunaj pozicioj pri aktivigo de la agado de esperantistoj en la batalo por la paco kaj amikeco de popoloj. Dum tri jaroj SOD kaj la Asocio partoprenis en E-kongresoj, renkontigoj, konferencoj kaj aliaj internaciaj aranĝoj en Bulgario, Hungario, Vjetnamio, GDR, Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio, Svedio, Svisio kaj Brazilo pli ol 80 sovetiajn esperantistojn.

En 1979 — 1982 SOD kaj la Asocio eldonis naŭ Esperanto-suplementojn al la ĵurnalo "Moscow News" po 10000 ekz. En ili estis publikigitaj pluraj gravegaj dokumentoj de CK KPSU kaj Soveta registaro, materialoj de la 26-a Kongreso de KPSU, prelegoj kaj paroloj de L.I. Breĵnev pri problemoj de en- kaj eksterlanda politiko, broŝuro "De kie venas minaco kontraŭ paco". La plej granda parto de la suplementoj estis dissendita al E-organizaĵoj kaj apartaj esperantistoj en ĉirkaŭ 50 landoj — kaj dum tiuj ĉi jaroj estas ricevitaj multaj pozitivaj reĝoj kaj en eksterlanda E-gazetaro, kaj en leteroj, ricevataj de la Asocio kaj de la redakcio de "Moscow News".

En eksterajn landojn estis senditaj sinturnoj de ASE kaj apartaj kluboj, ankaŭ letero al esperantistoj kun alvoko elpaŝi kontraŭ vetarmado, produktado de neŭtrona kaj kernia armilaro, partopreni Marŝon de paco kaj aliajn amasaranĝojn. En pluraj kluboj estis okazigataj sabatumoj kaj dimanĉumoj de internacia solidareco kun posta transkontigo de la perlaborita saĵaro al Sovetia pacfonduso.

Estis esperantigitaj dokumentaj filmoj kaj filmo pri la juneco de V.I. Lenin por prezento al esperantistoj dum internaciaj aranĝoj kaj renkontigoj, ankaŭ por ekspedo al grandaj eksterlandaj E-organizaĵoj.

La Konferenco tamen rimarkas, ke dum la raporta periodo ne ĉiuj eroj de la Asocio agis kun enda aktiveco — tio koncernas unuavice Komisionojn de ASE, precipe la junularan, virinan, kultur-amasan. Kelkaj kluboj praktike limigis sian agadon per lingva praktiko, orientiĝante al mallarĝa rondo de siaj membroj, havas malfortajn ligojn kun komsomolaj kaj sindikataj organizaĵoj kaj kun la Estraro de ASE. Apartaj kluboj havas

malfacilaĵojn pro tio, ke ĝis nun ne estis aprobita Tipa regularo pri klubo de sovetiaj esperantistoj. Ĝis nun oni ne sukcesis ekeldoni revuon de la Asocio, instru-metodikon kaj soci-politikan literaturon en Esperanto. "Informbulteno" de ASE aperas neregule, pro kio parto de gravaj kaj interesaj informoj venas al legantoj kun granda malfruo. Kelkaj ASE-filioj (Armenia, Latvia, Estonia) kaj kluboj ne alsendas informojn pri sia agado aŭ sendas ilin tre malofte. En pluraj urboj ĝis nun ne estas solvitaj organizaj demandoj (koordinado de agado inter du aŭ pli da kluboj, agantaj en la sama urbo, k.s.).

La Konferenco substrekas, ke la agado de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj entute, de ties filioj kaj kluboj sekvantperiode devas baziĝi sur la taskoj, metitaj antaŭ la sovetiaj sociaj organizaĵoj de la decidoj de la 26-a Kongreso de KPSU, de la decidoj de KPSU pri ideologia laboro kaj eksterlanda politika agado de Soveta Ŝtato, de paroloj de la Ĝenerala sekretario de CK KPSU, Prezidanto de Prezidio de la Supera Soveto de USSR kamarado L.I. Breĵnev.

La Konferenco decidis:

1. Taksi la laboron de la Estraro de ASE dum la raporta periodo kontentiga.

2. Konforme al la "Regularo pri la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj" konsideri la plej grava tasko de ASE ĉiurime uzi Esperanton en la batalo por la paco, malstreĉiĝo de la internacia tensio kaj plifirmigo de internacia kunlaborado kaj tiucele organizi pli vastan informadon de eksterlanda socio pri la vivo de sovetia popolo, pri la en- kaj eksterlanda politiko de Soveta Ŝtato, pri evoluo de la ekonomio, scienco kaj kulturo de USSR. Centre de la konstanta praktika agado de la Asocio devas esti ankaŭ demandoj de plua ordigo de la laboro kun esperantistoj ĉiunivele, firmigo de la ligoj de la Estraro de ASE, ties filioj kaj kluboj kun respektivnivelaĵaj sindikataj kaj komsomolaj instancoj, aligo de politik-eduka laboro en la kluboj kaj filioj de ASE.

3. Aprobi la preparitan de la Prezidio de ASE "Planon de ĉefaj agadirektoj de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj por 1982 — 1983". Proponi al ĉiuj estraroj de ASE-filioj dum monato surbaze de tiu ĉi plano ellabori siajn konkretajn laborplanojn por la sama periodo kaj poste prezenti ilin al la Prezidio de ASE. Pluajn ASE-laborplanojn aprobadu dum jaraj kunsidoj de la Estraro de ASE.

4. La Prezidio de ASE speciale atentu efikan laboron de komisionoj de la Estraro kaj sovetia MEM-sekcio, celante, ke ĉiu estrarano aktive laboru minimume en unu el la komisionoj. Dum la kunsidoj de la Prezidio aŭskulti raportojn de komisionestroj pri la farita laboro.

5. Konsideri laŭcela fondi komisionon de la Estraro de ASE pri internacia edukado de sovetiaj esperantistoj. La junulara komisiono de ASE plifirmigu siajn ligojn kun junularaj E-klubo.

6. Peti la gvidantaron de SSOD helpi eldoni lemlon de Esperanto por rondetoj en la kvanto, konforma al bezonoj de la kluboj.

7. Peti Prezidion de SSOD, VCSPS kaj CK VLKSM kune kun aliaj organizaĵoj trovi eblecojn fondi eldongrupon (redakcion) por eldoni en Esperanto revuon kaj librojn (soci-amasan, lern-metodikon kaj belartan literaturon), ankaŭ organizi regulajn radioelsendojn en Esperanto por eksteraj landoj.

8. Komisi al la Prezidio de ASE senpere okupiĝi pri organizo de tutsovetiaj someraj E-tendaroj.

IGVIDJORGANOJ DE ASE POST LA 2-A ASE-KONFERENCO

1. Estraro de ASE:

- 1.1. Aroloviĉ Viktor S. — Moskvo,
- 1.2. Berjoza Anatolij V. — Moskvo (SSOD-funkciulo) ¹³⁶,
- 1.3. Bespalov Vladimir I. — Soĉi,
- 1.4. Cibulevskij Dmitrij M. — Ĥarkiv,
- 1.5. Donskaja Lubovj I. — Moskvo,
- 1.6. Eisen Ferdinand M. — Tallinn,
- 1.7. Gonĉarov Aleksandr M. — Moskvo,
- 1.8. Gonĉarov Anatolij J. — Moskvo,
- 1.9. Grigorjev Viktor P. — Moskvo,
- 1.10. Grigorov Valerij M. — Moskvo (funkciulo el VCSPS),
- 1.11. Isajev Magomet I. — Moskvo,
- 1.12. Kalniņš Ajvars R. — Riga,
- 1.13. Kameškov Boris N. — Leningrad,
- 1.14. Kanajev Georgij J. — Moskvo (funkciulo el VCSPS),
- 1.15. Kazakov Anatolij B. — Moskvo,
- 1.16. Kim Pjotr L. — Alma-Ata,
- 1.17. Kocarij Sergej V. — Krasnodar,
- 1.18. Kolker Boris G. — Ufa,
- 1.19. Kolobova Galina A. — Moskvo (SSOD-funkciulo),
- 1.20. Kondjakov Aleksandr V. — Moskvo (funkciulo el VLKSM),
- 1.21. Koreckij Grigorij I. — Moskvo,
- 1.22. Koroleviĉ Aleksandr I. — Lviv,
- 1.23. Korotkeviĉ Georgij J. — Moskvo,
- 1.24. Krajnov Sergej N. — Moskvo,
- 1.25. Kuznecov Sergej N. — Moskvo,
- 1.26. Lazareva Lubovj P. — Moskvo (funkciulo el VCSPS),
- 1.27. Loseva Natalja V. — Moskvo (SSOD-funkciulo),
- 1.28. Maĉkalova Susanna A. — Jerevan,
- 1.29. Majburova Jekaterina V. — Kievo,
- 1.30. Makovskij Anatolij I. — Moskvo (SSOD-funkciulo),
- 1.31. Matkovskaja Galina N. — Moskvo (SSOD-funkciulo),
- 1.32. Melnikov Aleksandr S. — Rostov/Don,
- 1.33. Melnikova Evelina B. — Moskvo,
- 1.34. Mutalov Šaahmat Š. — Taškento,
- 1.35. Narumov Boris P. — Moskvo,
- 1.36. Novikova Ludmila L. — Moskvo,
- 1.37. Ojalo Jaan H. — Tallinn,
- 1.38. Paščenko Miĥail F. — Moskvo,
- 1.39. Patatjan Avetis G. — Jerevan,
- 1.40. Perevalov Dmitrij A. — Moskvo,
- 1.41. Petruk Boris G. — Moskvo,
- 1.42. Podkaminer Semjon N. — Leningrad,
- 1.43. Poltjrev Viktor S. — Ivanovo,
- 1.44. Popov Aleksandr I. — Minsk (funkciulo el VLKSM),

¹³⁶ Kooptita post la Konferenco.

- 1.45. Rjabceva Nadejda K. — Moskvo,
- 1.46. Rukšans Janis H. — Riga,
- 1.47. Samodaj Vladimir V. — Moskvo,
- 1.48. Sapojnikov Vladimir S. — Krasnojarsk,
- 1.49. Sedov Vladimir S. — Moskvo,
- 1.50. Sibircev Vladimir A. — Novosibirsk,
- 1.51. Skupas Laurinas L.A.J. — Vilnius,
- 1.52. Smimov Vladimir V. — Moskvo,
- 1.53. Stanešnikov Fjodor F. — Moskvo,
- 1.54. Šakirov Kutlukhan A. — Taškento,
- 1.55. Šijafer Aleksandr Z. — Tomsk,
- 1.56. Ŝoroĥova Natalja N. — Moskvo,
- 1.57. Tkeŝelaŝvili Georgij K. — Tbilisi,
- 1.58. Toidze Levan M. — Tbilisi,
- 1.59. Tokarev Boris V. — Moskvo,
- 1.60. Vaitilavičius Adomas J. — Vilnius,
- 1.61. Verbickij Jevgenij A. — Moskvo (funkciulo el VLKSM),
- 1.62. Verigin Vitalij J. — Moskvo (funkciulo el VLKSM),
- 1.63. Volkov Vjačeslav V. — Leningrad,
- 1.64. Zubkov Nikolaj B. — Moskvo.

2. Prezidio de ASE:

- 2.1. Isajev Magomet I. — Prezidanto,
- 2.2. Zubkov Nikolaj B. — vicprezidanto,
- 2.3. Makovskij Anatolij I. — vicprezidanto,
- 2.4. Podkamjner Semjon N. — vicprezidantoASE,
- 2.5. Samodaj Vladimir V. — vicprezidantoASE,
- 2.6. Cibulevskij Dmitrij M. — prezidiano,
- 2.7. Kanajev Georgij J. — prezidiano,
- 2.8. Kolker Boris G. — prezidiano,
- 2.9. Kolobova Galina A. — prezidiano,
- 2.10. Majburova Jekaterina V. — prezidiano,
- 2.11. Paŝčenko Mihail F. — prezidiano,
- 2.12. Percevalov Dmitrij A. — prezidiano,
- 2.13. Petruk Boris G. — prezidiano,
- 2.14. Verbickij Jevgenij A. — prezidiano,
- 2.15. Volkov Vjačeslav V. — prezidiano,
- 2.16. Berjoza Anatolij V. — respondeca sekretario ¹³⁷.

3. Komisionoj kaj sekcioj de ASE (kun la gvidantoj kaj aliaj respondeculoj):

- 3.1. Organiza komisiono — Makovskij A.I.;
- 3.2. Komisiono pri internaciaj ligoj — Isajev M.I.;
- 3.3. Junulara komisiono — Ŝoroĥova N.N.;
- 3.4. Komisiono pri ideologia laboro kaj internacia edukado — Verigin V.J.;

¹³⁷ La 26-an de marto 1982 okazis la unua (post la 2-a Konferenco) kunsido de la Estraro, dum kiu Anatolij V. Berjoza estis kooptita en la Estraron de ASE kaj elektita kiel ties respondeca sekretario.

- 3.5. Komisiono pri informado kaj gazetaro — Samodaj V.V.;
- 3.6. Ĉefredaktoro de la "Informbulteno" de ASE — Zubkov N.B.;
- 3.7. Kultura komisiono — Stanešnikov F.F.;
- 3.8. Instru-metodika komisiono — Kolker B.G.;
- 3.9. Scienc-teknika komisiono — Gončarov A.J.;
- 3.10. Virina komisiono — Donskaja L.I.;
- 3.11. Sovetia sekcio de MEM — Podkaminer S.N.;
- 3.12. Respondeculo pri laboro kun blindaj esperantistoj — Sedov V.S.

DECIDO DE LA ESTRARO DE LA ASOCIO DE SOVETIAJ ESPE- RANTISTOJ (09.12.1983)

Aŭskultinte kaj pridiskutinte la raporton de Prezidanto de la Asocio M.I. Isajev "Aktualaj taskoj de sovetiaj esperantistoj en batalo por la paco kaj plifirmigo de internaciaj kontaktoj" la Estraro de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj rimarkas, ke demandoj de batalo por la paco, por vastigo kaj plifirmigo de internaciaj kontaktoj, por pliefikigo de internacia agado de la Asocio aktualas precipe nuntempe, kiam furioza politiko Rejgan-administracio, esprimanta interesojn de la militindustria komplekso de Usono subigas la mondon al minaco de term nuklea milito, kies postsekvo povas esti pere de la tuta homaro.

La Estraro de ASE plene aprobas kaj subtenas Deklaron de la Ĝenerala sekretario de CK KPSU, Prezidanto de Prezidio de Supera Soveto de USSR J.V. Andropov de la 24-a de novembro ci-jare lige kun ekdisvolvo de usonaj mezdistancaj raketoj en Okcidenta Eŭropo. Tiu ĉi Deklaro havas ekskluzive gravan politikan signifon kaj estas nova konfirmo de inklino de Soveta Unio al pacama lenina eksterlanda politiko, principa direktiĝo al ĉesigo de la vetarmado, antaŭ ĉio la nuklea, al malpliigo kaj finrezulte plena nenigo de nuklea militminaco.

La Estraro de ASE alvokas ĉiujn esperantistojn kaj iliajn organizaĵojn entrepreni aranĝojn por aktivigi laboron pri klarigo al alilanda socio de la Deklaro de kamarado J.V. Andropov, disvastigo de vero pri devigitaj respondaj agoj de nia ŝtato kaj ties aliancanoj por efektiviĝo de sia sekureco, por ne permesi al Usono kaj NATO rompi ekzistantan proksimuman egalecon de fortoj en Eŭropo, fariĝinta objektiva faktoro de eŭropa sekureco kaj stabileco.



La Estraro de ASE rimarkas, ke dum la tempo post la 2-a raport-reelekta konferenco (marto 1982) la Asocio signife aktivigis laboron pri plua firmigo de kontaktoj kun E-socio en eksterlando, precipe kun la asocioj de esperantistoj en socialismaj landoj kaj MEM. Aprile 1982 en Jerevan estis sukcese okazigita la 15-a konsulta renkontiĝo de reprezentantoj de E-organizaĵoj en socialismaj landoj, aprile 1983 ASE-delegitaro partoprenis la 16-an konsultan renkontiĝon en Radziejowice (Pollando). ASE-reprezentantoj partoprenis la 9-an MEM-konferencon, en kiu sep sovetiaj esperantistoj estis elektitaj en la konsiston de Internacia komitato de MEM, kaj solenan kunsidon en Budapeŝto, dediĉitan al 30-jariĝo de MEM.

ASE-representantoj partoprenis tradiciajn renkontiĝojn de esperantistoj-pacdefendantoj en Pardubice (ĈSSR). En 1983 en TEJO- kaj UEA-kongresoj, Internacia E-lernejo en Bulgario la Asocio partoprenigis pli ol 150 sovetiaj esperantistoj.

Sian partoprenon en la internaciaj aranĝoj sovetiaj esperantistoj uzis por konatigi eksterlandan socion kun la atingoj de sovetia popolo en konstruado de komunismo, evoluo de sovetia multnacia kulturo, kun pacama en- kaj eksterlanda politiko de KPSU kaj Soveta registaro.

Al firmigo de internaciaj kontaktoj kontribuis la eldonagado de ASE. Helpe de SSOD kaj APN-eldonejo estis multmilkvante eldonitaj kaj disvastigitaj eksterlande vicaj suplementoj al la ĵurnalo "Moscow News", broŝuroj kun tekstoj de la raporto de kamaraĵo J.V. Andropov pri la 60-jariĝo de USSR, lia artikolo "Doktrino de K. Marks kaj kelkaj aspektoj de la socialisma konstruado en USSR", kun materialoj, ligitaaj kun okazigo de Dua speciala sesio de Ĝenerala Asembleo de UN pri malarmado kaj aliaj materialoj kaj dokumentoj, klarigantaj principajn demandojn de la eksterlanda politiko de USSR, la suma eldonkvanto estis pli ol 90 000 ekzempleroj.

Estas organizita relative regula eldonado de la "Informbulteno", kiu pli operative prilumas laboron de kluboj, informas pri agado de la Prezidio kaj aliaj aktualaj demandoj de la E-movado.

Pere de la "Informbulteno" de ASE sovetiaj esperantistoj konatiĝis kun Statuto de MEM, cirkuleraĵ leteroj kaj mesaĝoj de la Prezidanto kaj kelkaj aliaj dokumentoj de MEM, kun labor-enhavo de multaj internaciaj renkontiĝoj, kun sperto de internaciaj kontaktoj de sovetiaj E-kluboj, kun reŝoj de alilandaj legantoj de sovetiaj eldonoj en Esperanto.

E-kluboj okazigis pacdefendajn kunvenojn kaj mitingojn, organizis sabatumojn kun posta transkontigo de la perlaborita mono al Pacfonduso. La temo de batalo por la paco, kontraŭ vetarmado estis prioritata dum E-tendaroj, okazintaj en 1982 — 1983 en diversaj urboj de la lando.

Dum la raporta periodo estis efektivigita certa laboro pri organiza firmigo kaj ordigo de la agado de sovetiaj esperantistoj, estis organizita enketado de kluboj, ellaborita kaj publikigita en "Informbulteno" la ordo de registriĝo de kluboj kiel primaraj organizaĵoj de ASE. Signife aktiviĝis la agado de respublikaj ASE-filioj en Ukrainio, Litovio, Latvio, Armenio, Estonio, E-komisiono en Uzbekio, estis fondita ASE-filio en Kartvelio. Ĉiumonate estis okazigataj kunsidoj de la Prezidio de ASE, en kiuj estis aŭskultataj raportoj de kluboj, de apartaj komisionoj kaj aktualaj demandoj pri pliefikigo de internaciaj rilatoj.

La instru-metodika komisiono de la Estraro de ASE laŭ la akceptita en 1982 laborplano ellaboris programon de elementa kurso por ĉeestaj kursoj kaj rondetoj kaj ekzamenan programon por kurs- kaj rondetgvidantoj, ankaŭ Regularon pri atestado, aprobitajn de la Prezidio de ASE. Helpe de la instru-metodika komisiono la eldonejo «Russkij Jazik» ("Rusa lingvo") aperigis la 2-an eldonon de Esperanto-rusa vortaro. En 1984 estos eldonita lemolibro de Esperanto.

La Estraro de ASE rimarkigas, ke agado de ASE havas plurajn malfacilaĵojn kaj mankojn.

Ĝis nun ne estas solvita la demando pri eldono de revuo de la Asocio kaj ne estas organizitaj radioelsendoj en Esperanto por eksterlando, ne estas aranĝitaj efikaj kontaktoj kaj koordinado de la agado kun Sovetia pacdefenda komitato kaj aliaj organizaĵoj de sovetia socio en okazigo de aranĝoj pri batalo por la paco, kio malhelpas al altigo de efektiveco de nia internacia agado.

Ne estas organizita sistema instruado de la aktivularo, okazigo de seminarioj pri aktualaj demandoj de en- kaj eksterlanda kaj interna politiko, pri spertinterŝanĝo de

kluba laboro kaj aliaj demandoj. Multaj kluboj spertas seriozajn malfacilaĵojn pro foresto de konstantaj ejoj, manko de monrimedoj, foresto de aprobitaj de lokaj gvidaj instancoj klubaj Statutoj kaj sistemo pri kolekto de membrokotoj, pro nesufiĉa helpo en ordigo de ilia laboro flanke de lokaj sindikataj instancoj.

Ĝis nun estas malbone ordigitaj operativaj ligoj de kluboj inter si, ankaŭ kun la Prezidio de Asocio. Ne estas finita laboro pri registrado de kluboj kiel primaraj organizaĵoj de ASE.

La Estraro de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj **DECIDAS**:

Konsideri ĉefa tasko de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj konstantan firmigon de ligoj kun internaciaj kaj landaj E-organizaĵoj, kun eksterlandaj esperantistoj kaj pliefikigon de ĉiuj ligoj por aktivigo de partopreno de esperantistoj en batalo por la paco, malarmado, demokratio kaj socia progreso, profundan klarigon de celoj kaj taskoj de pacama eksterlanda kaj interna politiko de Soveta ŝtato, atingoj de la sovetia popolo en la komunisma konstruado.

Tiucele:

1. Daŭnigi regulan eldonadon en Esperanto de materialoj pri aktualaj demandoj de eksterlanda kaj interna politiko de Soveta ŝtato. Trakti kun gvidantaro de APN pri enigo en ĉiujaran planon de la eldonejo de 8 — 10 materialoj en Esperanto, ankaŭ kun gvidantaro de la eldonejo "Raduga" ("Ĉielarko") pri eldono de belarta literaturo en Esperanto (2 — 3 verkoj de sovetiaj aŭtoroj ĉiujare).

2. Prepari kaj eldoni en 1984 sovetian numeron de "Paco".

3. Firmigi kontaktojn kun redakcioj, eldonantaj en Esperanto, en socialismaj landoj, sendi por publikigo en ili, ankaŭ en la revuoj de UEA "Esperanto" kaj "Kontakto", en eldonoj de landaj E-organizaĵoj de eksterlandaj materialojn pri aktualaj demandoj de sovetia realeco kaj E-movado en USSR.

4. Studi demandon pri regula eldono de "Bulteno de paco" por publikigo de la plej gravaj dokumentoj de Soveta registaro, celitaj al pacdefendo.

5. Sonigi en Esperanto kaj sendi al eksterlandaj E-organizaĵoj du filmojn, preparitajn de SSOD: "Ĉu celas rusoj al milito?" kaj "Lecionoj de historio" (al la 40-jariĝo de venko de sovetia popolo en la Granda Patria milito).

6. Partopreni vican Konsultiĝon de esperantistoj el socialismaj landoj.

7. Ellabori laborplanon de Sovetia MEM-sekcio, de ĝia partopreno en internaciaj aranĝoj de MEM. Regule sendadi artikolojn al la revuo "Paco" kaj la bulteno "Pacaktivulo". Aktive partopreni okazigatajn de MEM aranĝojn. Prepari proponojn pri organizo de vica Konferenco de Mondpaca Esperantista Movado en USSR en 1985.

14 novembro --- En Odeso forpasis Naum Isaakoviĉ Sigal;
23 novembro --- Sepdek tria kunsido de ASE-Prezidio;
10 decembro --- 4-a ekstervica respublika Konferenco de Litovia ASE-filio = 24-a refunkciiga Kongreso de la Litovia Esperanto-Asocio (Kaunas, Litovio);
10.12 -- 11.12 --- Zamenhof-tagoj-88 (Kaunas, Litovio);
16 decembro --- Forpasis Viktor Pavloviĉ Beškarev (Gorjkij, Rusio);
23 decembro --- Sepdek kvara kunsido de ASE-Prezidio;
- 1989**
- 04 januaro --- Sepdek kvina kunsido de ASE-Prezidio;
12 januaro --- Sepdek sesa kunsido de ASE-Prezidio;
18 januaro --- Sepdek sepa kunsido de ASE-Prezidio;
23.01 -- 25.01 --- 3-a raport-reelekta Konferenco de ASE, dum kiu estis refunkciigita SEU (Moskvo, Rusio);

04.03 — 05.03	—	Fonda Konferenco de belorusaj esperantistoj (Minsk) ¹⁴¹ ;
22 marto	—	En Riga forpasis Nikolajs Lapins;
printempo	—	Litova radio komensis siajn elsendojn en Esperanto;
15.04 — 16.04	—	«KOR-17» (Odoso, Ukrainio);
18.04 — 21.04	—	22-a renkontiĝo de reprezentantoj de E-organizaĵoj el soc. landoj (Moskvo, RSFSR, USSR);
29.04 — 02.05	—	OSER-45 en Krasnojarsk (Rusio);
13 majo	—	En Riga forpasis Eduardas Jaunvaiks;
16.07 — 23.07	—	45-a TEJO-Kongreso (Kerkrade, Nederlando);
29.7 — 05.08	—	74-a UK de Esperanto (Brighton, Britio);
23 oktobro	—	En Riga forpasis M. Burgmeijsters.

ALDONO AL LA KRONOLOGIO ¹⁴²

Verŝajne post la silenta estingiĝo de CRRER kaj OSER, la sola tradicia regiona aranĝo restas UER (Urala Esperantista Renkonto) kun preskaŭ 20-jara tradicio:

Titolo	Jaro	Loko	Ĉeftemo
URA-1	1979	Kurgan	Esperanta movado, interurbaj kontaktoj
URA-2	1981	Sverdlovsk	Koordino de la agado; novaj formoj de la kluba laboro
URA-3	1982	Sverdlovsk	Manifesto de Rauma; klerigo; faka agado
URA-4	1982	Tjumeno	Perspektivoj de Esperanto en Uralo
URA-5	1983	Sverdlovsk	Interlingvistiko
URA-6	1984	Permo	Historiaj aspektoj de Esperanto
UER-7	1985	Tjumeno	40 jaroj de la fino de la 2-a Mondmilito
UER-8	1985	Nijnij Tagil	Aktualaj problemoj de la informado pri Esperanto
UER-9	1986	Tjumeno	Praktikaj problemoj de la E-instruado al plenkreskuloj
UER-10	1987	Toboljsk	Kultura kaj kleriga laboro en la E-klubo
UER-11	1987	Sverdlovsk	Eksteraj aspektoj de la kluba laboro
UER-12	1988	Tjumeno	Internacia lingvo kaj internacia agado
UER-13	1989	Permj	Informado pri E.; kvalifiko de instruistoj
UER-14	1989	Surgut	Tradiciaj kaj novaj formoj de la kluba agado

¹⁴¹ Tiu ĉi kaj la sekvaj E-aranĝoj okazis jam post SEU-refunkciigo.

¹⁴² Informo de H. Gorecka pri tradiciaj renkontiĝoj en Urala regiono de Sovetio — la revuo "La Ondo de Esperanto" N 5 (43)/1998, p. 7.

**KONTRIBUO DE APARTAJ AŬTOROJ KAJ TRADUKINTOJ
AL LA "INFORMBULTENO" DE ASE**

- Abolskaja M. — NN 14/13, 40/15, 43/20, 59/10, 59/13;
- Abov P. — N 59/6;
- Abromas Z. — N 46-47/16;
- Aitai P. — NN 14/13, 44-45/22, 53-54/31, 53-54/34;
- Ajbuŝev R. — N 60/12;
- Ananjin A. — NN 29-30/26, 33-34/17, 43/15, 46-47/12, 55-56/27, 67/9;
Andre L. — N 62/18;
- Andraev I. — N 43/11;
- Andrejeva T. — N 73/22;
- Andronov I. — N 62/2;
- Anikejev S. — NN 3-4/23, 9-10/19, 28/20;
- Anofin B. — N 53-54/34;
- Antropov S. — NN 37-38/21, 43/17;
- Apollo A. — N 22-23/25;
- Armand G. — N 33-34/27, 41/16;
- Arolovič V. — NN 26-27/32, 61/7;
- Bajenov I. — N 73/32;
- Baradosova M. — N 19-20/30;
- Baraŝ E. — N 40/2;
- Bariŝnikov S. — N 50/19;
- Basko I. — N 12-13/17;
- Batievskij V. — NN 33-34/18, 37-38/21, 43/5, 48-49/20, 70-71/33;
- Bausch W. — N 50/19;
- Beekman V. — N 2/14;
- Belizin S. — N 50/15;
- Belogolovskij M. — N 6-7/21, 33-34/23;
- Berce L. — N 33-34/14;
- Bercis T. — NN 39/17, 53-54/30;
- Bespalov V. — NN 3-4/24, 9-10/25, 14/8, 46-47/15, 67/7;
- Beŝkarev V. — NN 5/12, 43/8;
- Betinke R. — N 26-27/5, 32/6;
- Birjulin A. — N 17-18/18;
- Blanke D. — N 22-23/8, 24-25/2, 26-27/5, 40/2;
- Bojko A. — N 33-34/19;
- Bogdanovič M. — N 59/24;
- Borisov I. — N 19-20/23;
- Bronŝtejn M. — N 9-10/28;
- Bubeneč N. — N 55-56/29;
- Bugajeva G. — N 44-45/23;
- Buksbaum B. — N 19-20/30;
- Bunsčioden P. — N 43/12;
- Burmeister R. — N 31/20;
- Burgmeisters M. — NN 37-38/30, 60/22, 73/29;
- Buŝ A. — N 41/16;
- Buŝ O. — N 33-34/7;
- Camejro J. — N 41/14;
- Cejtin G. — N 40/22;
- Cibulevskij D. — NN 5/15, 8/9, 8/15;
- Cibran O. — N 43/18;
- Cimberov M. — NN 3-4/9, 22-23/27;
- Cvetkova Vaierija — N 46-47/20;
- Cvileneva N. — N 9-10/25;
- Czupkalo Z. — N 31/21;
- Čeliauskas P. — NN 46-47/23, 48-49/22, 63-64/19, 65-66/22, 68/20;
- Ĉumak P. — N 68/13;
- Daine I. — N 26-27/17;
- Dana Dinh Dam — N 37-38/17;
- Danovskaja A. — N 62/6;
- Danovskij N. — NN 17-18/23, 26-27/34;
- Deŝkin G. — N 43/22;

- Diambekov A. — N 31/24;
- Dmītrišina L. — N 8/12;
- Donskaja L. — NN 33-34/19, 43/23, 46-47/14;
- Dresen H. — N 62/17;
- Duličenko A. — NN 33-34/25, 51-52/20;
- Dzebkalo A. — N 24-25/22;
- Erdmanis J. — N 15-16/4;
- Ernits E. — N 9-10/14;
- Ernits V. — NN 9-10/14, 70-71/26;
- Fedoriščeva O. — N 33-34/8;
- Fedotov N. — N 37-38/23;
- Fejgin I. — N 5/2;
- Fjodorov A. — NN 3-4/24, 14/7;
- Fleury N. — N 58/6;
- Gacenko J. — N 67/7;
- Galceva G. — N 15-16/8;
- Galickaja M. — NN 53-54/20, 55-56/28, 58/15, 60/10, 65-66/26;
- Gamzin S. — N 43/7;
- Geller M. — N 50/19;
- Gevčuk M. — N 55-56/25;
- Girba V. — NN 48-49/18, 53-54/33, 59/7, 63-64/12, 68/14;
- Gluňov G. — N 59/10;
- Gnatenko S. — NN 61/13, 62/7;
- Goňštejn V. — N 32/13;
- Gončarov A.J. — NN 9-10/30, 12-13/11, 37-38/2, 37-38/13, 57/23, 61/10, 70-71/17;
- Gončarova I. — NN 3-4/30, 8/4, 46-47/29, 51-52/6, 51-52/12, 53-54/15, 63-64/7, 67/12, 72/20;
- Gonzales Meara A. — N 28/16, 31/21;
- Gorazejev N. — NN 43/4, 43/16, 44-45/20;
- Gorbatenko J. — NN 24-25/23, 26-27/8, 32/13 (v. ankaŭ Ŝevčenko);
- Goreckaja G. — N 35-36/28;
- Gorelovskij L. — N 55-56/19;
- Gorjkij M. — N 37-38/36;
- Gorov Ĥ. — N 22-23/22;
- Gorskij A. — N 12-13/19;
- Granat B. — NN 32/22, 58/27;
- Grigorenko V. — NN 17-18/5, 40/17;
- Grišin N. — N 48-49/27;
- Gromov V. — N 32/14, 40/22;
- Gudskov N. — N 60/13;
- Gulidov A. — N 24-25/28;
- Gurevič D. — NN 68/14, 68/15;
- Gusev V. — N 40/14;
- Haruzn N. — N 46-47/10;
- Heinec H. — N 24-25/2, 26-27/5;
- Hemerkova M. — N 40/3, 40/5;
- Henriksen B. — N 15-16/25;
- Henriksen Kaj — N 15-16/25;
- Henriksen Kim — N 15-16/25;
- Huber A. — N 50/17;
- Ĥamrakulov S. — N 15-16/27;
- Ĥodin V. — N 51-52/21;
- Ĥomič E. — N 24-25/21;
- Ĥotimčenko J. — N 42/21;
- Ĥromov V. — NN 32/4, 32/9, 32/24, 41/17, 44-45/30, 65-66/28, 70-71/15, 70-71/26;
- Inber V. — N 43/22;
- Ionesov A. — NN 6-7/28, 12-13/12, 12-13/18, 14/15, 17-18/24, 33-34/4, 40/18, 55-56/30;
- Isajev M. — NN 3-4/1, 6-7/1, 12-13/2, 15-16/2, 21/17, 22-23/5, 24-25/18, 26-27/5, 28/6, 65-66/1;
- Isakova A. — NN 26-27/29, 44-45/21, 46-47/15;
- Isakova N. — N 58/17;
- Ivanov A. — N 59/4;
- Ivasenko A. — NN 24-25/21, 35-36/28, 44-45/19, 51-52/28, 59/9, 68/19;

- Jackson I. — N 35-36/30;
- Jafasova R. — NN 32/10, 42/14;
- Jakobsons M. — NN 35-36/2, 59/5;
- Jakovleva J. — NN 15-16/28, 19-20/31, 28/13, 28/20;
- Jansson T. — N 1/13;
- Jarošenko J. — NN 68/12, 72/14;
- Jarošević V. — NN 15-16/25, 29-30/22, 65-66/26, 68/12;
- Jazikova M. — N 53-54/26;
- Jegorovas P. — NN 5/1, 6-7/23, 8/13, 9-10/9, 9-10/18, 9-10/27, 15-16/19, 17-18/28, 19-20/13, 19-20/17, 24-25/29, 26-27/10, 26-27/25, 28/12, 31/13, 33-34/26, 37-38/9, 37-38/18, 41/22, 44-45/4, 48-49/16, 48-49/20, 50/24, 51-52/17, 55-56/29, 59/12, 70-71/24, 73/17;
- Juarez Sedene R. — N 53-54/25;
- Jurčenko S. — N 9-10/25;
- Jivkov T. — N 9-10/4;
- Ĵukova A. — NN 44-45/29, 50/18;
- Ĵukova T. — N 15-16/24;
- Kačalova Z. — N 50/22;
- Kaĝaja K. — N 28/17;
- Kalašnikov A. — N 29-30/35;
- Kanački S. — N 41/14;
- Kapustin L. — NN 15-16/24, 33-34/35, 40/13, 43/16, 46-47/29, 67/22, 73/32;
- Karev V. — N 58/23;
- Kasperianas V. — N 72/18;
- Kauts V. — NN 58/26, 73/19;
- Kazakov A. — N 70-71/7;
- Kazancev P. — NN 22-23/19, 33-4/30;
- Kazancev S. — NN 51-52/11 58/19;
- Kazuko K. — N 73/25;
- Keliuotis R. — N 35-36/21;
- Kerner A. — N 48-49/28;
- Kim P. — N 61/13;
- Kirpičjov J. — 40/21;
- Kiselov V. — N 57/21;
- Kivajev J. — NN 9-10/29, 51-52/34;
- Knjazev A. — NN 3-4/24, 11/14;
- Knjazeva N. — N 11/14;
- Kobrin P. — NN 26-27/26, 46-47/13;
- Kocarj S. — N 12-13/19;
- Kočvara D. — N 58/6;
- Kogan A. — N 17-18/10;
- Kolas J. — N 59/24;
- Kolbeckij V. — N 51-52/22;
- Kolker B. — NN 3-4/29, 5/13, 6-7/10, 6-7/31, 8/16, 9-10/31, 11/16, 12-13/24, 12-13/31, 14/9, 14/16, 17-18/31, 21/19, 33-34/34;
- Kontrov G. — NN 72/8, 73/23;
- Koptjagina T. — NN 5/10, 8/7, 9-10/23, 53-54/32, 55-56/29, 58/23, 68/14;
- Kořinek J. — N 19-20/21;
- Korolevič A. — NN 6-7/13, 15-16/17, 37-38/11;
- Koroljov I. — NN 40/11, 63-64/17, 68/11;
- Korotkevič G. — NN 3-4/25, 5/8, 11/7, 12-13/9, 15-16/9, 24-25/30, 28/14, 29-30/30, 31/11, 33-34/27, 37-38/35, 51-52/26, 51-52/35, 55-56/12, 59/18, 59/22, 60/5, 60/24, 61/22, 63-64/23, 67/18, 72/22;
- Kostyljova O. — N 58/19;
- Kotelnikov A. — NN 32/22, 40/12, 53-54/26;
- Kotova A. — NN 39/13, 44-45/17;
- Kovalenko L. — N 22-23/19;
- Kovnator N. — N 26-27/26;
- Kovtonjuk J. — N 69/22;
- Krajnov S. — N 3-4/31;

- Krasnikov O. — N 15-16/5;
- Krivomazov A. — N 61/24;
- Krolík I. — N 59/16;
- Kudinova V. — N 73/26;
- Kukuškina O. — N 44-45/16;
- Kuliagin G. — N 42/25;
- Kumaki H. — N 68/10;
- Kupala J. — N 37-38/35;
- Kurolap Z. — N 63-64/29;
- Kuzjmenko L. — NN 68/16, 73/28;
- Kuznecov S. — NN 60/16, 65-66/8;
- Laiconas E. — N 24-25/21;
- Lazareva T. — N 35-36/12;
- Le Phuong Nam — 53-54/23;
- Lebenzon J. — N 50/17;
- Lemelev V. — NN 6-7/24, 6-7/29, 17-18/16, 32/18, 43/17;
- Lemus Rodrigues E. — N 8/13;
- Lepjoškin V. — N 61/9;
- Liepinja G. — N 37-38/27;
- Linnamägi M. — NN 15-16/18, 17-18/25, 21/24;
- Lisienkova V. — N 59/6 (v ankaŭ Ŝarabkova);
- Lobastov A. — NN 26-27/15, 50/10;
- Lozgačov N. — NN 53-54/18, 60/13, 63-64/13;
- Mačkalova S. — NN 3-4/15, 50/12, 70-71/16;
- Maŝnač M. — N 31/18;
- Majburova J. — NN 2/10, 11/7, 12-13/19, 17-18/14, 17-18/21, 32/8, 37-38/7, 53-54/21, 55-56/18, 57/16, 59/7, 63-64/11;
- Majkovskij V. — N 68/16;
- Makašvili Z. — 29-30/31;
- Makovej T. — N 19-20/21;
- Makovskij A. — N 11/4;
- Mamedov Ŝ. — NN 26-27/25, 44-45/6;
- Mandrik M. — N 58/22;
- Masalkin V. — NN 6-7/24, 15-16/13, 37-38/25;
- Masenko A. — NN 35-36/20, 43/3, 50/18, 58/15;
- Masson M. — N 68/10;
- Matjunin K. — N 19-20/31;
- Matjušenko V. — N 22-23/31;
- Matvejev V. — N 33-34/8;
- Mazajeva O. — N 12-13/5;
- Medinš A. — N 31/17;
- Medvedev L. — NN 32/16, 58/14, 58/23, 60/6, 61/19, 67/8, 68/1, 72/8, 73/12;
- Melnikov A. — NN 22-23/20, 58/27, 63-64/28, 68/7;
- Miňajlov A. — NN 12-13/3, 40/11, 55-56/27, 60/12, 72/17;
- Milzon K. — N 51-52/24;
- Minin V. — NN 58/12, 62/5;
- Minkiviz G. — N 72/10;
- Mitrofanov G. — N 33-34/20;
- Mkrčjan R. — NN 28/8, 29-30/21, 29-30/29, 31/10, 31/22, 33-34/17, 43/13, 44-45/18;
- Muenko T. — N 73/25;
- Müller A. — NN 31/12, 32/5, 48-49/19, 53-54/23, 53-54/24;
- Muraškovskij J. — N 9-10/17;
- Murgin C. — NN 31/20, 73/24;
- Mylnikov I. — 50/27;
- Natinj A. — NN 8/13, 17-18/23, 44-45/13, 55-56/30, 67/6;
- Naumov T. — N 58/9;
- Naumova R. — N 58/9;
- Nekrasov N. — N 43/21;
- Nesterovskaja V. — 53-54/27;
- Nevzal F. — N 40/2;
- Nguyen Do Khanh — NN 31/22, 35-36/24, 40/10;

- Nikiforova N. — NN 22-23/15, 40/14;
- Nikiforova Z. — N 55-56/31;
- Nikitina J. — N 65-66/20;
- Nikulin A. — NN 5/12, 9-10/20, 15-16/21, 19-20/26;
- Noreikaite G. — N 33-34/16;
- Norijasu I. — N 46-47/10;
- Novikova L. — N 19-20/14;
- Ojalo J. — NN 5/9, 37-38/32, 39/15, 42/23, 58/25, 62/15;
- Ojasild E. — NN 9-10/29, 37-38/39;
- Olifirova L. — NN 31/15, 35-36/25;
- Opletajev V. — NN 43/2, 65-66/27;
- Orlov A. — N 73/20;
- Pajuk V. — N 42/22;
- Palu J. — NN 22-23/29, 26-27/16;
- Papazov D. — NN 22-23/22, 46-47/18;
- Paščenko M. — N 6-7/14;
- Paškovskij M. — NN 44-45/3, 53-54/26;
- Patatjan A. — N 6-7/20;
- Paupe N. — N12-13/30;
- Pavčenko J. — N 60/28;
- Pavlukovec A. — NN 27-28/26, 59/23;
- Paz S. — N 43/12;
- Perevalov D. — NN 3-4/6, 9-10/23, 11/15, 12-13/13, 15-16/11, 19-20/9, 28/18, 53-54/12, 53-54/33, 70-71/10;
- Perevertajlo J. — NN 12-13/30, 55-56/20, 58/17;
- Perevertajlo F. — NN 50/22, 50/25, 51-52/29;
- Perikov V. — N 50/20;
- Petelčić V. — NN 46-47/14, 55-56/29;
- Pethes I. — NN 22-23/22, 24-25/2, 24-25/10, 31/6;
- Petrov A. — NN 32/10, 42/11, 42/14;
- Petuškov L. — N 22-23/12;
- Pimenov P. — N 3-4/11;
- Plate W. — N19-20/21;
- Podkaminer S. — NN 2/8, 6-7/7, 6-7/30;
- Podolskij N. — N 22-23/30;
- Podvirnaja N. — N 55-56/25;
- Pogorelaja S. — N 44-45/19;
- Poljaškova L. — N 50/19;
- Poltiev V. — N 28/10;
- Popedrjajev J. — N 37-38/19;
- Pout P. — N 19-20/22;
- Preškina V. — NN 58/23, 72/13;
- Prilepskaja M. — N 29-30/23;
- Puškarj I. — NN 58/14, 60/28;
- Puškin A. — NN 43/23, 43/24;
- Ramonas A. — N 55-56/28;
- Raus E. — NN 3-4/18, 26-27/29, 31/14, 37-38/24, 40/21, 42/20, 46-47/15, 50/20, 55-56/22, 55-56/32, 57/17, 60/15;
- Rešetnikova N. — N 3-4/24;
- Rjabinin V. — N 3-4/24;
- Rojdestvenskij V. — NN 51-52/10, 55-56/33, 60/8;
- Romanenko S. — N 9-10/23;
- Rudenko G. — N 22-23/23;
- Rustaveli Š. — N 29-30/34;
- Saar J. — N 62/18;
- Salenikovič A. — N 61/15;
- Salimzjanova I. — NN 26-27/18, 31/9, 41/20;
- Saletti N. — N 35-36/30;
- Salov V. — NN 53-54/27, 61/14;
- Samodaj V. — NN 14/5, 31/5;
- Sapojnikov V. — NN 8/2, 55-56/14;
- Sazončik O. — N 42/18;

- Schödl A. — N 73/24;
- Schödl L. — N 73/24;
- Sedov V. — NN 33-34/26, 55-56/12, 57/11, 65-66/18;
- Seguru V. — NN 15-16/20, 19-20/24, 29-30/25, 31/23, 35-36/10, 39/12, 42/1, 46-47/1, 55-56/7, 63-64/3, 67/15, 70-71/21. 72/7;
- Seljankin A. — N 51-52/15;
- Semjonov V. — N 72/13;
- Semjonova O. — NN 8/2, 31/16;
- Sidorenko N. — N 70-71/20;
- Silvestre J. — N 31/31;
- Simbireva I. — N 67/7;
- Skupas A. — NN 35-36/17, 42/5, 48-49/28, 57/18;
- Skvorcova Z. — NN 22-23/32, 29-30/29;
- Slabin V. — N 43/15;
- Slezák J. — N 26-27/4;
- Smetanina S. — N 3-4/31;
- Soldatenko A. — N 63-64/16;
- Solovjova J. — N 73/26;
- Soroka V. — N 67/21;
- Starkov A. — N 51-52/18;
- Starodubcev N. — NN 9-10/20, 17-18/21, 55-56/28;
- Staševskaja M. — NN 15-16/10, 28/18, 33-34/18, 40/16, 50/19, 62/7, 68/15;
- Stefanov B. — NN 9-10/22, 26-27/22;
- Stepanov A. — NN 55-56/23, 55-56/32;
- Strajnickas L. — NN 41/115, 43/14;
- Streleckij A. — N 6-7/8;
- Strokanej S. — N 17-18/21;
- Surnakin A. — N 40/7;
- Suško O. — NN 11/9, 12-13/20, 14/12;
- Syóžj N. — N 73/25;
- Szilvasi L. — N 9-10/28;
- Šakarov A. — N 72/27;
- Šakirov K. — NN 3-4/17, 6-7/12, 15-16/13;
- Šamsijev J. — N 11/15;
- Šarabkova V. — NN 6-7/30, 9-10/21, 11/14, 14/11, 15-16/26, 17-18/21, 17-18/25, 19-20/27, 21/22, 26-27/13, 26-27/27, 28/8, 28/17, 31/23, 37-38/8, 40/13 (v. ankaŭ Lisienkova);
- Šaragina G. — N 15-16/29;
- Šarov A. — N 9-10/24;
- Šeňovcov V. — NN 37-38/38, 59/17;
- Ševčenko J. — NN 48-49/15, 61/16, 62/9, 73/15 (v. ankaŭ Gorbatenko);
- Šilo G. — N 44-45/21;
- Šimonis J. — N 26-27/27;
- Šipilin B. — N 42/10;
- Školnik J. — N 26-27/20;
- Šlivinskas E. — N 58/22;
- Šljafer A. — NN 8/14, 9-10/15, 12-13/15, 12-13/21, 15-16/15, 17-18/18, 21/20, 37-38/26, 44-45/11, 65-66/15, 72/9;
- Šoroňova N. — NN 22-23/4, 22-23/27, 29-30/14, 32/1, 35-36/8, 67/15;
- Štraler O. — N 58/19;
- Šukurov F. — NN 22-23/20, 37-38/14;
- Šuvajev T. — NN 9-10/23, 14/15, 15-16/7, 15-16/22, 17-18/22, 24-25/28, 44-45/20, 58/24;
- Tamošietis K. — N 53-54/29;
- Tenebaum P. — N 24-25/21;
- Thelet C. — N 9-10/26;
- Timofejeva N. — N 22-23/31;
- Titajev A. — NN 19-20/23, 44-45/14;

- Tjutčev F. — N 43/24;
- Tonti A. — N 43/23;
- Trimakene B. — N 72/18;
- Tumasov N. — N 70-71/32;
- Turkadže L. — N 46-47/7;
- Ulmovcevi V. — N 57/20;
- Ŭnder M. — N 62/17;
- Urdajev A. — N 5/14;
- Vaitilavičius A. — NN 2/16, 15-16/30, 48-49/26, 51-52/30;
- Vaitkėvičius A. — N 44-45/8;
- Valecillos D. — N 41/15;
- Vasenkov A. — NN 50/23, 58/21, 70-71/32, 72/19;
- Vasjkina I. — N 24-25/21;
- Vaščišina M. — NN 28/19, 43/18, 51-52/20, 61/14;
- Verbickij M. — N 32/3;
- Verņova A. — NN 43/19, 51-52/11, 72/27, 73/31, 73/32;
- Verigin V. — NN 31/4, 35-36/30, 35-36/31, 39/18, 41/25, 44-45/31, 51-52/6, 55-56/9, 60/3, 60/21;
- Veršin S. — N 55-56/32;
- Volkov V. — NN 6-7/11, 17-18/9;
- Volodarskij B. — N 11/7;
- Voronov I. — N 60/12;
- Vovenko N. — N 24-25/21;
- Vtorova T. — N 12-13/3;
- Vulfovič L. — NN 9-10/26, 11/11, 28/19, 43/20, 51-52/23, 62/12, 72/25, 72/28;
- Zagvazdin A. — N 63-64/14;
- Zaharija J. — N 37-38/20;
- Zajdiner L. — N 31/24;
- Zankai D. — N 26-27/4;
- Zarinčuk N. — N 33-34/21;
- Zenkevič M. — N 8/10;
- Zibenkes V. — N 12-13/17;
- Zimels L. — N 19-20/19;
- Zotov V. — N 32/23;
- Zozulja B. — NN 6-7/9, 40/17, 53-54/36, 67/17;
- Zubkov N. — N 70-71/18;
- Zujeva N. — NN 53-54/28, 72/18;
- Walker E. — N 58/5.

DECIDO DE URF ASE-KONFERENCO EN LUCK

17.05.1988

Al: SSOD;
VCSPS;
CK VLKSM;
Prezidio de ASE;
Redakcio de la "Informbulteno" de ASE;
ASE-Prezidianoj;
E-klubo de URF ASE

La 14-15-an de majo 1988 en Luck okazis respublika seminario de klubgvidantoj kaj aktivuloj de la E-movado (106 partoprenantoj). Estis reprezentitaj 34 kluboj kaj 2 grupoj.

Unu el la demandoj de la seminario estis: "Proksimaj perspektivoj de la ASE-agado", laŭ kiu informon prezentis la respondeca sekretario de ASE k-dino Ŝanina L.J.

Post ĉiufanka pridiskuto la partoprenintoj de la seminario akceptis la decidon, pri kiu ni vin sciigas.

**DECIDO
DE LA RESPUBLIKA SEMINARIO DE KLUBGVIDANTOJ KAJ AKTIVULOJ EL
E-KLUBOJ DE URF ASE (LUCK, 15.05.1988)**

Aŭskultinte kaj pridiskutinte la informon de la respondeca sekretario de ASE k-dino Ŝanina L.J. "Pri proksimaj perspektivoj de la ASE-agado", kiu speciale antaŭvidas fondon en USSR de fakte nova E-organizaĵo "Tutsovetia unuiĝo de esperantistoj", kiu funkcios ĉe VNMC de Kulturministerio de USSR, la partoprenintoj de la seminario opinias, ke:

- ASE-gvidorganoj, la Estraro kaj Prezidio ne estas laborkapablaj kaj fakte ne plu gvidas la E-movadon en la lando;
- La ASE-Statuto ne estas plenumata: estas rompataj la limperiodoj de la jarkunvenoj kaj de la raport-reelektaj Konferencoj (la lasta Tutsovetia Konferenco okazis antaŭ pli ol 6 jaroj kaj nuntempe ĝia okazigo konstante estas prokrastata); decidoj de la prezidikunsidoj estas akceptataj sen kvorumo. Aliurbaj prezidianoj ne estas invitataj al la kunsidoj kaj eĉ ne informataj pri ties okazigo kaj decidoj (inter la cetera — pri membrigo en ASE de novaj E-klubo);
- La demandojn pri ASE-likvidado kaj fondon de nova E-organizaĵo povas decidi nur Konferenco de esperantistoj de Soveta Unio;
- Dum la Konferenco devas esti prezentita detala raporto pri la agado de la ASE-Estraro kun analizo de tiu laboro. La Konferenco devos pasi responde al postuloj de "PERESTROJKO"-periodo;
- La reprezentateco en la Konferenco devos esti tia, ke en ĝi estus reprezentitaj ĉiuj E-klubo de la lando;
- La personan reprezentatecon de la kluboj ĉe la Tutsovetia Konferenco devas decidi la kluboj mem, gvide de lokaj ASE-filioj;
- Lige kun eventuala ŝanĝo de strukturo de la E-movado la ASE-Prezidio devus adresi al ĉiuj kluboj kaj ASE-filioj konvenajn informojn por organizi pridiskutojn kaj ellaboron de proponoj.

La partoprenintoj de la seminario opinias necesa:

1. Adresi decidojn pri tiu ĉi demando al organizaĵoj-kunfondintoj: SSOD, VCSPPS, CK VLKSM, ankaŭ al ASE-Prezidio, redakcio de la "Informbulteno" de ASE, ASE-Prezidianoj, ĉiuj E-klubo de la Ukraina Respublika Filio de ASE.
2. Rekomendi al ASE-Prezidio dum septembro-oktobro 1988 organizi kunsidon de la ASE-Estraro por solvi demandojn pri okazigo de la III-a Tutsovetia ASE-Konferenco.

3. Peti ASE-Prezidion meti demandon ĉe certaj instancoj pri rehonorigo de SEU kaj ties senbaze akuzitaj membroj.

Tiu ĉi decido estas akceptita unuanime.

LETERO-RAPORTO DE P. JEGOROVAS ¹⁴³

Mi konsideras mia devo kurte informi vin pri la 72-a UK de Esperanto, okazinta de 25.07 ĝis 01.08 ĉ.j. en Varsovio kaj pri kelkaj pozitivaj kaj negativaj momentoj de partopreno en ĝi de sovetiaj esperantistoj.

La kongreson partoprenis 5941 personoj el 65 landoj. Ĝi fariĝis rekorda laŭ nombro de la partoprenintoj dum la tuta 100-jara historio de la monda E-movado kaj ĉefa evento de la jubilea jaro.

La ĉeftemo de la kongreso — "Esperanto — 100 jaroj de internacia kulturo".

Alta protektanto de la kongreso — Prezidanto de la pola parlamento (sejmo) Roman Maŝinovski.

En la honoran kongresan komitaton eniris 41 gravaj ŝtataj, sociaj, sciencaj agantoj, agantoj de arto de Pollando, inter kiuj ministro pri eksteraj rilatoj M. Ojehovski, ministroj pri fervojoj, kulturo kaj arto, junularo, edukado, komitatprezidantoj kaj multaj aliaj.

Celoj de la kongreso — plifirmigo de solidareco inter esperantistoj, vastigo de la movado, studo de ties problemoj (kongresreguloj, artikolo 1).

La kongreso okazis en la urbo, kie antaŭ 100 jaroj aperis la unua lernolibro de Esperanto en la rusa lingvo, en la Palaco de kulturo kaj tekniko centre de la urbo, siatepe konstruita de sovetiaj specialistoj kaj donacita al Pollando. Por la kongreso estis prezentitaj la plej bonaj kondiĉoj. Gazetaro, radio, televido de Pollando kelmorale antaŭ la kongreso, dum ĝi kaj daŭre poste vaste ĉiutage prilumis ĝian laboron, informis pri E-movado. La kongrespartoprenantoj rajtis senpage uzi urban trafikon.

La ĉefaj kongresaj aranĝoj:

1. **Laboraj kunsidoj.** En ĉi tiun grupon de aranĝoj eniras kunsidoj de UEA-Komitato kaj UEA-Estraro, du komunaj UEA-kunvenoj, kunsidoj pri la kongresa ĉeftemo, kunsidoj de CED pri monda lingvoprojekto, kunsidoj de terminologia E-centro, kunsidoj de UEA-komisionoj, kunsidoj de Akademio de Esperanto, kunsidoj de fakaj asocioj k.t.p.

2. **Edukaj aranĝoj.** En ĉi tiun grupon de aranĝoj eniras Internacia Kongresa Universitato (40-a sesio), 10-a esperantologia konferenco, Tago de Paco, Tago de Lernejo k.t.p.

3. **Solenaj aranĝoj.** Malfermo kaj fermo de la kongreso.

4. **Junularaj aranĝoj.**

5. **Kulturaj aranĝoj.** En ĉi tiun grupon de aranĝoj eniras nacia vespero, internacia arta vespero, konkursoj, filmoj, koncertoj, spektakloj, ekspozicioj, muzikaj aranĝoj k.a.

¹⁴³ Tiun ĉi leteron (de la 10-a de novembro 1987) la aŭtoro P. Jegorovas neniel titolis, sed verkis ĝin, kiel sian raporton pri partopreno en la vica Universala Kongreso en Pollando, dediĉita al la 100-jara jubileo de Esperanto, kaj dissendis ĝin al pluraj esperantistoj de la lando. En la aldona parto li skribas: «...*Mi opinias necesa, ke la gvidantoj de ASE sin turnis al la komisiono, kiu okupiĝas pri reraĵigo de sovetiaj civitanoj, kiuj suferis pro la persekutoj dum Stalina periodo, kun la peto pri rehabilitiĝo de sovetiaj esperantistoj...*» kaj: «*Samtempe necesas esplori la kialojn de ĉesigo de la agado de SEU*».

6. Festaj aranĝoj. Interkona vespero, balo, bankedo, akcepto.

7. Ekskursoj.

8. Aliaj aranĝoj. 23-a internacia infana kongreseto, 43-a Internacia Junulara Kongreso¹⁴⁴, internacia festivalo "100 jarojn de E-kulturo" k.a.

Entute laŭ la programo dum la kongreso okazis 188 diversaj aranĝoj, kulime kelkaj samtempe kaj krome kelkdekoj da neplanitaj.

Honora protektanto de la kongreso Roman Malinovski parolis dum la solena malfermo de la kongreso, dum la solena fermo kaj dum la mitingo en Bjelostok, organizis oficialan akcepton por kongresaj aktivuloj kaj partoprenis kelkajn aliajn aranĝojn de la kongreso. Dum la oficiala akcepto al R. Malinovski estis enmanigita membroleto de Pola E-Asocio. Krom ĉio cetera dum la solena malfermo de la kongreso R. Malinovski je la nomo de pola registaro proponis en Bjelostok, naskiĝurbo de la aŭtoro de la lingvo L. Zamenhof konstrui internacian E-centron. Tiun ĉi proponon subtenis UEA-Estraro. La financado de la konstruado de la centro estos efektivigata plejparte el polaj fontoj.

La kongreson partoprenis persona reprezentanto de la Ĝenerala Sekretario de UN s-ro Nigel Kassar, kiu parolis dum la malfermo de la kongreso kaj dum kelkaj aliaj aranĝoj.

Honoraj gastoj de la kongreso laŭ invito de UEA estis pluraj parencoj de la aŭtoro de Esperanto L. Zamenhof.

La solenan malfermon de la kongreso partoprenis multaj reprezentantoj el diversaj ambasadejoj en Varsovio, inter tiuj — el la bulgara, ĉeĥoslovaka, hungara, GDR-a, jugoslava, kuba, ĉina.

La kongreson telegrame salutis Ĝenerala direktoro de UNESCO, Prezidento de Islando, Prezidanto de parlamento de Svedio kaj multaj aliaj.

Sekretario de PSLP J. Ćirek, prezidanto de la pola parlamento R. Malinovski, ministro pri kulturo kaj arto A. Kravčuk k.a. akceptis UEA-Prezidanton H. Tonkin kaj Ĝeneralan direktoron de UEA S. Milojeviĉ.

La kongreso ricevis grandan subtenon flanke de la pola registaro.

Dum Internacia Kongresa Universitato (la rektoro — Juan Regulo Peres, Hispanio) okazis 23 prelegoj pri diversaj temoj, inter kiuj 7 prelegintoj estis el socialismaj landoj.

Du ĉefajn prelegojn dum la solena malfermo de la kongreso faris rektoro de universitato en Potsdam (Usono) prof. H. Tonkin.

Sukcese pasis la Tago de Paco. Ties aranĝojn partoprenis 600 personoj, el kiuj 20 prelegis. Du UEA-Estraranoj — D. Masterman (Italio) kaj B. Despina (Francio) — prelegis dum ĝi. Gvidis tiutagajn aranĝojn ties iniciatinto UEA-vicprezidanto Y. Umeda (Japanio). Al la partoprenintoj de la kunsido estis voĉlegitaj salutvortoj de MEM-Prezidanto I. Petes (Hungario). Oni demonstris hungaran esperantlingvan filmon "En Eŭropo ie" pri kontraŭmilita temo. Dum la Tago de Paco estis honore enmanigita nova premio, lanĉita de japanaj esperantistoj, kiun aljuĝas UEA-Estraro. La unua laŭreato de la premio ekestis H. Bakker (Nederlando) pro la agado pri disvastiigo de Esperanto en Afriko. Dum tiu ĉi kongreso inter la partoprenintoj estis reprezentantoj el 10 afrikaj landoj. Dum la enmanigo de la premio estis ĉiuj UEA-estraranoj (8 personoj) kaj Ĝenerala direktoro de UEA S. Milojeviĉ.

Sed precipe altnivela estis ĉi-jare esperantologia konferenco. Ankaŭ ambaŭ UEA-Kunvenoj (pri la agadraporto de UEA-Estraro por 1986 kaj pri la kongresa ĉeftemo).

¹⁴⁴ Internacia Junulara Kongreso de TEJO estas aranĝo, kiu ne apartenas al la programo de UK (Red.).

Pasis sukcese ankaŭ Tago de Lernejo kaj kunsidoj de reprezentantoj de naciaj E-Asocioj. Okazis kunsidoj de 37 fakaj E-Asocioj. Estas fondita nova organizaĵo — Internacia Kooperativa E-Organizaĵo. Fruktodone pasis kunsido de CED kaj aliaj.

UEA-Komitato kunsidis 9-foje. Anstataŭ eksigita pro sanstato V. Sadler UEA-estrarano pri financoj estis elektita Gian Carlo Fighiera (Hispanio). Fondita estis terminologia E-Centro. Aprobata estis plano pri scienc-teknikaj aranĝoj.

D. Blanke (GDR) estis nomita la plej aktiva UEA-Komitatano dum la pasinta jaro. Estas decidite, ke la 73-a Universala Kongreso en 1988 okazos en Rotterdam (Nederlando) kaj la 74-a en 1989 — en Brighton (Britio). Por la sekvaj kongresoj estas proponoj el Milano, Prago, Valencio, Habano, Abiĝano k. a. urboj. Vice kun UEA-oficejoj en Rotterdam, Antverpeno, Novjorko, Budapeŝto estas decidite fondi azian UEA-oficejon en Tokio.

Dum la ekskurstago granda grupo da partoprenintoj (ĉ. 1000 personoj), UEA-gvidantoj k. a. vizitis u. Bjelostok, kie oni organizis mitingon kaj difinis lokon por konstruado de internacia E-Centro, subskribis akton pri la temo inter reprezentantoj de UEA kaj polaj funkciuloj; estas akceptita tiel nomata Deklaracio de Bjelostok, kiu poste estis aprobita en UEA-Komitato kaj proklamita dum la solena fermo de la Kongreso. Tiu ĉi deklaracio pere de UN-representantoj en Novjorko estos transdonota al ĉiuj registaroj de la mondo.

Tio ĉi estis kongreso de kongresoj, festivalo de festivaloj. Riĉis kultura programo, ekz. prezentitaj estis 28 teatraĵoj, kiujn partoprenis 680 aktoroj, 10 koncertoj, pola vespero, internacia arta vespero, multnimbraj filmoj, ekspozicioj, moviĝanta ekspozicio de UEA dediĉe al la 100-jara jubileo k.t.p.

Ĉiutage estis eldonata kongresa bulteno "Kongresa Kuriero".

Dum la Kongreso funkciis riĉa librovendejo de E-literaturo el la tuta mondo, organizita de UEA. Dum la semajno estis venditaj E-libroj por la sumo 12 milionoj da polaj zlotoj.

Bulgara E-Asocio estis proklamita la plej aktiva nacia E-Asocio dum 1986.

Tutmondaj amaskomunikiloj montris veran intereson al la Kongreso, 144 ĵurnalistoj el multaj landoj estis akredititaj ĉe la Kongreso, okazis kelkaj gazetaraj konferencoj antaŭ, dum kaj post la Kongreso. La laboron de la Kongreso prilumis NBS, Reuter, PAP, Sinfua, AP, DPA¹⁴⁵, Hungara Televidkompanio k. a.

Rezulte de la Kongreso oni akceptis 3 rezoluciojn: unu pri internaj problemoj de internacia E-movado; alian — pri la ĉeftemo de la Kongreso; la trian — tiel nomatan "Deklaracion de Bjelostok".

Dum la solena fermo de la kongreso estis anoncitaj rezultoj de Belartaj konkursoj de UEA. La unua loko en la branĉo "originala poezio" estis aljuĝita al Jevgenij Belonenko (USSR).

En Pollando estis aperigita speciala poŝtmarko dediĉe al la kongreso kaj centjara jubileo de Esperanto. Poŝtmarkoj aperis ankaŭ el Bulgario, GDR, Kubo, San-Marino, Ĉinio, USSR (surkoverte) k. a.

En la raporto pri agado de UEA-Estrarano dum 1986, kiu estis disvastigita inter la Kongrespartoprenintoj, 6-foje pozitive estis menciita la agado de Sovetiaj Esperantistoj, inter la cetera oni esprimas domaĝon, ke dume ASE restas ekster UEA.

En la laboro de la Kongreso aktive partoprenis socialismaj landoj. Escepte grandan intereson oni montris al agado de sovetiaj esperantistoj.

¹⁴⁵ Diversiandaj informagentejoj.

La kongreso montris emon de esperantistoj al pacmovado, kiunlaboro, interkompreniĝo, amikeco inter popoloj.

Por pli detala konatiĝo kun la pensoj kaj ideoj, dominintaj dum la kongreso, estus utile konatiĝi kun jenaj rusigitaj dokumentoj (mi esperas, ke moskvanoj prezentos la tradukojn):

1. Prelego de H. Tonkin (aprile ĉ.j. antaŭ esperantistoj de Svedio (estas publikigita en la Kongreslibro);

2. Prelego de H. Tonkin dum la matena solena malfermo de la kongreso (estas publikigita en "Kongresa kuriero", ankaŭ oni aperigos ĝin en septembra numero de "Esperanto"0;

3. Prelego de H. Tonkin dum vespera malfermo de la kongreso (estos publikigita en la revuo "Esperanto");

4. Prelego de R. Malinovski dum la solena malfermo de la kongreso (estis publikigita en "Kongresa kuriero", ankaŭ oni aperigos ĝin en "Esperanto");

5. Prelego de N. Kassar dum la solena malfermo de la kongreso (estas publikigita en "Kongresa kuriero", estos aperigita en "Esperanto");

6. Prelego de L.Z. Zamenhof (nepo de la aŭtoro de Esperanto) dum la solena malfermo de la kongreso (estas aperigita en "Kongresa kuriero", ankaŭ oni presos ĝin en "Esperanto");

7. Du rezolucioj kaj Deklaracio de Bjelostok (estos aperigita en "Esperanto"; la Deklaracio de Bjelostok estas publikigita en "Kongresa kuriero").

La sovetiaj esperantistoj estis reprezentitaj de oficiala delegitaro de ASE, kien eniris 4 personoj (M. Isajev, D. Perevalov, V. Venigin, L. Skupas), du specializitaj turistaj grupoj de esperantistoj (entute 70 personoj), kelkdek esperantistoj partoprenis la kongreson laŭ la privataj invitiĝoj. Necesas substreki, ke sovetiaj esperantistoj, krom ASE-gvidantoj, ne estis pasivaj observantoj de la kongreso (prelego de A. Vaitilavičius dum la Internacia Kongresa Universitato, paroloj de E. Raus kaj D. Perevalov dum kunsido de esperantistoj-komunistoj, paroloj de L. Skupas kaj D. Perevalov dum la Tago de Paco, arta programo de esperantistoj el Armenio, Kartvelio, Moskvo, Novgorod, Ĥmelnickij, Vorkuta k.a., paroloj de G. Goreckaja, J. Ojalo, L. Medvedev dum pridiskuto de la kongresaj temoj, parolo de A. Melnikov kaj aliaj dum kunsido de esperantologia konferenco, parolo de E. Ŝevĉenko kaj L. Medvedev dum kunsido de la Centro de Esploro kaj Dokumentado, parolo de D. Perevalov dum kunsido de MEM, renkontiĝo de sovetiaj esperantistoj kun afilandaj amikoj, prezento de du litovaj filmoj en Esperanto — "Ĉu vi plantis vian arbon?" kaj "Sociaj ŝanĝoj en vilaĝo", intervjuo de M. Isajev al APN-korespondanto kaj al redakcio de Pola radio en la rusa lingvo, intervjuo de L. Skupas por revuo de pola-soveta amikeco kaj multaj aliaj aktivecoj). Sed la partopreno de sovetiaj esperantistoj en la kongreso povis esti kelkfoje pli aktiva kaj efektiva.

Necesas noti jenajn principojn gravajn mankojn de la sovetia flanko:

1. Dum la solena malfermo de la kongreso ne estis reprezentita sovetia ambasadejo en Varsovio. Tiu ĉi faktoro taksis kiel lingvan diskriminacion flanko de USSR. Necesas noti, ke la respondeca sekretario de ASE L.J. Ŝanina, pravigante tion, certigas, ke UEA ne invitis reprezentantojn el la sovetia ambasadejo. Tiu ĉi certigo estas vera mensogo. La invitojn ricevis ĉiuj ambasadejoj, eĉ ne perpoŝte, sed pere de kuriero, sekve eventuala nericevo tute ne povis okazi. Inter alie, tion eblas tute facile kontroli.

2. De TASS-korespondanto ¹⁴⁶ en Varsovio oni eksciis, ke TASS-gvidantoj ne rekomendis informadi pri la laboro de la kongreso. Rezulte pri la kongreso, pri kiu vaste informadis la tuta mondo, en nia lando estis nur 2—3 scilgoj.
3. Kiel ni eksciis, SSOD fiaskigis partoprenon en la kongreso kiel honora gasto de doktoro de juraj sciencoj, laboranta en Instituto de la Ŝtato kaj Juro ĉe Scienca Akademio de USSR Z.M. Zamenhof, parenfino de la aŭtoro de la Internacia Lingvo Esperanto L. Zamenhof. Precipe strangas tiu ĉi historio, ĉar ĝuste ASE iniciatis la partoprenon de Z.M. Zamenhof (UEA invitis ŝin kiel honoran gaston, konsiderante pripagi ĉiujn elspezojn — mendis lokon en la plej bona hotelo de Varsovio "Viktorija", aĉetis kaj sendis en Moskvon aviadbiletojn tien-reen k.t.p.), sed SSOD-ASE ne informis Z.M. Zamenhof pri ĉio ĉi kaj enlistigis ŝin en la komuna turista grupo, egale kun la ceteraj. Dum la lasta tago antaŭ la forveturo Z.M. Zamenhof eksciis pri la mensogo kaj rifuzis veturi al la kongreso. Kaj denove L.J. Ŝanina certigas, ke de UEA ne estis invito por Z.M. Zamenhof, sed tio denove estas nenio ol vera mensogo. Kaj denove tio eblas facile kontroli.
4. "Inturist"¹⁴⁷ fiaskigis veturon de tri turistaj grupoj de alilandaj esperantistoj en USSR, kiuj post la UK en Varsovio devis viziti Moskvon, Leningradon kaj Vilnius. Ankoraŭ aprile 1986 ĝenerala direktoro de UEA S. Milojeviĉ dum vizito de Varsovio interkonsentis kun reprezentantoj de "Inturist" en Varsovio. Ĉio estis principe interkonsentite, "Inturist" promesis organizi la veturon en USSR. Tiu promeso validis ĝis lasta momento, eĉ numero de grupo, kiu devis viziti Vilnion ekde 01 ĝis 04 de aŭgusto 1987 jam estis (N 0502, respondeculo pri la grupo — Ladova Galina Vladimirovna el "Inturist"). Sed lastmomente "Inturist" rifuzis organizi la veturon en USSR.
5. Relative aktiva partopreno de sovetiaj esperantistoj en la kongreso okazis, ĉefe, dank' al iniciato de ordinaraj grupanoj kaj venintaj individue esperantistoj. La gvidantoj de la delegitaro kaj de la turistaj grupoj kaj antaŭ la veturo, kaj en Varsovio organizadis nenion. Ordinaraj esperantistoj, venintaj en Varsovion en la turistaj grupoj, kiuj pagis sufiĉe grandan monsumon (pli ol 500 rubloj por 7 tagoj), ankaŭ venintaj individue, estis multe pli aktivaj, ol oficialaj delegitoj aŭ gvidantoj de la turistaj grupoj, kiuj venis al la kongreso kontraŭ la mono de SSOD au anstataŭ aliaj esperantistoj kaj kiuj devus aktive partopreni la kongreson (M. Isajev, L. Ŝanina, V. Verigin, A. Zorin). Tiuj homoj tute ne interesiĝis pri la kongreso. Ili eĉ agitis kelkajn niajn esperantistojn ne partopreni la kongreson. Dum 7 tagoj ili estis en la kongresejo 2—3-foje po kelkaj minutoj. Jen estas kelkaj konkretaj ekzemploj:
 - ASE-Prezidanto Isajev M.I., kiu samtempe estas vicprezidanto de MEM opiniis nenecesa partopreni kunsidon de tiu internacia organizaĵo. Ĉiuj esperantistoj-pacaktivuloj miris pri tio;

¹⁴⁶ TASS — (ruse) Telegrafa agentejo de Soveta Unio.

¹⁴⁷ "Inturist" — tutlanda firmao, kiu monopole okupiĝis pri ĉiuj eksterlandaj vojaĝoj de sovetianoj kaj pri akcepto de eksterlandaj gastoj en USSR.

- ASE-Prezidanto Isajev M.I., kiu ŝatas ĉiufoje ripeti, ke sovetiaj esperantistoj devas okupiĝi nur pri pacmovado, ne vizitis aranĝojn dum la Tago de Paco;
- ASE-Prezidanto Isajev M.I. vizitis la unuan komunan UEA-kunvenon, dum kiu estis pridiskutata agado de UEA dum la jaro 1986, nur por 5 minutoj, post kio li ien foriris;
- ASE-Prezidanto Isajev M.I. la duan komunan UEA-kunvenon, dum kiu estis pridiskutata la kongresa ĉeftemo, tute ne vizitis;
- ASE-Prezidanto Isajev M.I. ne partoprenis kunsidojn de gvidantoj de naciaj E-Asocioj;
- ASE-Prezidanto Isajev M.I. ne partoprenis la oficialan akcepton ĉe la prezidanto de la Pola parlamento R. Malinovski, anstataŭ kio kune kun L. Ŝanina, A. Zorin kaj kelkaj aliaj, lasinte la grupon kaj la delegacion, li forveturis ekskursi en Krakov;
- ASE-Prezidanto Isajev M.I. ne partoprenis ankaŭ esperantologian konferencon, kunsidon de CED, kunsidon de komisiono pri laboro kun UN, kunsidon de E-Akademio k.a.
- ASE-Prezidanto Isajev M.I. ne partoprenis (ĉu aktive, ĉu pasive) aliajn ne malpli gravajn kongresajn aranĝojn. Rezulte — la ASE-Prezidanto partoprenis nur la solenan malfermon de la kongreso;
- La supre menciitajn aranĝojn ne partoprenis ankaŭ la respondeca sekretario de ASE L.J. Ŝanina, ASE-prezidanta membro de la delegacio V. Verigin, gvidanto de unu el la grupoj, respondeca sekretario de URF ASE A. Zorin;
- Gvidantoj de E-organizaĵoj el socialismaj landoj (Bulgario, GDR, Hungario, Pollando, ĈSSR) plurfoje plendis kontraŭ ASE-gvidantoj, precipe kontraŭ M. Isajev, L. Ŝanina, V. Verigin, kun kiu ne eblas kontakti kaj kunlabori; ke ili estas tute ne kompetentaj pri E-movado, ke kutime ĝuste ili reprezentas ASE dum la ĉiujaraj konsultiĝoj de E-organizaĵoj el socialismaj landoj, sed ili ne estas fidelaj partneroj, ili ĉiuj preskaŭ ne scipovas la lingvon Esperanto. Otte tiujn niajn gvidantojn oni simple priidas, rakontas anekdotojn pri ilia "agado". Tiuj personoj fakte kompromitas ASE, SSOD, nian landon entute. Multaj gvidantoj de e-organizaĵoj el soc. landoj simple ĉesis ajnajn kontaktojn kun tiuj, ĉar kunlabori ne estas eble. Ekzemple, ASE ne oficiojaĝigis sian reprezentanton al E-kongreso de GDR malgraŭ multnombraj promesoj. Tiu fakto estis konsiderata en GDR kiel vera ignoro de la E-agado en GDR. Dum la lasta periodo L. Ŝanina ĉesis ekspedi "Infombultenojn" de ASE al GDREA kaj respondis al ilia demando, ke la "Infombulteno" estas destinata nur por sovetiaj esperantistoj kaj ne estas permesata al ekspedo eksterlanden (malgraŭ ke en la kontrakto pri kunlaboro estas antaŭvidita interŝanĝo de presorganoj). Entute sovetiaj esperantistoj, krom la gvidantoj, estas popularaj en la socialismaj landoj;
- Saman rilaton al ASE-gvidantoj havas ankaŭ UEA-Estraro. Kiel antaŭe UEA havas grandan intereson al la agado de sovetiaj esperantistoj kaj grandan estimon al ili, krom la gvidantoj de ASE, ĉar ili scias pri la forta E-

movado en nia lando. Tio estis demonstrita multfoje, ankaŭ dum tiu ĉi kongreso, ekzemple, por sovetiaj esperantistoj estis fiksita minimuma kongresa kotizo, UEA donacis al sovetiaj esperantistoj multajn centojn da valoraj libroj k.t.p.;

- Grupo de sovetiaj esperantistoj en Varsovio estis ege malmultnombra. Por la komparo mi povas noti, ke el Bulgario la kongreson partoprenis proksimume 500 esperantistoj, el Hungario — same proksimume 500, el ĈSSR — ĉirkaŭ 300, el GDR — ĉirkaŭ 150, ne parolante jam pri Pollando. Oni diris, ke eĉ tiomnombra grupo el Sovetio ne venus, se prezidanto de la Pola parlamento R. Malinovski persone ne petus sovetiajn aŭtoritatojn organizi grandan grupon de sovetiaj esperantistoj por partopreni la kongreson;
- Estis multnombraj malglataĵoj (hotelo en Moskvo, financaj demandoj k.t.p.). Ekzemple, M. Isajev, L. Ŝanina dum la unua tago ne venis en la kongresojn, pro kio sovetiaj esperantistoj ne povis ĝustatempe registriĝi, tion ili povis fari nur la sekvan tagon... L. Ŝanina kaj aliaj ne interesiĝis pri la aferoj de la grupo, loĝis (7-persone) aparte en alia hotelo, ne venadis en la hotelon, kie estis lokitaj la ceteraj. Fine de la vojaĝo evidentiĝis, ke inter la delegitoj estas iu moskvano S. Lysanov, kvazaŭ reprezentanto de junularo. Neniu scias, kiel li trafis la delegitaron. Necesas noti, ke la personan konsiston de la delegitaro fiksas SSOD-gvidantoj, sed ne ASE, kiel devus esti;
- En la kongresejo per radio oni kelkfoje serĉis M. Isajev-on kaj aliajn ASE-gvidantojn, sed sen sukceso, ĉar en la kongresejo ili estis maloftaj gastoj. Okazinta kurtaj renkontiĝoj de M. Isajev kaj UEA-vicprezidanto Yosimi Umeda ne donis iujn rezultojn, ĉar M. Isajev ne havis rajtojn ion interkonsenti krom tio, M. Isajev ne povas libere paroli en Esperanto, ne parolante jam pri plena nekompetenteco pri la E-movado.
- Kontribuo de sovetiaj esperantistoj al la programo "100-jariĝo de Esperanto" estis vere tre modesta, ne respegulis niajn eblecojn kaj fortojn.

Mi ŝatus kurte informi vin pri la 43-a TEJO-kongreso, okazinta de la 17-a ĝis la 24-a de julio 1987 en pola urbo Krakov. Ankaŭ tiu kongreso estis la plej multnombra el ĉiuj antaŭaj junularaj E-kongresoj. Ĝin partoprenis pli ol 1000 junaj esperantistoj el 47 landoj.

Saluton al la kongreso transdonis alta protektanto ministro de Pollando pri junularo A. Krasnevski kaj prezidanto de Unio de polaj studentoj A. Dragan, ankaŭ vicurbestro de Krakov. Por kongresanoj estis prezentitaj bonegaj kondiĉoj. Ili rajtis senpage uzi urban trafikon, senpage vizitadi urbajn muzeojn.

Ĉeftemo de la kongreso estis "Homo kaj minaco de civilizacio". Estis multaj laboraj grupoj — pri esperantologio, pri loka evoluo, pri pacmovado, pri naturdefendo, pri novaj malsanoj... Estis prezentitaj multaj prelegoj. Vastis kultura programo de la kongreso (filmoj, spektakloj, koncertoj, ekspozicioj k.a.) Multnombris ekskursoj, ankaŭ en Osvencim, Zakopane kaj Velička. Estis riĉa libroservo. Ĉiutage aperadis kongresa bulteno.

Dum la kongreso kunsidis TEJO-Komitato kaj TEJO-Estraro. Dum la kongreso estis elektita nova TEJO-Komitato; prezidanto de TEJO fariĝis J. Kořmaluk (Pollando),

LETERO DE A.S. MELNIKOV

Al XIX-a Tutsovietia Konferenco de KPSU

24.05.88

Estimataj kamaradoj!

23.04.88 en la ĵurnalo "Veĉernjaja Odessa" ("Vespera Odeso") estis publikigita artikolo "Rehonorigo de Esperanto", en kiu temis pri deklaro de la lasta restinta viva membro de CK de SEU komunisto ekde 1932 k-do. A.I. Verŝinin. Li sinturnis al la Ĝenerala prokuroro de USSR kun la peto okazigi esploron pri la kontraŭleĝa ĉesigo de la SEU-agado en 1937¹⁴⁸, konfisko de ties materialaj kaj financaj rimedoj kaj ankaŭ pri persekutoj kontraŭ esperantistoj (kiam la kialoj de la persekutoj estis nur ilia partopreno en la E-movado).

Mi plene subtenas A.I. Verŝinin-on kaj volus aldoni, ke negativa rilato al Esperanto ne estas ĉesigita ĝis nun. Tion atestas, inter alie, la decido de CK KPSU pri la fondo de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE), en kiu estas substrekite, ke la celo de ASE-fondo ne estas subteno de evoluo kaj disvastigo de la E-movado, sed ĝia "ordigo" (legu: kontrolado). Do, ne hazarde laŭ sia propra Regularo ASE (unusola el ĉiuj E-organizaĵoj de la mondo!) NE celas propagandi kaj disvastigi Esperanton.

Gvidantaro de ASE, enoficigita de SSOD konforme al la celo limigi la E-movadon en USSR, perfekte plenumis tiun taskon, ne solvinte (principe) dum 9 jaroj eĉ ne unu problemon de la E-movado en nia lando (v. aldonon N 1).

Kiuj realan utilon havas Esperanto por la ŝtato kaj ajna persono?

Esperanto estas unika ilo de POPOLA DIPLOMATIO. Korespondado kun alilandaj esperantistoj, partopreno en internaciaj E-aranĝoj (ekde 1980 sen tiuj ne estas eĉ unu tago!), vizito de korespondamikoj (kun prelegoj en E-klubo) — jen estas tradicioj de internacia E-movado. Eĉ dum la plej malbonaj jaroj de stagnado¹⁴⁹ dum troigita suspektajmo sovietiaj esperantistoj diference de aliaj tavoloj de nia popolo havis konstantajn kontaktojn kun alilandaj samideanoj.

Esperanto estas efektiva kanalo por disvastigo de informoj pri kaj el USSR (ankaŭ en la landoj, kien per oficialaj vojoj sovietiaj eldonaĵoj, delegacioj k.s. ne povas trafi). Unue, esperantistoj, kiel "nacia minoritato", precipe atentis tion, kio aperas en tiu lingvo. Pro tio ĝuste presajo en Esperanto havas pli da ŝancoj esti legita, ol tiu en iu alia lingvo. Due, esperantistoj distingiĝas per plia socia aktiveco. En GDR inter esperantistoj estas duoble pli da partianoj, ol entute tra la lando. Inter anglaj esperantistoj, membroj de kontraŭmilitaj organizaĵoj, asocioj de kunhelpo al UN, komunistoj estas pli multe, ol entute tra la lando (procente). En 1986 estis 60 esperantistoj el 518 membroj de Eŭropa Parlamento (representantoj de Italio, Britio, Belgio, Nederlando, FRG, Francio, Danlando kaj Irlando).

Socia aktiveco de alilandaj esperantistoj estas vidata speciale en tio, ke, ricevinte materialojn el USSR, ili prezentas tiujn dum ekspozicioj, en siaj oficejoj kaj E-klubo, legante leterojn, registras radiolendojn kaj same aŭskultas dum siaj klubkursidoj (bedaŭrinde, Moskva radio ne faris konstruktivajn konkludojn post la provelsendoj en 1978, elvokintajn grandan intereson eksterlande). Kaj la E-redakcio de Varsovia radio okupis en 1985 la 1-an lokon inter la similiaj redakcioj en aliaj lingvoj laŭ ricevitaj leterecoj.

¹⁴⁸ Fakte en 1938 (Red.).

¹⁴⁹ Tiel nomata "stagna periodo" estas nomita la periodo de Brejnev-regado (Red.).

Ĝis la persekutoj en 1937 SEU ne nur faris grandan laboron por propagandi sovetian ideologion eksterlande (v. aldonon N 2), sed ankaŭ havis sufiĉan materialan subtenon: pere de organizita buroo de teknika helpo aŭtoroj el Bulgario, Japanio, Nederlando, Aŭstralio, Germanio, Britio k.a. senpage transdonis en USSR siajn inventaĵojn pri fervoja tekniko, avia konstruado, ŝtoffarbado k.s. Dum la stagna periodo de amasa apatio kaj blokado de Esperanto esperantistoj trapis ĉiujn pordojn, nur uzante entuziasmon fondis nenie registritan kaj aprobitan organizaĵon — SEJM, kiu agis multe pli bone, ol ASE, eldonadis popularan eksterocenzuran revuon ktp, malgraŭ ke ĉio ĉi ne nur postulis certajn fortojn, persistecon kaj tempon, sed povis malhelpi fari ofic-karieron, elvoki aliajn malagrablaĵojn.

Esperanto estas universala FORMO DE PERSONECA EVOLUO, enhavanta soci-politikan aktivecon (internaciisma praktiko, ankaŭ konstanta kontakto kun reprezentantoj de diversaj nacioj de USSR); amatora kultura agado (aŭtoroj kaj plenumantoj-esperantistoj ofte venkas dum diversaj neesperantistaj konkursoj; sovetiaj esperantistoj okupas unuajn lokojn en internaciaj E-konkursoj); turismo (en USSR ĉiujare okazas 30 — 50 interurbaj, tutuniaj kaj aliaj E-aranĝoj kun 2 — 4 mil partoprenantoj, reprezentantaj dekojn da nacioj de USSR); lernejo de interkomunikado, kies defcito nun tre sentblas, ktp.

Do:

1. Rilato al E-movado estas parto de ĝenerala politiko de la ŝtato kaj partio (vera subteno dum Lenin-periodo; persekutoj dum la Stalina; ioma plivigligo dum la Ĥruščova; obstrukco kaj kvazaŭhelpo dum la Brejneva). (Pri la rilato al Esperanto flanke de gvidantoj en socialismaj landoj v. la aldonon N 3).
2. Subteno de la E-movado estas pli grava por la ŝtato, ol por esperantistoj. Tio estas forlogado de la junularo de troa entuziasmo pri fremdaj lingvoj kaj kulturoj (sekve, malpliigo de influo de fremda ideologio, malfortigo de anglalingva hegemonio, vojo de efektiva propagando de niaj atingoj (brejnevanoj¹⁵⁰ finis "malsekretigon de iaj informoj" pri vera ŝtato de la aferoj; kion do timi dum la "perestrojko"?).
3. Potenciale eblecoj de sovetiaj esperantistoj estas ege grandaj. Ili povus fariĝi avangardo de internacia E-movado, kiu estas agnoskita kaj kunlaboras kun UNESCO, Tutmonda Packonsilantaro kaj aliaj gravaj internaciaj kaj naciaj organizaĵoj, influu tiel al pozicio de neesperantistaj organizaĵoj. (Ni notu, ke nur dum 1985 reprezentantoj de UEA partoprenis 70 kunsidojn de diversaj komitatoj de UN).
4. Jam nun Esperanto antaŭas milojn da lingvoj laŭ ties uzado dum internaciaj kontaktoj. Ĝi fariĝis la ĉefa laborlingvo de Akademio Internacia de la Sciencoj (San-Marino). En 1993 estas planata komerca uzado de maŝina traduko el ajna lingvo al la ajna pere de Esperanto. Nombro de superaj lernejoj, kie oni instruas Esperanton, pli ol 4-obliĝis ekde 1973 ĝis 1986 (ĝis 126), kaj kvanto da landoj — duobliĝis (ĝis 28).
5. Malgraŭ konformaj ordonoj, obstrukcon flanke de la gazetaro, praktike plena manko de lerniloj k.s. bremsaj faktoroj, KVANTO DE E-KLUBOJ EN USSR KRESKIS EKDE 1978 PROKSIMUME 4-OBLE (ekde 50 ĝis 200), kio atesta

¹⁵⁰ Eble, ne por ĉiuj estas komprenebla tiu esprimo "brejnevanoj". Tiuj estas L.I. Brejnev kaj liaj kungvidantoj.

pri vera intereso de sovetianoj al Esperanto. Vere gravas, ke la plimulto el esperantistoj en USSR estas junularo.

Konforme al la pli supre notita mi proponas:

1. Perigardi la pozicion de KPSU al la E-movado, agnoski ĝian socian utilon kaj rekomendi ĉiel helpi ties evoluon.
2. Postuli, ke gvidantoj de ASE, SSOD, VCSPS, CK VLKSM organizu ĝis la 1-a de oktobro Tutsovetian Konferencon de ASE, dum kiu ili devos raporti pri plenumo de decidoj de la antaŭaj konferencoj, laborplanoj; ellabori strategion kaj taktikon de estonta agado dum la "perestrojka" periodo.

Melnikov A.S.,
estraro de ASE

Aldono N 1

LA PLEJ GRAVAJ PROBLEMOJ DE SOVETIA E-MOVADO

1. Organiza agado. El tri kunfondintoj de ASE VCSPS kaj CK VLKSM plene retiriĝis de partopreno en ĝia laboro, kaj SSOD plenforte strebas sekvi tiun ekzemplon. Metodika helpo (des pli la materiala) flanke de ASE al primaraj organizaĵoj tute mankas. Fondo de provincaj, regionaj kaj urbaj filioj ne estas subtenata kaj tute mankas kompetentaj pri la E-movado funkciuloj surloke. Rezulte neniu povas solvadi lokajn problemojn de E-klubo. Ne estas plenumita paragrafo de la ASE-Regularo, laŭ kiu ASE havas juran rajton kaj financajn rimedojn. Ne estas aprobita problemo pri individuaj membroj en ASE, malgraŭ ke tio estas bezonata.

